

# La Sotesana Instruo

## 1 Enkonduko

1. Sotesano<sup>1</sup> atingis grandan iluminiĝon en la dudekoka de aprilo de la unua jaro de ŭonbulismo<sup>2</sup> (1916) kaj diris: “Ĉiuj estaĵoj enestas en unu esenco kaj ĉiuj instruoj devenas de unu fonto, en kio la vojo de eterno kaj la principo de karmo fundamentas unu la alian kaj formas unu rondaĵon.”
2. Sotesano post granda iluminiĝo tralegis sanktajn librojn de diversaj religioj. Leginte la sutron *Diamanto*, li diris: “Ŝakjamunio estas vere la sanktulo el ĉiuj sanktuloj. Mi iluminiĝis meminstruite, sed kiam mi retrorigardas mian proceson ekde la studmotivo ĝis la iluminiĝo, multas koincidoj kun liaj faroj kaj diroj, tial mi atribuas lin kiel la antaŭulon de mia darmo.” Li aldiris: “Kiam mi malfermos eklezion estonte, mi ĉefdoktrinigos la budhan darmon kaj konstruos tute senmankan kaj grandan eklezion en ĉi tiu mondo.”
3. Sotesano diris: “La budha darmo estas la granda vojo de la mondo. Ĝi klarigas la principon de vera naturo, solvas la gravan problemon de naskiĝo kaj morto, montras la principon de karmo kaj enhavas la vojon de praktikado, tial ĝi superas ĉiujn aliajn doktrinojn.”
4. Sotesano observis siatempan situacion kaj decidis la gvidprincipon per la slogano: “Jam progresas materio, ni disvolvu la spiriton.”
5. Kiam Sotesano unuafoje komencis instruadon, sekvantoj jam atingis la nombron de pli ol kvardek ene de kelkaj monatoj. El ili li elektis naŭ homojn aparte sincerajn kaj fidelajn kaj nomis ilin modelaj disĉiploj por la eklezifondo. Li diris: “Homo estas la mastro de ĉiuj estaĵoj kaj ili estas la uzaĵoj de homo, kaj en homa vojo bonvolo kaj justeco estas ĉefaj kaj intrigo estas flankaj. Tial al la principo konformas tio, ke homa spirito ja regas ĉiujn estaĵojn kaj la granda vojo de bonvolo kaj justeco establiĝas en la mondo. Sed lastatempe la ĉefaĵo perdas sian statuson kaj intrigo regas en la mondo, tiel ke la granda vojo tre malordiĝas. Nun ni unue kunigu niajn mensojn kaj volojn kaj ĝustigu la popolan menson malfortiĝantan tagon post tago. Vi bone komprenu ĉi tiun signifon kaj iniciatu la fondon de granda eklezio en la eterna mondo.”
6. Sotesano ellaboris la organizan sistemon de dekmembra grupo, per kiu eblas senescepte instrui ĉiujn homojn en la dekdirekta mondo, kaj diris: “Ĉi tio estas la rapida metodo egale trejni ĉiujn homojn nur per la instruo de unu instruisto kaj estas tiel simpla organizo, ke eĉ miriadoj da homoj gvideblas ĉiam nur per penado al naŭ homoj.” Li diris, organizinte la unuan grupon de la eklezio per la naŭ disĉiploj antaŭe elektitaj: “Ĉi tiu grupo organiziĝas

---

<sup>1</sup> Sotesano 소태산 少太山 (1891-1943): prononce derivita el la korea vorto *Sotesan*, alnomo de *Bak Ĝungbin*, fondinto de ŭonbulismo. Kutime ŭonbulanoj respekte nomas lin *Deĝongsa*, kiu signifas grandan majstron.

<sup>2</sup> Ŭonbulismo 원불교 圓佛敎: koredevena religio fondita de Sotesano en 1916. Ĝi, surbaze de budhismo, prenas kiel kredobjekton kaj praktikmodelon la darmkorpan budhon *Ilŭonsang*, kiu simbolas la veron. Ĝi instruas siajn kredantojn konscii la bonfarojn de ĉiuj estaĵoj en la universo kaj danki ilin kaj emfazas la ĝisdatigon, vivutiligon kaj popularigon de budhismo. Ŭonbulismo estas *ŭonbulgjo* en la korea kaj *Won Buddhism* en la angla. *Ŭon* signifas cirklon, per kiu Sotesano esprimis sian iluminiĝintan veron, *bul* signifas iluminiĝon, budhon kaj *gjo* signifas instruon. Tiel estas derivita la vorto ŭonbulo, kiu identas kun la darmkorpa budho *Ilŭonsang*. Ŭonbulejo: loko en kiu *Ilŭonsang* estas ensanktejigita, templo de ŭonbulismo; ŭonbulano: kredanto de ŭonbulismo; ŭonbuliko: scienco okupiĝanta pri ŭonbulismo; ŭonbulikisto: sciencisto okupiĝanta pri ŭonbulismo.

responde al la mondo en la dek direktoj: la estro respondas al ĉielo, la vicestro al tero kaj la aliaj ok anoj respektive al la ok direktoj. Larĝasence ĉi tiu grupo reprezentas la dek direktojn kaj mallarĝasence la dek direktoj integriĝas al unu korpo.” La estro estis Sotesano, la vicestro *Song Gju*<sup>3</sup> kaj la anoj *I Ĝeĉol*<sup>4</sup>, *I Sunsun*<sup>5</sup> *Gim Giĉon*<sup>6</sup>, *O Ĉanggon*<sup>7</sup>, *Bak Seĉol*<sup>8</sup>, *Bak Dongguk*<sup>9</sup>, *Ju Gon*<sup>10</sup>, kaj *Gim Gŭangson*<sup>11</sup>.

7. Sotesano prepare al la eklezifondo establis ŝparkason kaj diris al la grupanoj: “Ĉi tiu laboro, kiun ni entreprenas, ne fareblas por ordinara homo. Se la laboro estas tia, nepras apartaj pacienco kaj penado, des pli ni ĉiuj nun vivas malriĉe. Tial malfacilas starigi la fundamenton de nia laboro sen apartaj ŝparemo kaj laboremo en ĉiuj kampoj. Ni tutkore plenumu ĉiujn regulojn de la ŝparkaso, per kio ni montru fondmodelon al niaj posteuloj.” Unue li malpermesis al ili drinki kaj fumi kaj igis ilin ŝpari dankorizon<sup>12</sup> kaj ĉeesti komunan laboron.

8. Sotesano komencis polderigadon en *Giljongni*<sup>13</sup> kaj ĝin direktante diris al disĉiploj: “Vi, naŭ homoj, estas senspertaj en laboro kaj venis en la fondperiodo de granda eklezio, tial nun al vi multas nekutimaj suferoj, sed ankaŭ ne malmultas viaj plezuroj. Pli signifoplene estas iniciati ajnan laboron elportante suferojn ol nur gardi senpene laboron faritan de aliulo. La eklezio konstruata de ni estas granda eklezio neekzistinta en la pasinteco kaj malfacile videbla eĉ en la estonteco. Por konstrui tian eklezion ni devas elfari la doktrinon, kiu entenas la jenon: religio kaj scienco kunprogresu por malfermi vere civilizitan mondon; movo kaj senmovo akordu unu kun la alia por kunprogresigi studon kaj laboron; ĉiuj doktrinoj senescepte integriĝu por fari unu familion en reciproka harmonio. Tial nature ni tiel multe laboras por realigi ĉiujn punktojn senmakule.”

9. Kiam la grupanoj faris la polderigadon, iu riĉulo de najbara vilaĝo, vidante tion, tuj estigis disputon, submetis al la ŝtatoficejo petskribon por sia polderigado kaj frekventis la koncernan instancon. Tio tre maltrankviligis la grupanojn pri la eventuala problemo de terposeda rajto kaj do ili profunde malamamis lin. Sotesano diris: “Ŝajnas, ke ĉielo ekzamenas

---

<sup>3</sup> *Song Gju* 송규 宋奎 (1900-1962): ŭonbulana alnomo *Gongsan*, pastro, *gongsa* (honortitolita ŭonbulano, kiu atingis pli ol la gradon de diablovenka darmforto aŭ oficis kiel ĉefmajstro), ĉefdisĉiplo de Sotesano, ĉefmajstro de ŭonbulismo (1943-1962).

<sup>4</sup> *I Ĝeĉol* 이재철 李載喆 (1891-1943): ŭonbulana alnomo *Ilsan*, pastro, *debongdo* (honortitolita ŭonbulana pastro, kiu ricevis la plej altan noton de studa-labora merito), unu el la naŭ disĉiploj de Sotesano.

<sup>5</sup> *I Sunsun* 이순순 李旬旬 (1879-1941): ŭonbulana alnomo *Isan*, laiko, *dehobop* (honortitolita ŭonbulana laiko, kiu ricevis la plej altan noton de studa-labora merito), unu el la naŭ disĉiploj de Sotesano.

<sup>6</sup> *Gim Giĉon* 김기천 金幾千 (1890-1935): ŭonbulana alnomo *Samsan*, pastro, *gongsa*, unu el la naŭ disĉiploj de Sotesano, la unua disĉiplo, kiun Sotesano aprobis kiel naturvidinton.

<sup>7</sup> *O Ĉanggon* 오창건 吳昌建 (1887-1953): ŭonbulana alnomo *Sasan*, pastro, *debongdo*, unu el la naŭ disĉiploj de Sotesano.

<sup>8</sup> *Bak Seĉol* 박세철 朴世喆 (1879-1926): ŭonbulana alnomo *Osan*, pastro, *debongdo*, unu el la naŭ disĉiploj de Sotesano.

<sup>9</sup> *Bak Dongguk* 박동국 朴東局 (1897-1950): ŭonbulana alnomo *Juksan*, laiko, *dehobop*, unu el la naŭ disĉiploj de Sotesano, frato de Sotesano.

<sup>10</sup> *Ju Gon* 유건 劉巾 (1880-1963): ŭonbulana alnomo *Ĉilsan*, laiko, *dehobop*, unu el la naŭ disĉiploj de Sotesano, onklo de Sotesano.

<sup>11</sup> *Gim Gŭangson* 김광선 金光旋 (1879-1939): ŭonbulana alnomo *Palsan*, pastro, *debongdo*, la unua disĉiplo de Sotesano.

<sup>12</sup> Dankorizo 보은미 報恩米: rizo, varo, mono aŭ objekto ŝparita en ĉiutaga vivo, kiun oni oferas por publika laboro, profunde dankante la kvar bonfarojn.

<sup>13</sup> *Giljongni* 길룡리 吉龍里: malgranda vilaĝo, unu parto de *Jongsan*, kie Sotesano naskiĝis, kreskis, ilumiĝis kaj instruis dum la unuaj jaroj de ŭonbulismo, la unua sankta loko de ŭonbulismo.

nian penadon per ĉi tia disputo dumlabore okazanta. Ne tiriĝu de tio, nek malamu lin, nek plendu al li. Nepre venkos justo en la fino. Eĉ se nia penaĵo fariĝas lia posedaĵo, ni neniom hontas pri la konscienco kaj nia volo estas ĉiam agadi por homoj. Malgraŭ ke la finfarota poldero vaste ne uziĝos malsame ol ni komence planis, li ankaŭ estas unu el la homoj kaj estiĝas granda kampo por ĉi tiuj malriĉaj loĝantoj ĉemaraj. Ja tio ankaŭ donas profiton al homoj, ĉu ne? Ĉi-okaze transcendu la ideon pri memo kaj aliulo kaj penu diligente nur kun la volo labori por homoj, kaj la problemo nature solviĝos juste.”

**10.** *I Ĉunpung*<sup>14</sup> iun tagon vizitis kaj Sotesano demandis: “Kvankam tiuj homoj venis al mi por lerni moralon, mi ne instruas al ili ĝin, sed unue taskas al ili digokonstruon. Ĉu vi komprenas mian volon?” Li respondis: “Kiel do mi kun mallarĝa vido komprenus vian profundan volon? Tamen ŝajnas al mi, ke estas du kialoj: unu estas por igi ilin prepari sian studkotizon per ĉi tiu digokonstruo kaj la alia estas por pruvi, ke ĉio plenumebblas per unuanima kunlaboro.” Sotesano respondis: “Vi ĝenerale pravas, sed aŭskultu miajn pliajn volojn. Ili venas al mi por lerni, tial mi antaŭ ĉio devas scii, ĉu ili havas firman fidon aŭ ne. Mi povas ekscii ilin kun aŭ sen vera fido, kiam ili senspertaj en fizika laboro kampigas la marbordon malzorgitan dum dekmiloj da jaroj, alfrontante mokojn de najbaroj, kaj faras ĉi tiun laboron sufiĉe nekredoblan por ili. Vidante ilian laboron de la komenco ĝis la fino, mi povas scii, ĉu ili havas la forton fari ĉiujn laborojn en la estonteco aŭ ne. Spertante memprovizadon per konsumo ŝparo kaj diligenta laboro, ili povas ekscii la fonton de feliĉo. Farante ĉi tiun penigan laboron, ili sin trejnas al naturutiligo kaj povas akiri la propran forton venki ĉiujn suferojn. Mi kun ĉi ĉiuj voloj entreprenis ĉi tiun laboron.”

**11.** Kiam la grupanoj komplete finis la digokonstruon, ili interparolis: “Komence la laboro aspektis malfacila kiel konstruo de alta monto sur ebena grundo, sed nun ĝi estas finita kaj male aspektas facila. Tamen, kiel malfacilos atingi la vojon?” Sotesano aŭskultis tion kaj diris: “Vi nun ne scias la manieron atingi la vojon, tial vi diras tiajn vortojn. Se vi scias la manieron, tio pli facilas ol manĝado. Kiel do havi grandaniman kaj liberan mensostaton malfacilus kiel konstrui tiun digon? Se vi ne komprenas miajn vortojn, ilin bone memoru kaj ree pensu, post kiam vi ekscios la studmanieron.”

**12.** Kiam la unua templo de ŭonbulismo estis konstruita piede de la montpinto *Oknjobong*<sup>15</sup> en *Giljongni*, Sotesano skribis sur ĝia ĉeftrabo la jenan tekston: “Mi teksas rondajon per la suno kaj la luno, kaj ŝpinas la leĝon de printempo kaj aŭtuno,” kaj aldonis sube la jenan tekston: “Elstaras la pino, entenante la printempon de dek mil arboj; muĝfluas la rojo, kunigante la pluvgutojn de mil montpintoj.”

**13.** Sotesano diris al la naŭ grupanoj: “Nun materia civilizo prosperas tagon post tago, dum malfortiĝas la spirito de homo, kiu devas uzi materion. Tial ĉiuj individuoj, familioj, socioj kaj ŝtatoj ne povas teni sian stabilecon kaj homoj enfalos en senfinan suferon. Kiel do tion malatentus ni kun la volo savi la mondon? Ne malestis, ke sanktuloj kaj saĝuloj ĉiapene preĝis al ĉielo kaj tero por ĉiuj vivuloj kaj movis ĉielan volon. Nun estas la tempo por preĝi tutkore kaj ĉiapene al ĉielo kaj tero kaj movi ĉielan volon, por ke ĉiuj homoj ne menstiriĝu de materio, sed uzu ĝin. Via menso estas ĉiela menso. Se via menso tute koncentriĝas kaj neniom estas egoisma, ĝi unuiĝas kun la virto de ĉielo kaj tero kaj ĉio sukcesas laŭ via menso. Vi sciu, ke via menso havas la povon movi ĉielan volon, kaj ĉiam memoru ankaŭ, ke via korpo havas la respondecon savi homojn.” Li asignis al ili datojn kaj lokojn kaj petis de ili ĉiuj preĝadon.

**14.** La dudekunuan de aŭgusto de la kvara jaro de ŭonbulismo (1919) la pleja preĝopenado de la naŭ grupanoj, kiuj transcendis vivon kaj morton, fine montriĝis kiel la miraklo de

<sup>14</sup> *I Ĉunpung* 이춘풍 李春風 (1876-1930): ŭonbulana alnomo *Hunsan*, pastro.

<sup>15</sup> *Oknjobong* 옥녀봉 玉女峰: montpinto en *Giljongni*.

sanga fingropremaĵo. Sotesano vidis tion kaj diris: “Ĉielo kaj tero jam respondis al via sindona menso kaj la nevidebla vermondo nun prijuĝis nian laboron. Per tio komenciĝas nia sukceso. Nun via korpo estas dediĉita al la dekdirekta mondo. Se vi ne ŝanĝas ĉi tiun hodiaŭan menson dum ĉiu estonta laboro malgraŭ ĉiuj suferoj kaj malfaciloj aŭ pensas nur la hodiaŭan okazon eĉ ĉe viaj korinklino al la familio kaj situacio de la kvin deziroj<sup>16</sup>, vi ne tiriĝos de ili. Nu, vi kun sentiriĝa pura menso strebu nur al studo kaj laboro.” Sotesano donis al ili respektive ŭonbulanajn alnomon<sup>17</sup> kaj nomon<sup>18</sup> kaj diris: “Via nomo ĝis nun uzita estas sekulara kaj privata nomo, tial vi kun tiu nomo jam mortis. Nun mi donas al vi novan kaj publikan nomon kaj revivigas vin. Bonvole prenu ĝin kaj ĉiapene savu multajn homojn.”

**15.** Sotesano diris: “De nun nia lernaĵo estas la budha darmo kaj nia instruado al sekvantoj estas la budha darmo. Vi antaŭ ĉio klopodu esplori la esencon de ĉi tiu budha darmo kaj ilumiĝi pri ĝia vero. Mi jam sciis la veron de la budha darmo. Sed vi ankoraŭ ne atingis la kapablon analizi la veron kaj ankaŭ pro la plurjarcenta malbontraktiĝo de budhismo en ĉi tiu lando mankis respekto al iu ajn, kiu portis la nomon budhismo. Tial mi timis ne respektiĝi pro la fermitaj mensoj de homoj kaj eĉ ne parolis, ĉu la budha darmo estas justa aŭ maljusta, vera aŭ malvera, tiel ke mi precipe penis inspiri al vi nur kredon per senorda instruado laŭ via kapablo. Se ni volas trovi la fundamentan veron, atingi veran studon kaj konduki ĉiujn vivulojn al la du vojoj de saĝo kaj feliĉo, ni devas preni ĉi tiun budhan darmon kiel ĉefadon kaj krome budhismo fariĝos monda ĉefreligio en la estonteco. Tamen estonta budhismo ne tenos la saman sistemon kiel tradicia, sed havos oficon, terkultivon, metion kaj komercon kaj estos ĝenerale studata de homoj, ĉu laikoj, ĉu pastroj. Oni ne adoras nur limigitan budhofiguron kaj studo kaj laboro ne estos aparte unu de la alia, ĉar oni scios, ke ĉiuj estaĵoj en la universo kaj la malplena darmondo estas budho. Bonfaranto de monda afero estos bonstudanto de la budha darmo kaj reciproke. Ne estos aparte darmhalo kaj budho por fari adon, sed laŭ la laboro kaj deziro de adoranto estos loko kaj budho por fari adon. Se tiel, nenie ne estos darmhalo kaj budho, kaj budha bonfaro etendiĝos eĉ al herboj kaj arboj, tiel ke realiĝos neimageble ideala budholando. Miaj karaj! Malfacilas renkonti ĉi tian ŝancon malgraŭ dekmilionfoja tempocirkulado, sed vi feliĉe renkontis ĝin. Malmultas tiuj, kiuj rekonas ĉi tiun ŝancon, sed vi feliĉe rekonis ĝin kaj fariĝis fondintoj de nova eklezio. Ne rigardu vanaj miajn vortojn eĉ ne pruveblajn hodiaŭ, sed popaŝe iru laŭ ĉiu mia gvido, kaj vi povos vidi ilian efektivigon en la baldaŭa estonteco.”

**16.** Sotesano diris: “Budhismo kiel religio kun profunda rilato al Koreio multfoje estis kaj bonvenigita kaj malakceptita. Ĝi estis bonvenigita antaŭ plurjarcente kaj malakceptita de nelonge. Politika ŝanĝo kaj konfuceisma potenco puŝis bonzojn eniri en montojn kaj nenifare vivi malsekularan vivon, tial en ĝenerala socio malmultas sciintoj de la budha darmo, des pli iu sciinto diras jene. En belpejzaĝaj lokoj situas temploj. Tie estas bonzoj kaj budhofiguroj. Homoj en la mondo adorvitas lokojn, kie estas bonzoj kaj budhofiguroj, por peti feliĉon kaj senkulpigon. Bonzoj fariĝas disĉiploj de budhofiguroj kaj vivas solaj sen sia familio. Ili havas plenrazitan kapon kaj portas ĉifonan robon. Ili ĉantas budhonomon kaj voĉlegas sutron, rondeturnante rozarion en la mano. Ili kun dorsosako vagas por peti almozon. Kiam ili renkontas homojn en la mondo, ili salutas eĉ la plej malnobelan. Ili detenas sin de fumado, drinkado kaj viand- aŭ fiŝmanĝado. Ili mortigas nenium vivulon. Tamen bonziĝas ne nobeloj, riĉuloj kaj bonsortuloj, sed malbonsortuloj kaj

<sup>16</sup> Kvin deziroj 오욕 五慾: kvin bazaj deziroj de homo, t.e. la kvin deziroj de riĉo, sekso, manĝo, famo kaj dormo.

<sup>17</sup> Ŭonbulana alnomo 법호 法號: nomo aldonita al kredanto de ŭonbulismo por honori lian grandan meriton de studo kaj laboro.

<sup>18</sup> Ŭonbulana nomo 법명 法名: nomo donita al kredanto de ŭonbulismo ĉe lia membriĝo.

vivmalsukcesintoj. Se el la bonzoj iu bone studas kaj luminiĝas, li libere povas diveni la plej taŭgan lokon por loĝejo kaj tombo, alporti venton kaj pluvon, movi monton kaj transpaŝi riveron. Tamen tia povulo estas unu el mil aŭ dek mil. La budha darmo estas vana vojo kaj ĝin ne povas sekvi homoj en la mondo. Bone estas foje ekskursi al belpejzaĝaj lokoj. Se iu frekventas templon aŭ fariĝas bonzo, lia familio ruiniĝas. Kremacio malhelpas idojn. Bonzoj, kiuj kredas la budhan darmon, rigardiĝas kiel nekutimaj homoj. Sed jene estas la reala vivo de bonzoj. Ili estas for de la sufera mondo, konstruas purajn templojn en belpejzaĝaj lokoj, adoras dignoplenajn budhofigurojn. Ili solaj sen havi ĉirkaŭe parencojn apogas kun kelkaj samideanoj sian menson sur enpinara vento kaj superhedera luno. Ili estas ĉirkaŭataj de muziko natura kiel birda pepo kaj akvoflua sono en ĉiuj direktoj. Ili senzorge vivas de manĝo kaj vesto, kiujn ofertas kredantoj. Ili frapadante moktakon jen ĉantas budhonomon, jen recitas sutrojn. Ili sidmeditante eliras el pompa kaj impona domo kaj promenas en arbaro. Ne ĉiuj bonzoj, sed la plejmulto de ili tiel same vivis liberan, puran kaj laŭgustan vivon. Sed dum tia vivo daŭris, la superega vojo de budho ne povis diskonigi al la mondo kaj bonzoj enfalis en hinajanon<sup>19</sup>, solaj bonfarante nur al si. Kiel do tio estus la volo de budho? Tial la superega vojo de budho estas senŝanĝa, sed ni reformu parton de ĝiaj doktrino kaj sistemo kaj turnu malmultnombrajn budhismon en popolamasan, partian praktikadon en perfektan.”

**17.** Sotesano plu diris: “La superega vojo de budho estas senlime alta, profunda kaj vasta, tiel ke ne eblas priskribi buŝe kaj penike liajn saĝon kaj povon. Sed koncizadire ni scias nur la ekziston de naskiĝo kaj morto, sed ne scias tiun de multvivo, dum li plie sciis la principon sen naskiĝo kaj morto kaj la ekziston de senlima vivo tra la multviva eterno. Ni ne scias eĉ la fundamentan principon de nia memo, dum li plie scias tiun de ĉiuj estaĵoj en la universo. Ni ne povas klare distingi bonan vojon de malbona kaj enfaligas nin en malbonan, dum li sin savinte povas savi ĉiujn vivulojn en la dekdirekta mondo el malbona vojo al bona. Ni ne scias eĉ feliĉon kaj suferon kaŭzitaĵoj de ni, dum li scias feliĉon kaj suferon hazardajn kaj kaŭzitaĵoj de ĉiuj vivuloj. Kiam ne plu ĝueblas feliĉo kaj plezuro, ni povas nenion fari, dum li tiam povas ilin revenigi. Ni vivas laŭplaĉe, ĉu saĝo lumas aŭ mallumas, dum li povas lumigi mallumiĝantan saĝon kaj daŭrigi luman saĝon. Ni tiriĝas de avido, kolero kaj malsaĝo kaj misfaras multon, dum li tute ne tiriĝas de ili. Ni estas alkatenitaj nur al la ekzisto de ĉiuj estaĵoj en la universo kaj ne scias ilian neekziston, dum li povas scii neekziston en ekzisto kaj ekziston en neekzisto. Ni ne povas scii, ĉu estas la ses vojoj de ĉielula, homa, bataldemonaj, bestaj, malsatdemonaj kaj inferaj mondoj kaj la kvar naskuloj de vivonaskulo, ovonaskulo, humidnaskulo kaj transformiĝnaskulo, dum li scias eĉ la principon, ke ŝanĝiĝas la kvar naskuloj en la ses vojoj. Ni penas profitigi nur nin mem, eĉ damaĝante aliulojn, dum li faras ĉion en reciproka profito kaj en la nefarebleco de tio plezuraj per helpo al aliuloj spite siajn malprofiton kaj vivoperdon. Ni havas nur posedaĵon, loĝejon kaj familion reale limigitajn al ni, dum ĉiuj estaĵoj en la universo estas lia posedaĵo, la dekdirekta mondo estas lia loĝejo kaj ĉiuj vivuloj estas lia familio. Do ni akiru ĉi tiajn saĝon kaj povon de budho kaj strebu al vivulsavo.”

**18.** Sotesano plu diris: “La doktrino kaj sistemo de tradicia budhismo organiziĝis precipe por bonza vivo, tial ili ne konvenis al ordinaruloj en ĉiutaga vivo. Kredantoj en ĉiutaga vivo ne povis ĉefroli, sed estis kiel gastoj, tial al ili, malsame ol bonzoj, malfacilis enlistiĝi kiel senperaj disĉiploj de budho kaj prauloj de la budhana eklezio, krom se iu el ili havis distingitajn laboron kaj studon. Religioj traktas homojn, sed temploj estis konstruitaj en senhomaj montoj, tial homoj okupataj pri ĉiutaga vivo ne povis viziti templojn por ricevi

---

<sup>19</sup> Hinajano 小乘 *hinayana* (s.), laŭvorte malgranda veturilo, unu el la du ĉefaj budhanaj skoloj, floranta en Sri-Lanko, Tajlando, Birmo, Kamboĝo kaj Laoso. Ĝi emfazas precipe grandan asketismon kaj fidelecon al la primitiva doktrino por atingi absolutan liberiĝon.

instruon. Sutroj konsistis el idiotismoj kaj vortoj malfacile lerneblaj kaj kompreneblaj por ordinaruloj, tial ili estis malfacile instrueblaj ĉu por klerulo ĉu por malklerulo, ĉu por viro ĉu por virino, ĉu por maljunulo ĉu por junulo. Bonzoj forlasis profesion de ofico, terkultivo, metio kaj komerco kaj vivis de ofero, donaco kaj almozo, tial ne povis vivi ĉiuj homoj tiamaniere. Estis strikte malpermesite al bonzoj geedziĝi. Estis la instrukcio nur pri diversa formala adoro al budho, sed ne pri ĉiutaga etiketo. Kiel do direblus, ke ilia vivo estis vasta? Tial ni ne diferencigos pastrojn kaj laikojn per ĉefeco kaj flankeco, sed nur per la gradoj de iliaj studo kaj laboro. Ni ne diferencigos pastrojn kaj laikojn ankaŭ en la darmheredo. Ni establos templojn ie ajn laŭ kredantoj. Ni elektos kaj kompilos esencajn sanktajn librojn en facilaj vortoj lerneblaj por ordinaraj homoj. Ni igos pastrojn havi profesion laŭ sia cirkonstanco. Ni lasos ilin geedziĝi laŭvole. Ni ne sekvos ĉiun komplikan formalan adoron al budho, sed faros precipe realan adoron kaj pli instrukcios etiketon konvenan kaj utilan al ĉiutaga vivo. Ni igos escepte de speciala okazo pastrojn en la junaĝo lerni alfabeton, en la mezaĝo lerni religion kaj strebi al vivulsavo kaj en la maljunaĝo enloĝiĝi en bela kvietaj loko, fortranĉi mondajn korinklinojn kaj dezirojn, studi la gravan aferon de naskiĝo kaj morto, printempe-aŭtune rondviziti templojn en la mondo kaj instrui homojn kaj vintresomere denove absorbiĝi en sinkultivo. Tiamaniere ni forigu difektojn en la tuta vivo kaj laŭ la epoko kaj popola menso ankaŭ en la institucio funkciiganta ĉi tiujn doktrinon kaj sistemon.”

**19.** Sotesano plu diris: “En tradicia budhismo estas instruata aŭ sankta libro, aŭ konsidera medito, aŭ budhonoma ĉantado, aŭ preĝvorta recitado, aŭ albudha adoro. Sankta libro celas sciigi la doktrinon, sistemon kaj historion de budhismo. Konsidera medito celas komprenigi la okultan veron malfacile instrueblan per sankta libro kaj parolo. Budhonoma ĉantado kaj preĝvorta recitado celas igi novulon koncentri ĉagrenitan menson, ĉar li loĝanta en la ĉagrena mondo havas multajn korinklinojn kaj dezirojn kaj al li malfacilas eniri en ĝustan vojon. Albudha adoro celas realigi la volon de kredanto kaj ricevi lian helpon al budhana laboro. Ja ĉi ĉiujn objektojn kredanto devas lerni. Tamen iuj alkroĉiĝis al unu aŭ du objektoj el ili, formis diferencajn sektojn per la vojo de partia praktikado kaj malhelpis la kredon kaj praktikadon de kredanto. Tial ni unuigas ĉi ĉiujn objektojn. Ni studas multajn hŭadojn de medita sekto<sup>20</sup> kaj ĉiujn sanktajn librojn de sutra sekto<sup>21</sup>, forlasas ĉiujn komplikajn hŭadojn kaj sanktajn librojn kaj prenas kiel la objektojn de afera-principa esploro tiujn hŭadojn kaj sanktajn librojn, kiuj klarigas la ĉefan principon kaj esencon. Ni studas budhonoman ĉantadon, mediton kaj preĝvortan recitadon kaj prenas ilin kiel la objektojn de spirita kultivo por koncentri menson. Ni studas ĉiujn preceptojn, la kialon de repago kaj la vojon de la kvar bonfaroj kaj prenas ilin kiel la ĉiutagvive konvenajn objektojn de justaga elekto. Ni do igas ĉiujn kredantojn kunpraktiki ĉi tiujn tri grandajn objektojn. Ni igas ilin akiri la forton senobstakle klarvidi aferon kaj principon kiel budho per la studo de la objektoj de afera-principa esploro. Ni igas ilin akiri la forton netiriĝi de aĵoj kiel budho per la studo de la objektoj de spirita kultivo. Ni igas ilin akiri la forton distingi juston de maljusto kaj fari juston kiel budho per la studo de la objektoj de justaga elekto. Se ni igas ilin preni ĉi tiujn tri grandajn fortojn kiel la materialon por albudha adoro en ĉiutaga vivo kaj kiel la motoron plenumi ĉiujn volojn, nature unuigas ĉiuj doktrinoj kaj perfektigas la praktikado de kredanto.”

---

<sup>20</sup> Medita sekto 선종 禪宗: budhana sekto, kiu celas atingi iluminigon per medito.

<sup>21</sup> Sutra sekto 교종 教宗: budhana sekto, kiu celas atingi iluminigon per la studo de sanktaj libroj.

## 2 Doktrino

1. Sotesano diris: “Ĉiuj religifondintoj en la pasinteco enmondiĝis laŭtempe kaj instruis la farendaĵojn de homoj, sed ili diferencis inter si per ĉefinstruo laŭ epoko kaj regiono. Tio kompareblas kun diversaj fakoj en medicino. Do budhismo, prenante kiel sian ĉefinstruon la senformecon de ĉiuj estaĵoj en la universo, instruas la veron de eterno kaj la principon de karmo kaj klarigas precipe la vojon al luminiĝo el iluzio. Konfuceismo, prenante kiel sian ĉefinstruon la formon de ĉiuj estaĵoj en la universo, instruas la tri principojn<sup>22</sup>, la kvin homrilatojn<sup>23</sup> kaj la bonvolon, justecon, decon kaj saĝon<sup>24</sup>, kaj klarigas precipe kiel kultivi sin, estri familion, administri ŝtaton kaj pacigi la mondon. Taoismo, prenante kiel sian ĉefinstruon la naturan leĝon en la universo, instruas kiel nutri la naturon kaj klarigas precipe kiel teni sin en pureco, trankvilo kaj senfareco. Kvankam ili tri diferencas inter si per ĉefinstruo, ili samcelas ĝustigi la mondon kaj profitigi vivulojn. En la pasinteco ĉi tiuj tri religioj klopodis instrui nur sian fakon, sed en la estonteco ne eblos savi vastan mondon nur per parta instruo. Tial ni integrigas ĉi ĉiujn doktrinojn, unuigas en *Ilŭon* spiritan kultivon, aferan-principan esploron kaj justagan elekton kaj decidas ĉiun kurson per la kunperfektigo de korpo kaj spirito kaj per la kunfaro de studo kaj afero. Se iu ajn bone studas tiamaniere, li ne nur mastras la ĉefinstruojn de la tri religioj, sed ankaŭ komprenas la doktrinojn de ĉiuj aliaj religioj en la mondo kaj ĉiujn leĝojn en la universo, tiel ke li povas atingi la grandan vojon, kiu kuras al ĉiuj direktoj.”

2. Iu disĉiplo demandis: “Kion oni povas nomi granda vojo?” Sotesano respondis: “La vojo, kiun ĉiuj homoj de la mondo povas sekvi, estas la granda vojo de la mondo, dum la vojo, kiun nur malmultaj homoj povas sekvi, estas malgranda vojo. Niaj ĉefinstruo de *Ilŭon*, kvar bonfaroj, kvar nepraĵoj, tri studoj kaj ok punktoj sciendas kaj praktikeblas por ĉiuj homoj de la mondo, tial ili estas la granda vojo de la mondo.”

3. *Bak Gŭangĝon*<sup>25</sup> demandis: “Kia estas rilato inter *Ilŭonsang* kaj homo?” Sotesano respondis: “Ja vi demandas grandan veron. Nia eklezio adoras *Ilŭonsang* same kiel tradicia budhismo budhofiguron. Budhofiguro simbolas la korpon de budho, dum *Ilŭonsang* la menson de budho. La korpo estas nenio alia ol homfiguro, dum la menso estas tiel senlime vasta, ke ĝi povas inkludi eston kaj neeston kaj trapenetri la tri mondojn. Tial ĝi estas la fonto de ĉiuj estaĵoj en la universo kaj la nepriskribebla stato de koncentriĝo. Konfuceismo nomas ĝin la grandekstremo<sup>26</sup> aŭ la senekstremo<sup>27</sup>, taoismo ĝin la naturo aŭ la vojo kaj budhismo ĝin la pura darmkorpa budho. Sed ĉi ĉiuj havas la saman principon kaj fine revenas al la vero de *Ilŭon* tra iuj ajn direktoj kaj vojoj. Se iu nomata religio ne bazas sin sur tia vero, tiu estas malvirta vojo. Tial nia eklezio prenas la veron de *Ilŭonsang* kiel la modelon de nia reala vivo kaj klarigas la du pordojn de kredo kaj praktikado.”

4. *Gŭangĝon* plu demandis: “Kiel kredi je *Ilŭonsang*?” Sotesano respondis: “Tio estas, prenante *Ilŭonsang* kiel kredobjekton, kredi je ĝia vero kaj serĉi feliĉon kaj plezuron. La

---

<sup>22</sup> Tri principoj 삼강 三綱: unu el la kernaj doktrinoj de konfuceismo, la tri sekvendaj principoj inter reganto kaj regato, patro kaj filo, kaj edzo kaj edzino.

<sup>23</sup> Kvin homrilatoj 오륜 五倫: unu el la kernaj doktrinoj de konfuceismo, la kvin homrilatoj inter reganto kaj regato (justeco), patro kaj filo (amo), edzo kaj edzino (distingo), pliaĝulo kaj malpliaĝulo (ordo), kaj amikoj (fido).

<sup>24</sup> Bonvolo, justeco, deco kaj saĝo 인의예지 仁義禮智: kernaj virtoj de konfuceismo.

<sup>25</sup> *Bak Gŭangĝon* 박광전 朴光田 (1915-1986): ŭonbulana alnomo *Sungsan*, pastro, *ĝongsa*, filo de Sotesano, rektoro de la universitato *Wonkwang* (*Ŭonkiang*) (1951-1986).

<sup>26</sup> Grandekstremo 태극 太極: *taichi* (ĉ.), la realeco de la universa esenco.

<sup>27</sup> Senekstremo 무극 無極: *wuchi* (ĉ.), la senformeco kaj transcendo de la universa esenco.

enhavo de *Ilŭonsang* estas la kvar bonfaroj kaj tiu de la kvar bonfaroj estas ĉiuj estaĵoj en la universo. Ĉiuj estaĵoj en la mondo kaj la malplena darmmondo estas nenio alia ol budho. Tial ni iam ajn kaj ie ajn ne perdu timrespekton kaj kun pura menso kaj pia sinteno rilatu al ĉiuj aĵoj kiel al dignoplana budho. Ni penu fari albudhan adoron rekte al ĉiuj aĵoj kaj reale havigu al ni feliĉon kaj plezuron. Unuvorte ni turnu partian kredon en perfektan kaj superstiĉan kredon en realan.”

5. *Gŭangĝon* plu demandis: “Kiel praktiki *Ilŭonsang*?” Sotesano respondis: “Tio estas, prenante *Ilŭonsang* kiel praktikmodelon, sekvi ĝian veron kaj kultivi personecon. Iluminiĝinte pri la vero de *Ilŭonsang*, ni sciu senobstakle la komencon kaj finon, ĉefajon kaj flankajon de ĉiuj estaĵoj en la universo, la naskiĝon, maljuniĝon, malsanon kaj morton de homo kaj la principon de karmo. Ni nutru ĉiam la klaran naturon sen havi egoismon en menso kaj sen klini kaj submeti nin al korinklino kaj avido kiel *Ilŭon*. Ni faru nur ĝuste kaj senpartie ĉiujn agojn sen tiriĝi de plezuro, kolero, malĝojo kaj ĝojo kaj de proksimeco, malproksimeco, intimeco kaj malintimeco kiel *Ilŭon*, kiam ni uzas menson en ĉiuj situacioj. Iluminiĝi pri la principo de *Ilŭon* estas naturvido, gardi la esencon de *Ilŭon* estas naturnutrado kaj fari perfektan agon kiel *Ilŭon* estas naturutiligo. Tio estas ankaŭ la spirita kultivo, afera-principa esploro kaj justaga elekto, kiuj estas la esencaj vojoj de nia studo. Tio estas ankaŭ la tri studoj de precepto, koncentriĝo kaj saĝo, kiujn Ŝakjamunio instruis. Spirita kultivo estas koncentriĝo kaj naturnutrado, afera-principa esploro estas saĝo kaj naturvido kaj justaga elekto estas precepto kaj naturutiligo. Se iu ajn tutkore faras ĉi tiujn studojn, li atingas budhecon senkonsidere siajn edukitecon, inteligentecon, sekson kaj aĝon.”

6. *Gŭangĝon* plu demandis: “Se tiel, ĉu tiu desegnita *Ilŭonsang* enhavas en si la veron, povon kaj studmanieron?” Sotesano respondis: “Tiu cirklo estas unu modelo por almontri la veran *Ilŭon*. Tio estas same, kiel fingro almontranta la lunon ne estas la vera luno. Tial nepre per la tiumodela *Ilŭonsang* studanto devas trovi la veran *Ilŭon*, gardi la veran naturon de *Ilŭon* kaj uzi la perfektan menson de *Ilŭon*. Tiam lia vivo tute unuiĝas kun la vero de *Ilŭonsang*.”

7. Sotesano diris: “Resume la vero de *Ilŭon* estas malpleno, rondeco kaj justeco. En naturnutrado klarvidi la staton, kiu transcendas eston kaj neeston, estas malpleno; havi menson sen iro kaj veno estas rondeco; ne klini menson estas justeco. En naturvido scii, ke la vero de *Ilŭon* absolute malplenas je vorto kaj penso, estas malpleno; havi senlime vastan saĝon estas rondeco; ĝuste vidi kaj juĝi ĉiun aĵon estas justeco. En naturutiligo fari ĉiun agon sen penso estas malpleno; fari ĉiun agon sen alkroĉiĝo estas rondeco; fari ĉiun agon laŭ la meza vojo estas justeco.”

8. Sotesano diris: “Studantoj celas iluminiĝi pri la okulta vero por ĝin utiligi en reala vivo. Alie tio estas balasto. Nun mi parolos pri la darmkorpa budho *Ilŭonsang* konforme al reala vivo. Kiam vi renkontas *Ilŭonsang*, unue ĉiam prenu ĝin kiel hŭadon necesan por naturvido kaj budhiĝo. Due prenu ĝin kiel la modelon de perfekta praktikado en ĉiutaga vivo. Trie prenu ĝin kiel la objekton de vera kredo, sciante ke ĉiuj estaĵoj en la universo posedas la realan povon rekte doni feliĉon kaj punon. Kiam sciante de ĉi tia vero vidas *Ilŭonsang*, ĉiam li adoras ĝin kiel la portreton de gepatroj.”

9. Iu demandis: “Kiun budhon via religio adoras kiel la originan majstron?” Sotesano respondis: “La budhon Ŝakjamunio.” Li denove demandis: “Se tiel, kial *Ilŭonsang* anstataŭ lia figuro estas ensankteĵigita en via darmhalo?” Sotesano respondis: “Malfacilas efektive interpreti kaj instrui la pruvon, ke lia figuro donas al ni feliĉon kaj punon. Tamen *Ilŭonsang* montras la puran darmkorpan budhon. Ĉielo-tero, gepatroj kaj kunvivuloj estas la aperaĵoj de la darmkorpa budho kaj ankaŭ leĝoj estas donitaj de la darmkorpa budho. Ni povas iel ajn interpreti kaj instrui la pruvon, ke al ni feliĉon kaj punon donas ĉi tiuj ĉielo-tero,



gepatroj, kunvivuloj kaj leĝoj, tial ni adoras *Ilŭonsang* kiel kredobjekton.” Li denove demandis: “Ŝajnas al mi, ke vi nur vorte adoras Ŝakjamunion. Ĉu ne estas aparta adorceremonio al li?” Sotesano respondis: “Kvankam ni ne ensanktejigas lian figuron en la darmhalo, ni inspiras al kredantoj tutkore adori lin kaj samtempe substrekas, ke vera adoro al li estas respektive sekvi la esencan spiriton de lia instruo, laŭ ĝi uzi la ses sentorganojn kaj eterne heredigi kaj progresigi liajn darmon kaj laboron. Kiel do nur ensanktejigi lian figuron kaj fari matenan kaj vesperan adorceremoniojn nomiĝus adoro al li?”

**10.** Li plu demandis: “Por saĝuloj en ĉi tiu civilizita mondo ekstreme taŭgas efektive interpreti kaj instrui la fonton de feliĉo kaj puno, ensanktejiginte *Ilŭonsang*. Tamen estas la fakto, ke en ajna epoko tra la homara historio multas malsaĝuloj kaj malmultas saĝuloj. Ĉu por inspiri al malsaĝuloj kredon ne pli utilas ensanktejigi budhofiguron?” Sotesano respondis: “Mi pensas, ke se ni detale klarigas la pruvon, ke la darmkorpa budho, la kvar bonfaroj, donas al ni feliĉon kaj punon, eĉ la plej malsaĝa homo povas tion facile kompreni kaj kredi. Sed estas bone, se en budhofigurejo saviĝas tiaj homoj, kiuj ne povas vekti en si kredon sen budhofiguro. Tiam eblas savi kaj adorantojn de budhofiguro kaj tiujn de *Ilŭonsang*, ĉu ne?”

**11.** Li plu demandis: “Kia estas rilato inter *Ilŭonsang* kaj Ŝakjamunio?” Sotesano respondis: “*Ilŭon* estas la fonto de ĉiuj veroj kaj Ŝakjamunio estas instruisto, kiu iluminiĝis pri ĉi tiu vero kaj instruis ĝin al ni. Kvankam estas bona vero, ĝi ne utilas al ni sen tiu, kiu trovas kaj instruas ĝin. Kvankam li naskiĝis en ĉi tiu mondo, sen la vero de *Ilŭonsang* li ne povus fariĝi budho, nek estus materialoj por lia kvardeknaŭjara predikado. Tial ni prenas la darmkorpan budhon *Ilŭonsang* kiel la simbolon de la vero kaj Ŝakjamunion kiel la originan majstron kaj adoras egale la darmkorpan budhon kaj la homfiguran budhon. Sed ni devas scii, ke tio estas esprimo el la distinga vidpunkto inter *Ilŭonsang* kaj Ŝakjamunio, kaj ke *Ilŭonsang* kaj Ŝakjamunio ne estas du el la sendistinga vidpunkto.”

**12.** Iu disĉiplo demandis: “Kiel diferencas adori budhofiguron kaj *Ilŭonsang*?” Sotesano respondis: “Adori budhofiguron havas signifon nur en tio, ke postvenantaj disĉiploj memoras kaj respektas budhon, limigite al lia personeco, sed adori *Ilŭonsang* havas vere vastan kaj grandan signifon. Anstataŭ adori nur budhan personecon kiel kredobjekton, ni adoras kaj kredas ĉiujn estaĵojn en la universo kiel budhon kaj ĉe ili ni serĉas la fonton de ĉiuj feliĉoj, punoj, plezuroj kaj suferoj. Krome ni rekte prenas ilin kiel praktikmodelon kaj nutras perfektan personecon kiel *Ilŭonsang*. Tio estas ĝenerala diferenco.”

**13.** Sotesano diris: “Foje necese estis adori budhofiguron por la disvastiĝo de instruo, sed se konsideri pri la nuna kaj la estonta tempoj, fakte tio ne estas tiel. Homoj adoras tiun budhofiguron de jarmiloj, tial nun ili poiome seniluziiĝas pri ĝia potenco. Kiam ili plene seniluziiĝos, ili ne kredos ĝin sen scii la principon de la superega vojo nur tial, ke tia adoro estas vana. Kiel do tio ne malhelpus la disvastiĝon de instruo? Des pli ne malmultas homoj, kiuj adoras majestan budhofiguron nur por siaj vivrimedoj. Kiel do tio ne estus bedaŭrinda? Ni tial decidus adori la darmkorpan budhon *Ilŭonsang*.”

**14.** Sotesano plu diris: “En ĉi tiu epoko la tuta homaro pli kaj pli eniras en la maturan aĝon kaj ĝia saĝo disvolviĝas. Tial ĉiuj homoj komprenos feliĉon kaj punon ĉe plezura kaj sufera situacioj. Komprenante feliĉon kaj punon, ili serĉos la fonton de feliĉo kaj puno. Trovante ĝin, ili klare scios ilian signifon. Klare sciante ĝin, ili bone kredos ĝin. Se homo trovas kaj adoras kredobjekton efektive kompreneblan, li ĉu saĝa, ĉu malsaĝa povas havi trankvilan koron. Oni ne petu de aliulo sian albudhan adoron kiel en la pasinteco, sed plejparte mem faru tion. Kredanto sciu ĉiun manieron adori budhon. La principo de adormaniero estas ĉi tiuj doktrino kaj sistemo kaj ankaŭ sukceso post albudha adoro diferencas. Albudha adoro sukcesas nur per konstanta penado laŭsitua. Tial ĉu oni havas bonan aŭ malbonan rilaton, ĉu oni estas riĉa, nobela, malriĉa aŭ malnobela, ĉi ĉio rezultas el la bona aŭ malbona

albudha adoro farita tra la multviva eterno. Kiu havas multe da feliĉo kaj da saĝo, tiu ilumiĝas pri la principo de la darmkorpa budho *Ilŭonsang* kaj adoras kiel budhon ĉiujn estaĵojn en la universo kaj la malplenan darmmondon. Li klare distingas tempodaŭron necesan por sukcesi en albudha adoro. Li trovas la fonton de feliĉo kaj puno kaj al ĝi faras albudhan adoron, tial li nepre sukcesas en ajna voto. Ni do adoras la darmkorpan budhon *Ilŭonsang* ne por adori nur unu budhofiguron kiel budhon, sed por adori ĉiujn estaĵojn en la universo kaj la malplenan darmmondon kiel budhon.”

**15.** Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*<sup>28</sup>, iun tagon paro da maljunaj geedzoj preterpasante diris, ke ili iras al la templo *Ŝilsangsa*<sup>29</sup> por adori tian budhofiguron, ĉar ilia bofilino estas malbonkarakteraj kaj tre malservema. Sotesano aŭskultis tion kaj diris: “Vi scias adori nur budhofiguron, sed ne vivan budhon.” Ili demandis: “Kie estas la viva budho?” Sotesano respondis: “Via bofilino en via hejmo estas la viva budho, ĉar ŝi rekte povas servi aŭ malservi vin. Bonvolu adori unue ŝin.” Ili denove demandis: “Kiel ni povas fari tion?” Sotesano respondis: “Aĉetu objekton plaĉan al ŝi per tiu mono, kiun vi volas oferi al la budhofiguro, kaj servu ŝin kiel vi respektas budhon, kaj via adoro fruktos laŭ via penado.” Hejmenreveninte, ili sekvis lian konsilon kaj ilia bofilino fariĝis tre servema en kelkaj monatoj. Kiam ili denove venis kaj esprimis mil dankojn, Sotesano diris al apudaj disĉiploj: “Tio estas reala albudha adoro, kiu estas preĝi por feliĉo kaj senkulpigo rekte al la koncernato.”

**16.** *Gim Jongŝin*<sup>30</sup> demandis: “Ĉu ne estas alia krom reala adoro al la koncernaj kvar bonfaroj?” Sotesano respondis: “Estas du manieroj: unu estas adori rekte la koncernajn kvar bonfarojn, kion ni nomas reala adoro, kaj la alia estas vera adoro, kiu signifas adori la darmkorpan budhon pere de la senforma malplena darmmondo. Konforme al tempo, loko kaj situacio konstante utiligu ĉi tiujn du manierojn, ĝis vi sukcesos en via deziro, kaj nenio ne realigeblas, kvankam diferencas tempodaŭro.” Ŝi plu demandis: “Kiel mi faru veran adoron al budho?” Sotesano respondis: “Purigu viajn korpon kaj menson kaj ekhavu vian deziron direkte al la darmkorpa budho, kaj poste forigu ĉiujn pensojn kaj tutforte koncentru menson per medito, budhonoma ĉantado, sutra voĉlegado aŭ preĝvorta recitado. Tiam fine vi realigos vian deziron kaj samtempe atingos la grandan povon savi vivulojn en malbonaj vojoj kaj konverti centmilojn da maliculoj. Tamen por atingi tian povon vi ja devas verŝi tutfortan penadon kaj plejan sinceron.”

**17.** Iu disĉiplo demandis pri la respondiĝo de korkonfeso. Sotesano respondis: “Korkonfeso responde povas spontane ricevi neimageble grandan potencon laŭ penado. Malfacilas pruviti tion vorte. Tamen ekzemple, kiam vi ne povas facile forigi ofte leviĝantan malbonan menson, faru tutforte korkonfeson, kaj ĝi nature ne plu leviĝos kaj turniĝos en bonan menson. Kiam kontraŭvole vi ofte faras malbonon pro via pasinta kutimo, sincere konfesu vian pekon kaj tutforte ĵuru bonfari en la estonteco, kaj nature estiĝos la forto pentofari. Tio estas proksima pruvo de korkonfesa respondiĝo. Kiel en legendo aŭ historia okazintaĵo, la bambua ŝoso de priservema filo, la sanga bambuo de lojala kortegano aŭ la sanga fingropremaĵo de niaj naŭ homoj, ĉi ĉio rezultis el korkonfesa respondiĝo. Sed tiaj granda respondiĝo kaj grandioza potenco aperas nur tiam, kiam oni neniel rompas sian konfesitan voton kaj tutkore daŭrigas strebadon al la voto. Vi aparte memoru ĉi tiun punkton. Se vi tiel akiras firman mensforton, vi povas ankaŭ preni senliman ĉielan povon kaj elmontri potencon kiel ĉielo kaj tero.”

<sup>28</sup> *Bongneĝongsa* 봉래정사 蓬萊精舍: alia nomo de *Sokduam* en la monto *Bjonsan*, kie Sotesano loĝis de 1921 ĝis 1924 kaj elfaris la doktrinon kaj sistemon de ŭnbulismo, la dua sankta loko de ŭnbulismo.

<sup>29</sup> *Ŝilsangsa* 실상사 實相寺: budhana templo.

<sup>30</sup> *Gim Jongŝin* 김영신 金永信 (1908-1984): ŭnbulana alnomo *Jungtaŭon*, pastrino, *debongdo*.

**18.** Sotesano diris: “La tri studoj, la esencaj vojoj de nia studo, plej necesas kaj eĉ momente ne forlasendas por trejni nian spiriton kaj atingi perfektan personecon. Ekzemple ili estas nenio alia ol la tri necesajoj de korpo, t.e. vesto, manĝo kaj loĝejo. Nia korpo naskiĝinta en la mondo bezonas veston, manĝon kaj loĝejon. Se mankas unu el ili, difektiĝas nia vivo. Nia spirito bezonas por vivi la tri fortojn de kultivo, esploro kaj elekto. Se mankas unu el ili, ni ne povas plenumi ĉiujn laborojn perfekte. Tial surbaze de la kunperfektigo de korpo kaj spirito, mi sume nomas la ses grandaj esencaĵoj la tri necesajojn de korpo, t.e. veston, manĝon kaj loĝejon kaj tiujn de spirito, t.e. koncentriĝon, saĝon kaj agon. Ili havas neapartigeblan interrilaton kaj estas nia nura savŝnuro. Sed ordinaruloj scias gravaj nur la tri esencaĵojn de korpo, sed ne tiujn de spirito. Kiel do tio ne estus mallarĝa penso? Ni devas scii, ke fakte nature sekvas la tri esencaĵoj de korpo, se ni bone studas tiujn de spirito. Tio estas distingi ĉefajon de flankajo kaj realigi ilin.”

**19.** Sotesano diris: “Ordinaruloj pene serĉas nur veston, manĝon kaj loĝejon, sed ne ilian fonton. Tio estas vere korprema. Se por korpo necesas vesto, manĝo kaj loĝejo, des pli multe necesas la fortoj de koncentriĝo, de saĝo kaj de ago por spirito, kiu regas korpan vivon, ĉu ne? Nur se spirito havas ĉi tiujn tri fortojn, oni povas bone akiri veston, manĝon kaj loĝejon kaj atingi perfektan personecon. Nur se oni scias la fonton de sia menso kaj uzi ĝin laŭvole, oni povas sekvi pravan vojon por akiri veston, manĝon kaj loĝejon. Nur se oni liberiĝas de naskiĝo, maljuniĝo, malsano kaj morto, oni povas atingi la vojon de eterne. Nur se oni scias la principon de kaŭzo kaj efiko, oni povas serĉi saĝon kaj feliĉon. Tio estas la vera kaj eterna vojo solvi veston, manĝon kaj loĝejon. Tial la spiritaj tri esencaĵoj estas la bazo de la tri esencaĵoj de vesto, manĝo kaj loĝejo.”

**20.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnesio: “En tradicia budhismo sekto de budhonoma ĉantado ĉiam nur vokas budhan nomon, sutra sekto ĉiam nur legas sutrojn, medita sekto ĉiam nur sidmeditas kaj precepta sekto ĉiam nur obeas precepton. Sub la sama budhismo ili kritikis unu la alian. Sed ĉi ĉio konsistigas la tri studojn de precepto, koncentriĝo kaj saĝo, tial ni igas kredanton kunpraktiki ilin ĉiujn. Ni igas lin ĉiutage frumatene sidmediti kaj tage-vespere laŭ konvena tempo trejniĝi al sankta libro, prelego, diskuto, ujdo, principo de naturo, taglibro kaj budhonoma ĉantado. Kiu ajn tutforte penas tiamaniere, tiu povas akiri multoble pli grandan efikon ol per tradicia trejno.”

**21.** Sotesano plu diris: “Kiam ni lernas la tri studojn en sankta libro, ili diferencas inter si, sed en reala studo ili havas nedisigeblan interrilaton kiel la tridento de rastilo. Por spirita kultivo devas esti la kunlaboro de afera-principa esploro kaj justaga elekto, por afera-principa esploro devas esti la kunlaboro de spirita kultivo kaj justaga elekto kaj por justaga elekto devas esti la kunlaboro de spirita kultivo kaj afera-principa esploro. Tial la tristuda kunpraktikado celas reciproke kunigi la fortojn kaj senprokraste progresigi studon. Krome en trejnesio la interŝanĝo de opinioj pri studo celas saĝigi homojn egale kaj akirigi al ili grandan scion sen troa peno.”

**22.** Sotesano diris: “Studanto ĉiam devas konscii la tri studojn en miriadoj da situacioj de la mondo. Ili kompareblas kun la kompasoj kaj stiristo de ŝipo. Sen ili la ŝipo ne povas transmariĝi. Al homo malfacilas bone vivi en la mondo sen konscii la tri studojn.”

**23.** Sotesano diris: “Kompardire mia instruado iras de la branĉoj kaj folioj de arbo ĝis ĝia radiko kaj inverse. Ĉar mi instruas homojn laŭ ilia respektiva kapablo.”

**24.** *Song Dosong*<sup>31</sup> diris: “Antaŭe mi legis skribon de antikva sanktulo kaj aŭskultis klarigon pri ĝi. Tiam mi nur legis ĝin parkere kaj ne tute komprenis la veran signifon de moralo. Sed de post kiam mi fariĝis via disĉiplo, mi trovas min poiome luminiĝanta pri la vero, kvankam viaj skribo kaj diro samas kiel tiu antaŭe legita skribo kaj tiu antaŭe

---

<sup>31</sup> *Song Dosong* 송도성 宋道性 (1907-1946): ŭonbulana alnomo *Ĝusan*, pastro, *ĝongsa*.

aŭskultita diro. Mi scivolas, kial mi freŝe ekscias ĉi ĉion.” Sotesano respondis: “Malnova skribo kompareblas kun konfekcio, kiu estas malfacila por ĝuste konveni al la korpo de ĉiuj homoj, sed rekta lernado per buŝa transdono kaj kora ricevo kompareblas kun laŭmende farita vesto, kiu ĝuste konvenas al tiu de ili respektive. Kiel do la studo de menskultivo per la instruo konvena al la respektivaj kapablo kaj kondiĉo de ĉiuj homoj kompareblus kun tiu nur per tiu fiksita skribo?”

**25.** Iu pastoro diris: “De antikva tempo preskaŭ senesepte ĉiuj eklezioj instruas precepton. Mi pensas, ke male ĝi subpremas naivan naturon de homo kaj bridas spiritan liberon, tiel ke ĝi multe malhelpas instrui homon.” Sotesano demandis: “En kiu punkto vi havas tian penson?” Li respondis: “Ne malestas homoj en la mondo, kiuj senprave malakceptas religion pro sia nepovado kompreni ĝian veron. Tamen ne malmultas homoj, kiuj plejparte sentas doktrinon sanktecon, sed hezitas reale kredi religion pro precepto. Se ne estus precepto, tiaj homoj povus eniri en la kadron de savo.” Sotesano diris: “Vi bedaŭras nur ilian nepovadon eniri en la kadron de savo. Ĉu vi tamen ne pensas, ke tio povas havi grandan influon sur alian lokon? Nia eklezio havas la tridek preceptojn, sed eĉ unu el ili ne forstrekindas, tial ni igas kredanton plenumi ilin ĉiujn. Sed la tridek preceptoj ŝtupare doniĝas al kredanto laŭ lia studgrado. Kiam iu ajn membriĝas, li ne povas facile deturniĝi de sia kutimo havita en tiu mondo, tial ni donas al li unue dek preceptojn plenumindajn por li. Tuj post kiam li trapaŝas la unuan ŝtupon, ni donas al li po dek preceptojn. Kiam li perfekte plenumas la tridek preceptojn, ni ne donas al li plian precepton, sed liberlasas lin, ĉar tia homo anticipas distingas pravan agon de malprava kaj faras pravan. Sed ni neniel liberlasas netian homon. Kiel do ni same traktus spertulon kaj novulon? En la mondo pli multas malsaĝuloj, tial via ĵusa aserto taŭgas por unu aŭ du el dekmiloj da homoj. Kiel do ni neglektus dekmilojn da homoj per la instruo taŭga por unu aŭ du homoj. Se homo vivus sola, ne gravus lia laŭplaĉa ago, sed en la mondo ĉiuj leĝoj orde etendiĝas kaj la tuta socio egale rigardas. Se iu laŭplaĉe faras maljuston, kie do li povas stari? Mi pensas, ke homo ne deflankiĝas de homa vojo, nur se li atentis ĉiun sian agon, kvazaŭ li tretus maldikan riverglacion. Tial ni ne povas ne doni precepton al studanto.”

**26.** Sotesano vojaĝis al Busano<sup>32</sup>. Kelkaj kredantoj venis kaj diris: “Ni senlime respektas vian instruon, sed ĉiam rompas la unuan precepton, ĉar ni vivas de fiŝkaptado. Pro tio ni hontas kaj eĉ senkuraĝiĝas.” Sotesano respondis: “Ne ĉagreniĝu. Ja malfacilas ŝanĝi profesion en mallonga tempo. Kvankam vi kontraŭvole rompas unu el la tridek preceptoj, se vi tutkore plenumas la ceterajn preceptojn, vi faras dudek naŭ bonojn kaj aperigas senliman meriton en socio. Kiel do vi enirus en la kavon de peksufero, rompante eĉ la ceterajn plenumebajn preceptojn nur pro tio, ke vi ne povas plenumi la unu? Se vi fidele plenumas la ceterajn preceptojn, nature estiĝas la vojo plenumi ankaŭ la unu. Vi kun tia konvinko neniom hezitu studi.”

**27.** Sotesano ĉeestis trejnsesion kaj diris: “*I Inujhŭa*<sup>33</sup> nun havas grandan aspiron, tiel ke ŝi flankenlasas eĉ sian okupon kaj partoprenas jen darmkunvenon, jen trejnsesion. Ŝia fido ja estas grandioza. Tial mi permesas al ŝi ĉi tiun tempon anstataŭ premii ŝin. Se vi havas iun demandon, demandu min.” Ŝi demandis: “Kiel respondi, se iu demandas, kion oni instruas kaj lernas en mia religio?” Sotesano respondis: “Origine budhismo estas tiu religio, kiu sciigas al homoj la principon, ke menso kreas ĉion. Vi povas respondi, ke la principon oni instruas kaj lernas. Se oni scias la principon, oni povas solvi ankaŭ la principojn de eterno kaj de karmo.” Ŝi denove demandis: “Kiel studi, sciante la principon?” Sotesano respondis: “Oni ne igu menson maltrankvila, malsaĝa kaj maljusta en situacio.”

<sup>32</sup> Busano 부산 釜山: granda havenurbo, la dua granda urbo en Koreio.

<sup>33</sup> *I Inujhŭa* 이인의화 李仁義華 (1879-1963): ŭonbulana alnomo *Detaŭon*, laiko, *ĝongsa*.

**28.** Sotesano demandis *Gim Jongŝin*: “Kiam homo vivas en la mondo, kio plej gravas?” Ŝi respondis: “Mi pensas, ke vesto, manĝo kaj loĝejo.” Sotesano denove demandis: “Kiu plej gravas el viaj studobjektoj en lernejo?” Ŝi respondis: “Mi pensas, ke la studobjekto de sinkultivo.” Sotesano diris: “Vi pravas. Por korpa vivo gravas vesto, manĝo kaj loĝejo, dum por studo gravas sinkultivo, ĉar ili respektive estas la bazoj de vivo kaj de studo. Sed ne sufiĉas sinkultivo nur per la lerneja studobjekto de sinkultivo. Nenio povas elmontri la veran staton de sinkultivo krom religio, kiu prizorgas la studon de menskultivo. Tial ĉiam memoru, ke religia studo estas la mastro de ĉiuj sciencoj kaj la bazo de ĉiuj studoj.”

**29.** Sotesano demandis la partoprenantojn de trejnseio: “Se iu demandas vin, kion vi lernas ĉi tie, kiel vi respondas?” Iu respondis: “Mi respondas, ke ni lernas la tri grandajn fortojn.” Alia respondis: “Mi respondas, ke ni lernas la esencajn vojojn de homo.” Krome pluraj homoj esprimis malsamajn opiniojn. Sotesano aŭskultis ilin kaj diris: “La vortoj de vi ĉiuj havas sencon, sed ankaŭ mi aldonas kelkajn vortojn. Atente aŭskultu min. Ni devas respondi konforme al la personeco kaj sinteno de demandanto. Tamen ĝeneraldire mi respondas, ke mi instruas vin kiel uzi menson. Detaldire mi instruas klerulon kiel uzi scion, potenculon kiel uzi potencon, riĉulon kiel uzi riĉon, plendvivanton kiel vivi dankan vivon, malfeliĉulon kiel krei feliĉon, dependvivanton kiel vivi memstare, nelernscipovulon kiel lerni, neinstruscipovulon kiel instrui, kaj egoiston kiel vekti altruismon. Unuvorte mi instruas ilin nur ĝuste uzi ĉiujn talentojn, materiojn kaj mediojn.”

**30.** Sotesano plu diris: “Laŭ la evoluo de materia civilizo en la nuna mondo multe progresas scio kaj tekniko pri ofico, terkultivo, metio kaj komerco kaj multe luksiga ankaŭ vivaparato. Tial homo okul- kaj korraviĝas de ĉi tiu brila materio kaj ekstreme malfortiĝas lia spirito uzanta materion, tiel ke la spirito, kiu estas la mastro, male fariĝas sklavo de materio. Tio estas vere zorgiga fenomeno. Eĉ la plej bona materio male misuziĝas, se malĝustmensulo uzas ĝin; eĉ la plej bona talento kaj multa scio male damaĝas homojn, se malĝustmensulo uzas ilin; eĉ la plej bona medio male helpas pekadon, se malĝustmensulo uzas ĝin, ĉu ne? Kvankam brilas ĉiuj eksteraj civilizoj etendiĝantaj en la universo, ili aŭ bonigas aŭ malbonigas ĉi tiun mondon nur laŭ mensuzo. Se oni uzas menson ĝuste, ĉiuj civilizoj helpas la konstruon de paradizo. Se oni uzas menson malĝuste, tio estas same, kiel ĉiuj civilizoj donas armilon al rabisto. Tial vi denove veku vin, diligente lernu la uzmanieron de menso, kiu estas la mastro de ĉiuj instruoj kaj fariĝu la piloto de menso, kiu bone utiligas ĉion en reciproka profito. Sekve vi instru al homoj la stirmanieron de menso kaj materie kaj spirite klopodu konstrui vere civilizan mondon.”

**31.** Sotesano diris: “Estiĝas sendifekta mondo, kie kunperfektiĝas korpo kaj spirito, interno kaj ekstero, nur se oni interne akcelas spiritan civilizon kaj progresigas religion kaj ekstere akcelas materian civilizon kaj progresigas sciencon. Sed se kiel nuntempe oni emfazas nur materian civilizon kaj malzorgas spiritan, tio estas same, kiel oni enmanigas tranĉilon al senprudenta infano. Oni ne scias, kian katastrofon kaj kiam ĝi alportos. Alivorte tio estas kiel mensa invalido kun sana korpo. Se oni emfazas nur spiritan civilizon, tio estas kiel korpa invalido kun sana menso. Kiel do tia unuflanka mondo nomiĝus perfekta? Tial, nur se interna kaj ekstera civilizoj kunprogresas, fine estiĝas paca kaj komforta mondo sen difekto.”

**32.** Sotesano diris: “Homoj en la mondo ricevas senlimajn oportunecon kaj profiton en la vivo pro la du bonfaroj de materia kaj morala civilizoj. Tial ili ne povas ne danki inventistojn kaj moralistojn. Tamen materia civilizo donas oportunecon precipe al korpa vivo, tial ĝia efiko tuj montriĝas, sed ĝia merito havas limon. Morala civilizo trejnigas senforman menson de homo, tial ĝia efiko malrapide montriĝas, sed ĝia merito ne havas limon. Kiel do la granda forto savi vivulojn kaj kuraci la mondon kompariĝas kun tiu de materia civilizo, kaj kiel do la lumo ĉesus nur en unu mondo? Sed estas tre bedaŭrinde, ke

nunuloj ankoraŭ scias serĉi nur montriĝantan materian civilizon kaj malmultas serĉantoj de senforma morala civilizo.”

**33.** Sotesano diris: “En la pasinteco Ŝakjamunio rigore malpermesis al ĉiuj bonzoj vestiĝi bone, manĝi bonguste, loĝi komforte kaj ĝui mondan plezuron. Li instruis ilin plezuri nur per la trankviligo de korpo kaj menso, kiam vekiĝas deziro al monda plezuro. Sed mi instruas vin diligente fari pravan agon, konforme al viaj vivrimedoj vestiĝi, manĝi kaj loĝi, kaj foje amuzi vin por ripozo. Kiel do eblus instrui homojn nur per mallarĝa darmo en ĉi tiu tempo kun altaj inteligenteco kaj vivnivelo? Perfekta kaj harmonia budha darmo nepre uzendas senescepte por individuo, familio, socio, ŝtato kaj la mondo. Tio estas la kerno de mia darmo.”

**34.** Sotesano diris al homoj en *Jongsan*: “Oni diras, ke la nuna mondo havas tian civilizon, kiu neniam estis antaŭe. Tamen ni devas ne ebriiĝi nur de materia civilizo supraĵe pompa kaj oportuna, sed nepre pripensi ĝiajn difektojn kaj estontajn influojn. En la nuna mondo, ju pli alten progresas civilizo ekstere, des pli profunden enradikiĝas malsano interne. Se tio estas tiel lasata, la mondo estonte enfalos en danĝeron nesaveble. Tio igas mondantojn ne povi ne havi profundan zorgon. Kiujn malsanojn do havas la nuna mondo? La unua estas monavidemo. Homoj, kiuj ekscias, ke mono estas la plej necesa por atingi ĉiujn dezirojn kaj plezurojn de la vivo, taksas monon pli grava ol justeco kaj honto. Pro tio malfortiĝas ĉia morala energio kaj vundiĝas amikeco. Tio estas granda malsano. La dua estas plendemo. Individuoj, familioj, socioj kaj ŝtatoj rigardas nur aliulan kulpon sen rekoni sian kaj pensas nur pri sia bonfaro al aliulo sen memori sian ŝuldon al aliulo. Ili malamas kaj plendas unu la alian, tial neniam ĉesas batalo ĉu granda, ĉu malgranda. Tio estas granda malsano. La tria estas vivdependemo. La malsano estas pli serioza ĉe nia popolo pro la malbono de molkoreco plurjarcente daŭranta en ĉi tiu lando, tial infano de riĉa familio volas vivi nenifare kaj havanto de riĉa parenco aŭ amiko volas vivi de lia havaĵo, tiel ke dek homoj volas vivi per la laboro de unu. Tio estas granda malsano. La kvara estas nescipovo de lernado. Naŭ dekonoj de la homa personeco formiĝas per lernado. Kiel abelo kolektas mielon, oni devas nepre klini sin kaj lerni scion necesan por si de homo el ajnaj kampo kaj klaso. Tamen el la homoj en la mondo multas tiuj, kiuj maltrafas sian lernoŝancon pro malinda memfiereco. Tio estas granda malsano. La kvina estas nescipovo de instruado. Se eĉ la plej multescia homo ne scipovas utiligi sian scion aŭ instrui ĝin al posteuloj, lia scio estas nenio alia ol nescio. Tamen el la homoj en la mondo multas tiuj, kiuj mem estas tiel fieraj kaj laŭdemaj pri sia ioma scio, ke ili eĉ ne volas asociiĝi kun nesciuloj. Tio estas granda malsano. La sesa estas egoismo. Egoismo daŭranta milojn da pasintaj jaroj estas firma kiel arĝenta monto kaj fera muro, tial ne nur malmultas esence sindonuloj, sed ankaŭ estas tiaj homoj, kiuj por sia famo provizore faras publikan laboron, sed ĉesigas ĝin post nelonge pro la revekiĝo de egoismo. Tial preskaŭ ruiniĝas ĉiuj institucioj por la publika bono. Tio estas granda malsano.”

**35.** Sotesano plu diris: “Nu, por kuraci ĉi tiujn malsanojn, antaŭ ĉio ni devas instigi religian studon al homoj kaj instrui ilin kiel kontentiĝi per sia stato, kiel trovi bonfaron esence, kiel vivi memstare, kiel lerni, kiel instrui kaj kiel altruistiĝi. Tiel ni devas kune klopodi igi ĉiujn homojn interne ekzameni sin kaj kuraci sian malsanan menson kaj ekstere observi la mondon kaj kuraci malsanan mondon laŭ la diro, ke la unua travivinto de malsano estas kuracisto. La granda recepto por kuraci ĉi tiujn grandajn malsanojn estas la esencaj vojoj de homo, t.e. la kvar bonfaroj kaj la kvar nepraĵoj kaj de studo, t.e. la tri studoj kaj la ok punktoj. Kiam ĉi tiu darmo disvastiĝos tra la mondo, la mondo nature fariĝos sendifekta mondo kaj ĉiuj homoj fariĝos budhoj kaj bodisatvoj kaj ĝuos feliĉon en paradizo senkompare ideala.”

**36.** Sotesano diris: “Religio kaj politiko estas respektive kiel korfavora patrino kaj severa

patro en familio. Religio surbaze de moralo instruas la menson de homoj, anticipe gardas ilin kontraŭ peko kaj igas ilin bonfari, dum politiko surbaze de leĝo observas la rezulton de iliaj faroj kaj premias kaj punas ilin. Se korfavora patrino kaj severa patro scias kaj plenumas sian respektivan rolon, ilia infano nepre ĝuas feliĉon. Alie ĝi suferas malfeliĉon. Kiel feliĉo kaj malfeliĉo de infano dependas de la ago de iliaj gepatroj, tiuj de homoj dependas de la ago de religio kaj politiko. Kiel do ne gravus la respondeco de ni, kiuj celas savi vivulojn kaj kuraci la mondon? Tial ni devas unue scii nian doktrinon sufiĉe, kaj poste disvastigi ĝin al la mondo kaj ĝui feliĉan vivon egale kun ĉiuj vivuloj per bona kaj virta regado bazita sur vera moralo. Tiam nia respondeco estas plenumita.”

**37.** Sotesano diris al homoj en la ferma ceremonio de trejnsesio: “Dum ĉi tiu trimonata trejnsesio mi instruis al vi la manieron blovi venton. Ĉu vi komprenas la signifon de vento? Ĝenerale en la universo estas sudorienta kaj nordokcidenta ventoj kaj en la mondo estas ventoj de moralo kaj de leĝo. Moralo estas sudorienta vento kaj leĝo estas nordokcidenta vento. Ĉi tiuj du ventoj estas la principo de mondregado. Juristo, kiu direktas premion kaj punon, respondecas pri nordokcidenta vento, dum religiisto, kiu direktas edifon, rekte respondecas pri sudorienta vento. Tial vi nepre devas bone lerni la manieron blovi sudorientan venton kaj vaste sekvi la vojon de reciprokaj helpo kaj harmonio. Nu, kio estas la maniero blovi sudorientan venton? Tio estas la instruoj de ĉiuj budhoj kaj sanktuloj de antikva tempo kaj niaj nunaj doktrinoj. Ankaŭ diversaj lecionoj dum ĉi tiu sesio trejnus vin al la maniero. Kian venton vi blovos, reveninte al via hejmo? Kiel sankta kaj glora estos tio, se vi blovos tian sudorientan venton, kies varma energio samtempe revivigas ĉiujn vivulojn suferintajn en la severa malvarmo de vintro, kaj alportos trankvilon al terurita vivulo, dankemon al plendemulo, reciprokan helpon al vivulo kun reciproka konflikto, saviĝon al peksuferanto kaj reboniĝon al malvirtulo, tiel ke ĉiupaŝe vi harmoniigos familion, socion, ŝtaton kaj la mondon! Tio estas la celo de mia instruo kaj estas farenda por vi. Sed la influo de tia sudorienta vento ne realiĝas nur per prediko kaj persvado, sed nur tiam, kiam vi unue estigas ĉi tiun sudorientan venton en la fundo de via koro, harmoniigas menson kaj energion kaj praktikas ĉi tiun principon. Vi plu studu kaj vaste utiligu ĉiujn doktrinojn ĉi-sesie lernitajn kaj ĉiam estu mastroj de sudorienta vento, kien ajn vi iras.”

**38.** Sotesano diris: “Kiam religio kaj politiko kondukas la mondon, ili estas kiel la du radoj de ĉaro. La ĉaro ne povas bone veturi, se la du radoj ne funkcias, se eĉ unu rado estas difektita, aŭ se la ŝoforo estas mallerta ĝin veturigi. Kiel oni povas bone veturigi la ĉaron por ne perdi ĝian funkcion? Estas du manieroj. Unu estas ofte ripari ĝin, por ke ĝi ne fariĝu senutilaĵo, nek difektiĝu. La alia estas, ke ĝia ŝoforo bone konu vojon kaj sekure veturigu ĝin laŭvoje. Tiel same, se religio kaj politiko volas bone konduki la mondon, ili devas laŭepoke forigi korupton kaj malbonon kaj ilia gvidanto devas laŭpopolmense apliki leĝon kaj fari administron.”

**39.** Sotesano demandis: “Ni jam malfermis religian eklezion. Kiel ni povas plibonigi ĉiujn malbonojn en la pasinteco kaj bone instrui la mondon per ĉi tiu nova religio?” *Bak Deŭan*<sup>34</sup> respondis: “Ĉiu laboro plenumiĝas de proksime, tial ni devas unue plibonigi nian respektivan menson por plibonigi la mondon.” *Song Mangjong*<sup>35</sup> respondis: “Niaj doktrino kaj sistemo jam elfariĝis responde al la epoko, tial se ni nur praktikas ilin, la mondo nature pliboniĝas.” *Ĝo Songgŭang*<sup>36</sup> respondis: “Mi ankoraŭ ne tute komprenas vian profundan volon, sed via instruo estas ekstreme perfekta kaj egala, tial mi kredas, ke ĉiuj homoj

<sup>34</sup> *Bak Deŭan* 박대완 朴大完 (1885-1958): ŭonbulana alnomo *Jongsan*, pastro, *debongdo*.

<sup>35</sup> *Song Mangjong* 송만경 宋萬京 (1876-1931): ŭonbulana alnomo *Mosan*, pastro.

<sup>36</sup> *Ĝo Songgŭang* 조송광 曹頌廣 (1876-1957): ŭonbulana alnomo *Gjongsan*, laiko, ĉefdirektoro de Instituto de Budha Darma (1928-1937).

spontane pliboniĝas laŭ la granda fortune de la mondo.” Sotesano diris: “Vi ĉiuj pravas. Se homo volas plibonigi la mondon, li devas unue plibonigi sian menson. Se li volas plibonigi sian menson, devas unue esti la instruo por fari tion. Ni jam havas ĝin kaj vi scias la principon de ĉi tiu studo. Vi do pli strebu al la studo kaj nepre efektivigu nian hodiaŭan interparolaĵon. Se pliboniĝas ĉiu religio, pliboniĝas homa menso. Se pliboniĝas homa menso, pliboniĝas ankaŭ la politiko de lando kaj la mondo. Kvankam religio kaj politiko havas malsaman kampon, ili dorsoflanke havas nedisigeblan interrilaton kaj egale influas la bonon kaj malbonon de la mondo.”



## Praktikado

**1.** Sotesano diris: “Mi celas, ke vi recitu la ĉefajn punktojn de ĉiutaga praktikado matene kaj vespere ne por ripeti ilin laŭvorte, sed por memori iliajn signifojn kaj kontroli ilin en via menso. Ĝenerale unufoje tage kontrolu ilin kaj detale ĉiusituacie bone ekzameni ilin. Vi do kontrolu kaj rekontrolu, ĉu la mensogrundon estis maltrankvilo aŭ ne, ĉu la mensogrundon estis malsaĝo aŭ ne; ĉu la mensogrundon estis maljusto aŭ ne, ĉu vi akcelis kredon, sinkuraĝigon, scivolon kaj penadon aŭ ne, ĉu vi vivis danke aŭ ne, ĉu vi vivis memstare aŭ ne, ĉu vi lernis diligente aŭ ne, ĉu vi instruis diligente aŭ ne, ĉu vi servis aliulon aŭ ne. Tiel vi prizorgu kaj reprizorgu tion, ĝis tio spontane plenumiĝos sen via prizorgado. Estas dirite, ke homa menso estas tiel subtila, ke ĝi ekzistas, kiam oni kaptas ĝin, kaj ke ĝi malaperas, kiam oni lasas ĝin. Kiel do vi povas kultivi la menson sen prizorgado? Tial por realigi ĉi tiun prizorgemon mi starigis la atentaĵojn en ĉiutaga vivo kaj dum templa vizito kaj por esplorigi ilin starigis taglibron, tiel ke mi gvidis akvimunan praktikmanieron. Vi diligente studu laŭ ĉi tiu maniero kaj kiel eble plej rapide plenumu la grandan laboron de sanktuliĝo.”

**2.** Sotesano diris: “La unua rapida maniero akiri la kultivoforton ĉe movo kaj senmovo estas, ke kiam vi faras ĉiun agon, vi ne faru tian agon, kiu maltrankviligas kaj ravas vian menson, kaj estu for de tia situacio. La dua estas, ke kiam vi rilatas al ĉiu objekto, vi ne havu korinklinon kaj avidon al ĝi, sed ĉiam kreskigu indiferentecon por ĝi. La tria estas, ke kiam vi faras ĉi tiun agon, vi ne tiriĝu de tiu ago kaj reciproke, sed koncentriĝu nur sur la faratan agon. La kvara estas, ke kiam ajn vi havas liberan tempon, vi atentu ĉanti budhonomon kaj sidmediti. La unua rapida maniero akiri la esploroforton ĉe movo kaj senmovo estas, ke kiam vi faras ĉiun agon de homo, vi klopodu akiri scion pri la farata ago. La dua estas, ke vi klopodu interŝanĝi opiniojn kun instruistoj kaj samideanoj. La tria estas, ke vi klopodu solvi laŭ esplorordo demandon, kiu naskiĝas ĉe via vido, aŭdo kaj penso. La kvara estas, ke vi klopodu studi niajn sanktajn librojn. La kvina estas, ke kiam vi finstudis niajn sanktajn librojn, vi konsultu sanktajn librojn de ĉiuj ekzistantaj religioj kaj plimultigu vian scion. La unua rapida maniero akiri la elektoforton ĉe movo kaj senmovo estas, ke se vi scias justa iun agon ĉu grandan, ĉu malgrandan, vi faru ĝin spite al la vivoperdo. La dua estas, ke se vi scias maljusta iun agon ĉu grandan, ĉu malgrandan, vi ne faru ĝin spite al la vivoperdo. La tria estas, ke kiam vi faras ĉiun agon, vi ne malkuraĝiĝu de ĝia tuja neplenumiĝo, sed daŭrigu senĉesan penadon.”

**3.** Sotesano diris: “En la pasinteco religio substrekis nur studon ĉe senmovo, tial oni rigardis studon kaj laboron nekunfareblaj. Iu do forlasis sian familion kaj pasigis la tutan vivon en monto kaj alia nur legadu, eĉ ne rimarkante enkortan grenon foriranta pro pluvo. Kiel do tio estus perfekta studmaniero? Tial ni ne rigardas, ke studo kaj laboro estas du. Se ni bone studas, ni bone laboras, kaj reciproke. Tiel ni povas kontinue akiri la tri grandajn fortojn ĉe movo kaj senmovo. Vi strebu al ĉi tiu granda studo senĉesa ĉe movo kaj senmovo.”

**4.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Dum faka trejnsesio novulo povas senti sin sufera aŭ mallibera pro la regula vivo. Sed kiam lia studo pli kaj pli maturiĝas kaj liaj korpo kaj menso poiome trejniĝas, ne estas pli komforta kaj plezura vivo ol ĉi tiu. Kiam vi plenumas la tagordon, ĉiam vi kontrolu en la menso, ĉu vi vivas suferan aŭ komfortan vivon. Al sufervivanto ankoraŭ restas karma kondiĉo de la polvomondo kaj al komfortvivanto pli kaj pli malfermiĝas la pordo de budhiĝo.”

**5.** Sotesano diris: “Penado por ajna laboro dependas de tio, ĉu homo scias, kian rilaton al li havas la farata laboro, aŭ ne. Ekzemple homo diligente laboras por manĝo kaj vesto, ĉar li scias, ke ili havas rektan rilaton al lia vivteno. Malsanulo fidele penas kuraci sin, ĉar li

scias, ke la kuracado havas gravan rilaton al lia sankonservo. Studanto tutforte studas, ĉar li scias, ke la studo havas gravan rilaton al lia estonteco. Scianto de ĉi tiu rilato venkas ĉiajn malfacilojn renkontatajn dum studo kaj neniom plendas, eĉ se indiferekte traktita de instruisto aŭ samideanoj. Sed nescianto de ĉi tiu rilato ne havas la paciencon studi kaj facile havas senpravan malkontenton eĉ pri instruisto aŭ samideanoj kaj sentas, ke li studas kaj laboras kvazaŭ anstataŭ aliulo. Vi denove pensu aplombe, ĉu vi jam scias, kian rilaton al vi havas ĉi tiu studo.”

**6.** Sotesano diris: “Ĉasisto, kiu iras por kapti leonon aŭ tigron, ne pafas senbride fazanon aŭ leporon, eĉ se li vidas ĝin. Ĉar li timas, ke la deziro kapti malgrandan beston igas lin maltrafi grandan beston. Tiel same aspiranto de granda studo ne vekas en si malgrandan deziron, ĉar li timas, ke ĝi malhelpas lin realigi grandan aspiron. Do studanto, kiu celas budhiĝi, devas ignori ĉiujn mondajn dezirojn kaj ampasiojn por atingi la celon. Se iu ne povas fortranĉi malgrandan deziron kaj deflankiĝas de siaj grandaj voto kaj celo, li estas kiel ĉasisto, kiu kaptas fazanon aŭ leporon kaj fine maltrafas leonon aŭ tigron. Kiel do tio ne lamentindus? Tial mi petas grandaspiranton ne veki en si malgrandan deziron.”

**7.** Sotesano demandis la partoprenantojn de trejnesio: “Mi aŭdis, ke iu kredanto de la templo *Jonggŭang*<sup>37</sup> por gajni ioman tagsalajron laboris proksime de la templo en la tago de darmkunveno. Kiel vi pensas pri li?” Iu disĉiplo demande respondis: “Estas eraro, ke li rigardas nur monon grava kaj neglektas studon. Sed se liaj gepatroj, edzino kaj infanoj malsatus manke de tiutaga manĝo, ĉu ĝusta ago ne estus savi la familion de malsato kaj malvarmo malgraŭ lia unutaga foresto en la darmkunveno?” Sotesano diris: “Viaj vortoj ŝajnas pravaj, sed darmkunveno ne okazas ĉiutage. Se homo vere aspiras studon kaj alte taksas la valoron de darmo, li ĉiamaniere intertempe preparas la manĝon de darmkunvena tago. Ĝuste tiutage serĉi la manĝon montras, ke li jam neglektas studon kaj ne fidelas al darmo. Tial mi anticipe menciis tion en la atentajoj dum templa vizito. Eĉ se ne sufiĉas manĝo malgraŭ lia anticipa peno, estas principo, ke nature estiĝas manĝo, se li studas sen egoismo en la koro. Ekzemple, nur post kiam naskiĝas infano, eliĝas la patrina lakto antaŭe neeliĝinta kaj la infano kreskas suĉante tiun ĉieldotitaĵon.”

**8.** Sotesano diris al darmkunvenantoj: “Hodiaŭ mi sciigos al vi mongajnan manieron. Aŭskultu min bone kaj riĉigu vin. La maniero ne temas pri ekstera ia tekniko, sed pri interna mensuzo. Nia doktrino estas mongajna maniero. Vidu! Kiom da mono homoj en la mondo elspezas por vino, sekso kaj veto en ordinara vivo! Kiom da materio ili malŝparas pro vanteco kaj sinmontremo! Kiom da havaĵo ili perdas pro mallaboremo kaj malfidindeco! Se homo, kiu vivas laŭplaĉe sen sia vivmodelo, lernos ĉiun instruon en darmkunveno kaj plenumos eĉ nur kelkajn rekomendojn kaj malpermesojn, lia mono senprave elspezita ne plu ellasiĝos eksteren kaj interne pligrandiĝos lia havaĵo akirata pro diligento, ŝparemo kaj fidindeco. Tio estas mongajna maniero. Sed rigardante ke studo havas nenian rilaton al mongajno, homoj en la mondo diras, ke pro monmanko ne eblas studi, kaj ke por mongajno ne eblas darmkunveni. Kiel do tio ne estus nur unuflanka penso? Tial scianto de ĉi tiu principo konvinkiĝas, ke pro monmanko li devas pli diligente studi, kaj ke por mongajno li devas pli fidele darmkunveni, tiel ke li atingas la vojon al la kunprogreso de studo kaj vivo.”

**9.** Sotesano diris: “Ordinaruloj scias, ke nur sidmedito, budhonoma ĉantado aŭ sutrolegado ĉiam en kvietata sidado estas studo, sed ne scias, ke estas studo por trejniĝi en reala vivo. Kiel do ili sciis la grandan studon de interna trankvilo kaj ekstera trankvilo? Ĝenerale la granda studo estas unue esplori la principon de memnatura kaj scii ĝian staton origine senalkroĉiĝan kaj fari senalkroĉiĝan agon en reala vivo. Kaptinto de ĉi tiu vojo certe akiras

---

<sup>37</sup> Templo *Jonggŭang* 영광교당 靈光教堂: ŭonbulejo en la urbeto *Jonggŭang*.

grandan kapablon. Se laŭsituacie studanto ne tiriĝas de tiu ago dum ĉi tiu ago kaj reciproke, tio estas koncentriĝo. Se li serĉas saĝon dum ĉi tiu ago kaj dum tiu ago kaj orde faras ilin, tio estas studo de afera-principa esploro. Se li ne tiriĝas de maljusto dum ĉi tiu ago kaj dum tiu ago, tio estas studo de justaga elekto. Spontane akumuliĝas la kultivoforto, akiriĝas la esplorforto kaj naskiĝas la elektoforto, se li dum libera tempo dediĉas sin al koncentriĝo per budhonoma ĉantado kaj sidmedito kaj al esploro per legado de sanktaj libroj kaj ĉu kun ago, ĉu sen ago nur daŭrigas studon senĉese. Vidu! *Song Gju* de la membriĝo ĝis nun tutforte oficis jen en la centra sidejo, jen en loka templo kaj ne povis ĉeesti eĉ trimonatan trejnseesion. Sed se mi ekzamenas lian nunan kapablon, en la kultivoforto li preskaŭ ne havas korinklinon kaj avidon kaj malofte tiriĝas de plezuro, kolero, malĝojo kaj ĝojo kaj de proksimeco, malproksimeco, intimeco kaj malintimeco. En la esplorforto li ĝenerale analizas ĉiujn aferojn de justo, maljusto, profito kaj malprofito kaj ĉiujn principojn de granda, malgranda, esto kaj neesto. En la elektoforto li povas distingi juston de maljusto kaj faras juston je dek kontraŭ unu. Liaj leteroj skribitaj dum oficokupateco kaj senditaj al mi enhavas profundan veron kaj estas verkitaj facilstile kaj klarlogike, tiel ke ili apenaŭ havas korektindaĵojn. Post nelonge li akiros la sufiĉajn tri grandajn fortojn kaj fariĝos gravulo, kiu servas multajn homojn, kien ajn li iras. Tio estas la merito de lia senĉesa studo ĉe movo kaj senmovo. Tiel same vi tutforte strebu al iamajna medito ĉe movo kaj senmovo kaj sufiĉe akiru la deziratajn tri grandajn fortojn.”

**10.** Sotesano diris: “Kiam vi ne laboras, ĉiam prepariĝu por farota laboro. Kiam vi laboras, ĉiam havu la mensostaton de nelaboro. Se dum nelaboro vi ne prepariĝas por farota laboro, vi ne povas eviti konfuziĝon kaj renversiĝon fronte al ĝi. Se dum laboro vi ne havas la mensostaton de nelaboro, vi fine fariĝas homo alkatenita al la situacio.”

**11.** En diskutkunveno *Ĝon Umgŭang*<sup>38</sup> opiniis pri diferenco inter studanto kaj nestudanto: “Eĉ kiuj ne praktikas nian doktrinon, tiu utiligas la tri studojn en iu okazo. Tamen post la paso de tiama tiu okazo ili denove estas malatentaj kaj ne interesiĝas, tial ili neniel progresas en studo tra la tuta vivo. Sed ni, studantoj, kontinue praktikas la tri studojn senkonsidere movon kaj senmovon, laboron kaj nelaboron, tial ni nepre atingos grandan personecon, se ni diligente daŭrigas studon laŭ la instruo.” Sotesano aŭskultis kaj diris: “Viaj vortoj estas sencohavaj, sed mi pli detale klarigos la diferencon. Ekzemple ĉi tie sidas tri personoj: unu studas pri maŝino, la dua meditas kaj la tria sidas nenifare. Ili aspektas apenaŭ diferencaj en sido, sed granda diferenco montriĝos post longa tempo. La maŝinstudanto inventos ion, la sidmeditanto atingos la forton de koncentriĝo kaj la nenifaranto rikoltos nenion. Tiel same grande diferencas la rezulto de senĉesa penado por io ajn. Estas mia konato, kun kiu mi lernis dum kelka tempo en la infanaĝo. Li malmulte interesiĝis pri lernado, sed tiel ĝuis kantadon, ke li kantis malferminte libron kaj ankaŭ irante. Pasintjare mi vidis lin, kiu ankoraŭ ne ĉesigis sian kantadon ĝis la grizhariĝo kaj rolis kiel kaŝita fama kantisto. De la infanaĝo mi hazarde interesiĝis pri la vero kaj malmulte pri legado. Tial mi tage-nokte enpensiĝis nur pri la okulta principo, tial mi multfoje forgesis dormon kaj manĝon kaj dronis en profunda medito. El tia senĉesa penado rezultas mia ĝishodiaŭa vivo kun la vero. Konsidere ĉi tion, plej grave estas elekti vivdirekton, kaj se homo jam decidis sian ĝustan direkton, sindone daŭrigi penadon por la celo estas la fundamento de sukceso.”

**12.** Sotesano diris: “Kvankam multaj patriarkoj de medita sekto malfermis miriadojn da rimedoj kaj da poroj pri medito, unuvorte medito estas aperigi okultan saĝon en trankvila malpleno, forigante iluzion kaj nutrante veran naturon. Tial jene tekstas la principo de medito: ĝustas viglo en trankvilo, dum malĝustas inertece en trankvilo, kaj ĝustas trankvilo

---

<sup>38</sup> *Ĝon Umgŭang* 전음광 全飮光 (1909-1960): ŭonbulana alnomo *Hjesan*, pastro, *debongdo*.

en viglo, dum malĝustas iluzio en viglo.”

**13.** Sotesano demandis sidmeditantojn de trejnesio: “Vi nun meditas, tolerante dormemon. Por kio vi faras?” *Gŭon Donghŭa*<sup>39</sup> respondis: “La spirito de homo origine estas perfekta kaj brila, sed laŭ avidveka situacio ĝi disiĝas milbranĉen kaj dekmilfolien, tiel ke li perdas perfektan spiriton kaj samtempe malbriligas saĝlumon. Tial ni celas akiri la kultivoforton kaj saĝlumon, kvietigante aflikton leviĝantan kaj koncentrate menson disiĝantan.” Sotesano diris: “Se vi vere scias la meriton de spirita kultivo, vi mem fidele daŭrigas ĝin eĉ sen aliula rekomendo, sed atentu meditmetodon. Se vi estas malĝuste rapidema ne detale sciante la metodon aŭ ne povas ĝuste praktiki puran meditmetodon serĉante miraklan signon, vi dum studo povas malsaniĝi, dekliniĝi al malvirta vojo kaj havi pli da afliktoj. Tial por ne malĝuste studi ofte kontrolu vin laŭ nia meditmetodo kaj ĉiam demandu vian antaŭulon pri la proceso. Se vi diligente faras ĝustan studon, vi facile atingas la liberon de korpo kaj menso. Ĉiuj budhoj, sanktuloj kaj granduloj atingis tioman mensforton per ĉi tiu meditmetodo.”

**14.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnesio: “Nuntempe diversaj skoloj de medita sekto argumentas unu kontraŭ la alia pri meditmetodoj, sed mi alprenas el ili la metodon koncentri menson subabdomenen, tiel ke oni perfekte nur koncentru menson dum la tempo de spirita kultivo kaj foje esploru hŭadon laŭ konvena okazo. Ĉar iluminiĝo pri uĵdo ne rezultas nur el longa pripensado kun obtuza spirito, sed pli efika estas laŭokaza esplorado kun klara spirito.”

**15.** Iu disĉiplo demandis pri la principo de akvenergia supreniĝo kaj fajrenergia malsupreniĝo. Sotesano respondis: “La karaktero de akvo estas malsuprenflua, malvarma kaj pura, dum tiu de fajro estas suprenira, varma kaj malklara. Kiam homo en si vekas ĉagrenan penson kaj la energio leviĝas, varmiĝas la kapo, malklariĝas la spirito kaj sekiĝas la salivo. Ĉar la fajra energio supreniĝas kaj la akva malsupreniĝas. Kiam penso dormas kaj la energio kvietiĝas, malvarmiĝas la kapo, klariĝas la spirito kaj en la buŝo cirkulas la pura salivo. Ĉar la akva energio supreniĝas kaj la fajra malsupreniĝas.”

**16.** Sotesano diris: “Estas du vojoj akiri la kultivoforton. Unu estas kultivi temperamenton kaj la alia estas kultivi menson. Ekzemple la senmova menso, kiun soldato havas trejninte menson en reala batalo, rezultas el la ekstera kultivo de temperamento, kaj la senmova menso, kiun sinkultivanto havas en favora kaj malfavora situacioj venkinte diabloldaton en situacio de la kvin deziroj, rezultas el la interna kultivo de menso. Se soldato akiris la eksteran kultivoforton de temperamento, sed ne akiras la internan kultivoforton de menso, lia kultivoforto ne povas esti perfekta. Se sinkultivanto akiris la internan kultivoforton de menso, sed ne akiras la kultivoforton de temperamento en reala situacio, ankaŭ lia kultivoforto ne povas esti perfekta.”

**17.** *Jang Doŝin*<sup>40</sup> demandis Sotesanon: “Vi ĉiam diras, ke oni ne tiriĝu de tiu ago dum ĉi tiu ago kaj reciproke, kaj ke oni havu pacan kaj perfektan menson ĉiam en farata ago. Tial ni strebas al tio. Antaŭ nelonge mi, kudrante veston, dekoktis herban medikamenton. Mi donis la tutan atenton al la kudro kaj forbruligis la medikamenton. Se mi prizorgas la dekokton dum la kudro, mi tiriĝas de tiu ago dum ĉi tiu ago. Se mi atentis nur la kudron kaj malatentas la dekokton, mi denove fuŝas la medikamenton. Kio estas la ĝusta vojo al studo en ĉi tiu okazo?” Sotesano respondis: “Se vi tiam faris kudron kaj dekokton, ili ambaŭ estis sub via respondeco. Tutforte plenumi la respondecon estas perfekta koncentriĝo kaj vera studo. Se vi absorbiĝis nur en unu ago kaj fuŝis la alian agon, tio ne estas perfekta

---

<sup>39</sup> *Gŭon Donghŭa* 권동화 權動華 (1904- ): ŭonbulana alnomo *Dotaŭon*, laiko, *ĝongsa*, edzino de *Ĝon Umgŭang*.

<sup>40</sup> *Jang Doŝin* 양도신 梁道信 (1918- ): ŭonbulana alnomo *Huntaŭon*, pastrino, *ĝongsa*.

koncentriĝo, sed partia menso kaj malatenta faro. Tial se homo povas prizorgi samtempe dek aŭ dudek agojn sub sia respondeco, tio estas ne senatenta menso, sed perfekta menso kaj grava maniero studi ĉe movo. Tamen homo senprave klopodas fari nenecesajn penson, aŭdon, vidon kaj enmiksiĝon, tiel ke lia menso iras al tiu ago dum ĉi tiu ago kaj reciproke kaj vana iluzio neniam ĉesas. Do studanto devas eviti tion. Se homo samtempe faras eĉ miriadojn da agoj en unu tago sub sia respondeco, tio neniel malhelpas lian koncentriĝon.”

**18.** Sotesano diris: “Ĉu vi scias, kial via menso dum koncentriĝo estas jen maltrankvila, jen trankvila? Tion kaŭzas, ĉu vi juste faris ĉiun agon aŭ ne. Kiu faras justan agon, tiu trovas tion komence komplika kaj malfacila. Sed ju pli ĝin li faras, des pli grandanimaj kaj trankvilaj fariĝas liaj korpo kaj menso, tiel ke lia estonteco larĝe malfermiĝas kaj samtempe li bone koncentriĝas. Kiu faras maljustan agon, tiu trovas tion komence plezura kaj facila. Sed ju pli ĝin li faras, des pli komplikaj kaj suferaj fariĝas liaj korpo kaj menso, tiel ke lia estonteco ŝtopiĝas kaj samtempe li malfacile koncentriĝas. Tial, kiu volas complete koncentriĝi, tiu devas antaŭ ĉio forigi maljustan deziron kaj ĉesigi maljustan agon.”

**19.** Sotesano demandis *I Sunsun*: “Kiel vi studas, estante laiko?” Li respondis: “Mi penas trankviligi menson.” Sotesano denove demandis: “Kiel vi trankviligas menson?” Li respondis: “Mi nur penas teni ĝin trankvila, sed ne scias specialan manieron.” Sotesano diris: “Ĝenerale por homo estas la du tempoj de movo kaj senmovo kaj por akiri trankvilon estas la du vojoj de ekstera trankvilo kaj interna trankvilo. Ekstera trankvilo estas forigi la fonton de diablo spiritmaltrankviliga ĉe movo, nepre farante justan agon kaj ne farante malsaĝan kaj ĉagrenan agon. Interna trankvilo estas nutri la perfektan originan spiriton ĉe senmovo, dormigante leviĝantan aflikton per sidmedito, budhonoma ĉantado aŭ ajna maniero. Ekstera trankvilo kaj interna trankvilo bazas unu la alian, tial oni povas akiri la veran trankvilon de menso nur per kunpraktikado de ambaŭ.”

**20.** *Song Dosong* tiel ŝatis legi ĵurnalon, ke por legi ĝin li ĉesigis eĉ sian faratan laboron, kaj ke kiam li havis urĝan laboron, li devis legi almenaŭ artikoltitolojn por trankvile eklabori. Iun tagon Sotesano admonis lin: “Vi tiel forlogiĝas al negrava ĵurnallegado, tial mi zorgas, ĉu vi tiel agas ankaŭ por alia afero. Ĉiu homo havas ŝatataĵon kaj malŝatataĵon. Renkonte al sia ŝatataĵo ordinarulo tiriĝas de ĝi kaj perdas perfektan kaj veran menson. Renkonte al sia malŝatataĵo li tiriĝas de ĝi kaj forgesas homan devon kaj devias de ĝusta vojo kaj alportas al si aflikton kaj suferon. Tia homo neniam povas atingi la trankvilon kaj saĝlumon de spirito. Mia admono pro ĉi tiu bagatelo celas montri al vi la fakton de spirita tiriĝo. Vi nepre tiriĝu nek de via ŝatataĵo, nek de via malŝatataĵo, sed ĉiam surpaŝi ĝustan vojon, tiel ke vi fariĝu utiliganto de miriadoj da situacioj, sed ne tiriĝanto de ili. Tiam vi eterne ne perdos vian veran kaj justan naturon.”

**21.** *I Ĉongĉun*<sup>41</sup> demandis: “Ĉu eĉ granda iluminiĝinto havas korinklinon?” Sotesano respondis: “Homo kun korinklino ne estas iluminiĝinto.” Ŝi demandis: “*Ĝongsan*<sup>42</sup> amas sian infanon. Ĉu tio ne montras lian korinklinon?” Sotesano respondis: “Vi ja povus nomi iluminiĝinto eĉ sensentan lignon aŭ rokon. Korinklino signifas, ke ne eblas foriri de amato pro amtiriĝo aŭ sopiro dum la foresto de amato malhelpas sinkultivon kaj publikan laboron. Sed li ne havas tiaĵon.”

**22.** Sotesano diris: “Homoj en la mondo rekonas kiel iluminiĝinton nur tiun, kiu legis multajn sanktajn librojn. Ili kredeme aŭskultas predikon kun citaĵoj el malnovaj sanktaj libroj, sed duonaŭskultas predikon, kiu rekte klarigas la principon en facilaj vortoj. Kia korprema penso tio estas! Sankta libro estas skribo, kiu enhavas la instruon de pasintaj

<sup>41</sup> *I Ĉongĉun* 이청춘 李靑春 (1886-1955): ŭonbulana alnomo *Otaŭon*, pastrino, *debongdo*, unu el la naŭ disĉiplinoj de Sotesano.

<sup>42</sup> *Ĝongsan* 정산 鼎山: ŭonbulana alnomo de *Song Gju*.

sanktuloj, saĝuloj kaj filozofoj por klerigi homojn. Tamen kun la tempo al la originaloj aldoniĝis tiom da komentoj kaj piednotoj, ke estiĝis kvinĉaro da libroj<sup>43</sup> kaj okdekmilo da sutroj<sup>44</sup>. Malfacilas tralegi ilin ĉiujn, eĉ se ni dediĉas la tutan vivon. Kiam do ni atingus la fortojn de kultivo, de esploro kaj de elekto kaj fariĝus elstaruloj kun granda personeco? Tial Ŝakjamunio antaŭdiris la laŭepokan ŝanĝon de sia darmo, dividante ĝin en la periodojn de ĝusta darmo, de ŝajna darmo kaj de fina darmo<sup>45</sup>. La ŝanĝo rezultis precipe el tio, ke pro sutra malsimpleco postvenaj neiluminiĝintoj perdis sian memstarecon kaj agis malsaĝe, tiel ke ĝusta darmo nature kadukiĝis. Tial, kiam revenas la periodo de ĝusta darmo, ĉiuj homoj povas reale trejniĝi per nova simpla doktrino kaj oportuna maniero. Ili ĉiuj povas sperti kaj ilumiĝi pri la granda vojo laŭ ĝusta darmo buŝe transdonita kaj kore ricevita. Kial do lerni la tutan kvinĉaron da libroj kaj studi la tutan okdekmilon da sutroj? Vi do ne logiĝu de multaj komplikaj malnovaj sanktaj libroj, sed nepre diligente studu per simpla doktrino kaj oportuna maniero kaj atingu elstaran kapablon. Post tiam vi konsultu tiujn malnovajn sanktajn librojn kaj ĉiujn teoriojn. Tiam unumatena konsulto pli efikos ol dekjara legado.”

**23.** Sotesano diris: “Kiu el vi trovis sanktan libron senĉese legeblan? Ordinaruloj scias, ke estas sanktaj libroj nur la kvar libroj<sup>46</sup> kaj tri klasikaĵoj<sup>47</sup>, la okdekmilo da sutroj kaj la sanktaj libroj de aliaj religioj. Sed ili ne scias grandan sanktan libron, kiu reale aperas. Kio do tio ne estus korprema? Se homo vidas la mondon per vera spirito, ĉio estas nenio alia ol sankta libro. Kiam li malfermas sian okulon, li vidas sanktan libron; kiam li klinas sian orelon, li aŭskultas sanktan libron; kiam li parolas, li voĉlegas sanktan libron; kiam li moviĝas, li utiligas sanktan libron, tiel ke al li senĉese malvolviĝas sankta libro ie ajn kaj iam ajn. Ĝenerale sankta libro eksplikas la du aĵojn de afero kaj principo. Ĝi analizas aferon per justo, maljusto, profito kaj malprofito kaj klarigas principon per grando, malgrando, esto kaj neesto, tiel ke ĝi helpas homon decidi direkton kaj surpaŝi homan vojon. Ĉiuj sanktaj libroj de konfuceismo, budhismo kaj aliaj religioj ne deflankiĝas de ĉi tia enhavo. Tamen afero kaj principo ne kuŝas en libro, sed la tuta mondo estas ili. Homo naskiĝas, vivas, mortas kaj renaskiĝas en afero kaj principo, tial ili havas nemalhaveblan rilaton al li kaj la mondo estas sankta libro, kiu sternas ilin, kiel ili estas. En ĉi tiu sankta libro, bone observante multajn aferojn de justo, maljusto, bono kaj malbono, ni devas fari justan kaj profitan aferon kaj forlasi malbonan kaj malprofitan aferon. Kaj bone observante ĉiujn principojn de grando, malgrando, esto kaj neesto, ni devas ilumiĝi pri ilia fonto. Kiel do tiam ĉi tio ne estus viva sankta libro? Tial mi petas vin bone legi ĉi tiun grandan sanktan libron reale aperantan, antaŭ ol legi multajn komplikajn sanktajn librojn.”

**24.** Iu disĉiplo demandis: “Mi ĉiam ne estas lerta en laboro. Kiel mi povas lertiĝi?” Sotesano respondis: “Diligente preparu vin antaŭ laboro, bone faru justaĵon dum laboro, denove kontrolu ĝin post laboro kaj ĉiam bone kontemplan eĉ aliulan laboron en la koro.

<sup>43</sup> Kvinĉaro da libroj 오거시서 五車詩書: metaforo por tiel multaj libroj, kiuj povas plenigi kvin ĉarojn. Ili konsistigas la konfuceanan biblion.

<sup>44</sup> Okdekmilo da sutroj 팔만장경 八萬藏經: ĉi tiu esprimo devenas de tio, ke en la tripitako kolektiĝis okdek kvar mil predikoj de Ŝakjamunio. Okdek kvar mil aŭ okdek mil esprimas ankaŭ multnombrecon.

<sup>45</sup> Periodoj de ĝusta darmo, de ŝajna darmo kaj de fina darmo 정법 상법 계법 正法 像法 季法: estas dividita la disvastiĝo de budha instruo post la forpaso de Ŝakjamunio en la tri periodoj. La unua periodo daŭras 500 aŭ 1000 jarojn, dum kiuj perfekte estas instruo, praktikado kaj frukto. La dua periodo daŭras 500 aŭ 1000 jarojn, dum kiuj estas instruo kaj praktikado, sed ne frukto. La tria periodo estas tiam, kiam ne etas praktikado kaj frukto, sed nur instruo.

<sup>46</sup> Kvar libroj 사서 四書: konfuceanaj sanktaj libroj, t.e. *La Granda Lernado (Tahsiao)*, *La Doktrino de Mezeco (Ĉungjung)*, *La Analektoj de Konfuceo (Nunju)* kaj *Mengzi (Mengtzu)*.

<sup>47</sup> Tri klasikaĵoj 삼경 三經: konfuceanaj sanktaj libroj, t.e. la tri libroj de *La Poezio (Ŝihĉing)*, *La Historio (Ŝuĉing)* kaj *La Ŝanĝo (Jiĉing)*.

Tiam vi pli kaj pli lertiĝos kaj faros ĉiun laboron senobstakle.”

**25.** Sotesano diris al homoj en darmkunveno: “Vi devas atente aŭskulti predikon aŭ prelegon, kvazaŭ vi ricevus de ĝi valoran trezoron. Kvankam pastro aŭ preleganto diras utilajn vortojn, ili ne efikas, se vi ne kaptas ilian esencon aŭ senatente aŭskultas ilin. Tial se vi, aŭskultante ajnajn vortojn, kontrolas ilin kontraŭ viaj studo kaj situacio kaj kun perfekta spirito atente aŭskultas ilin, via gajno multiĝas kaj samtempe ili nature speguliĝas en via reala ago, tiel ke plimontriĝos la merito de darmkunveno.”

**26.** Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*, li demandis, montrante al lampofajro: “Kial tiel mallume estas sub tiu lampofajro, kiu lumigas la kvar murojn?” *Gim Namĉon*<sup>48</sup> respondis: “Tio estas vere kiel mi. De pluraj jaroj mi rekte servas sub vi, sed miaj scio kaj ago pri ĉiuj aferoj ankoraŭ ne superas tiujn de samideanoj vizitantaj vin de fora loko.” Sotesano ridis kaj denove demandis *Song Gju*. Li respondis: “La lamplumo supren difuziĝas kaj lumigas malproksiman lokon, kaj la lampostango estas proksime kaj mallumigas suban lokon. Tio estas same, kiel homo bone scias aliulan kulpon, sed ne sian. Se paroli pri la kialo, kiam homo vidas aliulan faron, li povas ĝuste vidi ĝiajn forton kaj malforton, alton kaj malalton, ĉar nenio heziligas lin. Sed, kiam homo vidas sian faron, li ne povas ĝuste scii ĝiajn juston kaj maljuston, ĉar la ombro de la ideo pri memo ĉiam kovras lian saĝlumon.” Sotesano denove demandis: “Kiel tia neperfekta homo povas lumigi kaj sin kaj aliulon sendistinge?” Li respondis: “Se tia homo ne alkroĉiĝas al plezuro, kolero, malĝojo kaj ĝojo kaj fortranĉas ĉiun ideon el sia menso, lia scio pri memo kaj aliulo estas tute egala.” Sotesano respondis: “Vi pravas.”

**27.** Sotesano diris: “Se vi volas perfektuliĝi kaj akiri vastan scion, nepre ne alkroĉiĝu al unu flanko. Preskaŭ ĉiuj homoj de la nuna mondo estas unuflankiĝemaj kaj ne atingas la perfektan vojon. Konfuceanoj alkroĉiĝas al konfuceana kutimo, bonzoj al budhana kutimo kaj aktivuloj de aliaj religioj kaj socioj al siaj scio kaj laboro, tiel ke ili ne povas vaste scii pri justo, maljusto, profito kaj malprofito, nek preni aliulan instruon por sia uzo. Tial ili ne povas perfektuliĝi.” Iu disĉiplo demandis: “Ĉu tio ne signifas perdi propran opinion, se oni deflankiĝas de siaj tradicio kaj aserto?” Sotesano respondis: “Miaj vortoj ne signifas senprudente uzi ĉiujn instruojn perdante propran opinion, sed larĝe utiligi aliulan instruon post la firma starigo de propra prava opinio. Vi devas ĝuste kompreni ĉi tiun signifon.”

**28.** Sotesano diris: “Ordinarulo havas du kondiĉojn, kiuj mallumigas lian saĝon en ajna laboro. Unu estas, ke li tiriĝas de avido, tial li perdas la mezan vojon kaj lia saĝo mallumiĝas. La alia estas, ke li alkroĉiĝas nur al sia talento, tial lia saĝo pri alia kampo mallumiĝas. Sinkultivanto devas aparte atenti ĉi tiujn du kondiĉojn.”

**29.** Iu kredanto de ĉondoismo<sup>49</sup> vizitis kaj diris: “Mi aŭdis vian famon kaj venis de malproksime. Bonvolu favori min.” Sotesano diris: “Ŝajnas al mi, ke vi havas en la koro ion por demandi. Diru al mi.” Li demandis: “Kiel mi povas vastigi scion?” Sotesano respondis: “Demandi min estas vastigi scion kaj ankaŭ aŭskulti vin estas vastigi scion. Ekzemple, se mastruma aparato mankas al mastrumanto, li aĉetas ĝin en bazaro, kaj se scio pri laboro mankas al laboranto, li akiras ĝin en la mondo. Tial mi akiras scion pri io ajn ne nur per mia studo, sed ankaŭ de homoj, kiujn mi renkontas. Dum renkontiĝo kun vi mi akiras scion pri via religio kaj dum renkontiĝo kun alireligiulo pri lia religio.”

**30.** Sotesano diris: “Homa naturo origine estas nek bona, nek malbona, sed laŭ kutimo estiĝas bona kaj malbona personecoj. Kutimo formiĝas el tio, ke unu komenca penso

---

<sup>48</sup> *Gim Namĉon* 김남천 金南天 (1869-1941): ŭonbulana alnomo *Gaksan*, laiko.

<sup>49</sup> Ĉondoismo 천도교 天道教: korea religio fondita de *Ĉoj Ĝeu* en 1860, kies ĉefinstruo bazita sur konfuceismo, budhismo kaj taoismo estas, ke homo estas ĉielo.

multfoje respondadas al ĉiuj kaŭzoj-kondiĉoj<sup>50</sup>. Ekzemple vi ekaspiras studon kaj unuafoje venas al ĉi tiu templo, tiel ke vi renkontas instruiston kaj samideanon kaj sekvas leĝon kaj regulon. Komence vi trovas ĉion fremda, malkonvena kaj malfacile tolerebla, sed se vi longe daŭrigas vian aspiron senŝanĝe, viaj menso kaj ago pli kaj pli maturiĝas kaj en la fino nature ĝustiĝas senpene. Tio estas kutimo. Tiel same al bono kaj malbono estas egala la principo, ke kutimo formiĝas laŭ ĉiuj kaŭzoj-kondiĉoj, sed malfacilas kutimiĝo al bono kaj facilas al malbono. Krome, se homo estas eĉ iomete malatenta dum strebo al bona kutimo, li senkonscie dekliniĝas al malbona situacio kaj facile rezultigas la malon de sia komenca celo. Ĉiam atentu ĉi tiun punkton, kaj vi formos bonan personecon.”

**31.** Sotesano diris: “Laŭ mia sperto el la renkontiĝo kun multaj gestudentoj, viro ĝenerale estas indulgema, sed malsolideco kaj malsincereco estas lia malsano. Virino ĝenerale estas detalema, sed alfiksiĝemo kaj netoleremo estas ŝia malsano. Por formi perfektan personecon viro kun indulgemo precipe klopodu esti solida kaj sincera, kaj virino kun detalemo precipe klopodu esti senpartia kaj indulgema.”

**32.** Iu disĉiplo rapide manĝis kaj ofte parolis, tial Sotesano diris: “Homo povas studi eĉ dum manĝado kaj parolo. Se li manĝas rapide aŭ tro, tio facile kuntrenas malsanon, kaj se li parolas nenecese aŭ maldece, tio facile kuntrenas katastrofon. Kiel do malatenti unu kuleron da manĝado kaj unu vorton da parolo, rigardante tion kiel bagatelon? Tial studanto prenas ĉiun okazon kiel la ŝancon studi kaj plezuras per bontraktado de tiu kaj tiu okazo. Vi ankaŭ havu volon por ĉi tiu studo.”

**33.** *Mun Gonggju*<sup>51</sup> demandis: “Kiun modelon mi prenu por justaga elekto renkonte al situacio?” Sotesano respondis: “Prenu la tri pensojn kiel la modelon. Unu estas pri via voto, la dua pri la instruvolo de via instruisto kaj la tria pri tio, ĉu vi kliniĝas al unu flanko aŭ ne, observante tiutempan cirkonstancon. Se vi prenas ĉi tiujn tri kiel la modelon, via studo ĉiam ne mallumiĝas kaj ĉiu via ago nature ĝustiĝas.”

**34.** Sotesano diris, surgrimante kun *I Ĉunpung* krutan montpasejon malantaŭ la templo *Ĉongnjonam*<sup>52</sup>: “Renkonte al kruta vojo spontaniĝas koncentriĝo. Tial homo malmulte eraras sur kruta vojo, sed facile sur ebena vojo, kaj li malmulte eraras en malfacila laboro, sed facile en facila laboro. Nur se studanto agas egale, ĉu vojo estas ebena aŭ kruta, ĉu laboro estas facila aŭ malfacila, li atingas plenan koncentriĝon sur unu agon.”

**35.** Sotesano diris: “Ĉu vi vidis ĉielulojn? Ili ne loĝas en la ĉielo, sed tiuj infanoj estas ĉieluloj. Ili neniom havas egoismon en la koro, tial ĉieldotitaĵo eliĝas pere de patrino. Sed se egoismo pli kaj pli estiĝas, la ĉieldotitaĵo ĉesas. Se sinkultivantoj ne havas nur egoismon, el tio sekvas senlima ĉieldotitaĵo. Alie ŝtopiĝas la vojo al ĉieldotitaĵo.”

**36.** Iu disĉiplo demandis: “Per kiamaniera spirita kultivo mi povas forigi ĉiujn kvin dezirojn kaj vivi liberan kaj riĉan vivon kiel budho, absorbiĝante en sinkultivo?” Sotesano respondis: “Deziro ne estas forigenda, sed kreskigenda. Turnu kaj kreskigu malgrandan deziron al granda voto kaj koncentriĝu sur ĝin, kaj la malgranda deziro nature kvietiĝos kaj vi spontane vivos liberan kaj riĉan vivon.”

**37.** Sotesano diris: “Mi ne instruas, ke vi perforte forigu la sentojn de plezuro, kolero, malĝojo kaj ĝojo, sed ke vi uzu ilin konvene al tempo kaj loko kaj senobstakle utiligu liberan menson nur sen dekliniĝi de la meza vojo. Mi ne instruas, ke vi malŝatu banalan talenton kaj malgrandan deziron, sed ke vi zorgu pri ilia nepovado pligrandiĝi. Tial mi instruas, ke vi nur pligrandigu malgrandaĵon, kaj ke vi turnu vian penon de malgrandaĵo al

<sup>50</sup> Kaŭzo-kondiĉo 인연 因緣: kaŭzo kaj kondiĉo. Kaŭzo estas rekta kaj interna kialo, kiu estigas rezulton, dum kondiĉo estas nerekte kaj ekstera kialo, kiu helpas tion. Ĉiu ago do rezultas el kaŭzo kaj kondiĉo.

<sup>51</sup> *Mun Gonggju* 문정규 文正奎 (1863-1936): ŭonbulana alnomo *Dongsan*, laiko.

<sup>52</sup> *Ĉongnjonam* 청련암 靑蓮庵: budhana templo.



grandaĵo. Tio estas la supera maniero atingi grandaĵon.”

**38.** Sotesano diris: “Vi devas anticipi scii, ke estas tre danĝera momento dum studo kaj laboro. Tia momento por studanto estas, kiam al li malfermiĝas ĉiu saĝo, kaj por laboranto estas, kiam al li venas ĉiu povo. Ĉar homo kun malsupera kapablo<sup>53</sup>, ekhavante ioman saĝon, maldiligentas en granda studo kaj facile kontentiĝas per malgranda saĝo, kaj ekhavante ioman povon, fariĝas egoisma kaj fiera kaj ne povas plu progresi. Se faranto de studo kaj laboro ne atentis tian momenton, li mem enfalas en senliman kavon.”

**39.** Iu disĉiplo dum pluraj jardekoj dediĉis sindonon kredon kaj tutforte sidmeditadis, tiel ke lia spirito pli kaj pli klariĝis kaj li povis antaŭvidi la venon de gasto kaj la komencon kaj ĉeson de pluvo. Sotesano diris: “Tio estas nenio alia ol fantomo foje aperanta dum studo kiel lampirbrileto. Rekonsciigu kaj tion forigu. Se vi plezuras per tio, vi ne nur ne povas iluminiĝi pri la granda vero, sed eĉ enfalas en malvirtan vojon kaj facile fariĝas batalema demono. Kiel do permesi tiaĵon en la eklezio de ĝusta darmo?”

**40.** *Song Bjokĝo*<sup>54</sup> absorbiĝis nur en sidmedito, rapide dezirante akvenergian supreniĝon kaj fajrenergian malsupreniĝon, sed male alportis al si kapdoloron. Sotesano diris: “Tio okazas tial, ke vi ne bone scias studvojon. Ĝenerale perfekta studvojo estas studi egale ĉe movo kaj senmovo. Ĉe movo kunakiru la tri grandajn fortojn precipe per justaga elekto kaj ĉe senmovo kunakiru ilin precipe per spirita kultivo kaj afera-principa esploro. Kiu scias kaj sekvas ĉi tiun vojon, tiu ne aparte sentas suferon dum studo kaj estas libera kaj riĉa kiel la akvo de senventa oceano kaj akvenergia supreniĝo kaj fajrenergia malsupreniĝo nature okazas pro la trankvilo de lia menso. Kiu ne scias ĉi tiun vojon, tiu facile alportas al si nenecesan malsanon kaj suferas la tutan vivon. Vi do tre atentu tion.”

**41.** Sotesano diris: “Ĉefiĝante la esencan darmon farendan por homo, mi perfektigis la partian darmon de la pasinteco kaj faciligis la komplikan darmon, por ke iu ajn tuj eniru en la grandan vojon. Sed kiu ne scias ĉi tiun signifon kaj ankoraŭ ne forĵetas malnovan penson, tiu diras, ke por studi oni devas eniri en kvietan monton, aŭ ke oni devas akiri supernaturan forton kaj libere transloki monton, transpaŝi riveron kaj estigi venton kaj pluvon, aŭ ke ne utilas sankta libro, prediko kaj diskuto, sed nepras nur budhonoma ĉantado kaj sidmedito. Tiel li foje ne sekvas ĝuste mian instruon. Tio estas vere lamentinda. Nun ne malmultas homoj, kiuj senprofesie dum la tuta vivo vagadas en temploj, monaĥejoj aŭ profundaj montoj, dezirante spiritaltecon aŭ vojleratecon. Se homo serĉas darmon ekster la mondo kaj deziras nur supernaturan forton perdante homan vojon, tio ja estas malvirta vojo. Nu, vi bone studu en la mondo laŭ la esencaj vojoj de homo kaj de studo, kiujn mi instruas. Tiam fine vi plene atingos kaj feliĉon kaj saĝon, en kio samtempe enestos supernatura forto kaj spirita forto. Tio estas orda studo kaj radikohava granda vojo.”

**42.** Sotesano diris: “En la eklezio de ĝusta darmo supernatura forto ne rigardiĝas grava, ĉar ĝi ne nur estas senutila, sed eĉ malutila al mondsavo. Jen estas la kialo. Ĝenerale deziranto de supernatura forto eniras monten, evitante la ĉiutagan mondon, kaj for de homa vojo pasigas la tutan vivon per recitado de preĝaj aŭ sanktaj vortoj, alkroĉiĝante nur al vanteco. Se la tuta mondo adoras tion, disfalos ofico, terkultivo, metio kaj komerco kaj neglektiĝos moralo kaj disciplino. Krome tia homo ne scias la fonton de moralo kaj kun senorda penso kaj maljusta deziro esperas eksterordinaran forton. Se iam aperas ia miraklo pro falsa spirito, li misuzas ĝin, trompas la mondon kaj damaĝas homojn. Tial sanktulo diris, ke supernatura forto estas flanko, kaj ke supernatura forto aperanta sen la bazo de moralo estas nenio alia ol magio. Tamen se homo bone sekvas ĝustan vojon, estas indiferenta por deziro

<sup>53</sup> Kapablo 근기 根機: persona kapablo studi, kompreni kaj praktiki instruon. La kapablo dividiĝas en superan, mezan kaj malsuperan kapablojn.

<sup>54</sup> *Song Bjokĝo* 송벽조 宋碧照 (1876-1951): ŭonbulana alnomo *Gusan*, pastro, patro de *Song Gju* kaj *Song Dosong*.

kaj havas puran konduton, mistera signo foje povas okazi laŭ la lumo de memnatura, sed tio nature akiriĝas, malgraŭ ke li ne strebas al tio. Kiel do tion konjektus vivulo kun malvirta penso.”

**43.** Sotesano diris: “De tempo al tempo estas novulo, kiu sen scii sian kapablon klopodas tuj ilumiĝi pri la granda principo per momenta sindona penado. Tamen kun tia menso homo povas facile gravmalsaniĝi, kaj kiam lia volo ne realiĝas, rezignemo vekigiĝas kaj li eĉ povas malproksimiĝi de sinkultiva vivo. Vi devas atenti tion. Sed foje estas ankaŭ sinkultivanto, kiu aliras budhan etapon per unu salto. Li havas la plej superan kapablon rezulte el la multa sinkultivo tra sia multviva eterno. Havanto de meza aŭ malsupera kapablo devas plene strebi dum longa tempo. En la ordo de sinkultivo unue granda volo devas esti kaj unu post la alia estiĝas granda kredo, granda sinkuraĝigo, granda scivolo, granda penado kaj granda ilumiĝo. Ilumiĝo ne finiĝas per unufoja atingo, sed estas miriadoj da ilumiĝoj.”

**44.** Sotesano diris: “Stulta homo klopodas atingi tuj post sia ekaspiro la grandan saĝon de sanktulo, sed tio estas vere malĝusta penso. La akvo de tiu oceano estas la kunaĵo de akveroj, la granda tero de monto kaj kampo estas la kunaĵo de polvoj kaj la granda atingo de ĉiuj budhoj kaj sanktuloj estas la kunaĵo de la klopodoj de senforma kaj nevidebla menso. Kiu aspiras grandan studon kaj entreprenas grandan laboron, tiu antaŭ ĉio nepre devas komenci sian klopodon per malgrandaĵo.”

**45.** Sotesano diris: “De tempo al tempo estas tia homo pastriginta por serĉi la vojon, kiu intertempe forgesas sian volon kaj strebas al eksteraj lernado kaj scio. Tia homo povas esti multescia, sed lia spirita energio malfortiĝas kaj al li malfacilas akiri veran saĝon. Kiu serĉas veran vojon, tiu ekzameni sian komencan volon kaj tutforte klopodu akumuli la tri grandajn fortojn, ĝustigante diversflanken disiĝantan menson. Tiam li nature havigos al si ankaŭ la kapablon de eksteraj lernado kaj scio.”

**46.** Sotesano diris: “Antaŭ ol akiri unu penson, mi jen preĝis, jen recitis subite leviĝantajn vortojn, jen senkonscie dronis en kvietaj silento. De post kiam, hazarde akirinte unu penson, ilumiĝo estiĝis kaj la spiritpordo malfermiĝis, alternis lumo kaj mallumo tage-vespere en unu diurno, antaŭaduone-postaduone en unu monato. Kiam la saĝpordo malfermiĝis dum ĉi tiu alterno, mi memfidis je ĉiosciao kaj ĉiopovo, sed kiam ĝi refermiĝis, mi ne sciis, kion fari kun mi mem, denove timis pri mia estonteco kaj eĉ dubis, ĉu mi ne estis sorĉata de io. Fine tiu alterno malaperis kaj ilumiĝo daŭris konsekvence.”

**47.** Sotesano ĉiuvintre suferis tusadon. Kiam li predikis, li ĉiam tusadis. Pri tio li parolis al homoj: “Kiel vi scias, malmultas en la mondo tia loko, kiu havas malriĉan vivon kaj homan malklerecon kiel mia kreskloko *Giljongni*. Feliĉe pro mia kutimo de antaŭaj vivoj mi ekaspiris en la infanaĝo kaj tutkore serĉis la vojon, sed ĉe mi estis neniu, kiun mi povis demandi, kaj kiu povis min gvidi. Tial mi sola elpensis ideojn kaj ne povis ne travivi malfacilan kaj asketan agon. Mi jen tranoktis sendorme en monto, jen tratagis side sur vojo, jen tranoktis kun la malfermitaj okuloj side en ĉambro, jen baniĝis per glacia akvo, jen fastis, jen loĝis en frosta ĉambro, tiel ke mi eniris en senkonsciecon kaj fine mia demando solviĝis. Sed malsano jam profunde enradikiĝis en la korpo kaj malsansufero pliiĝas laŭ la energia malfortiĝo. Tiutempe mi ne sciis la vojon, tial tio ne eviteblis. Sed danke al mia travivaĵo feliĉe vi scias ĝuste la perfektan manieron de mahajana praktikado sen travivi tian malfacilan kaj asketan agon. Tio estas por vi granda feliĉo. Ĝenerale iamajna kaj ieajna medito estas la rapida vojo al mahajana praktikado. Se homo tiamaniere sin kultivas, li akiras duoblon per duona klopodo kaj sukcesas sen malsaniĝo. Mi do kore petas vin ne vundi vian korpon, atestante vanan asketan agon, kiun mi faris, kiam mi ne povis atingi la vojon.”

**48.** Sotesano diris: “Kiel en tiu lernejo estas ekzameno fine de semestro aŭ lernojar, ankaŭ al sinkultivanto estas diversaj ekzamenoj per favoraj kaj malfavoraj situacioj, kiam li

plialtiĝas en darmforto aŭ aliras budhan etapon. Tial, kiam Ŝakjamunio estis ĉe la atingo de sia luminiĝo, lin malhelpis la diabla reĝo Papijaso<sup>55</sup> kun siaj okdek kvar mil subuloj. Ankaŭ multaj postaj sinkultivantoj alfrontis tian ekzamenon. Laŭ mia observo estas homo el vi, kiu pene batalas kontraŭ ekzameno, kaj kiu malvenkis en la batalo kaj fuŝas la laboron de sia eterna vivo, kaj kiu bonrezulte trapasis la ekzamenon kaj havas la promesplenan estontecon. Mi deziras, ke vi esploru vian gradon kaj ne malsukcesu en la ekzameno.”

**49.** Sotesano diris: “Lernanto de tekniko devas ricevi de sia instruisto juĝon pri tekniko kaj lernanto de etiko devas ricevi de sia instruisto juĝon pri justo kaj maljusto. Alie lia tekniko ne povas esti linikonforma tekniko kaj lia studo ne povas esti celhava studo. Tial mi ĉiam juĝas viajn juston kaj maljuston en afero kaj principo, por ke vi evitu kurban vojon kaj surpaŝu rektan vojon. Se vi hezitas ricevi mian juĝon aŭ malkontentiĝas per ĝi, kio estas via origina studcelo kaj kiel vi povas progresi en studo? Pravaj kritikoj kaj konsiloj ne nur de mi, sed ankaŭ de iu ajn fariĝas ekzemplo por via estonteco. Se vi plendas kontraŭ bonfaranto, kiu malfermas vian estontecon, vi fariĝas nedankantoj, ĉu ne? Nu, vi devas danki pro juĝoj de mi kaj de la mondo pri viaj justo kaj maljusto kaj samtempe pli peni akiri la veran kernon de studo.”

**50.** Sotesano diris: “Kiu evitas situacion kaj klopodas kultivi menson nur en kvieta loko, tiu sinkultivanto estas kiel tiu homo, kiu evitas akvon kaj klopodas kapti fiŝon. Kian rezulton do li rikoltus? Tial, kiu volas vere sin kultivi, tiu devas kultivi menson nur en miriadoj da situacioj. Nur tiam li povas akiri la grandan forton ne mensoskuiĝi de miriadoj da situacioj. Se situacion renkontas mensotrejnanto nur en sensituacia loko, lia menso tuj skuiĝas, kiel se la sunon renkontas fungo kreskinta en ombro, ĝi tuj velkas. Tial la sutro *Vimalakirti*<sup>56</sup> diras, ke bodisatvo<sup>57</sup> estas en tumulto loko, tamen lia menso estas trankvila, dum herezulo estas en kvieta loko, tamen lia menso estas maltrankvila. Tio instruas, ke studo dependas nur de mensa sinteno, sed ne de ekstera situacio.”

**51.** Sotesano diris al disĉiploj: “Utiligu la budhan darmon kaj plibonigu vivon, sed ne alkatenu vin al la budha darmo kaj pasigu la tutan vivon vane. Generale la budha darmo estas la granda vojo savi la mondon. Se homo tamen evitas la ĉiutagan mondon, eniras en monton, pasigas la tutan vivon senprofesie nur per sutrolegado, sidmedito aŭ budhonoma ĉantado kaj fine havas nenian atingadon de vivulsavo, tia homo estas alkatenuita al la budha darmo, tial li nek alportas al si apartan sukceson, nek al la mondo ian utilon.”

**52.** Sotesano diris al homoj: “Homo volas scii la vojon por uzi ĝin en necesa loko. Se li ne povas uzi ĝin en necesa loko, lia scio estas nenio alia ol nescio. Kia profito do estus?” Sotesano levis sian ventumilon kaj aldiris: “Mi havas ĉi tiun ventumilon, sed se mi ne scias uzi ĝin dum varma vetero, kio do estus la efiko de ĝia ekzisto?”

**53.** Sotesano diris: “Studanto devas ekstere fortranĉi inklinon al ĉiu rilato kaj interne forlasi alkroĉiĝon eĉ al koncentriĝo. Alkroĉiĝo al koncentriĝo nomiĝas darmkateno. Se homo estas darmkatenuita, li estas ĉiam ligita per darmo eĉ dum unu rulado de okulo kaj unu movo de korpo, tiel ke li ne povas liberigi sin. Kiel do li povus eniri en la pordon de granda emancipiĝo? Tial studanto nepre spontane nutru la naturon kaj aktive ĝin funkciigu, tiel ke kiam la ses sentorganoj ne laboras, li forigu nur necesan penson, kaj ke kiam ili laboras, li forigu nur maljuston. Kiel do aparte alkroĉiĝi al koncentriĝo dum koncentriĝo? Kompardire bona vartisto lasas bebon libere ludi kaj vigle moviĝi kaj nur detenas ĝin de danĝeraj loko kaj objekto. Se vartisto por gardi bebon apudtenas ĝin kaj tuttage ne lasas ĝin moviĝi, ĝi

<sup>55</sup> Papijaso 파순 波旬: *Papiyas* (s.), laŭvorte malbonulo, malica reĝo de la diabloj.

<sup>56</sup> Sutro *Vimalakirti* 유마경 維摩經: la sutro entenas la predikojn de *Vimalakirti* (s.), laika disĉiplo de Ŝakjamunio.

<sup>57</sup> Bodisatvo 보살 菩薩: *bodhisattva* (s.), laŭvorte luminiĝanto, budhiĝanto, tiu, kiu serĉas luminiĝon kaj sindone helpas aliulojn.

nature suferas malliberon. Tiel same estas la malbono de alkroĉiĝo al koncentriĝo.”

**54.** Sotesano diris al *Gim Namĉon*: “Antaŭ nelonge mi vidis iun homon rajdanta sur bovo. Li ne trenis la bovon laŭvole, sed estis trenata de ĝi. Kiam la bovo eniris jen en dornejon, jen en kavon, jen en monton, jen en kampon, li estis trenata tien kaj falis jen surdorsen, jen surventren, tiel ke lia vesto disŝiriĝis kaj lia korpo kompatinde vundiĝis. Rigardante tiun scenon, mi diris al li, ke se li firme bridus la bovon kaj detenus ĝin de senprudenta iro kaj kondukus ĝin nur laŭ la vojo, ne okazus al li tia akcidento. Li respondis, ke li ankaŭ deziras tion, sed pro nescio ne povis la bovon malsovaĝigi kaj disponigis ĉiujn rajtojn al ĝi, tiel ke ĝi plisovaĝiĝis laŭ lia maljuniĝo kaj nun li tute ne povas ĝin regi. Hodiaŭ mi vidas vin ankaŭ veninta bovrajde. Kie estas via bovo?” *Namĉon* respondis: “Mi ankoraŭ rajdas sur ĝi.” Sotesano demandis: “Kiel aspektas via bovo?” Li respondis: “La alteco estas unu klafto, la koloro estas flava, la ŝuoj estas faritaj el kanabo kaj la barbo estas nigra kaj blanka.” Sotesano ride demandis: “Vi jam scias la aspekton de via bovo. Ĉu ĝi bone agas laŭ via volo aŭ vi ankaŭ estas trenata de ĝi?” Li respondis: “La bovo ĝenerale bone agas laŭ mia volo. Kiam la bovo maldiligentas fari justaĵon, mi krie igas la bovon ĉiukaze fari ĝin. Kiam la bovo inkliniĝas al maljustaĵo, mi ankaŭ krie igas la bovon ne fari ĝin.” Sotesano diris: “Vi jam trovas la bovon kaj ankaŭ scias malsovaĝigi ĝin, des pli ĝi ĝenerale aŭskultas vin. Do vi pli klopodu malsovaĝigi la bovon por libere fari ĉiujn aferojn.”

**55.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Ĉeesti trejnsesion estas kiel malsovaĝigi bovon. Homo libere agas laŭ vido, aŭdo aŭ penso sen moraltrejni sin en la mondo, tial li deflankiĝas de homa justeco. Tiam li estas kiel senbrida bovido, kiu suĉas la mamon de patrino kaj laŭplaĉe saltadas. Dum li elhejmiĝinte ĉeestas trejnsesion kaj sekvas ĉiujn regulojn kaj preceptojn, li ankoraŭ ne deturniĝas de malnova kutimo, tial tio ĉagrenas gvidanton; pensoj malvirtaj kaj nenecesaj svarmas en lia menso, tial gvidanto zorgas pri liaj studo kaj laboro. Tiam li estas kiel demamigita bovido, kiu alligite al paliso plorkrias al patrino kaj torde baraktas. Dum li sekvas ĉiun tagordon, li poiome komprenas vortojn de gvidanto kaj kvietigas pensojn malvirtajn kaj nenecesajn kaj plezuras per sciiĝo pri unu aŭ du nekonataĵoj el la aferoj kaj principoj. Tiam li estas kiel bovo neplene malsovaĝigita, sed grade trankviliĝanta de ĉia laboro. Li ne deflankiĝas de la interpretado kaj praktikado de la doktrino kaj maturigas la kultivforton, la esplorforton kaj la elektforton kaj samtempe ĉiupaŝe donas profiton al homoj spirite, korpe kaj materie. Tiam li estas kiel bone malsovaĝigita bovo, kiu bone faras ajnan taskitan laboron kaj ĉiupaŝe donas profiton al la mastro. Tiel same kamparano malsovaĝigas bovon por bone utiligi ĝin en plugado kaj mi faras fakan trejnon al vi en trejnsesio, por ke vi utiligu ĝin en homsocia agado. Mi deziras, ke vi ne forpasigu tempon en ĉi tia okazo, sed diligente studu kaj servu la vastan mondon per bone malsovaĝigita mensbovo kaj fariĝu sanktaj apostoloj de vivulsavo kaj mondkuracado.”

**56.** Sotesano diris al homoj en la malferma kunsido de trejnsesio: “Via ĉeesto en trejnsesio estas kiel enhospitaliĝo de malsanulo. Korpa malsano kuraciĝas per medikamento en hospitalo, dum mensa malsano kuraciĝas per moralo en religio. Tial budho kompariĝas kun la medicina reĝo, lia instruo kun medikamento kaj lia templo kun hospitalo. Tamen homoj en la mondo scias, ke korpa malsano estas malsano, kaj penas kuraci ĝin, elspezante tempon kaj monon, sed ili ne scias, ke mensa malsano estas malsano, nek eĉ pensas ĝin kuraci. Kiel do tio ne estus lamentinda por prudentulo? Kiel ajn grava estas korpa malsano, ĝi daŭras nur unu tutan vivon kaj malgrava malsano kuraceblas en mallonga tempo. Sed se mensa malsano restas nekuracita, ĝi fariĝas la semo de peko kaj sufero por la eterna estonteco. Havanto de mensa malsano perdas mensliberon, forlogiĝas al ekstera situacio kaj faras malindajn parolon, agon kaj penson, tiel ke li al si mem fosas tombon, alportas malestimon kaj faras suferon. Li do iras de peko al peko, de sufero al sufero kaj li neniam povas

resaniĝi. Sed nehavanto de mensa malsano povas en la vasta lando de la dekdirekta mondo transcendi suferon kaj plezuron, liberiĝi de iro kaj veno kaj ĝui ĉiajn feliĉojn kaj plezurojn laŭvole. Miaj karaj! Dum ĉi tiu trejnsesio vi bone trovu vian mensan malsanon kaj tutforte ĝin kuracu.”

**57.** Sotesano plu diris: “Se vi volas trovi kaj kuraci vian mensan malsanon, vi antaŭ ĉio devas scii kuracmanieron. Unue, kiel korpa malsanulo devas honeste konfesi al kuracisto la simptomojn de sia malsano, vi ankaŭ devas sincere konfesi al gvidanto tiujn de via mensa malsano. Due, kiel korpa malsanulo devas obei ĉe ĉiu ago la gvidon de kuracisto, vi ankaŭ devas absolute obei la instruon de gvidanto. Trie, kiel korpa malsanulo devas fidele peni ĝis la kompleta kuracado de sia malsano, vi ankaŭ devas tutforte strebi ĝis la fina kuracado de via mensa malsano. Se vi faras tiel diligente, vi fine perfekte resanigas vian mensan kaj samtempe akiras la medicinan arton kuraci ĉiujn homojn, kiuj suferas mensan malsanon, tiel ke vi eterne en la vasta mondo plenumas la grandan taskon de vivulsavo kaj mondkuracado.”

**58.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Nia doktrino por studo estas kiel taktiko subpremanta la mondon de milito kaj vi estas kiel trejnato lernanta tiun taktikon. Tiu milito signifas militon, kiu senĉese leviĝas en la lando de menso. La lando de menso origine estas perfekta, trankvila, brila kaj pura, sed laŭ la diablsoldato de egoismo ĝi mallumiĝas, malpuriĝas, konfuziĝas kaj maltrankviliĝas, tiel ke ĝi havas malmultajn pacajn tagojn en la senlima mondo. Tia vivo de vivuloj nomiĝas mensa milito kaj taktiko signifas la manieron venki ĉiujn diablsoldatojn en nia menso. La taktiko estas la vojo de mia praktikado, nome, kultivi koncentriĝon, saĝon kaj precepton kaj distingi darmon de diablo. Tio estas la senkompare granda taktiko subpremi la mondan militon. Sed homoj en la mondo ne rigardas ĉi tiun mensan militon kiel militon. Kiel do direblus, ke ili scias kaj ĉefajon kaj flankajon? Se ni esploras la radikon de ĉiuj grandaj kaj malgrandaj militoj de individuoj, familioj, socioj kaj ŝtatoj, ili komenciĝas pro ĉi tiu mensa milito de homo. Tial mensa milito estas la fonto de ĉiuj militoj kaj samtempe estas la plej granda milito, kaj taktiko subpremanta mensan militon estas la ĉefo de ĉiuj taktikoj kaj samtempe estas la plej granda taktiko. Nu, vi bone komprenu ĉi tiun signifon, diligente kultivu koncentriĝon kaj saĝon kaj plenumu precepton spite al la vivoperdo. Se vi ripete faras tion dum longa tempo, vi fine povos venki ĉiujn diablsoldatojn. Tiam vi atingos la gradon de diablovenka darmforto kaj samtempe fariĝos elstara ĉefgeneralulo, kiu subpremas ĉi tiun mondon senĉese suferantan pro mensa milito. Pri tio mi certas.”

**59.** Sotesano diris: “Kiel diversaj grenoj kaj herbaĉoj estiĝas en tiu kampo, bona kaj malbona mensoj estiĝas en nia naturo origine sen distingo kaj alkroĉiĝo, tial nia mensogrundo nomiĝas menskampo. Kiel ni bone kultivu forlasitan kampon por fari ĝin fekunda, ni bone trejnu nian mensogrundon por akiri saĝon kaj feliĉon, tial el tio devenas la vorto menskampa kultivo. Do, kiel bona terkultivanto sarkas kampon, forigas herbaĉon, kreskigas nur grenon kaj aŭtune akiras riĉan rikolton, bona menskultivanto ekzamenadas la estiĝon de bona kaj malbona mensoj, forigas malbonan menson, nutras nur bonan menson kaj ĉiam havas riĉajn saĝon kaj feliĉon. Kiel malbona terkultivanto lasas herbaĉon kaj grenon kreski, ne prilaboras kampon kaj aŭtune rikoltas nenion, malbona menskultivanto agas senprudente laŭ bona kaj malbona mensoj, renkontas nur suferon kaj plimalproksimiĝas de la vojo al saĝo kaj feliĉo. Tial la kaŭzoj de ĉiuj niaj suferoj kaj feliĉoj ne kuŝas en alia loko, sed nur en bona kaj malbona kultivoj de ĉi tiu menskampo. Kiel do neglekti ĉi tiun aferon?”

**60.** Sotesano plu diris: “De antikva tempo en religio estas dirite, ke trovi menskampon estas naturvido kaj kultivi menskampon estas naturnutrado kaj naturutiligo. Ĉiuj budhoj kaj sanktuloj prenis la studon de ĉi tiu menskampo kiel destinitan profesion kaj la studo estas la

bazo por konduki ĉi tiun mondon al bono. Tial nia eklezio decidis por la fakaj objektoj de menskampa kultivo la tri principojn de spirita kultivo, afera-principa esploro kaj justaga elekto kaj instrukciis ĉiujn manierojn praktiki ilin en ĉiutaga vivo. Spirita kultivo estas la objekto, kiu purigas kampon por kultivi menskampon, kaj afera-principa esploro estas la objekto, kiu sciigas diversajn kultivmanierojn kaj distingas grenon de herbo, kaj justaga elekto estas la objekto, kiu efektivigas scion kaj sukcese rikoltas multan grenon. Laŭ la progreso de scienca civilizo homa avido tagon post tago regas en la nuna mondo, tial ĉi tiu avido ne subigeblas sen la studo de menskampa kultivo kaj malfacilas realigi la mondan pacon sen subigi ĉi tiun avidon. Do estonte homoj en la mondo nature deziros menskampan kultivon, kaj se ili deziros tion, ili serĉos veran religion, fakulon pri tio. Kiu havas maturan praktikadon, tiu homo ricevos senliman respekton. Vi ĉi-tempe refortigu vian decidon kaj fariĝu modelaj kamparanoj, kiuj atingas grandan sukceson en menskampa kultivo.”

**61.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Dum ĉi tiu trejnsesio mi multe predikis kaj do mia hodiaŭa prediko eble povas tedi al iu, sed mi tiel multe predikas kaj predikas, ĉar mi devas ofte prediki al neplenkomprenanto de moralo, ĝis li nature iluminiĝos pri ĉiuj aferoj kaj principoj kaj agos. Tial, kiam ĉiuj pasintaj sanktuloj kaj saĝuloj instruis kaj gvidis ĉiujn novulojn, ili unue klopodis klarigi aferon kaj principon kaj sekve kuraĝigis ilin por poioma ago. Vi do ne maltrankviliĝu, nek korpremiĝu de tio, ke scio kaj ago tuj ne konformiĝas post unu aŭ du trejnsesioj, kaj ankaŭ ne primoku, nek riproĉu tian homon. Nu, vi ne pensu facila la predikon, kiun vi jam aŭskultis kaj denove aŭskultas, nek malkuraĝiĝu de tio, ke ago tuj ne komplete realiĝas laŭ scio, sed vi aŭskultu kaj denove aŭskultu, agu kaj denove agu. Tiam vi atingos perfektan personecon, en kiu ago konformas al scio.”

**62.** Sotesano diris al homoj en la ferma kunsido de trejnsesio: “Ĉi tiu hodiaŭa kunsido estas kaj ferma en malgranda trejnejo kaj malferma en granda trejnejo. Kiu rigardas ĉi tiun kunsidon nur kiel ferman, tiu ankoraŭ ne scias la manieron de granda studo.”

**63.** *Gim Deo*<sup>58</sup> demandis: “Ekde la grado de diablovenka darmforto ne estas preceptoj. Ĉu tiu gradano komplete finis la studon de justaga elekto?” Sotesano respondis: “La grado de diablovenka darmforto estas la unua sankta grado. Li do ne studas, alligite al darmo kaj alkatenite al preceptoj, sed li interne havas mensopreceptojn. Unu estas atenti, ke li ne dekliniĝu al hinajano, preferante nur siajn sinkultivon kaj komforton. La dua estas atenti, ke li ne forgesu la originan celon, dronante en riĉeco, famo kaj plezuro. La tria estas atenti, ke li ne malhelpu ĝustan darmon, senprudente montrante supernaturan forton al la okuloj de vivuloj. Krom tio li faru la tri studojn de spirita kultivo, afera-principa esploro kaj justaga elekto por supren havi pli da budheco kaj malsupren nutri pli da kompato kaj klopodu savi vivulojn.”

---

<sup>58</sup> *Gim Deo* 김대거 金大學 (1914-1998): ŭonbulana alnomo *Desan*, pastro, *ĝongsa*, ĉefmajstro de ŭonbulismo (1962-1994).

## Homa vojo

1. Iu nova kredanto petis: “Mi loĝas en la monto *Gjerjongsan*<sup>59</sup> kaj ofte interparolas kun anoj de diversaj religioj en la monto. Ili ĉiam fanfaronas pri la doktrino de sia religio kaj ĉiuvorte mencias *dodok*<sup>60</sup>, sed pri ĝia signifo mi ankoraŭ ne aŭdis klaran respondon. Bonvolu klarigi al mi la signifon de *dodok*.” Sotesano diris: “Mi admiras vian scivolemon pri *dodok*, sed ĝi estas tro vasta por klarigi ĉion en mallonga tempo. Vi do poiome sciiĝos nur post via konsiderinda trejniĝo. Nun mi koncize tradukos nur la laŭvortan signifon de *dodok* por kontentigi vian scivolemon kaj vi aŭskultu min atente. Facildire *do* estas vojo, kiu signifas agi ĝuste en io ajn. Tial ago de ĉielo nomiĝas ĉiela vojo, tiu de tero tera vojo, kaj tiu de homo homa vojo. Homa vojo konsistas el la du vojoj de korpo kaj spirito. Kvankam la principo de ĉi tiuj vojoj havas unu fonton, iliaj detaloj estas tro multaj por nombri ilin. El ĉi tiuj diversaj vojoj mi unue parolos nur pri homa vojo. Sennombraj estas larĝaj kaj mallarĝaj vojoj por korpo, kiuj interligite ien ajn trakuras riverojn, montojn, kampojn kaj vilaĝojn. Tiel same ankaŭ sennombraj estas grandaj kaj malgrandaj vojoj por spirito, kiuj kune laŭsituacie aperas ie ajn ĉe individuo, familio, socio kaj ŝtato. Sed jen estas kelkaj ekzemploj. Estas vojo inter gepatroj kaj gefiloj, inter pliaĝulo kaj malpliaĝulo, inter edzo kaj edzino, inter amikoj kaj inter kunvivuloj. Tiel same estas ĝusta vojo respektive, kiam ajn oni rilatas al ĉiu afero kaj ĉiu aĵo. Kiu ie ajn scias nur ĉi tiun ĝustan vojon, tiu estas vojsciinto, dum kiu ne scias ĝin, tiu estas vojnesciinto. El la vojoj la plej granda vojo estas nia naturo, la vojoj de eterno kaj de karmo. Tio unuigas ĉiujn estaĵojn kaj estas la fonto de ĉielo, tero kaj homo, tial kiu scias ĉi tiun vojon, tiu scias la plej grandan vojon.”

2. Sotesano plu diris: “Facildire *dok* estas virto, kiu signifas aperigi bonfaron en ajnaj laboro kaj loko. Se ĉielo sekvas la vojon, aperas ĉiela bonfaro. Se tero sekvas la vojon, aperas tera bonfaro. Se homo sekvas la vojon, aperas homa bonfaro. Tiom da virtoj rezultas el kiom da vojoj. Do el ĉi tiuj diversaj virtoj mi unue klarigos nur homan virton, kies detaloj ankaŭ estas sennombraj. Se gepatroj kaj gefiloj sekvas la vojon, aperas ilia virto. Se pliaĝulo kaj malpliaĝulo sekvas la vojon, aperas ilia virto. Se edzo kaj edzino sekvas la vojon, aperas ilia virto. Se amikoj sekvas la vojon, aperas ilia virto. Se kunvivuloj sekvas la vojon, aperas ilia virto. Se ĉi tiujn virtojn renkontas individuo, familio, socio, ŝtato kaj la mondo, ili respektive harmoniiĝas. El la virtoj la plej granda virto estas tio, ke luminiĝinto de superega vojo transcendas eston kaj neeston, liberiĝas de vivo kaj morto, tute komprenas kaŭzon kaj efikon kaj igas resti pace en paradizo ĉiujn vivulojn vagantajn en la brulanta domo de la tri mondoj. Tia homo ja atingis superegan virton.”

3. Sotesano plu diris: “Sed se iu serĉas malvirtan kaj misteran aĵon, ne sciante la principon de *dodok*, kaj nur buŝe laŭdas *dodok*, farante absurdan kaj malmoralan aĵon, li sekvas malican kaj malbonan vojon. Kian rilaton do tio havas al vera vojo kaj kian virton do tio estigus? Tial, kiu volas lerni *dodok*, tiu unue devas scii la principon de vojo kaj poste ĉiam tutforte kultivi virton. Tiam iu ajn poiome klare scios vojon kaj atingos virton. Sed ordinaruloj ne scias la esencon de *dodok*, tial ili rigardas kiel luminiĝinton tiun, kiu havas nur ian magian forton, ĉu li scias la fundamentan principon de granda, malgranda, esto kaj neesto aŭ ne, kaj kiel virtulon tiun, kiu havas nur mildan koron, ĉu li scias la klaran elekton de justo, maljusto, profito kaj malprofito aŭ ne. Kio do tio ne estus ridinda? Al la ordo de

<sup>59</sup> *Gjerjongsan* 계룡산 鷄龍山: naciparka monto alta je 828 metroj.

<sup>60</sup> *Dodok* 도덕 道德: moralo, laŭvorte vojo kaj virto. Ĝi estas netradukita pro la laŭsilaba klarigo en la originalo.

lernado estas taŭge, ke vi kiel novulo scivolos unue pri *dodok*. Mi deziras, ke vi, gravurante miajn vortojn en la koro, ĉiam sciu komplete la esencon de *dodok* kaj ne dekliniĝu al malvirta vojo.”

4. Sotesano diris: “Se homo volas sekvi homan vojon, li ne povas malatenti ĝin eĉ dum unu momento. Kiel do li povus plene sekvi homan vojon sen prizorgi la vojon inter gepatroj kaj gefiloj, inter instruisto kaj disĉiplo, inter pliaĝulo kaj malpliaĝulo, inter geedzoj, inter amikoj, inter ĉiuj kunvivuloj aŭ en ajna situacio? Tial de antikva tempo ĉiuj sanktuloj laŭepoke naskiĝis, respektive elfaris pravan leĝon kaj klarigis la vojon al humana vivo. Se iu malestimas la leĝon kaj ŝatas kondukti laŭplaĉe, tia homo ne povas montri homan valoron eĉ en la nuna vivo kaj ankaŭ enfalos malbonvojen en la sekva vivo, tiel ke li ne povos eviti peksuferon.”

5. Sotesano diris: “Ĉiuj aferoj en la mondo havas ĉefajon kaj flankajon, primaraĵon kaj sekundaraĵon. Se oni scias kaj pripenos ĉefajon, nature boniĝos ankaŭ flankajo, dum se ni sekvos kaj pripenos nur flankajon, nature malklariĝos ĉefajo. Se oni scias kaj pripenos primaraĵon, nature boniĝos sekundaraĵo, dum se oni sekvos kaj pripenos sekundaraĵon, nature malklariĝos primaraĵo. Ekzemple en homo menso estas ĉefajo kaj korpo estas flankajo, kaj en la mondo religio estas primaraĵo kaj scienco estas sekundaraĵo. Nur kiu klare distingas ĉefajon de flankajo kaj primaraĵon de sekundaraĵo, tiu povas nomiĝi vojscianto. Nur tia homo povas ĝustigi eĉ mondan aferon.”

6. Sotesano diris al *I Dongĝinhŭa*<sup>61</sup>: “Naskiĝinte en la mondo, homo havas du grandajn farendaĵojn. Unu estas renkonti instruiston de ĝusta darmo kaj fariĝi budho, kaj la alia estas atingi grandan iluminiĝon kaj savi vivulojn. Ambaŭ estas la plej ĉefaj kaj grandaj el ĉiuj aferoj.”

7. Sotesano laŭdis la versojn de *Dong Ĝongŝu*<sup>62</sup>:

*“Nur la juston li starigas ne celante la profiton.  
Nur la vojon li klarigas ne pensante la meriton.”*

Sotesano aldonis po unu verson al ĉiu lia verso:

*“Se nur juston li starigas ne celante la profiton,  
al li venas grandprofito.  
Se nur vojon li klarigas ne pensante la meriton,*

*al li venas grandmerito.”*

8. Sotesano vidis ĉevalon trenanta ĉaron kaj demandis iun disĉiplon: “Ĉu antaŭeniras la ĉevalo aŭ la ĉaro?” Li respondis: “La ĉevalo iras kaj la ĉaro sekvas ĝin.” Sotesano denove demandis: “Se la ĉaro haltas, ĉu vipi la ĉevalon aŭ la ĉaron?” Li respondis: “La ĉevalon.” Sotesano diris: “Vi pravas. Vipi la ĉevalon estas regi la ĉefajon. Homo sukcesas en ajna afero, nur se li unue serĉas kaj regas ĝian ĉefajon.”

9. *Gim Giĉon* demandis: “Kiel homo povas rekoni konformiĝon kaj reziston?” Sotesano respondis: “Konformiĝo estas tio, ke homo faras ĉion orde, kiel la kvar sezonoj de printempo, somero, aŭtuno kaj vintro alternas orde. Rezisto estas tio, ke homo volas obstine fari laboron neelteneblan sen scii ĝian ordon, obstine laborigas aliulon kontraŭ lia volo kaj ĉiam ofendas la koron de aliulo. Se homo unue distingas bone konformiĝon de rezisto kaj strebas precipe al konformiĝo, li sukcesas preskaŭ en ajna laboro.”

10. Sotesano diris: “Ĉiuj homoj volas sin bonigi, sed fine ili diferencas per sukceso kaj malsukceso, ĉar laŭ siaj saĝo kaj kapablo ili serĉas konformiĝe, reziste, reale aŭ false. Kiu konformiĝe serĉas, tiu bonigas aliulon kaj ankaŭ sin, tial li malfermas senliman paradizon.

<sup>61</sup> *I Dongĝinhŭa* 이동진화 李東震華 (1893-1968): ŭonbulana alnomo *Juktaŭon*, pastrino, *ĝongsa*, unu el la naŭ disĉiplinoj de Sotesano.

<sup>62</sup> *Dong Ĝongŝu* 동중서 董仲舒 (179-104 aK): *Dong Zhongshu* (ĉ.), ĉina konfuceano.



Kiu reziste serĉas, tiu bonigas nur sin kaj damaĝas aliulon, tial li enfalas en senfinan peksuferon. Kiu reale serĉas, tiu laŭprincipe serĉas ĉiujn feliĉon kaj plezuron en la koncerna loko, tial li atingas sukceson. Kiu false serĉas, tiu serĉas ĉiujn feliĉon kaj plezuron ĉe la nekonata loko de superstiĉo, tial li nepre atingas nenian sukceson. En la mondo malmultas tiuj, kiuj serĉas konformiĝe kaj reale, dum multas tiuj, kiuj serĉas reziste kaj iluzie. Tion kaŭzas, ke ĝusta darmo ankoraŭ ne estas disvastiĝinta, kaj ke homara spirito ankoraŭ ne estas egale iluminiĝinta. Kiam lumos la vojo serĉi konformiĝe kaj reale kiel la ĉielmeza suno, ĉiuj homoj boniĝos.”

**11.** Sotesano diris: “El la homoj, kiuj en sia familio priservas gepatrojn kaj amas gefratojn, malmultas tiuj, kiuj malbonfaras al aliulo. El la homoj, kiuj malzorgas gepatrojn kaj malpacas kun gefratoj, malmultas tiuj, kiuj bonfaras al aliulo. Tial en konfuceismo estas dirite, ke gefila priservo estas la bazo de ĉiuj kondutoj, kaj ke oni serĉas lojalan korteganon el familio konata per gefila priservo. Tio efektive pravas.”

**12.** Sotesano diris: “Kio superas mian povon, tio superas ankaŭ aliulan povon. Kio estas bona al mi, tio estas bona ankaŭ al aliulo. Kio bedaŭrigas min, tion mi ne faru al aliulo. Kio kontentigas min, tion mi faru ankaŭ al aliulo. Ĉi tio estas la maniero kompreni aliulan menson konsidere mian. Se vi tiel same studos longan tempon, okazos reciproka kortuŝo sen la distanco inter vi kaj aliulo.”

**13.** Sotesano diris: “Grandtalentulo scias utiligi aliulan talenton. Se tia homo troviĝas en familio, socio, ŝtato kaj la mondo, li progresigas ilin respektive.”

**14.** Sotesano diris: “Kion homo faras kun la volo doni utilon al aliuloj, tio foje povas esti eraro kaj damaĝi ilin. Kiam do vi faras ion ajn por aliuloj, vi nepre anticipu priatentu tian okazon. Kaj tiaokaza damaĝito danku farinton pro lia bonvolo, sed ne plendu nur pro la malutila rezulto.”

**15.** Kiam Sotesano restadis en *Jongsan*, nova kredanto oferis al li manĝon kaj donacon. Sotesano demandis: “Mi elkore dankas vin pro la oferoj, sed via hodiaŭa komplezemo povos iam ŝanĝiĝi laŭ via menso. Ĉu vi komprenas ĉi tiun principon?” La kredanto respondis: “Kiel do mia menso ŝanĝiĝus senprave?” Sotesano diris: “Tio ja dependas de tio, kion vi serĉas. Se mi havas tion, kion vi serĉas dum nia renkontiĝo, nia rilato estas eterna. Alie nia rilato estas efemera.”

**16.** Sotesano diris: “Dum amikado bona rilato ne daŭras longe, ĉar homo estas senatenta en atentenda loko kaj atenta en senatentenda loko. Homo estas senatenta en atentenda loko, se li forgesas sian ajnan ŝuldon al aliulo kaj sendanke traktas bonfarinton, kiu lin malkontentigas. Homo estas atenta en senatentenda loko, se li deziras rekompenciĝi pro sia ajna bonfaro al aliulo kaj pli malamas sian ŝuldanton, kiu faras malbonon al li, pensante sian pasintan bonfaron. Tial bona rilato ne daŭras longe, des pli amikeco ŝanĝiĝas en malamon kaj koleron. Vi komprenu ĉi tiun principon kaj nepre estu atentaj en atentenda loko kaj senatenta en senatentenda loko, tiel ke vi plilongigu bonan rilaton kaj estu atentaj por ne ŝanĝi ĝin en malbonan rilaton.”

**17.** *I Gongĝu*<sup>63</sup> diris: “Mi iam donis ioman oferon al malriĉa najbaro. De tiam li sindone helpas laboron de mia hejmo. Mi klare sciiĝis, ke nepre indas bonfaro, kaj ke bonfaro alportas rekompencan same, kiel tio.” Sotesano demandis: “Vi scias la principon, ke bonfaro alportas rekompencan. Ĉu vi tamen scias ankaŭ la principon, ke en iu okazo bonfaro ŝanĝiĝas en pekon?” Ŝi demande respondis: “Kiel tio povas okazi?” Sotesano diris: “Jama bonfaro ne fariĝas peko, sed bonfarinta menso povas ŝanĝiĝi en pekfarantan menson. Ordinariuloj fieras eĉ pri sia ioma bonfaro al aliulo, tial ili kelkoble pli malamas kaj

---

<sup>63</sup> *I Gongĝu* 이공주 李共珠 (1896-1991): ŭonbulana alnomo *Gutaŭon*, pastrino, *ĝongsu*, unu el la naŭ disĉiplinoj de Sotesano, kiu kromnomis ŝin Darmsako, ĉar ŝi plej multe diktis liajn predikojn.

priplendas sian ŝuldanton, kiam li ne rekonas ilian bonfaron aŭ sendanke agas. Tiel ekstrema amo naskas ekstreman malamon kaj malgranda bonfaro grandan malamikecon. Do kultivi bonon igas la bonon nekredinda kaj bonfaro ofte rezultigas pekon. Tial Bodidarmo<sup>64</sup> diris, ke enaga senpenso nomiĝas virto. *Laozi*<sup>65</sup> diris, ke supera virto ne estas virta. Nur se studanto scios ĉi tiun principon kaj utiligos ĉi tiun menson, lia bonfaro fariĝos eterna bonfaro kaj lia feliĉo fariĝos eterna feliĉo, tiel ke lia virto unuiĝos kun tiu de ĉielo kaj tero. Vi pli diligente klopodu fari tiujn nevirtan virton kaj senŝanĝan feliĉon.”

**18.** *I Ĝongŭon*<sup>66</sup> demandis: “Kiel mi povas teni perfektan menson sen tiriĝi de amo kaj malamo?” Sotesano respondis: “La maniero ne tiriĝi de amo kaj malamo estas ĉiam deturni unu penson bone. Ekzemple, kiam iu malamas vin, ne reciproke malamu lin senpripense, sed unue serĉu la kaŭzon. Se la malamindaĵo estas en vi, klopodu forigi ĝin. Se ne, rigardu la malamon kiel pagon por ago de via antaŭa vivo kaj akceptu ĝin trankvile. Aliflanke, kiam iu malamas vin, decidiĝu malami neniun alian konsidere vian ĉagrenon. Tiam, kiu malamas vin, tiu fariĝas via instruisto pri mensuzo. Se vi akceptas lin kiel vian instruiston, kiel do vi malamus lin? Tio estas la maniero ne tiriĝi de malamo. Kiam iu amas vin, ne ĝoju senpripense, sed unue serĉu la kaŭzon. Se la amindaĵo estas en vi, klopodu ĝin ĉiam konservi. Se ne, rigardu la amon kiel ŝuldon. Ankaŭ estas prava amo kaj malprava amo. Daŭrigu pravan amon kaj fortranĉu malpravan amon. Se vi ekrimarkas, ke via alkroĉiĝo eĉ al prava amo malhelpas alian laboron, nepre faru kuraĝan decidon kaj klopodu por ne misfari ĉefan laboron. Tio estas la maniero ne tiriĝi de amo. Konstante studu por ne tiriĝi de la du, kaj vi akiros perfektan menson.”

**19.** Sotesano vidis iun disĉiplon tro riproĉanta sian suboficulon kaj diris: “Se vi lin admonas sen tiriĝi de amo kaj malamo, via parolo estas darmo. Alie via parolo ne estas darmo. Kiel varmo kaj malvarmo ŝanĝiĝas ĉe sia ekstremo en la naturo, ekstrema ago de homo alportas estontan malfortiĝon.”

**20.** Iu disĉiplo malĝentile parolis al infano kaj Sotesano diris: “Kiam homo rilatas al pliaĝulo, estas la maniero priservi lin. Kiam homo rilatas al infano, estas la maniero ami ĝin. Laŭokaze la du manieroj diferencas per formo, sed ne per la spirito respekti kaj prizorgi aliulon. Kiel do trakti eĉ infanon senprudente?”

**21.** Sotesano diris: “Estas la proverbo, ke famkuriganto estas trumpetanto. Ĉiu homo do havas kaj blovas sian trumpeton. Por aŭskultanto ia tono estas trankviliga, ĉagrena, plezuriga, malĝojiga, harmoniiga aŭ kvereliga, tiel ke dividiĝas la vojoj al feliĉo kaj al peko. Nu, kiam vi trumpetas en ĉia situacio, ĉiam per bona tono harmoniigu ĉiujn homojn kaj progresigu privatan kaj publikan laborojn, sed ne kvereligu kaj ruinigu ilin reciproke. Tiam via trumpeto estas bona muzikilo, kiu kreas senliman feliĉon. Alie ĝi estas fonto de senlima peko.”

**22.** Sotesano diris: “Eĉ en rilato sendistanca<sup>67</sup> kiel inter gepatroj kaj gefiloj, gefiloj malvolas sekvi tiun gvidon, kiun gepatroj mem ne povas plenumi. Eĉ en rilato intima kiel inter geedzoj iu partnero malvolas sekvi tiun rekomendon, kiun alia mem ne povas plenumi. Tial anticipa memplenumo estas la plej bona maniero instrui aliulon.”

**23.** Iunokte hundo gardanta la pordon de la domo *Ĝoŝil*<sup>68</sup> furioze bojadis kontraŭ indiko de alproksimiĝanto. Iu disĉiplo ekstaris kaj riproĉis la hundon. Sotesano diris: “La respondeco

<sup>64</sup> Bodidarmo 달마 達磨 (460?-534?): *Bodhidharma* (s.), princo en suda Hindio, la dudekoka patriarko de hinda budhismo. Li enmigris en Ĉinion ĉirkaŭ en 520, iĝis la unua patriarko de ĉina medita sekto kaj estas konata per sia naŭjara antaŭmura meditado en la templo *Ŝaolin*.

<sup>65</sup> *Laozi* 노자 老子 (604?-531 aK): *Laotzu* (ĉ.), ĉina granda filozofo, prapatro de taoismo.

<sup>66</sup> *I Ĝongŭon* 이정원 李正圓 (1871-1933): ŭonbulana alnomo *Hujtaŭon*, laiko.

<sup>67</sup> Rilato sendistanca 무간한 사이: esprimo por la plejproksimeco de interhoma rilato.

<sup>68</sup> *Ĝoŝil* 조실 祖室: ĉefmajstrejo, domo, kie Sotesano loĝis kaj oficis, en la centra sidejo de ŭonbulismo.

de la hundo estas bojado. Kial vi malhelpas ĝin plenumi sian respondecon? Ĉiu homo kaj ĉiu aĵo en la mondo havas sian respondecon. Eĉ en homo okulo, orelo, nazo, lango, korpo kaj menso havas sian respondecon. Se homo ĉu pliaĝa ĉu malpliaĝa, ĉu nobela ĉu malnobela, plenumos nur sian respondecon, la mondo ordiĝos kaj progresos. Nu, fidele plenumu vian respondecon kaj ankaŭ ne malhelpu aliulon plenumi sian respondecon. Tamen el ĉiuj respondecoj estas la ĉefa respondeco, kiu regas ilin. En homo menso havas la ĉefan respondecon kaj en socio kaj ŝtato ĝin havas ĉiuj iliaj gvidantoj, kiuj administras kaj estras ĉiujn instituciojn. Tial se ĉefrespondeculo malzorgos sian respondecon eĉ iomete, ĉiuj aliaj subrespondecoj malzorgiĝos kaj la institucio nature malordiĝos. Fidele plenumu vian ajnan respondecon konsidere vian situacion kaj atente uzu vian menson, kies respondeco estas la plej grava el ĉiuj respondecoj, por ne malhelpi vian sorton kaj la estontecon de homoj.”

**24.** Sotesano diris al disĉiploj: “Ĝenerale la mondo konsistas el fortulo kaj malfortulo. Se ili ambaŭ harmonie plenumos sian respondecon, eterna paco realiĝos en ĉi tiu mondo. Alie ili ambaŭ suferos katastrofon kaj la mondo neniam paciĝos. Iu pasinta sanktulo diris, ke se superulo rigardas malsuperulon kiel infanon, la malsuperulo rigardas la superulon kiel gepatrojn; se superulo rigardas malsuperulon kiel pajleron, la malsuperulo rigardas la superulon kiel malamikon.”

**25.** Sotesano diris: “Ĉiu homo volas esti respektata de aliulo, sed pli multe faras malrespektindan agon. Kiel do li realigus sian volon? La maniero esti respektata de aliulo estas unue respekti kaj servi lin. Se vi respektas kaj servas lin, li recipokas la samon al vi.”

**26.** Sotesano diris: “Mi ĉiam bedaŭras tiun fortulon, kiu ne scias roli kiel fortulo. Nur se fortulo ĉiam helpas, gvidos kaj kuraĝigos malfortulon fortuliĝi kiel li, lia forto fariĝos eterna forto kaj li estos ĉiam respektata kiel antaŭiranto kaj pioniro. Sed nun fortulo ofte nur subpremas kaj trompas malfortulon. Kiel do li fariĝos eterna fortulo? Malfortulo ne estas ĉiama malfortulo, sed staros en la pozicio de fortulo, se lia spirito pli kaj pli malfermiĝos kaj lia energio reviviĝos. Tiam nature disfalos la pozicio de tiu fortulo, kiu lin antaŭe subpremis kaj trompis. Tial vera prudentulo ĉiam pli helpas kaj prizorgas aliulojn, kiam ili estas malriĉaj kaj malfortaj, tiel ke li konservas sian forton eterne.”

**27.** Sotesano vizitis la eklezian farmon kaj demandis la kialon de porka maldikiĝo. *I Dongan*<sup>69</sup> respondis: “Dum ĉi-jara longa pluvado ni nutris porkojn per iom putra hordeo kaj ili dikiĝis tagon post tago, sed antaŭ nelonge ni denove eknutris ilin per branoj. Ili do ne povas tuj deĉutiĝi de sia intertempa gusto, tiel ke ili perdas apetiton kaj pli kaj pli maldikiĝas.” Sotesano diris: “Ĉi tio estas viva sankta libro. Tiel sama estas sufero de riĉulo subite malriĉiĝinta aŭ de potenculo subite senpovigita. Tial de antikva tempo ĉiuj sanktuloj kaj saĝuloj estas indiferentaj por riĉeco kaj rango, tiel ke ili ne tiel ĝojas pro ilia alveno, nek tiel ĉagreniĝas pro ilia foriro. La imperiestro *Ŝun*<sup>70</sup> kiel malnobelo pluganta kampon kaj bakanta argilon surtroniĝis, sed neniom estis malmodera en sia suvereneco. Ŝakjamunio abdikis sian estontan reĝecon kaj transsaltinte la palacan muron bonziĝis, sed neniom korinkliniĝis al la reĝeco. Kiel indiferenta estis ilia sinteno por riĉeco kaj rango kaj kiel granda estis ilia forto superi feliĉon kaj suferon! Nu, se vi aspiras la vojon kaj volas lerni la instruon de sanktulo kaj saĝulo, ne forlogiĝu al momentaj komforto, plezuro kaj potenco, sed cedu ilin. Eĉ se por vi ne eviteblas akcepti ilin, ne alkroĉiĝu al ili, nek malviriĝu. Tiam vi ĝuos eternajn komforton, honoron kaj potencon.”

**28.** Sotesano klarigis la signifon de ‘kontenteco pri malriĉeco kaj plezuro per studo’: “Ĝenerale malriĉeco signifas mankon de io ajn. Se vizaĝo havas mankon, tio nomiĝas

<sup>69</sup> *I Dongan* 이동안 李東安 (1892-1941): ŭonbulana alnomo *Dosan*, pastro, *debongdo*.

<sup>70</sup> *Ŝun* 순 舜 (ĉirkaŭ 2250-2150 aK): imperiestro konata kiel perfekta plenumanto de fila priservo, saĝa kaj virta reganto en la antikva Ĉinio.

vizaĝa malriĉeco. Se scio mankas, tio nomiĝas scia malriĉeco. Se havaĵo mankas, tio nomiĝas havaĵa malriĉeco. Kontenteco signifas ĉiamanieran trankvilon pri la stato. Se homo malkontentiĝas per jam ricevita malriĉeco kaj perforte baraktas por eviti ĝin, tio pli ĉagrenas kaj suferigas lin. Tial oni trankvile traelporu jam neeviteblan malriĉecon kaj plezuru per preparado de estontaj saĝo kaj feliĉo. Studanto trankvilas pri la stato kaj plezuras per studo, ĉar li scias, ke ĉiuj nunaj malriĉeco kaj sufero povas ŝanĝiĝi en estontajn feliĉon kaj plezuron. Des pli, ĉar li ĉiam uzas sian menson konforme al la vero kaj havas la plezuron eniri en la veran staton de la kultivoforto, kiu transcendas suferon kaj feliĉon. De antikva tempo ĉiuj sanktuloj kaj saĝuloj plene sciis ĉi tiun principon kaj aplikis tian mensostaton en sia reala vivo, tial ili ĝuis senkompare plezuran vivon en malriĉeco.”

**29.** Sotesano diris: “Kiu deziras kontentiĝi per tio, ke ĉio en la mondo plene konformas al lia volo, tiu estas malsaĝa kiel homo, kiu konstruas pompan domon sur sablo kaj deziras vivi lukse por dek milionoj da jaroj. Saĝulo kontentiĝas kaj dankas, se en la vivo io konformas nur al la ses dekonoj de lia volo. Eĉ se tio konformas al la tuto de lia volo, li ne monopolas tion kontentindan, sed dividas tion kun aliaj homoj, tial tio neniam alportas al li katastrofon kaj lia feliĉo ĉiam estas senfina.”

**30.** Sotesano diris: “Ofte granda peko de homo komenciĝas per malgranda eraro. Vi do nepre ekzaminu vian agon de tempo al tempo kaj klopodu tuj korekti eĉ malgrandan eraron, se vi ĝin trovas. Orangutango en sudaj landoj estas tiel forta kaj rapida, ke homoj ne povas ĝin kapti. Sed ĝi tre ŝatas vinon, tial homoj metas grandan vazon vinplenan sur la vojo, kiun ĝi frekventas. Unuafoje ĝi rikane preteriras la vazon, sed revenas kaj trinkas iom da vino. Ĝi foriras kaj denove revenas kaj trinkas pli da vino. Post plurfoja tia ripeto li fortrinkas la tutan vinon kaj fine ebrie surfalas. Tiam homoj malkaŝas sin kaj kaptas ĝin senpene. Iom da vino, kiun ĝi komence intencas trinki, ja kreskas al unu granda vazo da vino, tiel ke ĝi perdas sian vivon aŭ kaptiĝas viva. Tiel same, se homo lasas sin fari unu aŭ du malgrandajn erarojn kaj ne ilin korektas, ili akumuliĝadas, tiel ke li fine faras grandan pekon kaj serioze fuŝas sian estontecon. Kiel do malatenti tion?”

**31.** Sotesano diris kun zorgo pri junaj disĉiploj, kiuj vagis pro la nepovado kapti la ĝustan vojon de studo: “El vi estas homo, kiu komence faras bone, sed fine malbone, kaj kiu komence faras malbone, sed fine bone. Tial mi antaŭvidas tion kaj gvidas vin per maniero konvena al vi respektive. Homo pli-malpli formas sian personecon de la tuta vivo pli ol en la aĝo de tridek jaroj. Se vi ne povas estiĝi prudentaj eĉ ĝis tiam, tio estas zorgiga ne nur al mi, sed ankaŭ al vi pli grande.”

**32.** Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*, granda pluvado akvoplenigis la lageton antaŭ la pajldomo. En ĝi kolektiĝis elĉiufanke multaj ranoj kaj naskis sennombrajn idojn. Kiam la pluvado ĉesis post nelonge kaj la suno brilis, la akvo poiome malpliigis kaj aspektis elĉerpigonta ene de kelkaj tagoj. Sed enakve ranidoj amuziĝis, svingante la vosteton. Sotesano vidis tion kaj diris: “Kiel kompatinde estas! Ranidoj tiel vigle amuziĝas, ne rimarkante sian vivon mallongiĝanta minuton post minuto. Kiel do nur ili estus tiaj? Ankaŭ homoj estas tiaj. Kiam saĝulo vidas la estontecon de tiuj homoj, kiuj nur elspezas sen enspezo, aŭ kiuj nur misuzas sian nunan potencon, ili estas nenio aliaj ol tiuj ranidoj en la sekiĝanta akvo.”

**33.** Sotesano diris al homoj: “Hodiaŭ mi parolos pri la plej necesa maniero por gardi menson kaj protekti korpon. Bone aŭskultu mian parolon kaj prenu ĝin kiel la sloganon de via studo en ĉiuj situacioj. La slogano estas ‘Ne perdu timrespekton’. Tio signifas, ke vi devas iam ajn kaj ie ajn rilati timrespekte al ĉiuj homoj kaj objektoj. Se homo perdas timrespekton, sendube naskiĝas plendo kaj venĝemo eĉ en rilato plej intima kaj sendistanca kiel inter gepatroj kaj gefiloj, inter gefratoj kaj inter geedzoj kaj li ofte malliberiĝas kaj damaĝiĝas de malgrava situacio kaj eĉ senvalora objekto. Tion kaŭzas, ke li perdas

timrespekton en la koro kaj agas senprudente, rigardante rilaton sendistanca kaj situacion malgrava. Ekzemple, se vendisto kaptas iun homon, kiu estas ŝtelanta skatolon da alumetoj en lia butikoj, ĉu la vendisto lasas la ŝtelanton foriri, rigardante la skatolon kiel bagatelon? Nur ekstreme bonkora homo finas per riproĉo. Alie povas okazi insulto. La skatolo da alumetoj do igas la ŝtelanton riproĉata kaj insultata. Alivorte pro la deziro preni alumetojn li ignoras kaj insultas sin, kaj la deziro rezultas el tio, ke li perdas timrespekton al unu skatolo da alumetoj. Se homo perdas timrespekton, eĉ nesentpova kaj senvalora skatolo da alumetoj montras tioman potencon, des pli kioman potencon povas montri plivaloraĵo aŭ ĉiopova homo? Tial ni ĉiam havu timrespekton. Se ni timrespektas ion ajn kaj juste vivas, ĉiuj objektoj en la tuta universo de la blua ĉielo ĝis la vasta tero estas niaj uzaĵoj, kaj ĉiuj leĝoj plenumataj en ĉi tiu mondo estas niaj protektantoj. Se ni sen timrespekto agas senprudente, ĉiuj objektoj en la universo estas aparatoj, kiuj vundas nin, kaj ĉiuj leĝoj en ĉi tiu mondo estas ŝnuroj, kiuj malliberigas nin. Kiel do ne timi tion? Tial mi petas vin nepre gravuri ĉi tiun sloganon korfunde kaj sekvi ĝin en ĉiuj okazoj, se vi en ĉi tiu ondoterura mondo volas bone gardi mensojn kaj protekti korpon.”

**34.** Sotesano diris en novjara tago: “Hodiaŭ mi ricevis de multaj homoj novjarajn bondezirojn. Sekularuloj kutimas regali bondezirintojn repage per manĝo aŭ donaco, sed mi sciigos al vi unu sekreton, per kiu vi povas sekure travivi la venantan malfacilan mondon.” Kaj li skribis la jenan poemon de iu pasinta saĝulo:

*“Milda ago estas plej valora,  
malfeliĉon kaŭzas la rigora.  
Kvazaŭ balbutante vi parolu,  
kvazaŭ stulta homo vi laboru.  
Ju pli urĝe, des pli lante pensu,  
kaj en paco krizon ne forgesu.  
Kiu vivas vivon ĉi tiele,  
tiu estas homo brava vere.”*

Sotesano aldonis poemfine la jenan frazon:

*“Kiu agas laŭ la supra vorto,  
tiu vivas ĉiam en komforto.”*

**35.** Iun tagon disĉiploj dum ĵurnallegado diverse argumentis por kaj kontraŭ iu novaĵo. Sotesano aŭskultis kaj diris: “Kiel vi povas senprudente paroli pri aliula afero? Veropiniulo estas prudenta kritiki aliulon. Eĉ dum vi legas ĵurnalon, vi detale esploru en ĝi la kaŭzon kaj efikon de bono kaj malbono kaj prenu ilin kiel ekzemplojn por via estonteco. Tio estas la ĝusta konduto de studanto kaj estas la vojo al vera profito. Tio ja estas lumigi unu mensojn per ĉiuj estaĵoj. Por leganto kun tia spirito ĵurnalo estas viva sankta libro kaj materialo por saĝo kaj feliĉo. Leganto sen tia spirito kreskigas nur kritikemon per akra opinio kaj malpeza lango kaj facile enfalas en la kavon de peko. Vi do tre atentu tion.”

**36.** Sotesano ial riproĉis *Gim Namĉon* kaj diris al *Mun Ĝonggju*: “Mia riproĉo ne direktiĝis nur al *Namĉon*. Kiel vi pensas pri tio? Kiam mi riproĉas iun ajn, unue ekzameni vian konduton. Se vi trovas la saman kulpon, korektu ĝin. Se ne, ĉiam memoru la riproĉon por ne kulpi en la estonteco. Ne klaĉu, nek moku la riproĉaton. Malsaĝulo klarigas nur aliulan kulpon, tial ĉiam estas mallume antaŭ li, dum saĝulo ekzamenas sian kulpon, tial li ne havas eĉ la tempon por rigardi aliulan kulpon.”

**37.** Sotesano diris: “Kiam homo faras iun laboron en la mondo, li ricevas de aliulo jen laŭdon, jen riproĉon. Se vi senpripense nur ĝojas aŭ malĝojas pro ĝi, vi estas kiel infano. Kiam aliulo parolas ion pri vi, reale ekzameni vian laboron. Se la laboro konformas al via konscienco, malgraŭ ĉies kritiko fidele faru ĝin per nesubigebla kuraĝo. Se ne, malgraŭ ĉies

laŭdo senhezite forĵetu ĝin kiel eluzitajn ŝuojn. Tio farendas por memstara studanto.”

**38.** Sotesano diris: “Kiam homo komencas iun laboron, ofte li daŭrigas sian penon bone fari ĝin ĝis unu eraro, sed post unu- aŭ dufoja eraro li tute malatentas sian volon kaj agas laŭplaĉe. Tio estas komparebla kun la jeno: kiam homo portas novan veston, li kun atento portas ĝin komence, sed perdas la atenton, post kiam ĝi estas makulita kaj ĉifita. Se homo tiamaniere faras ĉiun laboron, kiel do li sukcesus? Nur homo kun kompleta penso kaj granda administro ne senkuraĝiĝas de ajna eraro en laboro kaj ne ĉesigas komencan penon, sed rigardas la eraron kiel modelon kaj plibonigas sian estontecon, des pli por tia homo malgranda eraro estas la bazo de granda sukceso.”

**39.** Sotesano diris: “Ĉiuj homoj volas profiton, sed multe faras malprofitigan agon. Ĉiuj homoj volas riĉecon kaj rangon, sed multe faras malriĉigan kaj malnobeligan agon. Ĉiuj homoj volas laŭdon, sed multe faras mokigan agon. Tiel ofte ankoraŭ volo estas malsama ol perkorpa ago. Tion kaŭzas, ke ili ne scias la fonton de plezuro kaj sufero, aŭ ke malgraŭ scio ili ĝin ne efektivigas. Vi do pensu profunde kaj klare juĝu ĉi tiun kialon kaj ĉiapene konformigu vian agon al via volo. Tiam ĉio realiĝos laŭ via volo.”

**40.** Sotesano diris: “El la profesioj de homoj estas tiu, kiu estas feliĉokrea, kaj kiu estas pekfara. Feliĉokrea profesio estas tiu, per kiu homo profitigas ĉiun socion kaj nature bonigas sian menson. Pekfara profesio estas tiu, per kiu homo malprofitigas ĉiun socion kaj nature malbonigas sian menson. Tial homo devas esti prudenta elekti sian profesion. La plej bona profesio el ĉiuj profesioj estas budha laboro, kiu ĝustigas la menson de ĉiuj vivuloj kaj savas ilin de sufermaro al paradizo.”

**41.** Sotesano diris: “Prospero kaj malprospero de familio dependas ankaŭ de la mensostato de ĝia estro. Por familia prospero unue la spirito de famiĉestro estu diligenta. Due ĉiuj anoj harmonie kunlaboru por io ajn. Trie oni akiru scion kaj sperton antaŭ ol komenci ajnan laboron. Kvare oni disvolvu laboron orde laŭ la maksimumo, ke oni eklaboras per malgrandaĵo kaj poiome atingas grandaĵon. Kvine oni bone utiligu uzitan aĵon. Sese oni havu taŭgan vicokupon krom ĉefokupo kaj ilin glate interligu por enspezo. Sepe oni ne uzu senprudente kapitalon ĝis la atingo de planita enspezo. Oke oni eĉ post la celatingo ne troprofitu, sed ĉiam investu kapitalon en bazhavan kaj fidindan lokon. Naŭe oni ĉiam kontrolu spezon kaj malvaru pravan elspezon, sed firme preventu malvaloran elspezon. Se vi ĉiapene tiel estras vian familion, via mastrumaĵo nature kreskas kaj tio ankaŭ helpas vian mensostudon.”

**42.** Sotesano diris: “Familio estas reduktita ŝtato kaj ŝtato estas kolekto da familioj. Do familio estas malgranda ŝtato kaj samtempe la fundamento de granda ŝtato. Tial, kiu bone estras sian familion, tiu povas bone gvidi ankaŭ sian socion kaj sian ŝtaton. Se ĉiu homo bone estras sian familion, la ŝtato bone administriga. Oni ja devas scii, kiel grava kaj granda estas la respondeco de famiĉestro.”

**43.** Sotesano diris: “Por starigi modelan familion unue la tuta familio komune havu kredindan religion kaj ĉiam kun nova spirito disvolvu novan vivon. Due la famiĉestro havu virton, saĝon kaj konduton meritajn gvidi sian familion. Trie la famiĉestro ĉiamaniere klopodu precipe eduki siajn anojn, sed antaŭ ĉio li mem multe lernu kaj spertu por fariĝi familia spagulo. Kvare ĉiuj anoj vivu de sia laboro, kontrolu ĉiutagan spezon kaj faru buĝeton por ŝpari eĉ iom da mono. Kvine ĉiuj anoj havu profesion, sed evitu profesion, kiu mortigas vivulon aŭ narkotas aliulan spiriton, kaj ne minacu vivon kaj havaĵon de aliuloj per la misuzo de sia potenco, nek kordolorigu ilin. Sese eĉ geedzoj laŭeble memstare havu respektivan financan vivon kaj kune klopodu riĉigi siajn familion, socion kaj ŝtaton. Sepe ĉiuj anoj fidele plenumu devon kaj respondecon por la ŝtato kaj socio kaj laŭkapable kunhelpu precipe al organizoj senpovulprizorgaj, klerigaj kaj religiaj. Oke gepatroj instruu al siajn gefilojn kaj sciencon kaj religion kaj igu ilin servi post sia finedukiĝo la ŝtaton, socion aŭ eklezion dum konsiderinda tempo. Naŭe gepatroj heredigu al gefiloj nur tiom da

havaĵo, per kiom ili povas starigi la bazon de sia vivtenado, kaj oferi la restaĵon al publikaj organizoj de la ŝtato, socio aŭ eklezio. Deke ĉiuj anoj havigu al si novan forton per adekvata ripozo kelkfoje monate aŭ jare por kultivi korpon kaj menson en komplika homa vivo.”

**44.** Kiam Sotesano renkontis gravedulinon, li ĉiam diris: “Ne pensu senkompate, nek parolu senkompate, nek agu senkompate.” Li aparte malpermesis al ŝi mortigi ajnan vivulon kaj diris: “Kiam feto estas en la patrina utero, ĝia spirito estas tro juna. Ĝian estontan karakteron do facile influas gepatraj menso, parolo kaj ago, tial ekstreme gravas la bona konduto de gravedulino.”

**45.** Sotesano diris: “Estas kvar manieroj instrui gefilojn. La unua estas permensa instruado. Gepatroj kun religia kredo tenu sian menson ĝusta, bona kaj trankvila kaj igu gefilojn sekvi unue ilian menson. La dua estas peraga instruado. Gepatroj unue mem kaj dece agu kaj igu gefilojn sekvi nature ilian agon. La tria estas pervorta instruado. Gepatroj multe rakontu al gefiloj sentencojn kaj bonfarojn de budhoj, bodisatvoj, sanktuloj, saĝuloj, granduloj kaj klarviduloj, igu gefilojn memori kaj sekvi ilin kaj instruu per ĝentila admono gefilojn pri ĉiuj aferoj kaj principoj. La kvara estas rigora instruado. Gepatroj instruu al gefiloj per digno en neevitebla okazo, kiam gefiloj estas senprudentaj, sed tio ne ofte uzendas. Tial se gepatroj dum sia hejma instruado al gefiloj kunuzas ĉi tiujn kvar manierojn de la fetiĝo ĝis la plenaĝiĝo de ili, tio multe helpas gefilojn bonuliĝi.”

**46.** Sotesano diris: “Kiam gepatroj instruas gefilojn, unue gepatroj mem ne kontraŭu la vojon priservi pliaĝulon kaj gvidi malpliaĝulon. Gepatroj perdas la prestiĝon gvidi gefilojn, se antaŭ gefiloj gepatroj rekte malpriservas kaj malrespektas proprajn gepatrojn aŭ miskondutas en io ajn. Due gepatroj serioze parolu kaj agu. Se gefiloj rigardas gepatrojn facilanimaj, malfacilas gvidi gefilojn per prava regulo. Trie gepatroj donu amon al gefiloj. Se gepatroj estas nur seriozaj kaj ne donas amon al gefiloj, gepatroj ne povas vere edifi gefilojn. Kvare gepatroj ne perdu de gefiloj fidon pri ĉiuj siaj promesoj. Alie gepatroj ne povas doni striktan ordonon al gefiloj. Kvine gepatroj klare premiu kaj punu gefilojn. Alie gepatroj ne povas doni al gefiloj veran vekiĝon. Sese gepatroj inspiru pravan religian kredon al gefiloj ekde ilia infanaĝo. Alie al gefiloj facilas forlogiĝi al ekstera situacio dum ilia kresko. Sepe gepatroj rekomendu altruismon al gefiloj ekde ilia infanaĝo. Alie nature kreskas egoisma ĝermo. Oke gepatroj malpermesu al gefiloj kritikaĉi kaj kalumnii aliulon ekde ilia infanaĝo. Alie nature kreskas senprudenta kutimo kaj malfermiĝas la pordo de langalporta katastrofo. Naŭe gepatroj malpermesu al gefiloj preni maldecan objekton eĉ bagatelan ekde ilia infanaĝo. Alie nature kreskas senhonta kutimo.”

**47.** Sotesano diris: “En la infanaĝo ĝenerale homo facile heredas la spiriton de gepatroj, vidante kaj aŭdante iliajn agojn. Tial eĉ por idoj gepatroj devas prudente elekti sian profesion kaj ĉiapene sekvi pravan laboron kaj ĝustan vojon.”

**48.** Sotesano diris en memorceremonio pri *hujsaŭi*<sup>71</sup>: “Nia eklezio honoras per la titolo *hujsaŭi* la meriton de tiuj gepatroj, kiuj naskis, nutris kaj oferis siajn amatajn gefilojn por la eklezio, kaj memoras ilin. La nuna popola menso plenas je egoismo kiel en la pasinteco, tial tre malmultas tiuj, kiuj servas aliulon spirite, korpe kaj materie. Ofte gepatroj alkatenas nur al unu familio la tutan vivon de gefiloj eĉ kun granda povo, precipe volante sin apogi sur ilin. Sed vi, *hujsaŭi*-anoj, de frue transcendis tian penson, ignoris viajn gloron kaj komforton kaj dediĉis viajn amatajn gefilojn por ĉi tiu granda monda laboro. Tio estas la ago de kompatoplena bodisatvo. Ni devas eterne glori la spiriton kaj meriton de ĉi tiuj *hujsaŭi*-anoj kaj fariĝi veraj homoj, kiuj ĉiam servas la publikon ie ajn en la mondo, sekvante ilian volon.”

---

<sup>71</sup> *Hujsaŭi* 회사위 喜捨位: ŭonbulana honortitolo donita al gepatroj de tiuj ŭonbulanoj, kiuj atingis pli ol la gradon de darma-diabla lukto.

49. Sotesano en la domo *Bongneĝongsa* informiĝis pri la malsano de patrino. Li urĝe revenis hejmen en *Jonggŭang* kaj flegis ŝin. Post kelka tempo li diris al frato *Dongguk*: “Kiel do mi, moralinstruisto, malzorgus nian malsanan patrinon? Sed mia nuna situacio ne permesas al mi plene flegi ŝin. Kiel vi scias, jam multenombraj estas homoj, kiuj volas lerni de mi. Se mi ilin ne zorgos, tio malhelpos ilian estontecon kaj obstaklos ĉiun ĝisnunan laboron. Bonvolu tutforte flegi patrinon anstataŭ mi. Tiam mi eĉ iomete liberiĝos de mia kulpo pri neflegado kaj vi ankaŭ fariĝos granda fondinto de ĉi tiu laboro.” Sotesano konsolis patrinon: “La vivo kaj morto de homo dependas de ĉiela volo. Patrino, estu trankvila kaj restu ĉiam en la vera stato de koncentriĝo kaj pureco.” Sotesano kontraŭvole forlasis la hejmlokon kaj reveninte al la domo *Bongneĝongsa* absorbiĝis en sia savlaboro.

50. Iu disĉiplo demandis: “Ĉu ĝuste estas precipe ŝpari en ĉiuj ceremonioj de plenaĝiĝo, geedziĝo, funebro kaj prapatra memoro?” Sotesano respondis: “Oni moderigu elspezon en ĉiuj ceremonioj, sed nur ŝpari sen doni oferon al publika laboro ne estas la celo de ceremonia reformo. Geedziĝa ceremonio estas la komenco de nova vivo, tial ĝuste estas ŝpari geedziĝan koston kaj starigi la fundamenton de vivtenado per ŝparita mono. Funebra ceremonio estas la fino de vivo, tial ĝuste estas malavari funebren elspezon conforme al la merito de mortinto.”

51. Kiam Sotesano vidis najbarajn infanojn ludantaj, du el ili kverelis pri la posedo de iu malgranda objekto. La du fine venis kaj petis Sotesanon solvi la aferon, atestigante alian infanon. Sed la infano post longa pripensado respondis, ke ĝi ne scias, ĉar la afero ne rilatas al ĝi. Sotesano solvis la aferon kaj diris al disĉiploj: “Eĉ tiuj infanoj kverelas unu la alian kaj strebas al afero, kiu rekte rilatas al ili, sed ne strebas al afero, al kiu ne rilatas al ili. Kiel do multus homoj, kiuj sindone laboras por aliuloj? Tial respektiĝi meritas homo, kiu forlasas siajn profiton kaj potencon kaj laboras por aliuloj. Ankaŭ kiu havas tute malfermitan menson, tiu ne povas ne labori por aliuloj.”

52. Sotesano diris: “*I Ĉungmugong*<sup>72</sup> uzis sian menson conforme al la vojo. Li havis altan rangon, sed sen fiereco dividis kun ĉiuj siaj soldatoj vivon kaj morton, plezuron kaj suferon. Li senpotencigite fariĝis simpla ĉevalservisto, sed sen plendo kaj dekliniĝo tutforte nutris ĉevalojn bone. Foje li diris al ĉevaloj: ‘Kvankam bestoj, vi ankaŭ devas fari plejblon en la tempo de ŝtata krizo, ĉar vi kreskis, vivante de ŝtata havaĵo.’ Li cedis komfortan kaj gloran taskon al alia generalo kaj prenis sur sin malfacilan kaj nedistingiĝan taskon. Li lojale priservis sian superulon kaj ame gvidis sian subulon. Tial vere li estas sankta generalo kun saĝo kaj virto kaj estas inda ekzemplo por ĉiuj homoj, kiuj faras ŝtatan aŭ mondan laboron.”

53. Sotesano petis de *Ju Hoil*<sup>73</sup> legi la antaŭparolon de la libro *Ŝucuan*<sup>74</sup>. Kiam li atingis la frazon, ke la du imperiestroj<sup>75</sup> kaj la tri reĝoj<sup>76</sup> estas menskonservantoj, dum la reĝoj *Ĉieh* de *Hsia*<sup>77</sup> kaj *Ŝou* de *Ŝang*<sup>78</sup> estas mensperdiĝantoj, Sotesano diris: “Ĉi tiu frazo estos granda sekreto en la venonta mondo. Kiu avidas riĉecon, rangon kaj potencon kaj perdas menson, tiu ruinigos sin kaj ankaŭ sian familion. Se tia estas gvidanto de ŝtato aŭ la mondo, la

---

<sup>72</sup> *I Ĉungmugong* 이충무공 李忠武公 (1545-1598): alnomo de *I Sunŝin*, korea admiralo, nacisava sankta heroo.

<sup>73</sup> *Ju Hoil* 유허일 柳虛一 (1882-1958): ŭonbulana alnomo *Jusan*, pastro, *debongdo*.

<sup>74</sup> *Ŝucuan* 서전 書傳: ĉina libro kun la komentarioj de *Ĉeĉim* (1167-1230) pri la libro *La Historio*, kolekto da politikaj dokumentoj en la ĉina frua historio, kiujn onidire redaktis Konfuceo.

<sup>75</sup> Du imperiestroj 이제 李帝: *Jao* kaj *Sun*, rigardataj kiel sanktaj regantoj.

<sup>76</sup> Tri reĝoj 삼왕 三王: *Ju*, *Tang* kaj *Ven* kaj *Vu* (*Ven* kaj *Vu* estas patro kaj filo kaj kalkuliĝas je unu), rigardataj kiel sanktaj regantoj.

<sup>77</sup> *Ĉieh* de *Hsia* 하결 夏桀: la lasta reĝo de la ĉina dinastio *Hsia*, rigardata kiel tirano.

<sup>78</sup> *Ŝou* de *Ŝang* 상수 商受: identa kun la suvereno *Ĉoŭ*, la lasta reĝo de la ĉina dinastio *Jin*, rigardata kiel tirano.



katastrofo etendiĝos sur ĝin. Vi do ne tiriĝu de riĉeco, rango kaj potenco, sed tenu viajn rimedojn en la vivo de vesto, manĝo kaj loĝejo kaj ne perdu menson. Tiam al vi ne okazos danĝero en ajna malfacila tempo kaj unue vi ricevos bonan fortunon de ĉielo kaj tero.”

54. Post kiam iu riĉulo savis per iom da greno najbarajn malriĉulojn, kiuj suferis malbonan rikolton, li ĉiam deziris iliajn laŭdojn. Tial vilaĝanoj diskutis kaj starigis al li monumenton, sed li ne kontentiĝis per tiu monumento kaj per propra granda monsumo denove starigis monumenton kaj konstruis grandiozan monumentpavilonon. Rigardante tion ridinda, la vilaĝanoj multe kalumniis kaj mokis lin. *Gim Ĝuangson* aŭdis kaj raportis tion en diskuta kunveno. Sotesano aŭskultis tion kaj komentis: “Tio estas viva sankta libro, kiu avertas tiajn homojn, kiuj perforte serĉas honoron. Tiu riĉulo faris tion por montri sian honoron, sed male perdis eĉ sian pli fruan honoron, ĉu ne? Tial malsaĝulo serĉas honoron, sed tio male difektas lian honoron, dum saĝulo aparte ne serĉas honoron, sed nur dum lia ĝusta laboro nature venas al li granda honoro.”

55. *I Ĉunpung* diris: “Antaŭ nelonge mia filo iris al monto kaj estis tre surprizita de la kuglo mispafita de ĉasisto. Mi ne povas bone trakti la aferon, se tiam la kuglo malfeliĉe trafis mian filon.” Sotesano diris: “Diru al mi vian opinion.” Li respondis: “Leĝo estas por trakti tian aferon, tial mi informos la fakton al la jurejo kaj esprimos mian senton kiel patro.” Sotesano demandis *Song Ĝokbjok*<sup>79</sup>. Li respondis: “Ĉiu afero okazas laŭ la principo de kaŭzo kaj efiko, tial mi rigardos ankaŭ tiun aferon kiel repagon kaj tiel traktos ĝin, kiel nenio okazis.” Sotesano demandis *O Ĉanggon*. Li respondis: “Se mi ne estus studanto, mi nepre alvokus la jurejon. Mi tamen rigardos tiun aferon kiel sorton kaj ĝin preterlasos.” Sotesano diris: “Vortoj de vi tri deflankiĝas de la meza vojo. Laŭ la nuna leĝo oni nepre devas sciigi al ŝtatoficejo la naskiĝon kaj morton de homo. Des pli, kiu trovas akcidentan aŭ subitan mortinton, tiu devas sciigi tion al la ŝtatoficejo, eĉ se la trovanto havas nenian rilaton al la mortinto. Ne necesas paroli, se la trovanto estas patro de la mortinto. Tial mi kiel ŝtatano kaj patro tuj raportos la fakton al la ŝtatoficejo kaj konfidos al la jurejo postan traktadon.”

56. Sotesano iun tagon aŭskultis historian romanon kaj diris: “Por elvoki la intereson de legantoj ofte verkistoj tro priskribas la psikon kaj konduton de malsuperuloj kaj friponoj kaj faras ilin nekompareblaj fiuloj. Tio ankaŭ fariĝas la semo de malbona rilato. Tial kiam vi parolas pri la historio de antikvulo aŭ kritikis la konduton de nunulo, vi estu atentaj por ne troigi la realaĵon.”

57. Sotesano iun tagon legis la frazon de la libro *Ĝuangzi*<sup>80</sup>, ke Konfuceo<sup>81</sup> vizitis *Daoĝi*<sup>82</sup> por savi lin, sed ricevis sennombrajn insultojn kaj revenis vane. Sotesano diris: “Konfuceo estas granda sanktulo. Li klopodis bonigi lin malgraŭ danĝero kaj insultigo kaj montris homsavajn ekzemplon por dekmiloj da jaroj venontaj, sed homsavaj rimedoj diferencas laŭepoke. Por savi nunulojn pli efikas nature inspiri al ili agon, montrante la rezulton de anticipa memago, ol ilin admoni nur parole. Se paroli pri la kialo, granda parto de la nunuloj sen memago nur admonas aliulojn kaj fine enfalas en falsecon, tial ĉiuj homoj vere ne kredas nur admonon. Tio estas rimedo malsama ol tiu de Konfuceo, kiu klopodis savi *Daoĝi* per rekta admono. Sed samas la celo de mondsavo ĉu per rekta admono, ĉu per anticipa memago kaj diferencas nur la rimedoj laŭepoke.”

<sup>79</sup> *Song Ĝokbjok* 송적벽 宋赤壁 (1874-1939): ŭnbulana alnomo *Hasan*, laiko.

<sup>80</sup> *Ĝuangzi*, La 장자 莊子: libro *Zhuangtzu* (ĉ.), alinome *Nanhuacĝing*, kolekto da verkoj de *Ĝuangzi* (365-290 aK), ĉina granda filozofa kaj ĉefa persono de taoismo.

<sup>81</sup> Konfuceo 공자 孔子 (551-479 aK): ĉina granda filozofa, fondinto de konfuceismo.

<sup>82</sup> *Daoĝi* 도척: *Daozhi* (ĉ.), ĉina konata malbonulo, ĉefo de la naŭmilrabista bando.

**58.** Sotesano iun tagon diris pri la memsurtroniĝo de la reĝo *Vu* de *Ĉou*<sup>83</sup>, kiu eksigis sian suverenon *Ĉou*<sup>84</sup> aj subigis la tutan landon: “Se mi estus sur la loko de la reĝo *Vu*, mi neeviteble forpelus la reĝon *Ĉou* laŭ la popola volo, sed cedus la tronon al alia virtulo. Sed se ne troviĝus virtulo, aŭ se la popolo persiste ne akceptus mian cedon, mi ankaŭ ne povus fari alie ol surtroniĝi.”

**59.** Iu homo revenis de la vojaĝo en la monto *Gumgangsán*<sup>85</sup> kaj diris al Sotesano: “Dum mia vojaĝo mi renkontis homon, kiu kapablis laŭvole alvoki aŭ forsendi korvojn aŭ serpentojn. Ŝajnas al mi, ke li estas vera iluminiĝinto.” Sotesano diris: “Korvo grupiĝas kun korvo kaj serpento asociiĝas kun serpento. Kiel do iluminiĝinto troviĝus inter korvoj kaj inter serpentoj?” Li demandis: “Kia homo estas vera iluminiĝinto?” Sotesano respondis: “Vera iluminiĝinto sekvas nur homan vojon inter homoj.” Li demandis: “Ĉu iluminiĝinto ne havas ian apartan signon?” Sotesano respondis: “Ne.” Li demandis: “Kiel oni povas rekoni iluminiĝinton?” Sotesano respondis: “Se oni mem ne estas iluminiĝinto, oni ne povas bone rekoni iluminiĝinton, eĉ se oni vidas lin. Nur kiu bone parolas fremdan lingvon, tiu povas rekoni, ĉu aliulo bone parolas ĝin aŭ ne. Nur kiu bone muzikas, tiu povas rekoni, ĉu aliulo bone muzikas aŭ ne. Tial estas dirite, ke nur tia homo rekonas tian homon.”

---

<sup>83</sup> *Vu* de *Ĉou* 주무왕 周武王: reĝo, kiu mortigis la lastan reĝon de *Jin* aŭ *Ŝang* kaj fondis la dinastion de *Ĉou*.

<sup>84</sup> *Ĉou* 周 紂: lasta reĝo de *Jin*, konata kiel tirano.

<sup>85</sup> *Gumgangsán* 금강산 金剛山: monto fama per belaj pejzaĝoj, alta je 1638 metroj, situanta en norda Koreio.

## Kaŭzo kaj efiko

1. Sotesano diris: “La vero de la universo eterne turniĝadas sen naskiĝo kaj morto. Iri estas veni kaj veni estas iri, donanto estas ricevanto kaj ricevanto estas donanto. Tio estas eterne senŝanĝa principo.”
2. Sotesano diris: “Laŭ la principo de kvarsezona rotacio en ĉielo kaj tero, ĉiuj estaĵoj havas la ŝanĝon de naskiĝo, maljuniĝo, malsano kaj morto. Laŭ la principo de jina-janga reciproka antaŭenpuŝo en la universo, ĉiuj homoj havas la karman repagon por bono kaj malbono. Vintro estas la tempo, kiam malvarmo estas forta, sed la malvarmo enhavas varmon, tial kiam la varmo pli kaj pli fortiĝas, venas printempo kaj somero. Somero estas la tempo, kiam varmo estas forta, sed la varmo enhavas malvarmon, tial kiam la malvarmo pli kaj pli fortiĝas, venas aŭtuno kaj vintro. Tiel same ankaŭ en homa afero forto kaj malforto rilatas unu la alian, kaj laŭ siaj bono kaj malbono homoj repage progresas kaj malprogresas, ricevas reciprokajn helpojn kaj konfliktojn. Tio estas la principo de karmo.”
3. Sotesano diris: “Plantoj radikas en tero, tial se iliaj semoj aŭ radikoj enteriĝos, ili ĝermos kaj kreskos laŭ la kondiĉoj de tempo. Animaloj radikas en ĉielo, tial se iliaj eĉ unu penso, ago kaj parolo kiel karma kaŭzo semiĝos en la malplena darmondo, ili rikoltos repagon laŭ la kondiĉoj de bono kaj malbono. Kiel do trompi homon kaj ĉielon?”
4. Sotesano diris: “Homo kun penso donas rekompencojn kaj punojn, tial, kvankam li plej juste donas ilin, li povas erari. Sed ĉielo kaj tero sen ajna antaŭjuĝo donas rekompencojn kaj punojn, tial ili tute ne eraras konforme al la vero kaj ili klare faras repagon por bono kaj malbono. La vero estas ĉiopova kaj ĉieesta en la dek direktoj. Kiel do trompi la veron kaj maltimi la repagon? Tial prudentulo rigardas rekompencojn kaj punojn donitajn de la vero pli grandaj kaj gravaj ol de homo.”
5. Sotesano diris: “Ne malamu, nek insultu aliulon malantaŭ lia dorso. Interkomunikiĝas la energioj en la universo. Tial eĉ se unufoje iu malamas kaj insultas aliulon dum lia foresto, unue okazas energia interkomunikiĝo kaj semiĝas reciproka konflikto. Eĉ se unufoje iu bone pensas kaj laŭdas aliulon sen lia sciigo, unue okazas energia interkomunikiĝo kaj semiĝas reciproka helpo. Fine, renkontante siajn kondiĉojn, la semo de reciproka konflikto produktas malbonan frukton kaj tiu de reciproka helpo produktas bonan frukton. Lumbriko kaj skolopendro havas energion de reciproka konflikto. Tial kiam oni kunbruligas iliajn ŝelojn, oni povas observi, ke la du energioj puŝas unu la alian kaj poste unu malaperas pli frue. Ankaŭ per tio oni povas scii, ke al si mem respondas energioj de reciproka konflikto kaj de reciproka helpo.”
6. Sotesano diris: “Ĉiela-tera vetero estas jen sunbrila, jen nuba. Tiel same homa humoro estas jen gaja, jen melankolia, kaj ĉirkaŭa situacio estas jen favora, jen malfavora. Ankaŭ tio estas nenio alia ol natura ŝanĝo laŭ la principo de kaŭzo kaj efiko. Kiam sciinto de ĉi tiu principo elportas tian ŝanĝon, lia kultivita menso estas egala kaj ordinara kiel ĉielo kaj tero. Sed nesciinto de ĉi tiu principo travivas senfinan suferon, ĉar lia menso skuiĝas de tia ŝanĝo, tiel ke li ĉiam ne povas teni la mezan vojon en ĝojo, malĝojo, plezuro kaj ĉagreno.”
7. Sotesano diris: “Kion vi bonvole donas al aliulo, tion li bonvole redonos al vi. Kion vi malice forprenas de aliulo, tion li malice forprenos de vi. Tiu repago povas dekmiloble pliigi kaj dekmilone malpliigi laŭ la progreso kaj malprogreso de via partnero, sed neniel nuliĝas. Eĉ se partnero rekte ne faras repagon, estas nature revenantaj feliĉoj kaj punoj. Tial vi ne povas ricevi feliĉon kaj punon kaŭzitaĵojn de aliulo anstataŭ li, nek li povas ricevi feliĉon kaj punon kaŭzitaĵojn de vi anstataŭ vi.”

8. *Ĝo Ĝongŭon*<sup>86</sup> diris: “Budhoj ne farus punindan malbonon tra sia multviva eterne, tial ili eterne ne suferus. Sed Ŝakjamunio siatempe travivis diversajn suferojn kaj vi ankaŭ de la eklezifondo ne malmulte suferas polican observadon kaj popolmensan gvidadon. Ni ne povas kompreni la kialon.” Sotesano diris: “Mi de longe klopodas ne fari ajnan pekon. Tamen mia sufero okazas ŝajne pro tio, ke kiam mi instruis sennombrajn homojn tra mia multvivo, nerimarkate subpremiĝis malvirta kaj malbona spirito de obstinuloj.” Sotesano plu diris: “Fiksitan karmon ne povas kvitigi eĉ budho, kiu kompatoplene savas ĉiujn vivulojn per ĝusta darmo, kaj eĉ la plej malnobla homo ne povas nuligi meriton per peko. Tamen kapablaj budhoj kaj bodisatvoj povas mallongigi la daŭron de repago, sed neniel ĝin povas forigi.”

9. Iu demandis: “Se homo tutkore kultivas sin, ĉu li povas liberiĝi de fiksita karmo?” Sotesano respondis: “Malfacilas subite eviti fiksitan karmon, sed ne maleblas liberiĝi de ĝi poiome. Se studanto, sciante la principon, ke la kvar naskuloj ŝanĝiĝas en la ses vojoj, ne plu faras malbonon kaj ĉiam faras bonon, malbona vojo mem foriĝas kaj bona vojo pli kaj pli proksimiĝas al li. Eĉ se iu homo kun malbona rilato lin venĝas, li kun iluminiĝvola menso reagas al la homo sen pensi revenĝon kaj nature ĉesas la karmo inter li kaj la homo. Kiam li ricevas repagon por malbono, li ĉiam kontemplas tute pekmankan memnaturon kaj solvas ĉiujn karmajn kondiĉojn, pensante ke li pagas malnovan ŝuldon. Tiuokaze ĉiuj liaj pekoj degelas kiel neĝo sur forno. Tio estas la maniero estingi fiksitan karmon per menso. Ankaŭ se li bone sin kultivas, li ĉiam progresas en la ses vojoj. Eĉ se li renkontas iun homon kun ajna malbona rilato, li ricevas malpli da repago, ĉar li havas pli altan gradon ol la homo. Li servadas la publikon, kiu ĉiam protektas lin ie ajn, tial homoj kun malbona rilato ne povas facile invadi lin. Tio estas la maniero malpezigi fiksitan karmon per potenco.”

10. Iu disĉiplo suferis akcidenton fare de iu homo kaj ne povis subpremi indignon. Sotesano diris: “Toleru en via vico por repagi, kaj la karmo ĉesos. Alie li denove repagos al vi. Se ambaŭ daŭrigas repagon unu al la alia, neniam ĉesas la karmo de reciproka konflikto.”

11. Iu kredanto malpaciis kun edzo kaj kun la deziro havi nenian rilaton al li en la sekva vivo ĉiam malamamis lin. Sotesano diris: “Se vi volas realigi la deziron, forĵetu kaj amon kaj malamon kaj rilatu al li nur indifere.”

12. Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*, li aŭdis malĝojan ŝirkriion de apro pafita de ĉasisto kaj diris: “Kiam io profitas, alio damaĝiĝas.” Li aldonis: “Kiam mi vidas la apron mortigita, mi povas ekscii, kion ĝi faris en la pasinteco. Kiam mi vidas la ĉasiston mortigi ĝin, mi povas ekscii, kion li ricevos en la estonteco.”

13. Sotesano diris: “Kiam homo faras diversajn pekojn per korpo, buŝo kaj menso, specoj de repagoj estas sennombraj. Mi donas kelkajn konatajn ekzemplojn. Kiu multe vundas la koron de aliulo per malprecizaj vortoj, tiu kormalsanos en la sekva vivo. Kiu ŝatas gvati kaj ŝtelaŭdi aliulan sekreton, tiu en la sekva vivo naskiĝos kiel bastardo kaj estos malestimata kaj hontigata. Kiu facile malkaŝas aliulan sekreton kaj ofte hontigas aliulon antaŭ la publiko ĝis lia vizaĝruĝiĝo, tiu en la sekva vivo havos malbelan makulon aŭ cikatron sur la vizaĝo kaj malaktive vivos la tutan vivon.”

14. Iu disĉiplo demandis: “Pro kia peko okazas fulmomorto?” Sotesano respondis: “Subita fulmomorto okazas tial, ke la peko estas tiel subite farita al la publiko kiel fulmo. Ekzemple iu misuzis sian politikan aŭ militan potencon kaj masakris amason da homoj, aŭ iu devigis al homoj maljustan leĝon kaj multe damaĝis ilin.”

15. Kiam Sotesano direktis la konstruon en la templo Seulo<sup>87</sup>, li aŭdis kelkajn laboristojn

<sup>86</sup> *Ĝo Ĝongŭon* 조선권 曺專權 (1909-1976): ŭonbulana alnomo *Gongtaŭon*, pastrino, *ĝongsa*.

<sup>87</sup> Templo Seulo 서울교당: ŭonbulejo en Seulo.

interparoli pri tio, ke homo neniel povas bone vivi malgraŭ ĉia sia peno sen hazarda nekonata helpo. Poste li diris al disĉiploj: “Ĝenerale en homa vivo ne malestas hazarda nekonata helpo aŭ malhelpo. Nescianto scias, ke ĝin disponas dio, budho, prapatro aŭ demono, sed scianto scias, ke ĉi ĉio rezultas el la uzo de propraj korpo kaj menso, ke homo nun ricevas agon antaŭe faritan kaj estonte ricevos agon nun faratan, kaj ke homo neniam ricevas ajnan agon nefaritan. Tial malsaĝulo perforte serĉas riĉecon, rangon kaj prosperon kaj penas eviti malriĉecon kaj suferon, sed saĝulo trankvile traelportas ajnan punon aŭ feliĉon kaŭzitan de li mem kaj ĉiam klopodas krei feliĉon kaj plezuron por la estonteco. Dum feliĉokreado li semas senlimajn meritojn en la publiko, tiel ke la fonto de lia feliĉo ne elĉerpiĝas ie ajn kaj iam ajn.”

**16.** Sotesano diris: “La plej urĝa afero estas ne instrui sennombrajn sutrojn kaj instigi homojn bonfari, sed unue igi ilin kredi kaj luminiĝi pri la veroj de eterno kaj de karmo.”

**17.** Sotesano diris: “Malsaĝulo envias aliulon pro lia feliĉo, sed fordormas la okazon krei ĝin al si. Tia homo estas kiel terkultivisto, kiu deziras rikolton sen semado. Se terkultivisto semas nenion printempe, li rikoltas nenion aŭtune. Tio estas la principo de kaŭzo kaj efiko. Kiel do tio validus nur al terkultivo?”

**18.** Sotesano diris: “Kiu ne bonfaras, tiu ne povos realigi sian volon bone vivi en la sekva vivo. Kompardire, kvankam iu volas loĝi ĉi-vive en luksa domo, li ne povas tie enloĝiĝi, se ĝi ne estas lia. Vidu *Gongĉil*<sup>88</sup>! Kiam li eltrajniĝas en la stacidomo *Iksan*<sup>89</sup>, troviĝas vicoj da modernaj domoj kun kelkaj etaĝoj, sed li revenas nur al sia domaĉo, eĉ ne povante aŭdaci eniri en unu el ili. Tio estas ekzemplo, ke oni iras kaj ricevas laŭ sia pasinta ago.”

**19.** Sotesano diris: “Nur merita homo povas longe teni grandan feliĉon. Se senmeritulo ĝin ricevas, li disverŝas ĝin aŭ ĝi alportas al li katastrofon. Tial saĝulo scias krei, gardi kaj uzi feliĉon, tiel ke li eterne tenas kiel ajn grandan feliĉon.”

**20.** Sotesano diris: “Malsaĝuloj rigardas honoron nur bona kaj penas elmontri eĉ falsan honoron, ĉar ili ne scias, ke falsa honoro fine kaŭzas al ili damaĝon. En la mondo estas principo, ke kvankam oni penas iel ajn kaŝi veran honoron, ĝi nature elmontriĝas, dum kvankam oni penas diskonigi falsan honoron, ĝi fine disfalas. Tial vorte akirita honoro sen fakto nepre detruigiĝas vorte, kaj intrige akirita honoro ne nur detruigiĝas intrige, sed ankaŭ faligas jam ekzistantan honoron. Sekve en serioza okazo ĝi perdigas eĉ havaĵon kaj vivon. Kiel do ne atenti tion anticipe?”

**21.** Kiam iu almozulo petis de *Gim Giĉon* bonfari, *Giĉon* demandis: “Se mi donas al vi almozon, ĉu vi kapablas rekompenci min?” Li ne povis respondi kaj *Giĉon* diris: “Malsaĝuloj ofte petas aliulon bonfari al ili, sed male per tio ili faras pekon.” Sotesano aŭdis tion kaj diris: “La vortoj de *Giĉon* ja estas prediko. Homoj en la mondo ŝatas ricevi feliĉon, sed malmultas feliĉokreantoj. Homoj malŝatas ricevi punon, sed multas pekantoj. Tial en ĉi tiu mondo multas suferantoj kaj malmultas feliĉantoj.”

**22.** Sotesano diris: “Se homo laŭplaĉe faras ĉian malbonon kaj ne povas moderigi sin, aliuloj nepre punas lin. Se ili ne povas, la vero nepre punas lin. Tial prudentulo mem ne faras malbonon, antaŭ ol aliuloj punas lin, kaj li akceptas ilian konsilon, antaŭ ol la vero punas lin. Li do ne timas pri la malkaŝiĝo de sia malbono kaj ĉiam havas trankvilan koron.”

**23.** Sotesano diris: “Misuzanto de malgranda potenco per malgranda talento, ne trompu, nek damaĝu la popolamason, rigardante ĝin malsaĝa! Ĝia kolektiva menso estas ĉiela menso, ĝia kolektiva okulo estas ĉiela okulo, ĝia kolektiva orelo estas ĉiela orelo kaj ĝia kolektiva buŝo estas ĉiela buŝo. Kiel do trompi kaj damaĝi la popolamason, rigardante ĝin malsaĝa?”

---

<sup>88</sup> *Gongĉil* 공칠 公七: alnomo de *Gong Jongho*, laiko, kiu malriĉe vivis apud la centra sidejo de ŭonbulismo.

<sup>89</sup> *Iksan* 익산 益山: mezgranda urbo, en kiu situas la centra sidejo de ŭonbulismo.

**24.** Iam furioza hundo, kiu loĝis apud la centra sidejo de ŭonbulismo, estis mordmortigita de sia kolego. Sotesano vidis tion kaj diris: “Kiam juna, tiu hundo tre sovaĝis kaj rolis kiel reĝo inter najbaraj hundoj. Ĝi senbride faris ĉian kruelaĵon al ili, sed jam ĝi tiel kruele mortaĉas repage. Tio avertas homojn, kiuj misuzas sian potencon. Kiel do malatenti tion, rigardante tion hunda afero?” Li aldiris: “Oni povas juĝi per la mensuzo de iu homo, ĉu li progresas aŭ malprogresas. Progresanto estas milda kaj bonkora, tiel ke li ne damaĝas aliulojn kaj bone harmonias kun ĉiuj siaj renkontatoj, ĉiam humiligante sin gloras aliulojn kaj ŝatas lernadon, aparte kredas la veron kaj strebas al sinkultivo, ĝojas vidi boniĝon de aliuloj, kaj ĉiamaniere kuraĝigas malfortulojn. Malprogresanto estas malĝentila kaj malbonkora, tiel ke li ne profitigas aliulojn kaj ofte malpacas kun ĉiuj siaj renkontatoj, havante fortan fierecon ŝatas malestimi aliulojn kaj malŝatas lernadon, aparte ne kredas la veron de kaŭzo kaj efiko kaj ne sin kultivas, kaj ne povas toleri boniĝon de aliuloj kaj ĉiamaniere mallaŭdas pli bonajn homojn ol si.”

**25.** Sotesano diris: “Se homo senbride faras malbonon kaj ofte malbone estas sur ĉies lango, lia estonteco mallumiĝas. Iu homo fariĝis provinca estro kaj kruele misuzis sian potencon, tiel ke li multe forprenis de homoj la vivon kaj havaĵon. Tial kiam homoj kolektiĝis en vilaĝo, ili kune insultis lin. Tio fariĝis la semo de lia mizeriĝo en lia vivo kaj li montris sian puniĝon al homoj. Do ilia lango estas vere timiga.”

**26.** Sotesano diris: “El la multaj pekoj, kiujn ordinaruloj faras senprudente, estas kvin teruraj pekoj. Unu estas ne scii la ĝustan principon kaj misgvidi la spiriton de homoj. La dua estas nekredigi homojn je la principo de kaŭzo kaj efiko kaj malhelpi ilin bonfari. La tria estas kalumnii kaj priĵaluzi ĝustan kaj bonvolan homon. La kvara estas grupiĝi kun malvirtuloj kaj helpi ilin. La kvina estas malhelpi la kredon je ĝusta darmo kaj obstakli la progreson de ĝustdarma eklezio. Kiu ne ĉesas fari ĉi tiujn pekojn, tiu neniam povas liberiĝi de la tri malbonaj vojoj<sup>90</sup>.”

**27.** Sotesano diris: “En la mondo estas tri teruraj pekoj. Unu estas aserti pekon de aliulo per pretervido kaj insidi lin. La dua estas priĵaluzi amikan rilaton de aliuloj kaj disigi ilin. La tria estas uzi malvirtan saĝon kaj misgvidi naivulon. Kiu multe faras ĉi tiujn pekojn, tiu repage fariĝos blinda, muta aŭ freneza.”

**28.** Sotesano diris: “Iam iu meditmajstro havis multajn disĉiplojn kaj oferojn, tiel ke la vivo estis tre komforta kaj bonhava. Sed li plantis kaj kultivis kelkajn fruktarbojn, per kies profito li aparte vivtenis unu subbonzon. Kiam ĉiuj aliaj disĉiploj demandis la kialon, li respondis: ‘Se paroli pri la subbonzo, li ne bonfaris en la pasinta vivo, nek povas fariĝi tia homo ankaŭ en la nuna vivo, kiu donas utilon al aliuloj. Vivteni lin per la oferoj, kiujn donacis homoj por peti feliĉon, estas pligrandigi lian ŝuldon. Des pli, se li vivus per la oferoj en la nuna vivo, li repage suferus plurajn siajn vivojn kiel bovo kaj ĉevalo. Pro mia instruista amo por malpliigi lian ŝuldon mi tiamaniere gajnas kroman enspezon dum libera tempo kaj vivtenas lin.’ Tia konduto de la majstro estas granda prediko al homo, kiu vivas en la komunumo. Vi ne preteraŭskultu ĉi tiun predikon. Se vi tiom servas aliulojn spirite, korpe kaj materie, vi povas senĝene vivi de iliaj oferoj. Sed se vi servas nur vin kaj vivas de iliaj oferoj, vi estas grandŝuldantoj kaj nepre devas fari penojn en pluraj viaj vivoj. Ĝenerale altruisto malŝatas ricevi oferon, dum egoisto ŝatas tion. Vi ĉiutage kaj ĉiutempe ekzameni vin kaj estu atentaj por ne iĝi grandŝuldantoj al homoj.”

**29.** Ĉoj Neson<sup>91</sup> iutage oferis manĝon al homoj. Manĝinte kun ili, Sotesano diris: “Homo diference rekompenciĝas eĉ pro la samkvanta bonfaro. Tio dependas ne nur de materia kvanto, sed ankaŭ de mensa profundeco kaj de partnera povo. Dum somera pluvado de iu

---

<sup>90</sup> Tri malbonaj vojoj 삼악도 三惡道: infera, besta kaj malsatdemonna mondoj.

<sup>91</sup> Ĉoj Neson 최내선 崔內善 (1895-1964): ŭonbulana alnomo Ĝangtaŭon, laiko, *dehobop*.

jaro unu kamparano en *Jonggŭang* transriverigis tri ŝtatoficistojn, tial li konatiĝis kun ili. Kvankam li bonfaris samtempe kaj sampene, la tri personoj poste faris konsiderinde diferencon rekompencan al li laŭ siaj rajtoj kaj povo. Tio estas nur parta rakonto aperinta en nia reala vivo, sed entenas la principon de bonfaro kaj rekompenco tra la pasinta, la nuna kaj la estonta tempo.”

**30.** Kiam Sotesano restadis en *Jongsan*, iu diboĉinta junulo el najbara vilaĝo mem ekaspiris sinkultivon, pripentis pasintan pekon kaj promesis fari humanan agon estante disĉiplo de Sotesano. Post tiam Sotesano vojaĝis diversajn lokojn kaj revenis al *Jongsan* kelkajn monatojn poste. Intertempe la junulo denove fordiboĉis la familian havaĵon kaj hontis pri sia promesrompo kaj evitis Sotesanon, sed iun tagon survoje okazis neevitebla renkontiĝo. Sotesano demandis: “Kial vi eĉ unufoje ne vizitis min?” Li respondis: “Mi nur povas pardonpeti vin.” Sotesano demandis: “Pri kio vi pardonpetas min?” Li respondis: “Mia antaŭa promeso montriĝas nun kiel nenio alia ol mensogo al vi, sanktulo. Kiel do tio ne estus pardonpetinda? Bonvolu min pardoni grandanime.” Sotesano diris: “Intertempe vi estis malatenta kaj malŝparis la familian havaĵon kaj nun estas en mizero. Tial vi ne bezonas pardonpeti min. Se mi anstataŭ vi ricevus punon pro via malbonfaro, vi povus pardonpeti kaj eviti min, sed vi nepre ricevas rekompencan kaj punon pro via propra ago. Nun vi pensas, ke vi mensogis min, sed fakte vi mensogis vin mem. Tial de nun ne evitu min senprave, sed klopodu regi vian menson.”

**31.** Kiam Sotesano restadis en *Jongsan*, iutage li promenis al la legomĝardeno. Ĉe la rando de la legomĝardeno estis sterkejo plena je sterkakvo, kie naskiĝis svarmo da insektoj. Ĝuste tiam rato foriris manĝinte ilin kaj disĉiploj sarkantaj la ĝardenon diris: “Tiu rato de tempo al tempo venas kaj tiel manĝinte foriras.” Sotesano diris: “Nun tiu rato laŭvole manĝas insektojn, sed ili formanĝos ĝin ene de kelkaj tagoj.” La disĉiploj ne sufiĉe komprenis lin kaj scivolis, ĉu tiel rapide okazos la trimonda repago. Kelkajn tagojn poste ja la rato enfalis en la sterkejon kaj ekputris, kaj ĝin suĉmanĝis svarmo da insektoj. Tiam Sotesano diris: “En la antaŭa tago ŝajne vi rigardis mian diraĵon mistera, sed mi nur vidis la cirkonstancon kaj antaŭdiris tion. Tiam la strekejo estis plena je streko kaj la rato povis ĉirkaŭiradi ĝin libere kaj manĝi insektojn. Sed oni uzos la sterkon post la elsarkado kaj la sterkejo profundiĝos. Tiam la senatente vizitadanta rato nepre falmortos en la sterkejo kaj ne povos ne fariĝi manĝaĵo de svarmo da insektoj.” Li aldiris: “Tiel same homo ricevas repagon en la vivo nuna aŭ sekva laŭ la karaktero de sia ago.”

**32.** Kiam *Gim Sammehŭa*<sup>92</sup> dispecigis viandon en la kuirejo, Sotesano demandis: “Ĉu vi vidis la inferon de tranĉilmonto<sup>93</sup>?” Ŝi respondis: “Neniam.” Sotesano diris: “La viando sur la tranĉtabuleto estas en tiu infero. Ĉe la morto ĝi estis hakita kaj tranĉita en mil pecojn, kaj homoj aĉetinte ankaŭ ĉiuhejme tiel dekmiltranĉas ĝin. Kiel do ne timi tion?”

**33.** Sotesano diris: “En la pasinteco multas eĉ homoj kun malhonesta kaj malbona koro, kiuj bone vivis en la kuranta tempo, sed en la estonteco al tia homo malfacilas bone vivi en la kuranta tempo. Homoj ricevas preskaŭ ĉiujn repagojn por siaj dumvive faritaj agoj en la kuranta tempo kaj la malmulto transiros al ilia sekva vivo. Tial kiam la mondo pli kaj pli lumiĝos, homo kun honesta kaj bona koro trovos ĉion honesta kaj bona kaj lia estonteco brile malfermiĝos, dum homo kun malhonesta kaj malbona koro trovos ĉion malhonesta kaj malbona kaj lia estonteco mallumiĝos kaj ŝtopiĝos.”

<sup>92</sup> *Gim Sammehŭa* 김삼매화 金三昧華 (1890-1944): ŭonbulana alnomo *Naktaŭon*, laiko.

<sup>93</sup> Infero de tranĉilmonto 도산지옥 刀山地獄: infero, kie vivuloj suferas, dispecigate per tranĉiloj.

## Respondoj al demandoj

1. Sotesano ĉeestis sutroklarigan kunvenon de trejnnesio kaj aŭskultis diskuton de disĉiploj pri la brilo de ĉielo kaj tero. Sotesano demandis: “Ĉu vi opinias, ke ĉielo kaj tero havas konscion aŭ ne?” *I Gongĝu* respondis: “Jes, ili havas klaran konscion.” Sotesano demandis: “Kiel vi scias tion?” Ŝi respondis: “Se homo faras bonon, al li neatendite venas feliĉo, kaj se li faras malbonon, al li neatendite venas puno, tiel ke tiu reciproka respondo neniom okazas malĝuste. Se ĉielo kaj tero ne havas konscion, kiel do ili tiel distingas punon de feliĉo?” Sotesano petis: “Pruvu ilian distingon, por ke iu ajn facile komprenu tion.” Ŝi respondis: “Mi nur konvinkiĝas per mia kutima aŭskultado de multaj predikoj, sed malfacilas al mi analizi la principon kaj pruvi ilian distingon.” Sotesano diris: “Okulta stato estas malfacile komprenebla, kaj eĉ se oni komprenas ĝin, malfacilas sufiĉe ĝin pruvi. Tamen nun mi facilvorte klarigos unu pruvon. Per tio vi klopodu travidi ĉi tiun malfacile proveblan staton. Ĝenerale tero estas nur silenta kaj ne havas lingvon kaj movon, tial ĉiuj homoj rigardas ĝin nesentpova. Sed fakte estas pruvo, ke ĝi estas vere klarbrila. En terkultivo, se iu semas grenon, tero nepre helpas ĝian kreskon. Kie ruĝfabo estas semita, tie tero nepre eligas ruĝfabon, kaj kie sojfabo, tie sojfabon. Kie homo multe penas, tie tero donas riĉan rikolton, kaj kie malmulte, tie malriĉan, kaj kie malĝuste, tie malprofiton. Do tero sen ajna konfuzo klare distingas la karakteron de semo kaj la gradon de homa penado, ĉu ne? Aŭskultinte miajn vortojn, iu povas pensi, ke semo mem kreskas, ĉar ĝi enhavas vivelementon kaj homo prizorgas ĝin, kaj ke tero estas nenio alia ol bazo. Sed sen tera respondo semo ne povas mem kreski. Kian efikon do farus homa penado planti kaj sterki? Des pli, kio ajn radikas en tero, tio ne povas montriĝi sen ĝia respondo. Tial tero intervenas en ĉiujn estaĵojn kaj uzas povon de naskiĝo, morto, progreso kaj detruigo. Plie, ĉielo kaj tero ne estas du, kaj la suno, la luno, stelo, vento, nuboj, pluvo, roso kaj neĝo, ĉi ĉio enestas en unu energio kaj unu principo kaj estas miraklofara. Tial homo neniel povas kaŝi ĉiujn siajn bonojn kaj malbonojn eĉ sekrete faritajn, nek rezisti al repagoj por ili. Ĉi ĉio estas la konscio kaj brila potenco de ĉielo kaj tero. Sed la konscio de ĉielo kaj tero malsamas ol tiu de homo pri plezuro, kolero, ĝojo kaj malĝojo kaj estas konscio funkcia sen penso, konscio aperanta sen formo kaj konscio justa, perfekta kaj malegoisma. Kiu scias ĉi tiun principon, tiu timas la brilon de ĉielo kaj tero kaj en ajna situacio ne aŭdacas mensogi sian konsciencon, nek faras pekon. Des pli, kiu modeligas sin laŭ la konscio de ĉielo kaj tero, tiu akiras senliman kaj puran konscion kaj povas laŭvole efektiviĝi la potencon de ĉielo kaj tero.”
2. Sotesano demandis disĉiplojn: “Kiam homo sekrete preparas malicon en la koro aŭ sekrete faras pekon, li mem hontas renkonti ĉiujn estaĵojn en la universo. Kio estas la kialo?” *I Ŭonhŭa*<sup>94</sup> respondis: “Kvankam homo sola sekrete faras eĉ ion malgrandan, ĉiuj estaĵoj en la universo ekscias tion same, kiel la tuta korpo de homo sentas eĉ malgrandan mordinsektion, kiu senbrue rampas sur lia korpoparto. Tial tia homo mem hontas renkonti ilin.” Sotesano diris: “Viaj vortoj estas sencohavaj, sed mi aldiros. Ekzemple malbonfaranto, pensante ke neniu rimarkas lian decidon sekrete faritan en la koro, tuj plenumas ĝin en la mondo, tiel ke la mondo tuj ekscias ĝin, tial li mem hontas eĉ pri sia sekreta peko. Se vi volas scii kaŝitan faron de aliulo, vi bezonas nur vidi ĝian aperon, sed homoj vane klopodas antaŭscii sekreton de aliulo.”
3. Iu homo petis: “Orienta teorio asertas, ke ĉielo moviĝas kaj tero estas senmova, dum okcidenta teorio asertas, ke tero moviĝas kaj ĉielo estas senmova. Bonvolu diri, kiu pravas

<sup>94</sup> *I Ŭonhŭa* 이원화 李願華 (1884-1964): ŭonbulana alnomo *Sataŭon*, pastrino, *debongdo*, la unua disĉiplino de Sotesano.



el la du kontraŭdiraj teorioj.” Sotesano diris: “Jam de longe estas ĉi tiuj teorioj kaj ankaŭ estas multaj aliaj asertoj. Se koncize paroli pri mia opinio, ĉielo kaj tero origine ne estas du, tial iliaj movo kaj senmovo ne diferencas inter si. El la vidpunkto de movo ambaŭ moviĝas, dum el tiu de senmovo ambaŭ estas senmovaj. Kompardire homaj energio kaj korpo kune agas ĉe siaj movo kaj senmovo. La ĉiela energio kaj la tera bazo kunligite rotacias senĉese kaj harmonias unu kun la alia. Sed se juĝi ĉefaĵon kaj flankajon, la energio estas ĉefaĵo kaj la bazo estas flankajo, tiel ke la bazo sekvas la energion. Tio estas eterne senŝanĝa principo.”

4. *So Deŭon*<sup>95</sup> demandis: “Ŝakjamunio diris, ke en la detrua epoko<sup>96</sup> ĉi tiu mondo pereas de la forbrulo de ĉielo kaj tero. Ĉu tio vere okazos?” Sotesano respondis: “Jes.” Li denove demandis: “Se ili forbrulos, ĉu la nuna mondo neniigĝos kaj nova mondo kreiĝos?” Sotesano respondis: “Ilia forbrulo ne signifas, ke la mondo pereos en unu momento. Tio okazas, kiel la naskiĝo, maljuniĝo, malsano kaj morto de homo. Senĉese daŭras, ke homoj parte naskiĝas, parte maljuniĝas, parte malsanas kaj parte mortas. Tiel same en la mondo ĉiakampe funkcias la principo de formiĝo, daŭrado, detruigo kaj malpleno. Eĉ nun estas parto, kiu formiĝas, kiu daŭras, kiu detruigĝas, kaj kiu neniigĝas. Do ĉiam forbrulas ĉielo kaj tero.”

5. *Deŭon* denove demandis: “Ŝakjamunio diris, ke estas la tri mil grandmondoj<sup>97</sup>. Ĉu ili reale ekzistas?” Sotesano respondis: “Jes. Tamen ili ne estas konstruitaj ekster ĉi tiu mondo, sed estas diversaj mondoj disstarigitaj en ĉi tiu mondo. Se kalkuli ilin, eĉ tri mil ne sufiĉas.” Li demandis: “Ankaŭ la nuna astronomio diras, ke en ĉi tiu universo estas multaj pli grandaj mondoj ol nia. Kion tio signifas?” Sotesano respondis: “Budhaj vortoj povas esti aliaj laŭ la vidpunkto de interpretanto. Nun estas diversaj teorioj, sed miajn vortojn pruvos naturvidinta granda sciencisto en la baldaŭa estonteco. Kiu kredas min, ne plu dubu.”

6. *Deŭon* denove demandis: “Estas dirite, ke en la universo estas progresaj kaj malprogresaj epokoj. En kiu nun troviĝas Koreio?” Sotesano respondis: “En la progresaj epokoj.” Li denove demandis: “Kiom longe daŭras la du epokoj?” Sotesano respondis: “Ŝakjamunio kalkulis ilian daŭron kiel unu grandan eonon.”

7. *Deŭon* denove demandis: “Per kio la universo formiĝas, daŭras, detruigĝas kaj malplenas?” Sotesano respondis: “Kiel Ŝakjamunio diris, tio okazas per la tri radoj de akvo, fajro kaj vento.”

8. *Deŭon* denove demandis: “Iu pasinta sanktulo diris, ke la suno, la luno kaj la steloj estas la spirito de ĉiuj estaĵoj en la universo. Ĉu tio estas vero?” Sotesano respondis: “Jes.”

9. Iu katoliko dum interparolo demandis iun kredanton de la templo *Gongŭ*<sup>98</sup>: “Ĉu vi scias, kiu estas Kreinto?” La kredanto ne povis respondi kaj la katoliko diris: “Nia Sinjoro estas Kreinto, ĉar Li estas ĉioscia kaj ĉiopova.” Poste Sotesano aŭskultis la raporton de la kredanto kaj diris kun rideto: “Denove iru al li kaj demandu, ĉu li efektive vidis sian Sinjoron. Se li respondos, ke ne, diru, ke tio ja estas egala al nescio, kaj ke vi eksciis post pripensado, ke Kreinto ne ekzistas en aparta loko, sed lia Kreinto estas li, via Kreinto estas vi, kaj ke ĉiu vivulo estas sia Kreinto. Tio estas la plej taŭga respondo. Se li komprenos ĉi tiun signifon, viaj vortoj donos al li grandan feliĉon.”

10. Iu disĉiplo demandis: “Kie estas paradizo kaj infero?” Sotesano respondis: “Se via menso restas en la stato transcendantaj pekon kaj feliĉon, suferon kaj plezuron, la stato estas

<sup>95</sup> *So Deŭon* 서대원 徐大圓: (1910-1945): ŭonbulana alnomo *Ŭonsan*, pastro, *debonĝdo*.

<sup>96</sup> Detrua epoko 괴겁 壞劫: budhismo dividas la universan evoluon en la kvar epokojn de formiĝo, daŭrado, detruo kaj malpleno. La lastan sekvas denove la unua, kaj ankaŭ samtempe ĉiu epoko povas okazi tie kaj tie.

<sup>97</sup> Tri mil grandmondoj 삼천대천세계 三千大天世界: la senlima universo.

<sup>98</sup> Templo *Gongŭ* 전주교당 全州教堂: ŭonbulejo en *Gongŭ*, provinca ĉefurbo.

paradizo. Se via menso restas en la stato alkatenita al peko kaj feliĉo, sufero kaj plezuro, la stato estas infero.” Li denove demandis: “Kiel mi povas eterne vivi nur en paradizo kaj ne enfali en inferon?” Sotesano respondis: “Iluminiĝu pri la principo de memnatura kaj ĉiam restigu vian menson en memnatura, kaj vi eterne vivos en paradizo kaj ne enfalos en inferon.”

**11.** Iu disĉiplo demandis: “Ŝakjamunio diris, ke estas la tridek tri ĉieloj<sup>99</sup> en la ĉiela regno. Ĉu ili troviĝas ŝtupare en tiu malplena spaco?” Sotesano respondis: “Tiu ĉieloj estas nenio alia ol gradoj de studo. Tiu loko ĉu ĉiela, ĉu tera, kie troviĝas kapabla studanto, estas la ĉiela regno.” Li denove demandis: “Estas dirite, ke en ju pli alta ĉielo, des pli alta estas ĉielula staturo kaj des pli malpeza estas ĉielula vesto. Kion tio signifas?” Sotesano respondis: “Statura plialtiĝo signifas, ke ju pli progresas la forto iluminiĝi, des pli kreskas la spirita energio. Vesta plimalpeziĝo signifas, ke ju pli progresas la forto iluminiĝi, des pli malsupreniĝas malpura energio kaj malpeziĝas la spirito. Sed eĉ tiu ĉielulo, kiu atingis la plejprofundon de la tridek tri ĉieloj, malprogresos post la elĉerpiĝo de sia feliĉo, se li ne atingos grandan, perfektan kaj ĝustan iluminiĝon.”

**12.** *Ĝo Gongŭon* demandis: “Mi iam vidis homon, kiu ricevis punon pro tio, ke li detranĉis aŭ senprudente difektis malnovan arbon ĉirkaŭ sia vilaĝo. Ĉu tio okazis tial, ke ankaŭ tia nesentpovulo havas karman rilaton?” Sotesano respondis: “Tio ne okazis pro la karma repago de arbo, sed en la pasinta malluma epoko tre multis demonoj, kiuj ne povis reenkariniĝi. Ili do apogis sin sur tia malnova arbo, vilaĝsanktejo, famkonata monto aŭ granda rivero kaj estis multe adorataj de malsaĝuloj. Se homo malpli forta ol ili damaĝis ilin, ili venĝis lin per malsanigo aŭ alia puno, sed nun venas la luma epoko kaj tiaj demonoj ne povas aŭdaci homojn damaĝi.”

**13.** Iu disĉiplo demandis: “Kiun preĝvorton kaj kiel mi devas ĉantadi por iluminiĝi pri la vojo en mallonga tempo?” Sotesano respondis: “Granda studo ne dependas de preĝvorto, sed de homa penado. Iam analfabeta kolportisto de pajlŝuoj ekspiris sinkultivon kaj demandis instruiston, kio estas la vojo. Li respondis, ke ĝi estas *ĝuksimŝibul*: menso estas budho. Tiu analfabeto aŭskultis la frazon kiel *ĝipsinsebol*: tri parojn da pajlŝuoj kaj ĉantadis ĝin dum pluraj jaroj. Iun tagon li eksciis la veron, ke menso estas budho. Kiam iu sinkultivanto aĉetis viandon, li petis vendiston detranĉi puran parton. Tiam la vendisto enpikis tranĉilon en la viandon kaj demandis, kiu parto estas pura kaj kiu parto estas malpura. Ĉe tiu demando la sinkultivanto subite iluminiĝis pri la vojo. Tio klare montras, ke iluminiĝo ne dependas nur de iuj loko, tempo kaj preĝvorto. Sed ni jam havas elektitan preĝvorton kaj tutkore ĉantadi ĝin estas pli efike.”

**14.** Iu kredantino demandis: “Mi ankaŭ volas purigi mian menson kaj preĝi kiel pastro, sed mi estas tro ligita al hejmlaboro por realigi mian volon. Kiel do mi faru?” Sotesano respondis: “Pastro kaj laiko ne diferencas per mensa purigado. Purigu nur vian menson kaj tutkore preĝu, kaj vi egale ricevos tiom da potenco, kiom da penado vi faras.”

**15.** Iu homo demandis *I Ĝeĉol*: “Mi aŭdis, ke via instruisto estas sanktulo. Ĉu li scias ĉiujn aferojn kaj principojn?” *Ĝeĉol* respondis: “Jes.” Li denove demandis: “Ĉu li scias ankaŭ kiel fari aviadilon aŭ trajnon?” *Ĝeĉol* respondis: “Sanktulo scias la ĝeneralajn de afero kaj principo, dum specialisto scias tiajn teknikajn detalojn.” Li denove demandis: “Se tiel, ĉu tio ne kontraŭdiras, ke li estas ĉioscia pri afero kaj principo?” *Ĝeĉol* respondis: “Ĝeneralajo signifas radikon. Se iu scias la radikon de io ajn, ĉiuj branĉoj kaj folioj estas ĉe ĝi. Ekzemple provincestro aŭ prezidento ne povas scii ĉiujn detalojn, kiujn scias sekretario aŭ teknikisto en vilaĝa ŝtatoficejo. Tamen se li bone scias la ĝeneralajn de administrado kaj orde gvidas ĉiujn partojn, ĉu vi pensas, ke li scias tiun laboron aŭ ne? Tiel same sanktulo

---

<sup>99</sup> Tridek tri ĉieloj 삼십삼천 三十三天: la dua ĉielo de la dezira mondo laŭ budhana mondrigardo.

klare scias la esencojn de grando, malgrando, esto kaj neesto kaj de justo, maljusto, profito kaj malprofito, tial li rigardiĝas kiel ĉioscianto de afero kaj principo, sed li ne povas scii ĉiujn teknikajn detalojn. Li ja klare scias la esencojn, en kiuj enestas ĉiuj scioj.” *Ĝeĉol* revenis kaj raportis. Sotesano diris: “Viaj vortoj estas plejparte pravaj.”

**16.** Kiam Sotesano restadis en Seulo, *Min Ĝajonhŭa*<sup>100</sup> ĉiam servis lian manĝon kaj plezure manĝis la restaĵon. Sotesano iam demandis pri la kialo. Ŝi respondis: “Mi faras tion, ĉar en iu budhana skribo mi legis, ke se iu servas manĝon al budho kaj manĝas la restaĵon, li povas saviĝi kaj budhiĝi.” Sotesano demandis: “Mi scias, ke vi faras tion, ĉar vi pleje kredas kaj respektas min. Ĉu vi tamen reale komprenas la frazon aŭ ĝin superstiĉe kredas?” Ŝi respondis: “Mi nur kredas ĝin, sed ne provis analizi ĝian veran signifon.” Sotesano diris: “Kiam iu servas manĝon al budho kaj manĝas la restaĵon, li havas tiel proksiman rilaton al budho. Nature lia vidaĵo estas budha konduto, lia aŭdaĵo estas budha parolo, lia iluminigaĵo estas budha ĝusta darmo, lia ensorbaĵo estas budha kutimo. Sekve li povas facile saviĝi kaj budhiĝi, ĉu ne? Tio estas la vera signifo de la frazo.”

**17.** Iu disĉiplo demandis: “Estas dirite, ke se iu multe rondiras templan pagodon, li renaskiĝos postmorte en paradizo. Tial kredantoj multe faras sian adoron, rondirante pagodon. Ĉu tio estas vero?” Sotesano respondis: “Tio signifas, ke se homo ne rondirigas nur sian korpon ĉirkaŭ ŝtona pagodo, sed ĉiam rondirigas sian menson ĉirkaŭ sia korpa pagodo konsistanta el tero, akvo, fajro kaj vento kaj ekzamenas ĝin, li povas ĝui paradizon. Kiel do homo komprenus la veran signifon, se lia korpo rondiras nur ŝtonan pagodon kaj lia menso ne scias rondiri korpan pagodon?”

**18.** Iu disĉiplo demandis: “Ŝakjamunio diris, ke kiam studo maturiĝas, oni povas atingi la tri sciojn<sup>101</sup> kaj la ses okultajn povojn<sup>102</sup>. En kiu grado de darmforto oni povas atingi ilin?” Sotesano respondis: “Eĉ kiu ankoraŭ ne atingis la gradon de diablovenka darmforto, tiu parte povas scii la pasintan vivon kaj antaŭvidi la estontan vivon el la tri scioj, kaj ankaŭ povas aŭdi ĉion, travidi aliulan koron, scii la pasintan vivon, antaŭvidi la estontan vivon kaj fari miraklon el la ses okultaj povoj. Sed ilin atingi ne povas eĉ iu, kiu jam atingis pli ol la gradon de darma-diabla lukto. Nur budho aŭ bodisatvo, kiu atingis grandan, perfektan kaj ĝustan iluminigon, povas estingi ĉiujn afliktojn.”

**19.** Iu disĉiplo diris: “Mi volas scii la signifon de la kvar ideoj<sup>103</sup> en la sutro *Diamanto*.” Sotesano respondis: “De antikva tempo estas diversaj interpretoj pri ili. Tamen mi koncize klarigos ilin konforme al reala vivo. La ideo pri memo estas, ke oni pensas ĉion memcentre kaj rigardas siaĵon la plej bona, nome, memestimo. La ideo pri homo estas, ke rigardante homon kiel la mastron de ĉiuj estaĵoj, oni pensas ĉiujn aliajn vivulojn naskiĝintaj por homo kaj traktas ilin laŭplaĉe. La ideo pri vivulo estas, ke apartigante budhon de malbudho, oni mem deprimiĝas de sia malbudheco kaj ne klopodas progresi. La ideo pri vivdaŭro estas, ke oni prifieras nur siajn altecojn de aĝo, de sperto kaj de posteno kaj ne klopodas racie distingi juston de maljusto. Kun ĉi tiuj kvar ideoj neniu povas atingi budhecon.” Li denove demandis: “Kiel mi povas forigi ilin?” Sotesano respondis: “Por forigi la ideon pri memo vi devas scii la principon de maldaŭreco, ke viaj plej amataj korpo, havaĵo, posteno kaj potenco neniel utilas al vi ĉe la morto, tial ĉi ĉiuj ne estas viaj fiksitaĵoj. Por forigi la ideon pri homo vi devas scii la principon, ke la kvar naskuloj senfine transformas sian korpon en la ses vojoj. Por forigi la ideon pri vivulo vi devas scii, ke origine budho kaj

<sup>100</sup> *Min Ĝajonhŭa* 閔자연화 閔自然華 (1859-1932): ŭonbulana alnomo *Naktaŭon*, laiko, patrino de *I Gongĝu*.

<sup>101</sup> Tri scioj 삼명 三明: scii la pasintan vivon, antaŭvidi la estontan vivon kaj estingi ĉiujn afliktojn.

<sup>102</sup> Ses okultaj povoj 육통 六通: krom la tri scioj, aŭdi ĉion, travidi aliulan koron kaj fari miraklon.

<sup>103</sup> Kvar ideoj 사상 四相: kvar misaj, falsaj kaj alkroĉiĝaj konceptoj de neiluminiginto. Ili estas ideoj pri memo, pri homo, pri vivulo kaj pri vivdaŭro.

malbudho ne estas du, kaj ke budho ne plu estas budho, kiam li iluziiĝas, dum malbudho budhiĝas, kiam li iluminiĝas. Por forigi la ideon pri vivdaŭro vi devas scii, ke maljunulo kaj junulo, nobelo kaj malnobelo diferencas per korpo, sed tute ne per la naturo. Kiu komplete forigas ĉi tiujn kvar ideojn, tiu sinkultivanto estas budho.”

**20.** *I Ĉunpung* deturniĝis de konfuceana vivo kaj pastrigis. Vizitante Sotesanon, li diris: “Kiam mi vidas vin, mi estas tiel ravata, kvazaŭ mi vidus Konfuceon kun tri mil disĉiploj. Tamen min ĉiam ĉagrenas, ke budhismo havas iun punkton, kiun ne akceptis konfuceanaj sanktuloj.” Sotesano demandis: “Kio estas tiu punkto?” Li respondis: “Ili diris, ke budhismo emfazas nur vantecon kaj malplenon, tial budhanoj ignoras sian devon al gepatroj kaj suvereno.” Sotesano diris: “Budho malfermis la savpordon por multaj gepatroj kaj gefiloj tra eterna tempo, sed foje ne malestis tiaj liaj postaj disĉiploj, kiuj kontraŭis lian volon. Mi tamen konformigas ĉiun darmon al la epoko kaj klopodas, por ke oni bone faru laboron de familio, socio kaj ŝtato per la kredo je budhismo. Do ne zorgu pri tio. Krome la senekstremo kaj la grandekstremo en la libro *Ŝanĝo*<sup>104</sup> estas la vera stato de vanteco kaj malpleno. La bonvolo de Konfuceo estas la malegoisma stato de vanteco kaj malpleno. La mezeco de *Cuŝu*<sup>105</sup> antaŭ sentapero ne povas esti trankvila kaj senmova mezeco sen vanteco kaj malpleno. La brila virto de *La Granda Lernado*<sup>106</sup> nelumigeblas sen vanteco kaj malpleno. Tial ĉiuj religioj kaj skoloj diferencas per vorto kaj nomo, tamen samas la fonto de la vero. Kiu restas nur en vanteco kaj malpleno, tiu ne povas fariĝi granda iluminiĝinto. Nur kiu prenas vantecon kaj malplenon kiel la substancon de la vojo kaj bonvolon, justecon, decon kaj saĝon kiel la funkcion de la vojo kaj utiligas ilin en ĉiuj homaj aferoj, tiu atingas perfektan grandan vojon.”

**21.** Iu disĉiplo diris: “Iu homo demandis min, kiu estas via instruisto. Mi respondis, ke vi ne havas propran instruiston, ĉar vi meminstruite iluminiĝis.” Sotesano diris: “Se poste iu homo denove demandos vin pri mia instruisto, respondu al li, ke via instruisto estas mi, mia instruisto estas vi.” Alia disĉiplo demandis: “Kiu budho estas la ĉefinstruisto de via aŭtoritato?” Sotesano respondis: “La nuna mondo estas en transira tempo, tamen li estas Ŝakjamunio.”

**22.** Iu disĉiplo demandis: “Ni reformis adoron al budhofiguro. Ĉu ni tamen ne povas starigi eĉ statuojn de vi kaj de viaj sekvaj majstroj?” Sotesano respondis: “Starigeblas statuo por memori meritulon, sed ĝi ne prenenas kiel kredobjekto.”

**23.** Iu disĉiplo demandis: “Ĉu pro la relativa graveco de la kvar bonfaroj ni preĝdiras, ke desupre min gardrigardu ĉielo-tero kaj gepatroj, responde min gardrigardu kunvivuloj kaj leĝoj?” Sotesano respondis: “Ne indas aparte diskuti pri la relativa graveco. Tamen se kompari ilin kun la rango de parenceco, ĉielo-tero kaj gepatroj estas en la gepatra rango, kaj kunvivuloj kaj leĝoj estas en la gefrata rango. Tial ili estas dividitaj en ‘desupre min gardrigardu’ kaj ‘responde min gardrigardu’.”

**24.** Iu disĉiplo demandis: “La dankprincipo al ĉielo kaj tero en *la Fundamenta Instruo*<sup>107</sup> tekstas, ke se ni volas danki ĉielon kaj teron pro ilia bonfaro, ni antaŭ ĉio nepre sekvu kaj plenumu ilian vojon. Ĉu nur tio sufiĉas por danki ilin, al kiuj ni ŝuldas multegon?” Sotesano

---

<sup>104</sup> *Ŝanĝo*, *La* 주역 周易: unu el la tri klasikaĵoj de konfuceismo, libro pri sortodivenado verkita de la reĝo *Ven* kaj komentita de Konfuceo.

<sup>105</sup> *Cuŝu* 자사 子思 (492-431 aK): *Tzussu* (ĉ.), nepo de Konfuceo, konfuceano konata kiel la aŭtoro de *La Doktrino de Mezeco*. La mezeco antaŭ sentapero signifas, ke menso antaŭ apero de plezuro, kolero, malĝojo kaj ĝojo nomiĝas mezeco.

<sup>106</sup> *Granda Lernado*, *La* 대학 大學: unu el la kvar libroj de konfuceismo.

<sup>107</sup> *Fundamenta Instruo*, *La* 정전 正典: *Ĝongĝon* (k.), la ĉefa sankta libro de ŭonbulismo. Ĝi enhavas la fondmotivon, doktrinon kaj praktikadon de ŭonbulismo kaj estis eldonita surbaze de *La Fundamenta Instruo de Budhismo* (*Bulgjoĝongĝon* en la korea), kiun verkis kaj finredaktis Sotesano en 1943.

respondis: “Mi ekzemplos tion. En la eklezio de budho kaj bodisatvo aŭ en la skolo de sanktulo, saĝulo aŭ superulo iu disĉiplo ŝulda al sia instruisto scias kaj faras ĉion, kion lia instruisto scias kaj faras, kaj povas heredi la laboron de sia instruisto, kvankam li ne rekompencas materie sian instruiston. Ĉu ni tiam nomas lin dankanto aŭ nedankanto al sia instruisto? Per tio vi povas kompreni, kial sekvi kaj plenumi ilian vojon estas danki ilin.”

**25.** Iu disĉiplo demandis: “El la dankpunktoj al gepatroj estas, ke ni surpaŝu komplete la esencajn vojojn de studo kaj de homo. Kial tio povas esti danko al ili?” Sotesano respondis: “Kiu sekvas komplete la esencajn vojojn de studo, tiu atingas budhan saĝon. Kiu sekvas komplete la esencajn vojojn de homo, tiu atingas budhan agon. Se iu filo atingos budhajn saĝon kaj agon kaj fidele plenumos budhan laboron, lia glorplena nomo diskoniĝos en vasta mondo kaj gepatra bonfaro al li elmontriĝos. Pro la filo ankaŭ la nomoj de gepatroj eterne memoriĝos kaj ĉiuj homoj ilin respektos de generacio al generacio. Kiel do tio kompareblus kun priservado al ili dum unu mallonga vivdaŭro? Tio estas semlima danko al ili.” Li denove demandis: “Kial protekti senpovajn gepatrojn de aliuloj kiel niajn estas danki gepatrojn?” Sotesano respondis: “Konsidere la principon de multvivo, pri kiu Ŝakjamunio diris, sennombraj estas gepatroj pasintaj kaj estontaj tra miriadoj da eonoj. Kiel do fini dankon al tiel multaj gepatroj per danko nur al la nunaj gepatroj? Tial ni laŭkapable protektu senpovajn gepatrojn de aliuloj, ĉu la nunaj gepatroj vivas aŭ forpasis. Tio estas granda danko al ĉiuj pasintaj, nunaj kaj estontaj gepatroj.”

**26.** Iu disĉiplo demandis: “Kian rilaton havas la atentaĵoj en ĉiutaga vivo al la tri studoj en *La Fundamenta Instruo*?” Sotesano respondis: “La atentaĵoj en ĉiutaga vivo estas malkombinaĵo de la tri studoj. La kvina atentaĵo akcelas spiritan kultivon. La dua, la tria kaj la kvara akcelas aferan-principan esploron. La unua akcelas justagan elekton. La sesa kontrolas efektivigon de la tri studoj.” Li denove demandis: “Kiel la ses atentaĵoj dividiĝas en studon ĉe movo kaj studon ĉe senmovo?” Sotesano respondis: “La tria, la kvara kaj la kvina estas studo ĉe senmovo kaj preparas materialon por studo ĉe movo. La unua, la dua kaj la sesa estas studo ĉe movo kaj preparas materialon por studo ĉe senmovo. Tiel ĉiuj atentaĵoj helpas sin reciproke kaj ne permesas al homo lasi studon eĉ sekunde.” Li denove demandis: “Kian rilaton havas la atentaĵoj en ĉiutaga vivo al tiuj dum templa vizito?” Sotesano respondis: “La atentaĵoj en ĉiutaga vivo estas rapida maniero, per kiu en vivo ĉiam studi povas homo, ĉu klerulo ĉu malklerulo, ĉu viro ĉu virino, ĉu junulo ĉu maljunulo, ĉu bonulo ĉu malbonulo, ĉu noblulo ĉu malnoblulo. La atentaĵoj dum templa vizito helpas al homo kompreni kaj praktiki la atentaĵojn en ĉiutaga vivo.”

**27.** Sotesano aŭskultis diskuton de la partoprenantoj de trejnsesio. Iu diris: “Egale regali dek personojn per bovlo da rizo havas pli grandan meriton ol nur unu personon.” Alia kontraŭdiris: “Regali kontentige almenaŭ unu personon per ĝi havas pli grandan meriton ol nekotentige dek personojn.” Ili ne povis trovi la solvon kaj Sotesano juĝis: “Se iu donos ian objekton nur al unu persono, nur la persono plezure lin rekompencos. Se li donos ĝin al vilaĝo, lando aŭ senlima laboro de la mondo, la vilaĝo, la lando aŭ la tuta mondo plezure lin rekompencos. Tial uzi senlime la saman objekton havas senkompare pli grandan meriton ol kunlime.”

**28.** Iu disĉiplo demandis: “Kiel diferencas per merito almozoj kun penso<sup>108</sup> kaj sen penso?” Sotesano respondis: “Doni almozon estas kiel sterki fruktarbon. Doni almozon kun penso estas kiel disĵeti sterkon sur la grundon kaj doni almozon sen penso estas kiel kovri disĵetitan sterkon. La energio de surĵetita sterko facile perdiĝas kaj tiu de kovrita sterko daŭras longe. Tiel same diferencas per merito almozoj kun kaj sen penso.”

---

<sup>108</sup> Almozo kun penso 유상보시 有相布施: doni almozon pensante pri siaj bonfaro kaj rekompenciĝo.

**29.** *Ĝo Ŭonson*<sup>109</sup> demandis: “Kion signifas la verso de ĉondoismo: *i ĝe gung gung ol ol* (profito enestas en arko kaj arko kaj birdo kaj birdo)?” Sotesano respondis: “Estas diversaj interpretoj pri la verso. Se oni kunigas du arkojn laŭvorte, ili formas unu cirklon. Se oni enmetas du birdojn en unu cirklon, ili formas la simbolon de la grandekstremo. Tio signifas, ke se iu strebos al perfekta moralo kaj vivos senvenĝeme, li multe profitos el tio.” Li denove demandis: “Kion signifas, ke se iu tage-nokte kantados la verson, al li malfermiĝos fortuno?” Sotesano respondis: “Se iu tiel kantados la verson, kiu estas religia preĝvorto, lia menso puriĝos kaj venĝemo kaj malico en ĝi degelos, tiel ke la tuta universo puriĝos kaj paciĝos. Kie do estus pli bona kanto ol tiu? Multe ĝin kantadu.”

**30.** *Ĉoj Suinhŭa*<sup>110</sup>, plurgeneracia kredanto de ĉondoismo, neatendite ekspiris studon kaj membriĝis. Iutage ŝi diris al Sotesano: “Kiam mi estis kredanto de ĉondoismo, mi tutkore atendis la renaskiĝon de majstro *Suun*<sup>111</sup>. Kiam mi ekvidis vin, mi sentis min, kvazaŭ mi vidus majstron *Suun*, tiel ke mi pliintimiĝas al vi kaj eĉ ne povas subpremi mian ĝojon.” Sotesano ride diris: “Tiaj sanktuloj kaj saĝuloj plene disponas pri la veno kaj iro de siaj korpo kaj menso. Laŭ sia laborordo ili renaskiĝas libere en sia pasinta lando, en la oriento aŭ en la okcidento kaj havas nenian obstaklon. En ĉi tiu lando multaj senkomparaj iluminiĝintoj naskiĝis en la pasinteco kaj ankaŭ estonte kolektiĝos el ĉiuj direktoj por establi senprecedentan eklezion. Kiam vi kredas min, kredu min per mia instruo, sed ne kredu min por serĉi sinapogejon ĉe mi.”

**31.** Iu disĉiplo kutimis kritiki aliulojn senprudente. Iun tagon li diris, ke majstro *Ĝungsan*<sup>112</sup> estas frenezulo. Sotesano aŭdis tion kaj diris: “Kiel vi povas juĝi antaŭulojn senprudente? Estas maljuste akuzi instruiston pro la kulpo de liaj disĉiploj. Nur tia homo povas rekoni tian homon, tial kiu ne havas plenan scion, tiu ne povas prijuĝi aliulon.” Li demandis: “Kia homo estas li?” Sotesano respondis: “Li estas rara profeto kaj dia persono. Kiam nia eklezio diskoniĝos en la mondo, li kaj majstro *Suun* kune respektiĝos kaj memoriĝos eterne.”

**32.** *Gim Giĉon* demandis: “Mi komparas kun tagiĝo novmondan malfermiĝon<sup>113</sup> menciitan de profetoj. Majstro *Suun* antaŭsciigis tagiĝon al homoj en profunda dormo, majstro *Ĝungsan* informis ilin pri posttagiĝa novaĵo kaj vi eklaboris ĉe tagiĝo. Kiel vi pensas pri tio?” Sotesano respondis: “Tio havas sencon.” *I Hoĉun*<sup>114</sup> demandis: “Mi komparas ĝin kun unujara terkultivo, majstro *Suun* konsilis al homoj dum degelo prepari kampan laboron, majstro *Ĝungsan* informis ilin pri terkultiva kalendaro kaj vi rekte instruis al ili kiel kultivi teron. Kiel vi pensas pri tio?” Sotesano respondis: “Tio ankaŭ havas sencon.” *Song Dosong* demandis: “Ili estis tiaj diaj personoj, sed homoj havas malsamajn komentojn pro iliaj disĉiploj. Kiel ili traktiĝos estonte?” Sotesano respondis: “Homa afero tiel akceptiĝas, kiel ĝin kompetentulo aprobas. Ni hodiaŭ interparolis pri ili, tial se nia instruo diskoniĝos, ili diskoniĝos. Krome ili multe helpis estontajn iluminiĝintojn, tial tiuj postaj multe memoros kaj respektos antaŭajn.”

**33.** Iu homo demandis: “Unu el la malnovaj esoteraĵoj de nia lando diras, ke en la estonteco *Ĝong Dorjong*<sup>115</sup> surtroniĝos en la monto *Gjerjongsan* kaj paciĝos la mondon. Ĉu tio

<sup>109</sup> *Ĝo Ŭonson* 조원선 曹元善 (1896-1950): ŭonbulana alnomo *Hojsan*, pastro.

<sup>110</sup> *Ĉoj Suinhŭa* 최수인화 崔修仁華 (1889-1980): ŭonbulana alnomo *Gjongtaŭon*, pastrino.

<sup>111</sup> *Suun* 수운 水雲 (1824-1864): alnomo de *Ĉoj Ĝeu*, fondinto de ĉondoismo, korea religio fondita en 1860.

<sup>112</sup> *Ĝungsan* 증산 甞山 (1871-1909): alnomo de *Gang Ilsun*, fondinto de ĝungsanismo, korea religio fondita en 1900.

<sup>113</sup> Novmonda malfermiĝo 후천개벽 後天開闢: disvolviĝo de nova civiliza mondo.

<sup>114</sup> *I Hoĉun* 이호춘 李昊春 (1902-1966): ŭonbulana alnomo *Hangsan*, pastro.

<sup>115</sup> *Ĝong Dorjong* 정도령 鄭道令: homo, kiu fondos sian dinastion en la monto *Gjerjongsan* kaj pace regos la mondon post la korea dinastio *Ĝoson*, laŭ la libro *Ĝonggamrok* verkita en la dekseca jarcento kaj

okazos vere?” Sotesano respondis: “La monto *Gjerjongsan* signifas la venontan luman mondon kaj *Ĝong Dorjong* ĝustajn gvidantojn, kiuj regos la mondon. Tio do antaŭdiras, ke en la venonta luma mondo ĝustuloj regos familion, socion, ŝtaton kaj la mondon.”

**34.** *Giĉon* demandis: “Ĉu al la grado de diablovenka darmforto povas progresi tiu, kiu ankoraŭ ne vidas la naturon?” Sotesano respondis: “Ne.”

**35.** *Giĉon* denove demandis: “Kio estas pli peniga el progresi de la grado de elementa kredo al la grado de diablovenka darmforto kaj progresi de la grado de diablovenka darmforto al la grado de budha darmforto?” Sotesano respondis: “Tio dependas de persona kapablo. Iu homo kun la plej supera kapablo povas transsalti tuj post la grado de diablovenka darmforto al la grado de budha darmforto, dum alia homo sen tia kapablo restas longan tempon en la grado de diablovenka darmforto.”

**36.** *Giĉon* denove demandis: “Estas dirite, ke la povo apartigi la animon de la korpo atingeblas por sinkultivanto dum studo. En kiu grado de darmforto oni atingas la povon?” Sotesano respondis: “Ne povas tion fari eĉ iu en la grado de budha darmforto. Eĉ se iu ankoraŭ ne vidis la naturon, nek atingis la gradon de diablovenka darmforto, li povas tion fari per intensa spirita kultivo. Sed per tio ne takseblas la atingo de perfekta vojo. Tial en la venonta epoko nur peca luminiĝinto estos tiu, kiu ne bone scios ĉiujn homajn aferojn kaj principojn, eĉ se li estos lerta en astronomio supre kaj geografio malsupre, apartigos la animon de la korpo kaj atingos spiritaltecon. Do vi kunpraktiku la tri studojn kaj atingu perfektan personecon.”

**37.** *Giĉon* denove demandis: “Por atingi la gradon de diablovenka darmforto oni liberiĝu de naskiĝo, maljuniĝo, malsano kaj morto. Ĉu tio signifas la povon morti libere en sido aŭ staro kiel eminentaj budhanaj majstroj en la pasinteco?” Sotesano respondis: “Tio signifas luminiĝi pri la vero de eterno kaj ne alkroĉiĝi al naskiĝo kaj morto.”

**38.** *Giĉon* denove demandis: “Kiun gradon de darmforto iu devas havi por elektiĝi kiel ĉefmajstro<sup>116</sup> estonte?” Sotesano respondis: “Eĉ en la degenera epoko tiu devas havi almenaŭ la gradon de diablovenka darmforto.” Li denove demandis: “Se estas iu, kiu havas pli altan darmforton ol siatempa ĉefmajstro, kiel trakti la progreson de ties darmforto?” Sotesano respondis: “Oni faru tion laŭ la opinio de la eklezia publiko.”

**39.** Iu disĉiplo demandis: “En kiu grado de darmforto oni ne plu malprogresas?” Sotesano respondis: “Almenaŭ en pli ol la grado de diablovenka darmforto. Sed se eĉ tiu gradano lasas sian studemon, li povas malprogresi. Estas vero, ke ŝanĝiĝas ĉio en la universo. Eĉ budho, kiu atingis tian gradon, devas konstante teni sian studemon. Nur tiam li povas venki ajnajn favorajn kaj malfavorajn situaciojn kaj miradojn da eksteraj diabloj. Tio nomiĝas neniam malprogreso.”

**40.** Li denove demandis: “Estas dirite, ke homo kun la plej supera kapablo povas atingi kaj tujan luminiĝon kaj tujan praktikadon. Ĉu tio eblas?” Sotesano respondis: “El la pasintaj budhoj kaj patriarkoj ne malestis tiuj, kiuj atingis ilin ambaŭ, sed fakte homoj atingas ilin, trapasinte miradojn da tavoloj de naturvido kaj da ŝtupoj de praktikado. Kompardire ĉe tagiĝo nerimarkate foriĝas mallumo kaj alproksimiĝas lumo.”

---

priskribanta la estontan sorton de Koreio.

<sup>116</sup> Ĉefmajstro 중법사 宗法師: *ĝongbopsa* (k.), la eklezia estro kaj plej alta gvidanto de ŭonbulismo.

## Principo de naturo

1. Sotesano, atinginte grandan iluminiĝon, versis sian senton:  
*“La luno leviĝas freŝvente,  
 kaj ĉio lumiĝas spontane.”*
2. Sotesano diris: “Kiam homa naturo estas senmova, ĝi estas nek bona, nek malbona. Kiam ĝi moviĝas, ĝi povas fariĝi kaj bona kaj malbona.”
3. Sotesano diris: “Oni nomas plejbono la staton, kiu transcendas bonon kaj malbonon, kaj plejplezuro la staton, kiu transcendas plezuron kaj suferon.”
4. Sotesano diris: “Granda vojo estas perfekte harmonia, tiel ke esto kaj neesto, studo kaj laboro, naskiĝo kaj morto, movo kaj senmovo ne estas du. Ĉi tiu neduala pordo inkludas ĉion.”
5. Sotesano diris: “Sendistance interrilatas grandaj vojoj, sed ilin distancigas homoj mem, ne sciante tion. Kiu scias lumigi unu menson per ĉiuj estaĵoj, tiu povas atingi grandan, perfektan kaj ĝustan iluminiĝon.”
6. Sotesano diris: “Se iu diras, ke ne videblas la menso pro ĝia senformeco, kaj ke ne vortigeblas la naturo pro ĝia nepriskribebleco, li ne estas homo, kiu vere vidis la naturon. Budhecon klare vidas nur tiu, kiu povas evidente vidi sen okulstreĉado kaj tuj diri sen pripensado la formon de la menso kaj la realaĵon de la naturo.”
7. Sotesano diris: “Sinkultivanto celas vidi la naturon por scii ĝian originan staton, uzi korpon kaj menson senmanke kiel ĝi kaj fariĝi perfekta budho. Se iu nur vidas la naturon kaj ne strebas al budhiĝo, lia naturvido estas neutila kiel belaspekta plumbohakilo.”
8. Sotesano diris: “Naturvido estas same, kiel fine ekscias sian havaĵon milionulo, kiu ne sciis ĝin. Naturutiligo estas same, kiel li reakiras diversmaniere sian perditan rajton por havaĵo, kiun aliulo forprenis dum lia malzorgado.”
9. Sotesano diris: “Kiu ne instruas la principon de naturo, tiu religio ne estas perfekta, ĉar ĝi estas la ĉefaĵo de ĉiuj instruoj kaj la fundamento de ĉiuj principoj.”
10. Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*, iam pluvegis kaj akvo tondre falis de altaj klifoj kaj torente fluis en ĉiuj valoj. Li rigardis la scenon longe kaj diris: “Nun akvoj diversvale fluantaj havas malsamajn fluejojn, sed fine kolektiĝos en unu loko. Tiel same ĉiuj estaĵoj reiras al unu.”
11. Sotesano en la domo *Bongneĝongsa* skribis la jenan versaĵon al disĉiploj:  
*“En la nauĝkurbiĝa montvalo de Bjonsan<sup>117</sup>  
 la ŝtono starante aŭskultas fluakvon.  
 Nenio-nenio ja estas nenio,  
 neado-neado ja estas neado.”*  
 Li aldiris: “Kiu komprenas ĉi tiun signifon, tiu estas iluminiĝinto.”
12. Sotesano revenis de *Jongsan* al la domo *Bongneĝongsa* kaj demandis iun disĉiplon: “Kiam mi ŝipvojaĝis de *Jongsan* ĉi tien, mi trovis la maron profunda kaj vasta. Mi detale mezuris la tutan marakvon kaj kalkulis ĉiujn fiŝojn. Ĉu vi povas scii la akvokvanton kaj la fiŝnombron?” Li ne komprenis la signifon de liaj vortoj.
13. Sotesano demandis ĉiujn disĉiplojn en la domo *Bongneĝongsa*: “Iam iu lernanto demandis sian instruiston pri la vojo. Li respondis: ‘La vojon kontraŭas kaj instrui kaj ne instrui ĝin al vi. Kion mi faru!’ Ĉu vi komprenas la signifon?” Ili ĉiuj silentis kaj ne respondis. Tiam estis vintro kaj la korto plenis je blanka neĝo. Sotesano sola elĉambriĝis kaj

---

<sup>117</sup> *Bjonsan* 변산 邊山: monto en la naciparka duoninsulo *Bjonsan*.



forigis la neĝon. Iu disĉiplo rapide eliris, deprenis de li ŝovelilon kaj petis lin enĉambriĝi. Sotesano diris: “Per ĉi tio mi celis ne nur forigi la neĝon, sed ankaŭ instrui al vi la okultan staton.”

**14.** Sotesano demandis *Mun Ĝonggju* en la domo *Bongneĝongsa*: “Ĉu vi povas irigi majstron Bodidarmo de la bildo surmure pendanta?” Li respondis: “Jes.” Sotesano diris: “Nu, provu!” Li ekstaris kaj mem iris. Sotesano diris: “La iranto ne estas li, sed ĝuste vi.” Li respondis: “Sovaĝansero veninta de la oriento flugas suden.”

**15.** Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*, iu meditsekta bonzo venis de la monto *Gumgangsán* kaj Sotesano demandis: “Kion mi povas fari por vi, kiu venis tiel longan vojon?” Li respondis: “Mi volas aŭskulti vin pri la vojo. Bonvolu diri al mi, kie ĝi estas.” Sotesano diris: “Ĝi estas en via demando.” Li riverencis kaj foriris.

**16.** Iu meditsekta bonzo venis al la domo *Bongneĝongsa* kaj demandis Sotesanon: “Estas dirite, ke Ŝakjamunio jam malsupreniĝis al la reĝpalaco, ne forlasante la ĉielon *Tuŝita*, kaj fínsavis ĉiujn vivulojn, estante en la utero de patrino. Kion signifas tio?” Sotesano respondis: “Vi estas korpe en la domo *Sokduam*<sup>118</sup>, ne forlasante la templon *Ŝilsangsa*, kaj fínsavas ĉiujn vivulojn, estante en la domo *Sokduam*.”

**17.** Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*, iu homo vizitis lin, akompanate de *So Ĝungan*<sup>119</sup>. Sotesano demandis: “Kion vi aŭdis pri mi por veni ĉi tian malfacilan vojon?” Li respondis: “Mi aŭdis pri via alta moraleco kaj venis por renkonti vin.” Sotesano demandis: “Vi jam vidas min. Kion vi volas de mi?” Li respondis: “Mi ĉiam en la polvomondo ne povas ĝustigi menson pro afliktoj kaj iluzioj, tial mi volas ĝustigi ĝin.” Sotesano respondis: “Por ĝustigi menson vi devas unue luminiĝi pri ĝia fonto kaj uzi ĝin senpartie. Se vi volas scii la kialon, studu ĉi tiun uĵdon.” Sotesano skribis al li: “Ĉiuj estaĵoj reiras al unu. Kien reiras la unu?”

**18.** Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*, meditmajstro *Bek Hakmjong*<sup>120</sup> vizitadis kaj foje ĝuis interparolon pri la principo de naturo per eksterordinaraj vortoj. Iun tagon Sotesano antaŭdiris kelkajn vortojn al knabino *I Ĉongpung*<sup>121</sup>. La sekvan tagon li venis de la templo *Ŭolmjongam*<sup>122</sup>. Sotesano bonvenigis lin kaj diris: “Ŝajnas, ke tiu pistanta *Ĉongpung* maturiĝas en studo de la vojo.” Li tuj aliris kaj laŭte diris al ŝi: “Montru al mi la vojon sen movi viajn piedojn!” Ŝi trankvile stariĝis kaj suprenlevis la pistilon. Li silente enĉambriĝis kaj ŝi sekvis lin. Li demandis: “Ĉu vi povas irigi Bodidarmon surmure pendantan?” Ŝi respondis: “Jes.” Li diris: “Irigu lin.” Ŝi stariĝis kaj faris kelkajn paŝojn. Frapante sian genuon, li aprobis ŝian luminiĝon en la aĝo de dek tri jaroj. Sotesano rigardis la scenon kaj ridete diris: “Naturvido dependas kaj de vortoj kaj ne de vortoj, sed estonte ne aproboblos tiamaniere.”

**19.** Iun tagon majstro *Hakmjong* skribis la jenan versaĵon al Sotesano:

*“Montego kvazaŭe pikanta ĉielon,  
revenu al maro kaj faru grandondon.  
Vi tamen sen scii al kiu reveni,  
nur restas en Sokdu kaj domon konstruas.”*

Sotesano respondis al li per la jena versaĵo:

*“Montego elstaras ja kiel ĝi estas,*

---

<sup>118</sup> *Sokduam* 석두암 石頭庵: alia nomo de *Bongneĝongsa*.

<sup>119</sup> *So Ĝungan* 서중안 徐中安 (1881-1930): ŭonbulana alnomo *Ĉusan*, laiko, *dehobop*, ĉefdirektoro de Instituto de Budha Darma (1924-1928).

<sup>120</sup> *Bek Hakmjong* 백학명 白鶴鳴 (1867-1929): budhana pastro, kiu profunde amikiĝis kun Sotesano.

<sup>121</sup> *I Ĉongpung* 이청풍 李清風: nepino de *Gim Namĉon*.

<sup>122</sup> *Ŭolmjongam* 월명암 月明庵: tre malnova budhana templo en la monto *Bjonsan*.

*kaj maro tre vasta mem estas grandondo.*

*Denove mi scias al kiu reveni,*

*kaj alta montriĝos la domo de Sokdu.”*

**20.** *Gim Gŭangson* demandis: “Kio estis la realaĵo, antaŭ ol ĉiuj estaĵoj en la mondo naskiĝis?” Sotesano respondis: “Silente kontemplu la staton, antaŭ ol vi parolas.” Li denove demandis: “Kial naturvido necesas por praktikado?” Sotesano respondis: “Tio estas kiel scii la korpon de teksto.”

**21.** Iu disĉiplo demandis: “Kion rezultigas naturvido?” Sotesano respondis: “Naturvidinto klare scias la principon de ĉiuj estaĵoj en la universo kaj estas kiel ĉarpentisto, kiu jam havas liniilon kaj tuĉfadenon.”

**22.** Sotesano aŭskultis la predikon de *Gim Giĉon* pri la principo de naturo en trejnsesio kaj diris: “Lastnokte mi en duonsonĝo akiris la dezirplenuman globon<sup>123</sup> kaj donis ĝin al *Samsan*<sup>124</sup>. Mi do vidis, ke li ĝin englutis kaj tuj aliformiĝis. Kiam mi reale aŭskultas lian predikon pri la principo de naturo, mia spirito refreŝiĝas.” Sotesano aldiris: “Darmo nek doneblas, nek riceveblas per persona intimeco, sed ĝin ricevas nur homo, kiu malfermas sian saĝokulon. Okultan povon havas nur drak<sup>125</sup>, kiu posedas la dezirplenuman globon. Tian povon havas nur sinkultivanto, kiu vidas la naturon kaj scias trejni ĝin.” *Mun Gonggju* demandis: “Ni de longe respektas *Gongsan*. Ĉu li ankaŭ vidis la naturon?” Sotesano respondis: “Samtempe ekkonstruiĝas granda domo kaj malgranda domo, sed estas domo, kiu finkonstrueblas en unu monato, unu jaro aŭ pluraj jaroj. Tiel same *Gongsan* bezonas iom pli da tempo.”

**23.** Iu disĉiplo demandis: “Ĉu budhiĝo okazas tuj post naturvido?” Sotesano respondis: “Jes, tio eblas laŭ la kapablo de homo, sed tre malofte. Ĝenerale budhiĝo estas pli peniga ol naturvido. En la pasinteco homa saĝo estis malluma, tial homo rigardiĝis kiel iluminiĝinto nur per naturvido, sed en la venonta mondo homo ne povos rigardiĝi kiel iluminiĝinto nur per naturvido. La plejmulto de la sinkultivantoj facile vidos la naturon frue en sia hejmo kaj strebos al budhiĝo, serĉante grandan instruiston.”

**24.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Onidire la principo de naturo ne vortigeblas, sed ĝi ankaŭ klare vortigendas. Se iu el vi pensas sin iluminiĝinta, klarigu al mi tion, ke ĉiuj estaĵoj reiras al unu, kaj kien reiras la unu.” Homoj respondis unu post la alia, sed neniu estis aprobita. Tiam iu disĉiplo stariĝis kaj riverencinte diris: “Bonvolu ankoraŭ foje demandi min.” Sotesano denove demandis la samon kaj li respondis: “Ĉiuj estaĵoj origine estas klaraj kaj dekomence havas neniun lokon por reiri. Kien do necesus reirigi la unu?” Sotesano kun rideto silentis.

**25.** Sotesano diris: “Lastatempe el la studantoj de la principo de naturo multas tiuj, kiuj ofte klopodas interpreti ĝin nur per silento. Tio estas granda malsano. Verscianto scias klare distingi kapon de vosto, kvankam la stato de la principo de naturo origine estas sen kapo kaj vosto, kaj vorte priskribi la staton, kvankam ĝi estas super vortoj. Verscianto iel ajn aperigas sian scion kaj nescianto sian nescion. Sed oni ne rigardu nur pervortan esprimon la plej taŭga. Mil sutroj kaj dek mil predikoj de budhoj kaj patriarkoj estas kiel fingro almontranta la lunon.”

**26.** Sotesano demandis la partoprenantojn de trejnsesio: “Kiu el vi komplete transposedas la

<sup>123</sup> Dezirplenuma globo 여의보주 如意寶珠: *cintamani* (s.), magia kaj okulta globo, per kiu oni povas plenumi ĉiujn siajn dezirojn, metaforo por homa naturo kaj iluminiĝinta menso, atributo de budho kaj bodisatvo. Oni imagas, ke ĝi troviĝas en la submentono de drako.

<sup>124</sup> *Samsan* 삼산 三山: ŭonbulana alnomo de *Gim Giĉon*.

<sup>125</sup> Drako 용 龍: legenda besto. En eŭropaj legendoj kaj rakontoj ĝi aperas kiel malica besto, sed en Azio ĝi estas rigardata kiel ĉiopova besto kaj ofte metafore signifas reĝon, ekzemple drakrobo estas la robo de reĝo kaj drakvizaĝo estas la vizaĝo de reĝo.

malplenan darmmondon?” Ili silentis kaj ne respondis. Sotesano denove diris: “Ĉiuj budhoj kaj bodisatvoj de la tri mondoj penis posedi la malplenan darmmondon, kiu estas senforma kaj nevidebla, tial ili posedas ankaŭ ĉiujn formhavajn estaĵojn en la universo. Sed ordinaruloj kaj vivuloj avidas alproprigi nur formhavajn estaĵojn, tial ili ne povas eterne posedi ilin kaj forpasigas nur valoran tempon. Kiel do tio ne estus vantaĵo? Nu, vi ne baraktu por posedi nur objekton formhavan, sed pli penu posedi la malplenan darmmondon senforman.”

**27.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Se vi scias dividi grandon en malgrandojn, kiuj diference montras ĉiujn estaĵojn, kaj integri tiujn malgrandojn en grandon, vi perfekte komprenas la substancon de la principo de naturo. Se vi scias fari eston neesto, neeston esto kaj scias la veron, ke ĉio en la mondo ne ŝanĝiĝas en ŝanĝo kaj ŝanĝiĝas en senŝanĝo, vi perfekte komprenas la funkcion de la principo de naturo. El la homoj asertantaj sian iluminiĝon pri la principo de naturo ne malmultas tiuj, kiuj pli-malpli konjektas grandon kaj neeston, sed ne komprenas la principon de malgrando kaj esto. Kiel do eblus diri, ke ili perfekte iluminiĝis pri la principo de naturo?”

**28.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Detale dividu homon en menson, naturon, principon kaj energion kaj ankaŭ integri la tutan homon nur en menson, naturon, principon aŭ energion. Nun diru la rezulton.” Ili donis diversajn respondojn, sed Sotesano aprobis neniun kaj diris: “Ekzemple, kiam iu homo bredas kapron, li ne nutras ĝin per multo en unu tempo por tuj kreskigi ĝin, sed per ĝusta kvanto laŭ ĝia kresko, tiel ke ĝi nature kreskas, naskas idojn, produktas lakton kaj donas profiton al li. Tiel same oni en religio igas kredanton iluminiĝi pri la vojo.”

**29.** Kiam Sotesano estis en la domo *Ĝoŝil*, grupo da inspektistoj vizitis kaj demandis: “Kie la budho de via eklezio estas ensanktejigita?” Sotesano respondis: “La budhoj de nia eklezio ĵus eliris. Atendu momenton por vidi ilin.” Ne komprenante lin, ili konfuziĝis. Post nelonge de la kampo revenis por tagmanĝi grupo da homoj kun siaj laboriloj. Tiam Sotesano diris, montrante al la homoj: “Ĝuste tiuj estas budhoj de nia eklezio.” Des pli ne komprenis lin la inspektistoj.

**30.** Sotesano en trejnsesio petis de *Song Dosong* interpreti la darmtransdonajn versaĵojn<sup>126</sup> de la antikvaj sep budhoj. *Dosong* interpretis ilin unu post la alia kaj atingis la versaĵon de la sepa budho Ŝakjamunio, kiu tekstas jene: “Darmo fonte estas ja sendarmo, ankaŭ la sendarmo estas darmo. Kiam mi transdonas ja sendarmon, kiun darmon mi do nomu darmon?” Tiam Sotesano ĉesigis lian interpretadon kaj diris: “Origine ne indas nomi ion darmo, sed por komprenigi homojn kun malsupera kapablo tio nomiĝas darmo. La darmo tamen ne estas vera darmo. Kiu iluminiĝas pri la signifo de ĉi tiu versaĵo, tiu ne bezonas tralegi dekmilojn da sutroj.”

**31.** En januaro de la dudeksesa jaro de ŭonbulismo (1941) Sotesano deklamis sian versaĵon kaj diris: “Esto estas la stato de ŝanĝo kaj seno estas tiu de senŝanĝo, sed eblas nomi ĉi tiun staton nek esto, nek seno. La vortoj ‘turniĝadas, kaj en fino’ estas nenio alia ol devigata esprimo por instrui. Des pli ne necesas paroli pri la vortoj ‘malplenas kaj plenas.’ Ĉi tiu stato estas la vera realaĵo de la naturo, tial ne klopodu kompreni ĝin per pesado, sed iluminiĝu pri ĝi per intuo.”

---

<sup>126</sup> Darmtransdona versaĵo 전법계송 傳法偈頌: versaĵo, per kiu majstro transdonas la aŭtoritaton de sia eklezio, sekto aŭ skolo, kaj kiu enhavas lian kernan instruon.

## Budheco

1. Sotesano diris: “En ĉi tiu mondo multas montoj kaj grandaj kaj malgrandaj, sed multenombraj bestoj sin apogas kaj loĝas en la plej granda, profunda kaj arboplena monto el ili. Ĉie fluas riveroj kaj grandaj kaj malgrandaj, sed multenombraj fiŝoj sin apogas kaj loĝas en la plej vasta kaj profunda maro el ili. Tiel same diversaj homoj respektive gvidas la mondon, sed multenombraj vivuloj siajn korpon kaj menson apogas kaj kunĝuas komfortan vivon ĉe la plej virta kaj kompata homo el ili.”
2. Sotesano diris: “La grandaj korfavoro kaj kompato de budho havas pli varman kaj brilan forton ol la suno. Tial kien ajn etendiĝas ĉi tiuj korfavoro kaj kompato, malsaĝa koro de vivuloj degelas kaj ŝanĝiĝas en saĝan, kruela koro en favoran kaj kompatan, avara kaj avida koro en bonfaran kaj distinga koro pri la kvar ideoj en perfektan. Nenio do kompareblas kun iliaj potenco kaj lumo.”
3. Sotesano diris: “Se naiva infano estas sana kaj honesta kaj ne ĉagrenas gepatrojn, aŭ se ĝi estas bonkora kaj ĝentila, gepatroj tre ĝojas, vekas dorlonton kaj pli amas ĝin. Tiel same, kiam budho vidas ĉiujn vivulojn, li tre ĝojas, amas kaj pli kaj pli kondukas al bona vojo tian homon, kiu estas bonkora, estas lojala al lando, priservas gepatrojn, amas gefratojn, respektas instruiston, harmonias kun najbaro, savas malriĉulon kaj malsanulon, saĝigas sin sekvante la grandan vojon kaj akiras neelĉerpeblan meriton per enaga senpenso. Tio estas la granda korfavoro de budho. Se senprudenta infano dolorigas sian okulon pikante ĝin per sia fingro, vundas sian manon prenante tranĉilan klingon kaj plortumultas sen scii la kialon, gepatroj vekas simpatian kaj kompaton kaj pli protektas kaj kondukas ĝin. Tiel same budho tre malĝojas, kompatas kaj ĉiarimede savas ĉiujn vivulojn, se ili mem bruligas sian menson pro alkroĉiĝo al avido, kolero kaj malsaĝo, mem ruinigas sian korpon, mem faras aĵon indan enfali en malbonan vojon kaj eĉ pro puno kaŭzita de ili mem plendas al ĉielo-tero, prapatroj, kunvivuloj kaj leĝoj. Tio estas la granda kompato de budho. Kvankam vivuloj vivas sub tiaj grandaj korfavoro kaj kompato de budho, ili ne povas rekoni lian bonfaron. Sed tio neniom gravas al budho kaj li tutkore dediĉas miriadojn da eonoj nur por savi ilin. Tial budho estas la granda instruisto de la tri mondoj kaj la kompatoplena patro de la kvar naskuloj.”
4. Sotesano diris: “Budhoj kaj bodisatvoj sekvas senobstaklan kaj liberan vojon ĉe iro, restado, sido, kuŝo, parolo, silento, movo kaj senmovo, tial laŭbezone ili povas jen senmoviĝi jen moviĝi, jen grandiĝi jen malgrandiĝi, jen lumiĝi jen mallumiĝi, jen vivi jen morti, tiel ke ili neniom kontraŭas leĝon en ajnaj aĵo kaj loko.”
5. Sotesano diris: “Se nur materialon disponas homo, kiu bone faras manĝaĵon aŭ veston, li povas elfari ĝin laŭplaĉe kaj ĝustigi ĝin misfaritan. Tiel same granda sinkultivanto, kiu bone scias ĉiujn darmojn, knedante ilin, povas elfari novan darmon kaj ĝustigi eksmodan. Netia sinkultivanto uzas kaj transdonas nur faritan darmon, sed ne havas talenton krei kaj ĝustigi darmon.” Iu disĉiplo demandis: “En kiu grado de darmforto sinkultivanto atingas tian povon?” Sotesano respondis: “Nur sinkultivanto pli ol en la grado de diablovenka darmforto. Tiaj sinkultivantoj manifestas darmon per ĉiu uzo de siaj ses sentorganoj kaj estas la modelo de ĉiuj generacioj.”
6. Sotesano petis de *Song Bjokĝo* interpreti la frazon en *La Doktrino de Mezeco*: “Sekvi la naturon nomiĝas la vojo.” Li klarigis: “En konfuceismo tio signifas konformiĝi al ĉiela volo.” Sotesano diris: “Nur konformiĝi al ĉiela volo estas en la etapo de bodisatvo kaj utiligi ĝin estas en tiu de budho. Kompardire lerta rajdisto bone utiligas ĉevalon ĉu mildan, ĉu sovaĝan. Ordinarily kaj vivulo tiriĝas de la sesvoja transmigrado kaj de la dek du

kaŭzoj-kondiĉoj<sup>127</sup>, sed budho trabatas naturan karmon kaj estas libera veni kaj iri, supreniĝi kaj malsupreniĝi.”

7. Iu disĉiplo demandis: “Ŝajnas, ke ankaŭ majstro *Ĝinmuk*<sup>128</sup> logiĝis de vino kaj virino. Ĉu tio estas vero?” Sotesano: “Mi aŭdis, ke li ŝatis vinon. Sed li iam prenis bovlon da sala akvo por vino kaj fortrinkis ĝin, tamen nenio malbona okazis al li. En alia tempo, kiam li estis sub persimonarbo, iu virino kun voluptemo venis kaj petis lin amuziĝi. Li volis akcepti ŝian peton, sed tiumomente defalis ruĝmatura persimono kaj li indiferente iris por ĝin preni. Ŝi hontis kaj mem retiriĝis. Kiel do en lia menso estus vino kaj virino? Tia homo estas budho, al kiu vino ne plu estas vino, virino ne plu virino.”

8. Sotesano diris: “Vivulo uzas menson, regate de plezuro, kolero, malĝojo kaj ĝojo, tial li multe damaĝas sin kaj aliulon. Bodisatvo uzas menson, transcendente ilin, tial li ne damaĝas sin kaj aliulon. Budho uzas menson, regante ilin kvazaŭ sklavon, tial li multe profitigas sin kaj aliulon.”

9. Sotesano diris: “Eĉ se homo atingas nur la gradon de diablovenka darmforto, lin rekonas kaj adoras unue ĉieluloj kaj demonoj. Sed se li volas kaŝi sian spuron, ĝin povas rekonu neniun krom tiu, kiu havas pli altan gradon de darmforto.”

10. Sotesano diris: “Kiam homo atingas la plej altan studgradon, li akiras la tri lertecojn. Unu estas spiritalerteco, per kiu sen vidi, aŭdi kaj pensi li klare scias la ŝanĝon de ĉiuj estaĵoj en la universo kaj la karman repagon de homo en la tri mondoj. La dua estas vojlertereco, per kiu li bone scias la grandon, malgrandon, eston kaj neeston de la universo kaj la juston, maljuston, profiton kaj malprofiton de homo. La tria estas darmlerteco, per kiu li rekonas la grandon, malgrandon, eston kaj neeston de la universo, klarigas la juston, maljuston, profiton kaj malprofiton de homo kaj elfaras darmon ekzemplan por dekmiloj da generacioj. El la tri lertecoj darmlertecon povas akiri nur tiu, kiu atingas grandan, perfektan kaj ĝustan iluminiĝon.”

11. Sotesano diris: “Ne estas pli granda mastrumaĵo ol tiu kuniĝinta kun ĉiela mastrumaĵo. Ne estas pli granda homo ol tiu kuniĝinta kun ĉiela spirito.”

12. Sotesano diris: “Kiu kaptas la universan veron kaj utiligas ĝin ĉe la uzo de la ses sentorganoj, tiu estas ĉielulo, sanktulo kaj budho.”

13. Sotesano diris: “Kvankam ĉielo kaj tero abundas je senlimaj principoj kaj potencoj, ili estas nenio alia ol malplena ŝelo, se homo ilian vojon ne rekonas kaj ne utiligas. Homo rekonas ilian vojon kaj utiligas ĝin kiel sian aparaton, tial homo nomiĝas la mastro de la universo kaj la reĝo de ĉiuj estaĵoj. Eĉ se homo ne povas fari ĉiujn universajn laborojn kaj ankaŭ la universo ĉiujn homajn laborojn, la universo uziĝas de homo en afero kaj principo. Tial la grandan povon de la tri mondoj disponas budhoj kaj bodisatvoj, kiuj perfekte iluminiĝas pri la grando, malgrando, esto kaj neesto de la universo kaj laŭvole utiligas ĉielan vojon. Estonte homa povo estos pli respektata ol ĉiela povo kaj ĉiuj homoj adoras la grandan povon de budhoj kaj bodisatvoj.”

14. Sotesano diris: “Vazo de vivuloj estas malgranda, tial ĝi facile superfluas per novaj aĵoj kaj scio aŭ malpeze ŝanceliĝas, tiel ke ili alportas al si eĉ vivdanĝeron. Sed tiu de budhoj kaj bodisatvoj estas senlima, tial ĝi nek pliiĝas kun esto, nek malpliiĝas sen esto kaj ĝia enhavo ne enrigardeblas, tiel ke ili perfekte gardas sian havaĵon kaj pace konservas sian vivon.”

15. Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnesio: “Ordinaruloj avidas nur homan plezuron, tial ilia plezuro ne daŭras longe. Sed budhoj kaj bodisatvoj ĝuas senforman ĉielan plezuron, tial ili povas ĝui ankaŭ homan plezuron. Ĉiela plezuro signifas mensan plezuron

<sup>127</sup> Dek du kaŭzoj -kondiĉoj 십이인연 十二因緣: *dvadashanga-pratitya-samutpada* (s.), nescio, impulso, konscio, nomo-formo, ses sentorganoj, kontakto, sento, deziro, preno, estiĝo, naskiĝo, kaj maljuniĝo-morto.

<sup>128</sup> *Ĝinmuk* 진묵 震默 (1562-1633): budhana pastro fama per drinkado kaj senobstakla ago.

per la vojo kaj homa plezuro signifas formhavan plezuron per la kvin mondaj deziroj. Facildire homa plezuro estas kontentiĝi per siaj edzino, infano, havaĵo, posteno, ajna objekto aŭ vivmedio. La kronprinco Sidarto range estis estonta reĝo kaj korpe estis super ĉiuj regatoj, tiel ke li povis plezuri ĉiamaniere. Tio estas homa plezuro. Male post sia ĝusta ilumiĝo li transcendis ĉiujn formhavaĵojn kaj vivmediojn, liberiĝis de naskiĝo kaj morto, feliĉo kaj sufero, bono kaj malbono, kaŭzo kaj efiko, tiel ke li ĉiam estis trankvila en ajna situacio. Tio estas ĉiela plezuro. Konfuceo diris: ‘Kvankam mi, manĝinte legomon kaj trinkinte akvon, kuŝas apogante la kapon sur la brako, mi ja plezuras per tio. Maljustaj riĉeco kaj rango estas por mi kiel flosanta nubo.’ Tio estas la vortoj de ĉielulo, kiu ĝuas ĉielan plezuron, havante eĉ homan korpon. Sed homa plezuro nepre havas sian finon kaj estas natura leĝo, ke veninto foriras, kreskinto velkas, naskiĝinto mortas. Eĉ la plej altaj riĉeco, rango kaj famo en la mondo ne havas la forton rezisti kontraŭ maljuniĝo, malsano kaj morto. Kiam do ĉi tiu korpo mortas, foriras kiel flosanta nubo la edzino, infano, posedaĵo kaj posteno, al kiuj homo verŝis ĉiajn penon kaj avidon. Sed ĉiela plezuro ankoraŭ estas senŝanĝa malgraŭ korpa aliformiĝo, ĉar homo ĝin ĝuas per senforma menso. Kompardire talentulo havas la saman talenton, kvankam li translokiĝas de ĉi tiu loĝejo en alian.”

**16.** Sotesano plu diris: “Tial iu pasinta sanktulo diris, ke tritaga mensostudo estas miljara trezoro, centjara avidaĵo estas unumatena polvo. Tamen ordinarulo ne scias ĉi tiun principon, tial li taksas nur sian korpon grava kaj neniam serĉas sian menson. Sinkultivanto scias ĉi tiun principon, tial li forgesas sian korpon por serĉi sian menson. Nu, vi ne alkroĉiĝu al ĉiu estaĵo vere vanta, sed strebu al ĉiela plezuro eterna. Se homo longe daŭrigas ĉielan plezuron, li fine akiras la liberon de korpo kaj menso, prenas la grandan potencon de la tri mondoj kaj transcendas la eston kaj neeston de ĉiu aĵo kaj la sesvojan transmigradon. Li do povas nur anime sen enkorpiĝo vojaĝi la dekdirektan mondon. Li laŭvole en- kaj eliras eĉ en besta kaj insekta mondoj kaj estas tute libera naskiĝi kaj morti, veni kaj iri. En kiu ajn mondo li enkorpiĝas, li eterne ĝuas plezuron sen infektiĝi de tiu mondo. Tio estas plejplezuro. Sed homo ofte ne povas longe teni ĉielan plezuron, ĉar vekiĝas lia deziro je forma plezuro. Se eĉ ĝuanto de ĉiela plezuro ekvolas nur plezuri sen fari laboron indan ricevi ĝin, li subite malviriĝas, perdas la liberon de korpo kaj menso, tiriĝas de la cirkulanta rado de la granda naturo kaj denove ne povas eviti la sesvojan transmigradon.”

**17.** Iu homo vizitis Sotesanon kaj dum diverstema interparolo diris kun granda envio: “Riĉuloj de la provinco *Ĝolado*<sup>129</sup> kune investis kapitalon al la fervojo kuranta inter *Iksan* kaj *Ĝongu*, tial ili ĉiam senpage veturas.” Sotesano diris: “Kiel malriĉa vi estas! Eĉ unu trajnon ankoraŭ vi ne posedas!” Li konfuzite diris: “Necesas granda monsumo por posedi trajnon. Kiel do mi senhavulo povas ĝin posedi?” Sotesano diris: “Tial mi diris, ke vi estas malriĉa. Eĉ se vi posedus ĝin, mi ne rigardus vin kiel riĉulon. Nu, aŭskultu pri mia mastrumaĵo. Mi de longe rigardas ne nur tiun trajnon de *Ĝongu*, sed ankaŭ ĉiujn enlandajn kaj enmondajn veturilojn kiel miajn. Ĉu vi ankoraŭ ne komprenas min?” Li pli konfuzite diris: “Via parolo estas instruo super mia kompreno, tial mi ne povas sondi ĝian signifon per mallarĝa rigardo.” Sotesano diris: “Por posedi trajnon homo bezonas grandan kapitalon en unu momento kaj rekte respondecas pri ĝia administrado, tiel ke li devas elporti multajn suferojn. Sed mia posedmaniero estas alia ol lia. Mi ne bezonas unumomente grandan kapitalon, nek rekte respondecas pri ĝia administrado. Mi pagas ioman koston nur tiam, kiam mi vojaĝas ien ajn per la trajno, kaj ĝin uzas laŭ mia volo. Ĉu mi ne tro malmulte salajras ĉiujn miajn laboristojn, kiuj veturigas mian trajnon tage-nokte, kiuj riparas mian fervojon, kaj kiuj prizorgas la tutan administradon? Antaŭ nelonge mi vojaĝis al Seulo kaj

---

<sup>129</sup> *Ĝolado* 전라도 全羅道: la sudokcidenta parto de Koreio.

vizitis parkon. Promenante tie, mi senlime enspiris freŝan aeron kaj ĝuis la plezuran etoson de la tuta parko. Neniu ordonis al mi eliri kaj ne plu veni tien. Homo ĉiujare bezonas multan monon por prizorgi eĉ sian ripozdometon, sed sen fari tion mi plene utiligis tiun agrablan parkon kiel mian. Ĝenerale homo volas proprigi al si ajnan aĵon por sia oportuneco. Mi ja tiel utiligis la trajnon kaj la parkon. Kies posedmaniero do estus pli bona ol mia? Tial mi diris, ke ĉi ĉio estas mia. Mi rigardas kiel mian ne nur tion, sed ankaŭ ĉion en la mondo kaj eĉ la tutan teron, kiu surhavas ĉi ĉion. Se mi ĝuste uzas tion laŭokaze, neniu malpermesas, nek malhelpas min. Kiel vasta estas mia mastrumaĵo! Sed sekularaj ordinaruloj kun limigita menso baraktas por registri ion ajn nepre en sia nomo kaj ili senprave rapidas akiri aĵojn penigajn, zorgigajn kaj pezrespondecajn. Tion kaŭzas, ke ili ankoraŭ ne trovis senlime grandan mastrumaĵon.”

**18.** Sotesano post vintra trejnsesio vojaĝis al la templo *Bongsosa*<sup>130</sup> kun kelkaj disĉiploj. Survoje iu disĉiplo vespire diris: “Estas lamentinde, ke ni akompanas Sotesanon piede pro monmanko.” Sotesano diris: “Se iu ajn homo naskiĝas en ĉi tiu mondo kaj bone uzas siajn ses sentorganojn, li konformiĝas al leĝo kaj el tio povas gajni monon. Tial korpo kaj menso estas mongajnilo. Ĉio en la mondo povas iĝi mono laŭ la uzo de homo. Kiel do nur lamenti pro monmanko? Sed ni sinkultivantoj ne alkroĉiĝu al mono, sed trankvile plibonigu vivon egale, ĉu ni havas monon aŭ ne. Tio estas nia devo kaj tia homo estas vere riĉa homo.”

**19.** Iu disĉiplo diris: “Nuntempe en Seulo okazas granda ekspozicio. Estos bone, se vi vizitos ĝin.” Sotesano diris: “Ekspozicio komparas la pasintecon kun la nuno, montras la progreson de ofico, terkultivo, metio kaj komerco kaj helpas homojn plisaĝiĝi per interŝanĝo de scioj. Se homo kun vera volo vizitas la ekspozicion, li povas multe profiti el ĝi. Tamen hodiaŭ mi prezentos al vi unu grandan ekspozicion. Bone aŭskultu min. Ĉi tiu ekspozicio estas tiel vasta kaj granda, ke la tuta universo estas ĝia ejo, ke en ĝi prezentiĝas ĉiuj estaĵoj en la mondo, kaj ke ĝi senĉese okazas tra miriadoj da jaroj. Kompare kun ĉi tiu ekspozicio, la seula ekspozicio estas malpli granda ol eĉ plumeto. La ekspozicio elmontras ĉiujn varojn, sed ĝi ne povas transloki kaj prezenti la monton *Besan*<sup>131</sup> kaj la lagon *Hüangdungho*<sup>132</sup>, kiujn ni nun vidas de ĉi tie, kaj la mondfaman monton *Gumgangsán*. En la muzeo estas diversaj antikvaĵoj, sed tie ne prezentiĝas montoj, riveroj kaj tero, kiuj estas la plej antikvaj. En la akvario estas kelkspecaj fiŝoj, sed ilia nombro ne atingas eĉ la miliardonon de la tuta kvinociana fiŝaro. En la grenejo estas kelkspecaj rizoj, sed ilia kvanto estas malpli granda ol unu sablero de alta monto, kompare kun la tuta seskontinenta rizaro. Ĉiuj prezentaĵoj en la ekspozicio troviĝas samproporcie kiel supre. Kiel do grandsaĝa kaj larĝvida homo ne sentus tiun artefaritan ekspozicion malvasta kaj malriĉa? Tial, kiu malkovras ĉi tiun senliman ekspozicion kaj ĉiam rigardas ĝin per tia grandanimeco, tiu senlime profitas el io ajn, kion li vidas kaj aŭdas. De antikva tempo ĉiuj budhoj, sanktuloj kaj saĝuloj vidas ĉi tiun senliman ekspozicion, sekvas ĉiujn ĉi-ekspozicie elmontratajn principojn de grandado, malgrandado, esto kaj neesto kaj traktas la juston, maljuston, profiton kaj malprofiton de homo. Tial ili neniom estas malriĉaj.”

**20.** Iun tagon Sotesano promenis al *Namĝungni*<sup>133</sup> kun *Ĝo Songgŭang* kaj *Ĝon Umgŭang*. Vidante kelkajn belajn pinojn, kiuj staris apudvoje, *Songgŭang* admire diris: “Ho, kiaj belaj pinoj estas ili! Estus bone transplanti ilin en nian templon.” Sotesano aŭdis kaj diris: “Kiel vi ankoraŭ ne povas transpasi mallarĝan penson kaj malgrandan lokon? La templo kaj la pinoj ne staras apartigite unu de la alia, tial ili ambaŭ troviĝas ene de nia barilo. Kiel do

<sup>130</sup> *Bongsosa* 봉서사 鳳棲寺: budhana templo.

<sup>131</sup> *Besan* 배산 盃山: monto en *Iksan*.

<sup>132</sup> *Hüangdungho* 황등호 黃登湖: lago proksime de *Iksan*.

<sup>133</sup> *Namĝungni* 남중리 南中里: urboparto de *Iksan*.

transplanti la pinojn? Tion kaŭzas, ke vi ankoraŭ ne transcendas diskriminacion kaj distancon kaj ne trovas la grandan hejmon de la universo.” *Songgŭang* demandis: “Kie do ĝi estas?” Sotesano respondis: “Vi ne rekonas ĝin, kiu ja estas antaŭ viaj okuloj, tial mi nun montras ĝian figuron.” Sotesano desegnis unu cirklon surtere kaj diris: “Ĉi tio estas la granda hejmo de la universo, kiu enhavas ĉiujn okultajn principojn, sennombrajn trezorojn kaj senegalajn povojn.” *Umgŭang* demandis: “Kiel oni povas eniri en tiun hejmon kaj mastri ĝin?” Sotesano respondis: “Nur per la ŝlosilo de la tri grandaj fortoj, kiun oni povas elfari per kredo, sinkuraĝigo, scivolo kaj penado.”

**21.** Iu pastoro vizitis kaj Sotesano demandis: “Kion mi povas fari por vi?” Li respondis: “Mi venis aŭskulti vian utilan instruon.” Sotesano demandis: “Ĉu vi vidis vastan mondon, translimante vian kristanisman?” Li demande respondis: “Kie troviĝas tiu vasta mondo?” Sotesano diris: “Vi trovas ĝin, se vi translokas menson kaj havas larĝan rigardon. Homo kun mallarĝa rigardo ĉiam obstinas nur en sia laboro kaj kutimas je sia moro, tiel ke li kritikis aliulan laboron kaj malakceptas aliulan moron. Tial li limiĝas je siaj regulo kaj kutimo, enfalas en unu flankon kaj inter si kaj aliulo faras distancon fortikan kiel arĝenta monto kaj fera muro. Tiel same okazas konflikto kaj batalo inter ŝtatoj, inter religioj kaj inter individuoj. Kiel do dispartigi origine perfektan kaj grandan hejmon kaj dispecigi senliman kaj grandan instruon? Ni devas rapide disrompi la distancon, harmonie rilati al ĉiuj hejmoj kaj disvastigi perfektan, viglan kaj novan vivon. Tiam nenio en la mondo estas forĵetinda.”

**22.** Sotesano plu diris: “Se homo povas laŭokaze uzi ion ajn ĉu valoran, ĉu senvaloran en ĝusta loko, ĉu estaĵo en la universo estas mia uzaĵo kaj ĉu instruo estas mia protektanto. Ekzemple en bazaro troviĝas multaj varoj kaj valoraj kaj senvaloraj. Oni ne prenas nur valorajn varojn, nek forĵetas ĉiujn senvalorajn varojn. Povas okazi, ke ne utilas eĉ la plej valora varo, dum utilas eĉ la plej senvalora varo. Juvelo estas valorega, sed bovlo da rizo estas pli valora por plenigi malsatan stomakon. Lesivo estas venena, sed ĝi estas necesaĵo por lavi vestaĵon. Tiel same ĉiu objekto havas sian karakteron kaj sian uziĝejon. Kiel mallarĝamensa kaj stulta estas tiu, kiu, ne komprenante ĉi tiun principon, pensas nur unuflanke, ke senvalora estas ĉiu varo en bazaro krom tio necesa por lia uzo!” La pastoro kortuŝite diris: “Kiel grandanima vi estas!”

**23.** Sotesano diris: “Budhoj kaj bodisatvoj prenas ĉi tiun mondon jen kiel ripozejon, jen kiel laborejon, jen kiel amuzejon.”



## Animsavo

1. Sotesano diris: “Ordinaruloj rigardas grava nur vivon en la nuna mondo, sed prudentuloj rigardas ankaŭ morton grava, ĉar ili scias, ke bonmortanto povas bone naskiĝi kaj vivi kaj reciproke, kaj ĉar ili scias, ke naskiĝo kaj morto bazas unu la alian. Ne estas difinita tempo por solvi ĉi tiun problemon, sed homo preparu sian mortvalizon almenaŭ ekde la aĝo de kvardek jaroj. Tiam li ne rapidos ĉe la morto.”

2. Sotesano diris: “Iu ajn naskiĝinto en la mondo atingas sian morton. Hodiaŭ mi diros, kion vi faru por helpi mortanton animforiri kiel lia proksimulo, kaj kion vi faru kiel animforiranto. Atente aŭskultu min. Malfacilas sekvi mian tutan instrukcion, kiam homo subite mortas de akuta malsano aŭ ia akcidento, aŭ kiam mortanto estas tro nekredema por sekvi la gvidon. Se morto ne estas subita, aŭ se mortanto havas eĉ ioman kredon, sekvi mian instrukcion multe helpos mortanton plifirmigi la lastmomentan menson kaj savi la animon. Unue vi kiel proksimulo de mortmalsanulo bruligu incenson de tempo al tempo en la malsanĉambro kaj purigu ĝin. Alie lia menso malpurigos. Due ĉiam kvietigu lian ĉirkaŭon. Alie li ne povos koncentri sian menson. Trie multe rakontu al li pri bonuloj kaj konsolu lin laŭdante liajn bonfarojn. Tiam tiu bona penso impresos lin kaj facile fariĝos lia denaska kutimo en la sekva vivo. Kvare al li ne diru malbonajn kaj flatajn vortojn, nek malĉastajn kaj diboĉajn rakontojn. Alie tiu malbona aspekto impresos lin kaj facile fariĝos lia denaska kutimo en la sekva vivo. Kvine al li ne diru korinklinajn vortojn, nek montru malĝojan mienon, zorgante la familian havaĵon aŭ la parencaron. Alie tio alkatenos lin al amo kaj avido kaj malhelpos lian animon forlasi la lokon eterne. Se tie la animo ne havos la ŝancon reenkarniĝi kiel homo, ĝi facile enfalos en malbonan vojon. Sese al li laŭokaze ĉantu budhan nomon, legu sutron kaj prediku, aŭ meditu, se li ne volas aŭskulti voĉon. Tiam lia menso apogos sin sur tio kaj povos trankviliĝi. Sepe ĉe lia lasta spiro neniel bruu plorante, skuante lian korpon aŭ vokante lian nomon. Tio nur konfuzos la menson de la foriranto. Se vi ne povas subpremi malĝojon, esploru kelkajn horojn post lia morto.”

3. Sotesano plu diris: “Se vi kiel mortmalsanulo mem eksentas proksimiĝon al la morto, forlasu ĉiajn pensojn kaj nur kolektu vian menson. Se necesas fari vian testamenton, anticipe traktu tion por ne malhelpi vian koncentriĝon. Por vi nenio pli grava estas ol koncentriĝo. Se vi pensas, ke vi kutime havas venĝemon aŭ malamikecon al iu homo, invitu lin por repaciĝi. Se li ne povas veni, eĉ vi sola ĉiapene estingu vian venĝemon. Alie ĝi fariĝos la semo de malbona karmo en la sekva vivo. Se vi pensas, ke vi kutime korinklinas al iu ajn, ĉiapene ĝin forigu. Alie vi ne atingos veran nirvanon kaj la korinklino kaŭzos vian senfinan transmigradon en malbona vojo. Kiam vi atingas la lastan momenton sekvante ĉi ĉiujn punktojn, forgesu ĉiajn pensojn per pli pura menso kaj lasu vian animon foriri per medito aŭ budhonoma ĉantado. Tiam, eĉ kiu ne komplete scias la veron de naskiĝo kaj morto, tiu povos eviti malbonan vojon kaj aliri bonan vojon. Tamen ĉi tiun instrukcion devas sekvi ne nur homo ĉe la morto, sed ankaŭ homo, kiu kutime havas firman kredon kaj trejniĝon, por antaŭprepari la lastan vivaferon. Al homo sen kredo kaj trejniĝo malfacilas sekvi ĝin subite. Vi do anticipe komprenu ĉi tiun signifon kaj ne pentu en la lasta momento, ĉiam memoru ĉi ĉiujn punktojn kaj liberigu vin de la veno kaj iro de la animo. La afero de naskiĝo kaj morto estas granda kaj neniel neglektebla.”

4. Sotesano recitigis al *Song Song-ŭon*<sup>134</sup> kaj *I Gongĝu* sian versaĵon, kiu fariĝis animsava

<sup>134</sup> *Song Songŭon* 成聖願 (1905-1984): ŭonbulana alnomo *Ĝongtaŭon*, laiko.

preĝvorto<sup>135</sup>:

*“La animo vivas ĉiame,  
kaj elstaras ĝi nirvane.  
Eternfloras ĝi post scio,  
ĉiupaŝe sutras ĉio.”*

**5.** Sotesano verkis la jenan animsavan predikon antaŭ kaj post morto: “*Amuja*<sup>136</sup>, rekonsciiĝu kaj bone aŭskultu mian vorton. Kion vi ricevis en ĉi tiu mondo, tion bonan kaj malbonan vi faris en la pasinta mondo. Kion vi faras en ĉi tiu mondo, tion ankaŭ vi denove ricevos en la estonta mondo. Ja ĉi tio estas karmo natura. Budho kaj patriarko iluminiĝis pri memnatura kaj akiris mensliberon, tial ili tratabas ĉi tiun naturan karmon kaj laŭvole ĝuas la ses vojojn kaj la kvar naskulojn. Sed ordinarulo kaj vivulo ne iluminiĝis, nek mensliberiĝis, tial ili alkroĉiĝas al ĉi tiu natura karmo kaj travivas senliman suferon. Ĉu vi estas budho, patriarko, ordinarulo aŭ vivulo, ĉu vi estas nobela aŭ malnobela, kaj ĉu vi vivas longe aŭ mallonge – ĉi ĉion vi faras. *Amuja*, ĉu vi nun klare scias, ke ĉion vi mem faras? *Amuja*, aŭskultu plu min. Budho, vi kaj ĉiuj vivuloj havas la egalan principon de naskiĝo kaj morto kaj la egalan naturon, kiu estas pura kaj perfekta. La naturo estas kiel la luno en la ĉielo. Sola en la ĉielo estas la vera luno, sed ĝi speguliĝas en miloj da riveroj. Tiel same ĉiuj estaĵoj en la universo originas el la pura naturo, kiu ne havas nomon, nek formon, nek venon kaj iron, nek naskiĝon kaj morton, nek budhon kaj malbudhon, nek vantecon kaj neniecon, nek eĉ la vorton ‘ne havas’. Ĝi estas nek esto, nek neesto, sed el ĝi spontane naskiĝas esto, tiel ke la universo ŝanĝiĝas en formiĝon, daŭradon, detruigiĝon kaj malplenon, ĉiuj vivuloj ŝanĝiĝas en la ses vojojn kaj la kvar naskulojn tra naskiĝo, maljuniĝo, malsano kaj morto, la suno kaj la luno alterne ŝanĝas tagon kaj nokton. Tiel same via korpo naskiĝas kaj mortas. Tio ankaŭ estas nur ŝanĝo, sed ne naskiĝo kaj morto. *Amuja*, ĉu vi min ankoraŭ aŭskultas? Ĉu vi nun konvinkiĝas pri la stato de ĉi tiu naturo? Aŭskultu min plu. Kiam vi nun demetas ĉi tiun korpon kaj ricevas novan korpon, vi reenarkiĝas laŭ viaj kutima ĝuo kaj forta korinklino. Se la mondo de budho kaj bodisatvo regas en via ĝuo, vi reenarkiĝos en ilia mondo kaj ricevos senliman plezuron. Male, se avido, kolero kaj malsaĝo regas, vi reenarkiĝos en tia mondo kaj ricevos sennombrajn suferojn tra senlima eono. *Amuja*, ĉu vi min ankoraŭ aŭskultas? Denove aŭskultu min. Renkonte al ĉi tiu momento plifirmigu vian menson. Se vi ne forlasas eĉ la plej malgrandajn korinklinon kaj avidon, vi enfalos en malbonan vojon. Se vi unufoje enfalas en malbonan vojon, kiam do vi povos reenarkiĝi kiel homo, membriĝi al la eklezio de sanktulo kaj saĝulo, plenumi grandan laboron kaj akiri senlimajn saĝon kaj feliĉon? *Amuja*, ĉu vi min aŭskultas?”

**6.** Kiam Sotesano vidis la reklamajon de fajrasekura kompanio en seula ekspozicio, venis al li unu ideo kaj li diris: “Ni ĉiam diras, ke ni liberiĝu de naskiĝo kaj morto, plezuro kaj sufero, sed ni ne povas bone liberiĝi de ili sen scii la principon de naskiĝo kaj morto. Se homo pensas, ke ne estas la principo de renaskiĝo, kiel bedaŭrinda kaj malĝojiga por li estas morto! Tio estas kiel nefajrasekurato perdas la tutan havaĵon unumomente pro subita fajro. Sed al sciinto de la principo naskiĝo kaj morto de ĉi tiu korpo estas nenio alia ol surmeti kaj demeti veston. Kvankam ŝanĝiĝanta korpo nun mortas, senŝanĝa kaj klarbrila spirito eterne ne malaperas kaj denove ricevas alian korpon. Tial tiu spirito garantias al homo eternan

---

<sup>135</sup> Animsava preĝvorto 성주 聖呪: Sotesano donis al *Song Songŭon* la unuajn du versojn kaj al *I Gongĝu* la postajn du versojn. Jen estas la originala teksto.

*Jongĉon jongĝi jongbo ĝangseng,  
manse mjoldo sangdogno;  
gore gaktu mugunghŭa,  
bobo ilĉe desonggjong.*

<sup>136</sup> *Amuja* (k.) 아무야: vokativa esprimo, kiun anstataŭas persona nomo de mortinto.

vivon, kiel tiu asekura atesto povas konstruigi novan domon. Do scianto de ĉi tiu principo ĉiam estas trankvila pri naskiĝo kaj morto, dum nescianto maltrankviliĝas kaj agas senprudente. Scianto de la principo de plezuro kaj sufero preparas senfinan plezuron per pravaj plezuro kaj sufero, dum nescianto nek esperas, nek preparas ĝin kaj neniam saviĝas el vasta sufermaro. Kiel do tio ne vekus zorgon kaj kompaton ĉe prudentulo?”

7. Sotesano diris: “Multas vojoj sekvendaj por homo, sed se ilin resumi, ili ne dekliniĝas de la vojo de naskiĝo kaj morto. Kiu dumvive ne scias la vojon de naskiĝo, tiu ne povas montri la valoron de vivo. Kiu ĉemorte ne scias la vojon de morto, tiu ne povas facile eviti malbonan vojon.”

8. Sotesano diris: “Por homo naskiĝi kaj morti estas kiel malfermi kaj fermi okulon, enspiri kaj elspiri, endormiĝi kaj vekigi. Kvankam ili diferencas per tempa longo, la principo estas egala. Origine naskiĝo kaj morto ne estas du, nek ekzistas. Iluminiĝinto rigardas ilin kiel ŝanĝojn, dum neiluminiĝinto nomas ilin naskiĝo kaj morto.”

9. Sotesano diris: “Tiu suno hodiaŭ subiras okcidente, tamen ĝi morgaŭ denove leviĝos oriente. Tiel same ĉiuj vivuloj mortas en ĉi tiu mondo, tamen ilia foriranta spirito denove aperos kun nova korpo en ĉi tiu mondo.”

10. Sotesano diris: “Oni nomas ĉi tiu mondo la mondon, kie oni vivas, kaj tiu mondo la mondon, kien oni iras post la morto. Oni do pensas, ke ĉi tiu mondo estas alia ol tiu mondo, sed nur la korpo kaj loko ŝanĝiĝas kaj alia mondo ne ekzistas aparte.”

11. Sotesano diris: “Kiam homa spirito elkorpiĝas, ĝi unue sekvas sian korinklinon kaj poste sian karmon, tiel ke ĝi eterne transmigradas en la senlima mondo. La nura maniero liberiĝi de la transmigrado estas forigi korinklinon kaj transcendi karmon.”

12. *Ĝong Ilsong*<sup>137</sup> demandis: “Kiel teni la lastan penson ĉe la fino de mia vivo?” Sotesano respondis: “Restu en perfekta penso.” Li denove demandis: “Kiel okazas renaskiĝo post morto?” Sotesano respondis: “Tio estas kiel vekigo el via dormo. Kiam vi dormas sen distingo, *Ilsong* ŝajnas foririnta ien. Sed vekiginte, vi ree trovas la saman *Ilsong*. Kien ajn vi iras, unu objekto nomata *Ilsong* senfine renaskiĝas kaj remortas laŭ sia karmo.”

13. Iu disĉiplo demandis: “Ĉu vi povas sciigi al mi la proceson kaj staton, kiam la animo forlasas ĉi tiun korpon kaj ricevas novan korpon?” Sotesano respondis: “Ĝenerale la animo apartiĝas de ĉi tiu korpo post la lasta spiro, sed iu animo povas pli frue forlasi la korpon. La elkorpiĝinta animo ŝvebas en la aero kutime ĉirkaŭ kvardek naŭ tagojn antaŭ ol enuteriĝi, sed iu animo povas enuteriĝi tuj post la elkorpiĝo, aŭ post kelkmonata aŭ kelkjara vagado en la aero kiel vento. Ĝenerale la animo ĉirkaŭvagas ĝis nova enkorpiĝo, konsciante ke ĝi ankoraŭ havas sian malnovan korpon kiel en sonĝo. Kiam la animo enuteriĝas, ĝia antaŭa konscio malaperas kaj ĝi rigardas la enuteriĝintan korpon kiel propran.”

14. Iu disĉiplo demandis: “Mi ankoraŭ ne povis solvi la problemon de naskiĝo kaj morto, tial mi sentas mian vivon efemera kaj por mi ĉio en la mondo aspektas nur vanta. Kiel mi faru?” Sotesano respondis: “Iu malnova skribo diras, ke el la vidpunkto de ŝanĝo ankaŭ ĉielo kaj tero ne restas senŝanĝaj eĉ momenton, dum el tiu de senŝanĝo ĉiuj estaĵoj inkluzive min mem neniam ĉesas. Multe studu ĉi tiun signifon.”

15. Sotesano diris: “Ĉiuj sentpovuloj kaj nesentpovuloj en la mondo havas vivelementon. Estas neniu, kiu absolute malaperas, sed ili daŭras nur ŝanĝante sian formon. Ekzemple homa kadavro putras subtere kaj fekundigas la teron, ĉirkaŭ kiu kreskas abundaj herboj. Homo faras sterkon el la herboj kaj la sterko donas riĉan rikolton de greno. Homo manĝas la grenon, el kiu fariĝas sango kaj karno, tiel ke li konservas sian vivon kaj aktivas. El ĉi tiu vidpunkto ĉiuj estaĵoj en la universo eterne ne malaperas morte. Eĉ tiu pajlero elmontras sian kapablon ŝanĝiĝi en miriadojn da formoj. Tial studu profunde ĉi tiun principon kaj

---

<sup>137</sup> *Ĝong Ilsong* 정일성 鄭一成 (1879-1941): ŭonbulano, pastro.

iluminiĝu pri tio, ke ĉiuj estaĵoj en la universo ĝuas senfinan vivon en la vero de eterno.”

**16.** Sotesano diris al homoj en novjara ceremonio: “Nek hieraŭ, nek hodiaŭ estas aparta tago, sed oni nomas la ĝishieraŭan jaron la lasta jaro kaj la dehodiaŭan jaron ĉi tiu jaro. Tiel same la animo estas tute identa, ĉu oni vivas, ĉu oni mortis, sed oni nomas tiu mondo la mondon de mortinto kaj ĉi tiu mondo la mondon de vivanto. La korpo konsistanta el tero, akvo, fajro kaj vento mortas kaj naskiĝas, tiel ke estas ĉi tiu mondo kaj tiu mondo. Sed la animo estas eterne senmorta, tiel ke ne estas naskiĝo kaj morto. Tial por scianto de ĉi tiu vero la naskiĝo, maljuniĝo, malsano kaj morto de homo estas kiel la rotacio de la kvar sezonoj de printempo, somero, aŭtuno kaj vintro, kaj tiu mondo kaj ĉi tiu mondo estas kiel la lasta jaro kaj ĉi tiu jaro.”

**17.** Sotesano diris: “Kvankam homo gajnis multajn havaĵojn dum la tuta vivo, li neniel povas kunporti eĉ unu el ili ĉe la morto. Kiel do oni povas rigardi nekunporteblan havaĵon kiel eternan siaĵon? Se vi volas havi vian eternan posedaĵon, ĉiamaniere dum via vivo multe bonfaru al aliuloj sen pensi vian bonfaron kaj akumulu neelĉerpeblan meriton. Via vera eterna posedaĵo estas voto al ĝusta darmo kaj la mensforto praktiki ĝin. Senĉese strebu al la voto kaj mensostudo, kaj vi fariĝos la mastro de saĝo kaj feliĉo en la senlima mondo.

**18.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Ĉu vi scias pri la mondo de mortinto kaj ĝia sendito? La mondo nenie estas krom ene de la ĉirkaŭbarilo de via domo. La sendito estas neniu alia ol via familio. Jen estas la kialo. Ordinarulo havas fortan korinklinon al sia familio ĉi-monda, tial lia animo postmorte apenaŭ povas leviĝi foren kaj denove enfalas en sian domon. Se la animo ne havas la ŝancon reenkarniĝi kiel homo, ĝi povas reenkarniĝi kiel besto aŭ insekto de la domo. De antikva tempo do ĉiuj budhoj kaj patriarkoj konsilas, ke oni foriru kaj agu sen korinklino. Ĉar nur tiam oni povas eviti enfali en malbonan vojon.”

**19.** Sotesano diris: “Homo ĉiutage klopodu ne havi alkroĉiĝon. Kiu multe alkroĉiĝas al havaĵo, sekso, famo, profito, familio, vesto, manĝo kaj loĝejo, tiu multoble pli suferas kaj maltrankviliĝas, kiam li perdas ilin. Tio estas infera vivo en la realo kaj tia homo ankaŭ ĉe la morto ne povas liberiĝi pro sia alkroĉiĝo kaj enfalas en pekmaron. Kiel do ne atenti tion?”

**20.** Sotesano diris: “El la nunuloj foje estas tia homo, kiu anticipu elektas bonan lokon por sia tombo kaj firme pensas enteriĝi tie. Tuj post la morto lia spirito rekte kuros al tiu loko. Se ĝi ne havos la ŝancon reenkarniĝi kiel homo ĉirkaŭ la loko, ĝi nekonscie enfalos en malbonan vojon kaj al ĝi malfacilos denove homiĝi. Kiel do ne atenti tion?”

**21.** Iu disĉiplo malobeis ordonon de Sotesano kaj volis agi laŭ sia obstino. Sotesano admonis: “Se vi obstinas en tia bagatela afero, vi povos ankaŭ en grava. Tiuokaze vi faros ĉiun aferon laŭ via opinio kaj fine estos super miaj savo kaj animsavo. Tiam mi eĉ volos savi vin, sed tio ne eblos.”

**22.** Sotesano diris al la partoprenantoj de trejnsesio: “Se vi, forrifuzante ĉiujn mondajn korinklinojn kaj dezirojn, purigas vian menson kaj akiras la forton koncentriĝi per ĉiutaga aŭskulto de prediko, vi animsavas ne nur vin, sed ankaŭ nerimarkate eĉ mikrobojn kaj insektojn ĉirkaŭ vi per via darmforto, kiu movas la malplenan darmmondon. Kompardire la suno indiferente radias al neĝo kaj glacio sen degeligi ilin, sed ili nature degelas. Tiel same de la darmforto de iluminiĝinto, kiu ne havas malvirtan menson kaj vanan penson, nerimarkate degelas la karma obstaklo de ordinarulo kaj vivulo.”

**23.** Sotesano diris: “El la homoj estas ĉielano kaj terano. Ĉielano estas tia homo, kiu ĉiam havas indiferentecon por deziro kaj noblan penson, tiel ke lia pura energio supreniĝas. Terano estas tia homo, kiu ĉiam havas abundan deziron kaj malnoblan penson, tiel ke lia malpura energio malsupreniĝas. Tio estas vojkruciĝo al bona vojo kaj al malbona vojo. Se iu ajn ekzamenas sian menson, li povas ekscii, al kia homo li apartenas, kaj kio li fariĝos

estonte.”

**24.** Sotesano diris: “Nur kiam foriĝas nigra nubo en la ĉielo, la luno aperas kaj prilumas ĉiujn estaĵojn. Tiel same, nur kiam foriĝas nubo de deziro en la menso de sinkultivanto, la luno de saĝo leviĝas kaj fariĝas spegulo prilumanta ĉiujn vivulojn, kaj li fariĝas granda majstro, kiu animsavas vivulojn en malbona vojo.”

**25.** Sotesano diris: “Iun matenon mi en *Jonggŭang* rigardis al la monto *Bjonsan* en *Buan*<sup>138</sup> kaj trovis tie puran energion ĉirkaŭŝvebanta la ĉielan mezon. Poste mi vizitis tiun lokon kaj sciiĝis, ke amaso da sinkultivantoj ekmeditadis en la templo *Ŭolmjongam*. Sendube, se homo kolektas sian menson kaj purigas sian koron, malpura kaj malklara energio poiome malsupreniĝas, dum okulta kaj pura energio leviĝas al la plej alta ĉielo, tiel ke la tri mondoj en la dek direktoj eniĝas en lian klaran energion kaj la kvar naskuloj en la ses vojoj, ĉirkaŭite de lia pura darmforto, ricevas savon kaj animsavon.”

**26.** Sotesano ĉeestis iun vesperkunvenon kaj diris, alrigardante ĉiujn homojn unu post la alia sub la lampo: “Vi diferencas per energia leviĝo. El vi estas homo, kiu havas ĉiun malpuran energion sinkintan pro multa spirita kultivo kaj nur tute puran energion leviĝantan. Estas homo, kiu havas multan puran energion kaj malmultan malpuran energion. Estas homo, kiu duone havas puran energion kaj duone malpuran energion. Estas homo, kiu havas multan malpuran energion kaj malmultan puran energion. Estas homo, kiu havas nur tute malpuran energion.” Li aldiris: “Ju pli multe avida estas homo, des pli malpura estas lia energio, tiel ke ĝi ne povas altenleviĝi. Tia homo postmorte ne povas reenkarneki kiel homo kaj fariĝas besto aŭ insekto. Se homo, kvankam ne tiel avida, neglektas spiritan kultivon kaj bonfaradon kaj dekliniĝas nur al scio, lia energio malpeze leviĝas, sed ne havas pezon, tiel ke li fariĝas demono aŭ birdo. Tial se sinkultivanto luminiĝas pri menso, kultivas puran menson kaj faras ĝustan agon distingante juston de maljusto, li fine formas la spiritan subabdomenon<sup>139</sup> kaj laŭvole enkarniĝas sen tiriĝi de la sesvoja rado kaj povas absorbiĝi nur en spirita kultivo vojaĝante sen enkarniĝo la malplenan darmmondon nur kun la spirita subabdomeno.”

**27.** Sotesano diris: “Tutforte ĉiam igu la mensgrundon nek maltrankvila, nek malsaĝa, nek maljusta, kaj el tio naskiĝos la povo animsavi eĉ eninferan vivulon. Eĉ nur unufoje rilatigi iun al la ĝusta darmo de budho fariĝas bona semo de budhiĝo tra eterna eono.”

**28.** Kiam *Gim Gŭangson* forpasis, Sotesano kun larmoj diris al homoj: “Mi havas nepriskribeblan intimecon kun *Palsan*<sup>140</sup>, dividante ĉiajn feliĉojn kaj suferojn kun li dum pli ol dudek jaroj. Ne estas en la darmkorpo naskiĝo, morto, prospero kaj kadukiĝo, sed kiel do mi ne bedaŭrus, ke ne eblas plu vidi lian vizaĝon de la ŝanĝkorpo. Por la animo de *Palsan* nun mi predikos pri la naskiĝo kaj morto, veno kaj iro kaj pri la estingo de karma repago. Des pli bone aŭskultu ĉi tiun predikon por konsoli lin. Se vi luminiĝos ĉe miaj vortoj, tio utilos ne nur al vi, sed ankaŭ al li. Ŝakjamunio diris, ke se homo sekvas la grandan vojon, kiu ne havas naskiĝon kaj morton, venon kaj iron, estingiĝas multviva karma repago. Jen estas la maniero estingi karman repagon. Se iu kaŭzas al vi suferon kaj malprofiton, ne plendu lin korfunde, nek malamam lin, sed rigardu tion kiel vian malsuldiĝon kaj estu paca kaj ankaŭ ne kontraŭu lin. Se vi forrifuzas vian vicon por repagi, ja ĉesas tiu sinsekva repago. Krome komprenu la staton sen naskiĝo kaj morto, sufero kaj plezuro kaj tenu vian menson ĉiam en la stato. Tie estas nek naskiĝo kaj morto, nek karma repago. Se vi atingas ĉi tiun staton, komplete estingiĝas naskiĝo kaj morto kaj karma repago.”

**29.** *Bak Ĝebong*<sup>141</sup> demandis: “Kian utilon donas al la animo de mortinto kvardeknaŭtaga

<sup>138</sup> *Buan* 부안 扶安: okcidenta regiono de la provinco *Ĝonbuk*.

<sup>139</sup> Spirita subabdomeno 영단 靈丹: mensa subabdomeno, okulta mensforto akirita per spirita kultivo.

<sup>140</sup> *Palsan* 팔산 八山: ŭonbulana alnomo de *Gim Gŭangson*.

<sup>141</sup> *Bak Ĝebong* 박제봉 朴濟峯 (1888-1957): ŭonbulana alnomo *Ĝesan*, pastro.

animsava ceremonio aŭ mortmemora ceremonio?” Sotesano respondis: “En la universo estas la principo de okulta reciproka respondo. Se homo semas grenon en grundo kaj donas sterkon, tio faras diferencon en la rikolto, kvankam grundo, greno kaj sterko estas sensentaj. Eĉ sensenta greno tiel respondas, des pli kiel do ne respondus al sincera penado homo, la plej inteligenta estulo? Se por la animo de mortinto ĉiuj homoj tutkore faras preĝon, esprimas bondeziron, ofertas monon kaj invitas pastron prediki, iliaj koroj interkomunikiĝas kaj iliaj energioj respondas unu la alian. Sekve li povas tuj animsaviĝi. Eĉ se li enfalis en malbonan vojon, li povas progresi iom post iom. Eĉ se li havis multajn ŝuldojn en sia vivo, li povas kvitiĝi per la ofermono uzita je lia nomo por publika laboro. Se li ne havis ŝuldon, nevideble akumuligis meritojn. Alivorte la principo de ĉi tiu reciproka respondo estas kiel tiu de elektra.”

**30.** Iu disĉiplo demandis: “De antikva tempo, por la animo de mortinto liaj gefiloj, parencoj kaj amikoj ofertas monon al budhofiguro aŭ invitas pastron prediki kaj reciti sutrojn. Kian efikon naskas tio, kaj kiel diferencas la efiko laŭ la gradoj de penado kaj de darmforto?” Sotesano respondis: “Oni esprimas sian penadon per preĝo kaj ofero por la animo de mortinto. La pleja penado movas ĉielon, tial preĝo efikas laŭpene kaj ankaŭ prediko kaj recitado influas la animon laŭ pastra darmforto. Rezulte estas la animo, kiu puniĝas pro ĉiuj siaj pasintaj malbonoj kaj poste revenas sen sciigo al bona vojo. Estas la animo, kiu liberiĝas de ĉiuj karmaj obstakloj kaj tuj revenas al bona vojo. Estas la animo, kiu vagserĉas la vojon de sia enkarniĝo en la malluma aero kaj denove ĝin trovas. Estas la animo, kiu forlasas momentan alkroĉiĝon, libere venas al la mondo de ĉielo aŭ homo kaj ĝuas feliĉon kaj plezuron. Sed se malgranda estas gefila penado kaj mankas pastra darmforto, tio ne aparte efikas sur la animradikon, ĉar sen la pleja penado ne aperas vera potenco. Kompardire tio estas kiel terkultivisto havas malriĉan rikolton, se li ne enverŝas ĉiujn siajn penadojn kaj povojn por kultivi kampon.”

**31.** *So Deŭon* demandis: “Ĉu savata animo povas kompreni la animsavan predikon?” Sotesano respondis: “Estas jen la animo, kiu komprenas, jen la animo, kiu ne komprenas. Sed la animsavon nerimarkate kaŭzas penado enverŝita al la animo prefere al tio, ke la animo komprenas la predikon kaj atingas iluminiĝon. Muŝo ne povas propraforte flugi kvarcent kilometrojn, sed ĝi povas nekonscie vojaĝi la distancon, se ĝi fiksas sin sur ĉevalo, kiu kuras la distancon. Tiel same la animo povas poiome veni al la mondo de budho danke al la prediko.”

**32.** *Gim Deĝo* demandis: “Hodiaŭ mi faris kvardeknaŭtagan animsavan ceremonion por dujara bebo. Eĉ al plenkreskulo malfacilas kompreni la tutan ceremonion kaj animsaviĝi. Kiel tiu nematura animo komprenas ĝin kaj animsaviĝas?” Sotesano respondis: “Animo ne diferencas per aĝo. Animsavo estas kiel sterkado al planto kaj najla tiriĝo al magneto. Ĉiu animalo enbatas sian animradikon en la malplenan darmmondon kaj vivas, tial vera faro de animsava ceremonio tra la malplena darmmondo iĝas sterko por la animradiko kaj faras efikon.”

**33.** *Deĝo* denove demandis: “Ĉu per tiu ceremonio unumomente estingiĝas ĉiuj pekoj pezaj kaj malpezaj kaj saviĝas la animo?” Sotesano respondis: “Laŭ la pezo de persona peko, la penado de ceremoniano kaj la darmforto de pastro, ĉiuj pekoj povas degeli unumomente, kiel glacio degelas de la suno, aŭ tio bezonas longan tempon. Sed faro de la ceremonio neniel vaniĝas kaj nepre alligas la animon al bona rilato.”

**34.** *Deĝo* denove demandis: “Kial dum kvardek naŭ tagoj oni faras animsavan ceremonion?” Sotesano respondis: “Kiam homo mortas, ĝenerale la animo ŝvebas en la aero pli-malpli dum kvardek naŭ tagoj kaj poste enkorpiĝas laŭ sia karma kondiĉo, tial laŭ la vortoj de Ŝakjamunio ni tiel difinas la daŭron por ankoraŭ foje igi la animon pura kaj koncentrita kaj deziras animsavon. Sed multas animoj, kiuj tuj postmorte enkorpiĝas laŭ sia

alkroĉiĝo.”

**35.** *Dego* denove demandis: “En la sutro *Nirvano*<sup>142</sup> Ŝakjamunio diras, ke se vi volas scii vian antaŭan vivon, vidu tion, kion vi ricevas en ĉi tiu vivo; se vi volas antaŭscii vian sekvan vivon, vidu tion, kion vi faras en ĉi tiu vivo. Tamen ni trovas, ke homo, kiu estas punenda pro sia malbonkoreco, ĝuas plezurajn vivon en riĉa familio, dum homo, kiu estas feliĉenda pro sia bonkoreco, suferas mizeran vivon en malriĉa familio. Kiel do ni povas diri, ke la vero de kaŭzo kaj efiko estas preciza?” Sotesano respondis: “Tial ĉiuj budhoj kaj patriarkoj atentigis al homoj teni puran penson ĉe la lasta spiro. Kiu malbonkora ĝuas riĉecon kaj rangon en ĉi tiu vivo, tiu estas homo, kiu faris bonojn en la junaĝo de la antaŭa vivo, sed malvirtigiĝis en la maljunaĝo pensante bonfarindaĵon ne plu estanta kaj finis la vivon per malbona penso. Kiu bonkora travivas mizeran vivon en ĉi tiu vivo, tiu estas homo, kiu nekonscie faris malbonojn en la junaĝo de la antaŭa vivo, sed bone pentofaris en la maljunaĝo. Tiel same la lasta penso de ĉi tiu vivo fariĝas la unua penso de la sekva vivo.”

**36.** *Dego* denove demandis: “Post kiam homo mortas, la mondoj de mortinto kaj de vivanto diferencas inter si. Ĉu tamen nur la spirito povas libere veni kaj iri kiel dumvive?” Sotesano respondis: “Nur la konscio estas egala dumvive kaj postmorte, sed en veno kaj iro la animo alkroĉiĝanta al avido, kolero kaj malsaĝo diferencas de tiu subpremanta ilin. Kiam mortas la animo alkroĉiĝanta al avido, kolero kaj malsaĝo, ĝi, alligite al alkroĉiĝo, ne estas libera veni kaj iri, kaj, kovrite de la karmforto de nescio, tiriĝas de tiu alkroĉita loko, nur kiu estas luma. Ankaŭ ĉe la enkorpiĝo la animo vidas ĉion konfuzo. Vidante beston aŭ insekton bela, la animo eniras kun seksa deziro en ĝian uteron nekonscie kvazaŭ sonĝe. Kiam la animo elektas gepatrojn en homa mondo, ĝi enuteriĝas kun seksa deziro. Se la animo aspiras ian fiksitajn karmon kaj tamen ne povas ricevi homan korpon, ĝi en besta aŭ insekta mondo ricevas similan repagon, kiun ĝi ricevas en homa. Tiel same la animo ne estas libera naskiĝi kaj morti, sennombre suferas la senĉesan sesvojan transmigradon kaj tiriĝas de la dek du kaŭzoj-kondiĉoj. Sed, kiam mortas la animo subpremanta avidon, koleron kaj malsaĝon, ĝi ne estas alligita al alkroĉiĝo, tial ĝi estas tute libera veni kaj iri. La animo ĝuste vidas kaj pensas, tiel ke ĝi distingas pravajn lokojn de malpravaj kaj ne tiriĝas de karmo. Ĉe la enkorpiĝo la animo prave ricevas korpon en aplombo, enuteriĝas kun dankemo al novaj gepatroj kaj laŭvole ricevas ajnan fiksitajn karmon, tiel ke ĝi estas tute libera naskiĝi kaj morti kaj sen tiriĝi de la sesvoja transmigrado promenas, laŭplaĉe regante la dek du kaŭzojn-kondiĉojn.”

**37.** *Dego* denove demandis: “Pro kio naskiĝas proksima rilato?” Sotesano respondis: “Vivuloj ĝenerale havigas al si proksiman rilaton pro amo kaj malamo, sed budhoj kaj bodisatvoj havigas al si proksiman rilaton kun ĉiuj vivuloj pro favoro kaj kompatado por savi ilin.”

**38.** *Dego* denove demandis: “Ĉu homo animsaviĝas nur postmorte?” Sotesano respondis: “Animsavo estas egala ĉu dumvive, ĉu postmorte, tial dumvive savi propran animon pli efikas ol postmorte aliulo savas ĝin. Se homo ĉiutage igas sian menson brila, orda kaj ĝusta, tiel ke la ses perceptoj<sup>143</sup> nek makuliĝas, nek miksiĝas en la ses sentobjektoj<sup>144</sup>, li ne nur havas la grandan povon animsavi aliulon, sed ankaŭ jam animsavas sin dumvive. Sed tre malmultas tiaj homoj, tial urĝe sin kultivis ĉiuj sinkultivantoj de la tri mondoj.”

<sup>142</sup> Suro *Nirvano* 열반경 涅槃經: la sutro, kiu enhavas la lastajn predikojn de Ŝakjamunio kaj priskribas lian morton.

<sup>143</sup> Ses perceptoj 육식 六識: okula, orela, naza, langa, korpa kaj mensa perceptoj.

<sup>144</sup> Ses sentobjektoj 육진 六塵: formo, sono, odoro, gusto, kontakto kaj ideo (objekto).

## 10

### Fido

1. Sotesano diris: “Ĉe renkontiĝo instruisto unue ekzamenas la fidon de disĉiplo. Se studanto havas sindonan fidon, la instruo transdoniĝas kaj efikas. Alie ĝi ne transdoniĝas, nek efikas. Nu, kio estas fido? Unue fido estas ne dubi pri instruisto. Eĉ se ĉiuj homoj iel ajn kalumnias lin, via fido ne skuiĝu de tio. Eĉ se vi propraokule vidas ian suspektaĵon ĉe li, ne pesu ĝin. Due fido estas nur obei ĉiun lian gvidon, neniel obstinante en via propra opinio. Trie fido estas neniom plendi al li, ĝoje elportante tion, eĉ se li rigore instruas kaj severe riproĉas vin, aŭ publike malkaŝas vian eraron, aŭ taskas al vi penigan laboron, aŭ iel ajn traktas vin. Kvare fido estas sincere paroli al li, neniel kaŝante vian eraron. Se fido enhavas ĉi tiujn kvar punktojn, ĝi nomiĝas sindona fido kaj povas elfari la darmbovlon de budho kaj patriarko.”
2. Sotesano diris: “Estas dekmiloj da gradoj en la kapablo de studantoj. Tamen ili ĝenerale povas dividiĝi en superan, mezan kaj malsuperan kapablojn. Al supera kapablo apartenas homo, kiu tuj ekhavas juĝon kaj fidon kaj memcerte faras ĉiun studon, kiam li vidas kaj aŭdas ĝustan darmon. Al meza kapablo apartenas homo, kiu estas nek plenscia, nek senscia kaj ĉiam kun dubo pesas ĝustan darmon kaj instruiston. Al malsupera kapablo apartenas homo, kiu ne povas distingi ĝuston de malĝusto, sed fidele sekvas la gvidon de instruisto, ne pesante kaj dubante lin. Supera kapablo estas la plej valora kaj bezonata en religio el ĉi tiuj tri. Tia homo diligente studas por si mem kaj ankaŭ ĉiam pligrandigas eklezian laboron. Ĝin sekvas malsupera kapablo kun sindona fido. Tia homo, kvankam ne memfida, alte taksas darmon, plene fidas instruiston kaj senĉese studas, tiel ke li povas atingi sukceson. Sed plej malfacilas instrui homon kun meza kapablo. Li, multe kaprica, ofte malestimas darmon kaj instruiston kaj ne havas firman volon kaj sinceran penadon, tiel ke li apenaŭ povas sukcesi en studo kaj laboro. Tial homoj kun meza kapablo devas ĉiapene transiri tiun kapablon. Foje estas eĉ homo kun malsupera kapablo, kiu transsaltas rekte al supera kapablo. Alie li devas atenti la tempon, kiam li trairas mezan kapablon, ĉar tiam estas danĝero.”
3. Iu disĉiplo demandis: “Mia sukceso ŝajnas apenaŭ videbla, ĉar mi estas denaske sentalenta kaj ankaŭ mia studo estas mallonga. Kiel mi povas fari?” Sotesano respondis: “Religia studo ne multe rilatas al talento kaj tempo, sed nur al tio, ĉu oni tutforte studas per kredo, sinkuraĝigo, scivolo kaj penado aŭ ne. Se iu ajn tutforte studas nur per kredo, sinkuraĝigo, scivolo kaj penado, lia studo nepre povas sukcesi.”
4. Sotesano diris: “Kiam ordinaruloj decidiĝas fari ion, ilia fido ŝajnas tiel forta, ke ĝi traboras eĉ ĉielon, sed ĝi povas velki kun la tempo kaj ankaŭ ŝanĝiĝi, se ili akiras aŭ perdas potencon, aŭ se ilia familio repaciĝas aŭ malpaciĝas. Ju pli tian situacion oni renkontas, des pli oni sian fidon oni ekzameni, tiel ke oni turnu malfavoran situacion en favoran kaj forigu malicon kaj arogantecon en favora. Nur tiam atingeblas granda studo.”
5. Sotesano diris: “Al altrangulo, potenculo, riĉulo kaj multesciulo malfacilas eniri kun granda fido en religian pordon. Se tia homo decidus sian religian studon kaj sindone servas la publikon, li estas naskiĝinto kun profunda voto farita en antaŭa vivo.”
6. Sotesano diris: “El la homoj, kiuj disĉiple rilatas al mi, ne malestas tiu, kiu, ne min plenfidante, persistas en sia talento aŭ opinio kaj emas laŭvole fari. Kiel do indus lia renkontiĝo kun mi? Se studanto kun grandaj voto kaj fido tutkore dediĉas sin al mi, li neniel dubas kaj plendas, kian ajn vorton mi diras kaj kian ajn laboron mi taskas. Nur tiam ligiĝas lia kaj mia koroj kaj ne vaniĝas lia kaj mia penoj.”
7. Sotesano diris: “En religio oni rigardas fidon la plej grava, ĉar ĝi estas la ujo por enmeti



instruon, la motoro por solvi ĉiujn ujojn kaj la fundamento por plenumi ĉiujn preceptojn. Studi sen fido estas kiel sterki mortintan arbon, kio rezultigas nenion. Tial unue starigu sindonan fidon, kaj vi povos vin savi. Inspiri fidon al senfidulo estas la plej granda merito en instruado al aliulo.”

**8.** Sotesano diris: “Estas du manieroj kredi je la tri trezoroj: unu estas kredi per aliula forto kaj la alia per propra forto. La unua estas kredi kaj adori budhon, darmon kaj eklezion, kiuj efektive aperas. La dua estas, trovinte budhon, darmon kaj eklezion en memnatura, kredi kaj praktiki ilin. La du manieroj bazas unu la alian, tial oni devas kunpraktiki ilin ambaŭ. Se oni atingas la plej altan gradon de studo, ĉiuj estaĵoj en la universo kaj la malplena darmondo fariĝas la tritrezora unuo sen la limo de memo kaj aliulo.”

**9.** Sotesano demandis disĉiplojn: “Kiom multe vi sopiris vidi kaj apudi min dum mia longa foresto?” Ili respondis: “Ni tre multe sopiris.” Sotesano diris: “Mi komprenas vin. Sed kiom ajn infano priservas gepatrojn, tio malfacile kompareblas kun gepatra zorgo pri ĝi. Tiel same, kiom ajn disĉiplo fidelas al instruisto, tio malfacile kompareblas kun instruista zorgo pri li. Se la fido kaj sopiro de disĉiplo al instruisto atingas eĉ la duonon de la instruistaj amo kaj zorgo pri li, la instruo povas transdoniĝi al la disĉiplo.”

**10.** Sotesano diris: “Kiam oni kiel disĉiplo volas lerni de instruisto, oni ne povas plene ricevi lian instruon, se oni ne donas sian tutan koron al li aŭ ĉesigas sian penadon. En malnova tempo estis majstro *Guĝong*<sup>145</sup>. Kiam li bonziĝis, en frosta tago instruisto ordonis al li instali kaldronon. Kvankam li naŭfoje ĝin reinstalis tra la tuta nokto, li neniom plendis en la koro. Tial fine la instruisto, nomante lin *Guĝong*, akceptis lian disĉipliĝon. De tiam li fidele priservis sian instruiston dum pluraj jardekoj sen aŭskulti apartajn predikojn. Kiam serioziĝis la malsano de la instruisto, li pli sindone flegis lin kaj iun tagon li subite eksciis, ke memiluminigi estas ricevi instruon. Nur kiu kun tia fido serĉos instruon, tiu plene ĝin ricevos.”

**11.** Sotesano diris: “Kvankam printempa vento blovas indifere, nur viva arbo povas ricevi ĝian energion. Kvankam sanktuloj kaj saĝuloj instruas tute egale, nur fidulo povas plene ricevi la instruon.”

**12.** Reveninte de la vojaĝo en la monto *Gumgangsán*, Sotesano diris: “La mastro de mia gastejo, kristano, havis firman kredon kaj ĝuis tre feliĉan vivon. Mi demandis lin pri lia persona historio. Li respondis, ke li kredas Dion de tridek jaroj. Dum tiu tempo li havis multajn malfacilaĵojn en la vivo, sed li ĉiam dankis Dion pro la amo, kiam li havis favoran situacion, kaj pro la admono, kiam li suferis malfavoran situacion. En ĉiuj situacioj kaj favoraj kaj malfavoraj lia koro pli kaj pli ligiĝis kaj lia kredo pli kaj pli profundiĝis, tiel ke li povis ĝui feliĉan vivon. Nu, korfunde ekzameni la gradon de via kredo. Kvankam tiu kristano restas nur en la kredo je aliula forto kaj ne plene komprenas la fonton de la vero, li povas havi tian feliĉan vivon. Kiel do tio estus ĝusta kredo kaj sincera penado, se eĉ iomete al ĉagrenaj cirkonstancoj korkliniĝas vi, kiuj ja kredas kaj je propra forto kaj je aliula forto? Vi venis al ĉi tiu perfekta kaj reala kredejo. Do ĉiam ekzamenadu vian menson kaj regu ĉiun vivmedion per kredo, sed ne fariĝu fuŝuloj, kies kredo skuiĝas de vivmedio.”

**13.** Kiam Sotesano restadis en la domo *Sokduam*, malfortaj virinoj *Ĝang Ĝokĝo*<sup>146</sup>, *Gu Namsu*<sup>147</sup> kaj *I Mangap*<sup>148</sup> piedvojaĝadis ĉirkaŭ kvardek kilometrojn kaj esprimis sindonan fidon. Sotesano kortuŝite diris al ili: “Via fido ŝajnas tiel firma, ke vi povas tuj manĝi fekaĵon, se mi nun ordonas tion.” Ili tri tuj elĉambrigiĝis kaj alportis ĝin. Sotesano diris:

<sup>145</sup> *Guĝong* 구정 九鼎: budhana pastro en la naŭa jarcento. *Gu* signifas naŭ, kaj *ĝong* kaldronon.

<sup>146</sup> *Ĝang Ĝokĝo* 장적조 張寂照 (1878-1960): ŭonbulana alnomo *Itaŭon*, pastrino, *debonĝdo*, unu el la naŭ disĉiplinoj de Sotesano.

<sup>147</sup> *Gu Namsu* 구남수 具南守 (1870-1939): ŭonbulana alnomo *Jetaŭon*, laiko.

<sup>148</sup> *I Mangap* 이만갑 李萬甲 (1879-1960): ŭonbulana alnomo *Ŭantaŭon*, laiko.

“Sidiĝu. Mi supozas per via ago, ke vi povas manĝi eĉ ion pli naŭzan ol fekaĵo. Nia eklezio nun estas tiel malgranda, ke mi povas ofte prizorgi vin afable. Sed kiam ĝi pligrandiĝos, povos okazi, ke mi eĉ ne rimarkos viajn alvenon kaj foriron. Pensu, ĉu via hodiaŭa fido daŭros eĉ tiaokaze, kaj konstante ĝin havu eterne.”

**14.** Sotesano riproĉis *Gim Ĝonggak*<sup>149</sup>, kiu dormetis en la antaŭa vico dum lia prediko: “La dormetanta *Ĝonggak* ja estas abomena kiel hipopotamo.” Ŝi tuj ekstarinte kvarfoje riverencis kaj ridetis. Sotesano diris: “Mi ĝis nun multfoje faris malagrablajn riproĉojn al ŝi, sed ŝia fido neniom ŝanĝiĝis. Ŝi estas tia homo, kiu sekvas min ĉu dumvive, ĉu postmorte.” Sotesano aldiris: “Se disĉiplo havas nediritan vorton al instruisto kaj reciproke, ili ne estas veraj instruisto kaj disĉiplo.”

**15.** Sotesano diris: “Kiam mi hodiaŭ sidis en la domo *Ĝoŝil*, la vizaĝo de *No Doksongok*<sup>150</sup> klare aperis iom longan tempon antaŭ miaj okuloj. Ŝi havas tian fidon, kiu movas ĉielon. Tial ŝia sindonemo tiel montriĝas, malgraŭ ke nin blokas pli ol kvardek kilometroj da montoj kaj riveroj.”

**16.** *Ĝong Sokhjon*<sup>151</sup> diris: “Kvankam min ĉirkaŭas multaj suferoj, mi vivas plezure de ĉiutaga korkonfeso al la darmkorpa budho.” Sotesano diris: “Mi ne scias, ĉu vi vere plezuras, komprenante la meriton kaj potencon de la darmkorpa budho. Sed tio estas bona maniero trovi feliĉon en sufero. Kiu vivas tiamaniere, tiu povas ĝui feliĉon eĉ en tre malfacila vivmedio. Kiam mi loĝis en la monto *Bongnesan*<sup>152</sup>, miaj kunuloj ĉiam vivis plezure, priservante min kaj aŭskultante miajn predikojn, malgraŭ ke ili ĉiuflanke suferegis pro malkomforta loĝejo, malriĉa manĝo kaj peza laboro en tiuj kruta monto kaj profunda valo. Kiam la unuaj naŭ disĉiploj nespertaj fizike labori polderigis malvarmvintre la marbordon en *Jonggŭang*, ili neniom plendis kaj malkontentiĝis, sed ĝojis pro la fondo de ĉi tiu eklezio, turnis ĉiujn suferojn en feliĉon kaj obeis miajn ajnajn vortojn. Ŝajnis al aliuloj, ke la disĉiploj travivis netolereblajn malfacilojn kaj suferojn. Sed fakte iliaj mensoj plenis je feliĉo kaj ili ĝuis ĉielan feliĉon ja surtere. Nu, se vi jam decidiĝas fari la studon kaj laboron de ĉi tiu eklezio, venku ĉiujn malfacilojn kaj suferojn per firma fido kaj longvida espero kaj atingu la forton turni ajnan situacion en feliĉon. Nur tiam vi povas daŭrigi paradizan vivon eterne en la senlima mondo.”

**17.** Iu disĉiplo detranĉis sian manon por esprimi sindonan fidon, sed Sotesano diris, lin severe riproĉante: “Korpo estas la kapitalo nemalhavebla por studo kaj laboro. Kio do utilis esprimi fidon damaĝante la gravan kapitalon? Vera fido ne dependas de korpo, sed de menso. De nun neniuj faru tian stultegan agon.” Sotesano aldiris: “Kvankam eminentas scio kaj verko aŭ foja distinga ago altigas fidon de multaj homoj, tio ne sufiĉas por heredi la aŭtoritaton de ĉi tiu eklezio. Ĝin povas heredi nur tiu, kiu tutkore strebas al ĉi tiuj studo kaj laboro, havante fidon senŝanĝan spite al la morto.”

**18.** *Mun Ĝonggju* demandis: “*Song Gju*, *Song Dosong* kaj *So Deŭon* nun estas junaj, sed kiu estas pli promesplena en la estonteco?” Sotesano silentis longan tempon kaj *Ĝonggju* diris: “Al mi malfacilas ilin prijuĝi, ĉar ili diferencas inter si per avantaĝo kaj malavantaĝo.” Sotesano diris: “*Song Gju* ne mezureblas per via saĝo. De post la renkontiĝo kun la du fratoj de *Song Gju* kaj *Song Dosong* mi neniam havis grandan zorgon pri ili, estis neniuj laboro taskita de mi, kiun ili ne plenumis, kaj estis neniuj laboro, kiun mi dufoje petis ilin plenumi. Tial mia menso fariĝis iliaj mensoj kaj iliaj mensoj fariĝis mia menso.”

**19.** Sotesano diris: “Epoksava sanktulo enmondiĝas kun la granda fortuno de la universo. Se

<sup>149</sup> *Gim Ĝonggak* 김정각 金正覺 (1874-1952): ŭonbulana alnomo *Sontaŭon*, pastrino.

<sup>150</sup> *No Doksongok* 노덕송옥 盧德頌玉 (1859-1933): ŭonbulana alnomo *Hjontaŭon*, laiko, avino de *Gim Dego*.

<sup>151</sup> *Ĝong Sokhjon* 정석현 鄭石現 (1879-1947): ŭonbulana alnomo *Bektaŭon*, laiko.

<sup>152</sup> *Bongnesan* 봉래산 蓬萊山: alia nomo de *Bjonsan*.

vivuloj dediĉas sin al li kaj lia eklezio kaj starigas voton, ilia voto realiĝas rapide. Male, se vivuloj malestimas kaj malhelpas lin kaj lian eklezion, severa puno venas al ili. La saman forton havas ne nur li, sed ankaŭ tiu homo, kies menso tute unuiĝas kun lia menso.”

## 11 Sentencoj

1. Sotesano diris: “Ne ĉiam utilas studo de iu ajn scienco, sed ĉiumomente utilas tiu de mensuzo. Tial mensostudo estas la bazo de ĉiuj studoj.”
2. Sotesano diris: “Sinkultivanto celas scii menson kaj atingi ĝian liberon, scii la principon de naskiĝo kaj morto kaj transcendi ilin, kaj scii la principon de peko kaj feliĉo kaj laŭvole regi ilin.”
3. Sotesano diris: “Bona menso naskas ĉian bonon, dum malbona menso ĉian malbonon. Tial menso estas la fonto de ĉiaj bono kaj malbono.”
4. Sotesano diris: “Se malĝustmensulo havas multan monon, scion aŭ potencon, ĝi male fariĝas la fonto de pekado. Nur post kiam menso ĝustiga, mono, scio kaj potenco fariĝas eterna feliĉo.”
5. Sotesano diris: “Bono estas bona, sed alligiĝo al malgranda bono malhelpas grandan. Saĝo estas bona, sed alligiĝo al malgranda saĝo malhelpas grandan. Ne alligiĝu al malgrandaĵon, kaj vi akiros grandaĵon.”
6. Sotesano diris: “Se oni scias sin stulta, eĉ stultulo saĝiĝas. Se oni scias nur sin saĝa kaj ne povas trovi mankon, eĉ saĝulo poiome stultiĝas.”
7. Sotesano diris: “Grandstudanto kunstiras koncentriĝon kaj saĝon, tamen li starigas saĝon sur koncentriĝo kaj atingas veran saĝon. Grandlaboranto kunuzas virton kaj talenton, tamen li starigas talenton sur virto kaj utiligas veran talenton.”
8. Sotesano diris: “Facilas al bravulo renkonti fortan malamikon kaj al talentulo fari eraron.”
9. Sotesano diris: “Kiam malsaĝulo havas ĉagrenon kaj zorgon, li penas forigi ilin. Kiam li ne havas ilin, li diligentas rehavigi ilin al si. Tial en lia vivo neniam malestas ĉagreno kaj zorgo.”
10. Sotesano diris: “Kiu volas fari grandan studon, tiu ne esperu sukcesi en mallonga tempo. Maleblas iri longan distancon ĉiam rapidpaŝe kaj malfacilas atingi grandan studon per rapidemo. Tiu arbego rezultas el la plujara kresko de ŝoseto sen putri kaj budho kaj bodisatvo rezultas el la longa penado sen rezigni ekaspiron.”
11. Sotesano diris: “Estas du diabloj, kiuj malhelpas grandan studon. Unu estas malalte taksisian kapablon kaj memrezigne ĉesigi progreson. La alia estas memkontentiĝi per eta scio kaj memfiere ĉesigi progreson. Maleblas atingi grandan studon sen forigi ĉi tiujn du diablojn.”
12. Sotesano diris: “Senesperulo vivas korpe, sed mortis mense. Eĉ malbonulo, kiu faraĉis murdon, ŝtelon kaj adultron, povas fariĝi budho aŭ bodisatvo, nur se li deturnas menson. Tamen senesperulo estas tute senpova ĝis la reviviĝo de sia menso. Tial budhoj kaj bodisatvoj starigas la voton inspiri grandan esperon al ĉiuj vivuloj kaj senĉese strebas al tio en ĉiu sia vivo.”
13. Sotesano diris: “La dezirplenuma globo ne troviĝas aparte. Se oni forigas avidon el menso kaj liberiĝas de volo kaj malvolo, tio estas la dezirplenuma globo.”
14. Sotesano diris: “Ĝustigu vin, antaŭ ol ĝustigi aliulon, instruu vin, antaŭ ol instrui aliulon, kaj bonfaru al aliulo, antaŭ ol ricevi de li bonfaron, kaj vi povos akiri ĉiun vian deziron kaj samtempe harmonii kun aliulo.”

15. Sotesano diris: “Forta estas tiu, kiu venkas aliulon, sed pli forta estas tiu, kiu venkas sin. Sinvenkanto povas naski la forton venki ĉiujn homojn en la mondo.”
16. Sotesano diris: “Estas du specoj de stultuloj. Unu estas tiu, kiu penas regi laŭvole aliulan menson malgraŭ la nepovado regi eĉ sian menson. La alia estas tiu, kiu entrudiĝas en aliulan aferon malgraŭ la nepovado fari eĉ sian aferon ĝuste kaj suferas disputon.”
17. Sotesano diris: “Estas la vojo strebi al io ajn. Ordinarulo sen la vojo strebas al tio. Ju pli strebas li al tio, des pli foriĝas tio. Sed budho kaj bodisatvo per la vojo strebas al tio kaj tio nature venas al ili eĉ sen peno.”
18. Sotesano diris: “Kiu unue laboras kaj poste manĝas, tiu estas superulo. Kiu unue manĝas kaj poste laboras, tiu estas malsuperulo.”
19. Sotesano diris: “Malsaĝulo ŝatas ricevi feliĉon, sed malŝatas ĝin fari, kaj li malŝatas ricevi malfeliĉon, sed ŝatas fari pekon. Ĉar li ne scias la fonton de feliĉo kaj malfeliĉo, aŭ ke al li mankas ago malgraŭ scio.”
20. Sotesano diris: “Kiu multe bonfaras spirite, korpe kaj materie, tiu estas multe rekompencota homo. Kiu trankvilas en ajna situacio, tiu estas la plej trankvila homo. Kiu kontentiĝas per ajna kondiĉo, tiu estas la plej riĉa kaj nobela homo.”
21. Sotesano diris: “Vivulo ŝajnas fari nur sian laboron inteligente, sed fine li malprofitas. Budho kaj bodisatvo ŝajnas fari nur aliulan laboron stulte, sed fine ili profitas.”
22. Sotesano diris: “Saĝulo, ne konsiderante postenon ĉu altan, ĉu malaltan, fidelas nur al sia laboro, tial liaj laboro kaj merito glorie elmontriĝas kun la tempo. Malsaĝulo, ne fidelante al sia laboro, serĉas nur famon kaj meriton, tial fine liaj famo kaj merito neniiĝas.”
23. Sotesano diris: “Kiu ŝajnigas sin supera, tiu nepre malestimigas. Kiu volas ĉiam venki aliulon, tiu nepre malvenkas.”
24. Sotesano diris: “Ju pli malkaŝiĝas bono, des pli malgrandiĝas ĝia merito. Ju pli kaŝiĝas malbono, des pli profundiĝas ĝia radiko. Tial kaŝi bonon estas grandigi ĝian meriton kaj malkaŝi malbonon estas malprofundiĝi ĝian radikon.”
25. Sotesano diris: “Kaŝhelpi aliulon estas pli granda virto. Kaŝmalhelpi aliulon estas pli granda peko.”
26. Sotesano diris: “Se vi plendas, ke aliulo ne rekonas vian bonon, el ĝi ĝermas malbono. Se vi pentas pri via malbono, el ĝi ĝermas bono. Tial ne malhelpu vian progreson kontentiĝante per momenta bono, nek malvirtigu vin malesperante pro momenta malbono.”
27. Sotesano diris: “Malsaĝulo ŝatas ricevi senpagaĵon kaj ne scias, ke tio povas kaŭzi al li kelkoble pli grandan perdon. Saĝulo ne ŝatas ricevi senpagaĵon, des pli li ne prenas la tuton de senpagaĵo, sed disdonas ĝin al konvenaj lokoj, tiel ke li preventas malfeliĉon.”
28. Sotesano diris: “Verulo ne havas falsecon en menso kaj ĉiu lia ago montriĝas vera, kaj sanktulo ne havas reciprokan konflikton en menso kaj ĉiu lia ago montriĝas virta. Tial verulo ĉiam havas ĝustan menson kaj ne malicon, kaj sanktulo ĉiam havas trankvilan menson kaj ne suferon.”
29. Sotesano diris: “Ne diru malsincere, ke vi donos ion al aliulo, nek diru fanfarone, ke vi multe donis ion al aliulo. Alie via vorto ŝuldigos vin kaj difektos vian virton. Ne ĵuru malsincere al la malplena darmondo. Alie tio kaŭzos al vi teruran peksuferon.”
30. Sotesano diris: “Oni ne povas forigi malbonan kaj malican energiojn el aliula menso, ĝis oni forigos ilin el sia menso.”
31. Sotesano diris: “Menso de reciproka konflikto estas la fonto de malfeliĉo kaj menso de reciproka helpo estas la fonto de feliĉo.”
32. Sotesano diris: “Se eĉ iama pekinto tutkore pentas kaj akumulas meriton, malbona energio forfandiĝas en lia korpo kaj lia estonteco brile malfermiĝas. Se eĉ iama bonfarinto ankoraŭ havas plendon kaj malicon en sia menso, malbona energio ĉirkaŭvolvas lian korpon kaj lia estonteco mallume ŝtopiĝas.”

33. Sotesano diris: “Neiluminiĝintoj plendas eĉ al dekfoja bonfarinto, kiu nur unufoje faras malbonon, sed iluminiĝintoj dankas eĉ al dekfoja malbonfarinto, kiu nur unufoje faras bonon. Tial neiluminiĝintoj trovas nur damaĝon eĉ en bonfaro kaj alportas al si ĉagrenon kaj detruon, sed iluminiĝintoj trovas bonfaron eĉ en damaĝon kaj alportas al si pacon kaj komforton.”
34. Sotesano diris: “Bonulo instruas la mondon per bono kaj malbonulo atentigas la mondon per malbono. Ili ambaŭ havas egalan meriton por instrui kaj atentigi la mondon. Sed por la mondo laboras bonulo ricevante feliĉon kaj malbonulo farante pekon. Tial ne malamam, sed kompatu malbonulon.”
35. Sotesano diris: “Forĵetindas nenio en la mondo, se oni scias la manieron uzi tion.”
36. Sotesano diris: “Eĉ per simpla parolo kaj kelkvorta verko homo povas doni al aliulo esperon kaj trankvilon aŭ malesperon kaj ĉagrenon. Tial homo ne pekas nur pro fundamenta malboneco, sed ofte senkonscie pro nesciado de la principo de feliĉo kaj peko.”
37. Sotesano diris: “Malobei preceptojn gravajn kiel murdo, ŝtelo kaj adulto estas malbono, sed ĉesigi ĝustan kredon de homo kaj ŝtopi lian estontecon tra la eterna multvivo estas pli granda malbono. Almozdoni multan monon, manĝon aŭ veston estas bono, sed inspiri al homo ĝustan kredon kaj malfermi lian estontecon tra la eterna multvivo estas pli granda bono.”
38. Sotesano diris: “Estas tri specoj de homoj, kiuj malfacile saveblas. Unu estas tiu, kiu ne havas pliaĝulon en menso. La dua estas tiu, kiu malmolestas pri ajna afero. La tria estas tiu, kiu ne hontas pri peko.”
39. Sotesano diris: “Kiel membro de organizo malobei ĝian regulon estas detrui ĝin kaj neglekti membraran volon estas kontraŭi ĉielan volon.”
40. Sotesano diris: “Kiu, kvankam sen distingiĝaj bono kaj tekniko inter homoj, tenas sian ordinarecon longe kaj faras diligentan penadon, tiu estas elstara figuro kaj atingos grandan sukceson.”
41. Sotesano diris: “Vivdaŭro de religio ne dependas de ĝia ekipaĵo aŭ havaĵo, sed de la transdono de ĝia darmsaĝo.”
42. Sotesano diris: “Vera libero venas, kiam oni moderigas troliberon, kaj granda profito venas, kiam oni forĵetas egoismon. Tial kiu deziras veran liberon, tiu unue obeu preceptojn, kaj kiu deziras grandan profiton, tiu unue kultivu altruismon.”
43. Sotesano diris: “Vivuloj rigardas budhon kaj bodisatvon kiel la kampon de sia feliĉo, dum budho kaj bodisatvo rigardas vivulojn kiel tiun de sia feliĉo.”
44. Sotesano diris: “Se oni kiel homo ne scias vaste la ses vojojn kaj la kvar naskulojn, oni scias nur unuflankan mondon. Se oni ne scias komplete la progresan-malprogresan principon de la ses vojoj kaj la kvar naskulojn, oni estas miopulo.”
45. Sotesano diris: “Kiu ne havas egoisman penson en sia menso, tiu estas posedanto de la tri mondoj en la dek direktoj.”

## 12

### Ekzemplaj kondutoj

1. Dum Sotesano ŝipvojaĝis de *Bopsongpo*<sup>153</sup> al la domo *Bongneĝongsa* en *Buan*, ŝtormo subite leviĝis kaj la ŝipo forte skuiĝis. El la ŝipistoj kaj pasaĝeroj troviĝis jen svenanto, jen ploranto, jen vomanto, jen renversiĝanto, kio faris grandan tumulton en la ŝipo. Tiam Sotesano diris en plena aplombo: “Se homo eĉ en vivdangero, kolektane sian menson, tutkore pripentas sian pasintan pekon kaj ĵuras bonfaron en la estonteco, li povas saviĝi

<sup>153</sup> *Bopsongpo* 법성포 法聖浦: havenurbeto en la provinco *Gonnam*.

helpe de ĉiela forto. Homoj, do rekonsciiĝu!” Ĉiuj enŝipanoj trankviliĝis, forte impresite de lia digna sinteno. Post kelka tempo pli kaj pli mildiĝis ventoj kaj kvietiĝis ondoj. Ĉiuj homoj ne povis ne respekti Sotesanon, vidante lian pacan kaj senmovan sintenon kaj lian kompatan kaj sanktan figuron.

2. Sotesano iutage vizitis la templon *Ŝilsangsa* kaj vidis du maljunajn bonzojn severe riproĉantaj sian junan novicon pro tio, ke li tute ne aŭskultis ilian peton mediti. Ili diris: “Eĉ se mil budhoj naskiĝus, tia homo ne povus saviĝi. Li estas nur rubo.” Sotesano ridete diris: “Vi pensas, ke vi favoras lin, sed ŝajnas al mi, ke vi igas lin eterne ne mediti.” Iu bonzo demandis: “Kial vi opinias tiel?” Sotesano respondis: “Trudi ion al iu estas eterne malemigi lin al tio. Ekzemple, se mi, informante ke ene de tiu roko troviĝas oro, petos vin elfosi la oron, ĉu vi kredos min kaj tuj ekrompos la rokon?” Post iom longa pripensado li respondis: “Mi pensas, ke ne.” Sotesano diris: “Se mi trudos tion al vi kun tia necerteco, kiel vi do reagos? Vi sendube rigardos miajn vortojn malveraj. Via novico ankoraŭ ne scias plezuri per medito, nek havas la deziron mediti. Se vi trudas al li mediton, tio male igas lin rigardi ĝin vanta. Kiam li rigardas mediton vanta, li eterne ne meditas, ĉu ne? Tial tio ne estas bona maniero savi homon.” Li demandis: “Kio estas bona savmaniero?” Sotesano respondis: “Se vi ekscias, ke ene de tiu roko troviĝas oro, unue elfosu kaj brile utiligu ĝin. Tiam homoj scivolos pri la kialo de via riĉiĝo. Tiam klarigu la kialon laŭ la grado de ilia scivolemo, kaj ili danke elfosos la oron. Tio estas bona maniero savi homon.” La maljunaj bonzoj diris, ĝustigante sian sidpozon: “Via savmaniero estas vere vasta.”

3. Kiam Sotesano restadis en la domo *Bongneĝongsa*, iun tagon li rezignis vespermanĝon. *Gim Namĉon* kaj *Song Ĝokbjok*, kiuj priservis lin, demandis pri la kialo. Sotesano respondis: “Loĝante ĉi tie, mi ŝuldas multon al vi. Sed hodiaŭ nokte vi kverelos unu la alian kaj foriros antaŭ la morgaŭa tagiĝo, tial mi ne vespermanĝos.” Ili du diris: “Ni estas tre proksimaj amikoj. Kiel do ni forlasus ĉi tiun lokon, eĉ se ni ial ofendiĝus? Bonvolu vespermanĝi.” Kelkajn horojn poste ili subite kverelis kaj pakis siaĵojn, ne tolerante koleron. *Namĉon* memoris la averton de Sotesano kaj plu restante gardis lian sanktan instruon dum sia tuta vivo, sed *Ĝokbjok* foriris en la sekva mateno.

4. En la naŭa jaro de ŭonbulismo (1924) la eklezio ekkonstruis sian centran sidejon en *Iksan* kaj dum iom da tempo produktis hordean dolĉaĵon por sia vivteno. Sotesano ĉiam avertis disĉiplojn: “En la nuna mondo homaj mensoj ne estas egalaj, tial certe ŝlosu la pordojn kaj gardu la varojn kontraŭ ŝtelo. Se ili estus priŝtelitaj, ni ne nur suferus la perdon, sed ankaŭ pekigus aliulon.” Sotesano donis serurojn al la disĉiploj, sed ili ne povis certe ŝlosi ĉiujn pordojn pro spertmanko. Iun nokton ĉiuj hordeaj dolĉaĵoj kaj portiloj estis priŝtelitaj. La disĉiploj timis kaj ne povis subpremi sian maltrankviliĝon. Sotesano diris: “Ne maltrankviliĝu. La lastnokta gasto estas por vi granda instruisto. Vi kredas min la plej respektata instruisto, sed mian averton vi ne atentis. Tamen de hodiaŭ vi estos tre atentaj eĉ sen mia averto. Rigardu la lastnoktan perdon de iom da varoj kiel lernokotizon, per kiu vi regalis tiun instruiston.”

5. Iu disĉiplo estis tiel malĝentila, ke li ne povis korekti sian malnovan fikutimon eĉ kelkajn jarojn post la paŝtriĝo. Aliaj disĉiploj diris al Sotesano: “Li ŝajnas neutila, eĉ se li restas ĉe vi cent jarojn. Estas bone sekularigi frue lin por gardi la puran etoson de nia templo.” Sotesano diris: “Kiel vi diras tiajn vortojn? Li estas tia en ĉi tiu templo, des pli kia estos li en socio? Apartigi templon de socio estas mallarĝa penso kaj arbitra opinio. El la larĝa vidpunkto malbono de socio estas tiu de templo kaj malbono de templo estas tiu de socio. Kiel do perfekta ago estus forigi nur malbonon de templo kaj ĝin transloki en socion? Ĝenerale la budha darmo celas instrui ĉiarimede homojn ĝis la fino kaj konduki ilin al bono. Se ni rilatas nur al bonuloj, kie do estus nia devo? Tial ne malamamu, nek forlasu tiun, kiu ne

respondas rapide al via instruo, sed faru vian plejebulon instrui lin ĝisfine kaj kuraĝigu lin resti eterne kiel budha disĉiplo, por ke li kune budhiĝu. Nur li povas decidi sian foriron.”

**6.** Iu disĉiplo skandale malobeis eklezian regulon kaj la publiko decidis forpeli lin. Sotesano diris, eksciante tion: “Kiel vi aŭdacas fari tian decidon? Tio estas kontraŭ mia volo. Miaj homoj estas ne nur dekmiloj da disĉiploj, sed ankaŭ ĉiuj homoj en la mondo. Mia instruejo estas ne nur la limigita terpeco de ĉi tiu templo, sed ankaŭ ĉiuj lokoj en la mondo. Mia sekvanto mem povas foriri de mi, sed mi neniam forlasas lin unue.” Sotesano, mem alvokinte la disĉiplon, jen severe riproĉis lin, jen milde persvadis lin ĝis lia boniĝo.

**7.** Kiam Sotesano restadis en *Jongsan*, kelkaj prostituitinoj membriĝis kaj vizitadis lin. Liaj ĉirkaŭuloj hezite diris: “Kiam tiaj homoj vizitadas ĉi tiun sanktejon, ne nur eksteruloj mokas nin, sed ankaŭ tio nepre malhelpas la disvastiĝon de nia eklezio. Estas bone ĉesigi ilian vizitadon.” Sotesano ride diris: “Kiel vi diras tiajn senvalorajn vortojn? Ĝenerale la budha darmo celas savi ĉiujn vivulojn ĉiam per grandaj korfavoro kaj kompatio. Kiel do ni esceptus nur ilin? Des pli la savpordo estas malfermita por tiaj pekuloj. Ni devas ilin pli varme bonvenigi, por ke ili mem konsciu sian malbonon kaj memhonte forlasu sian pekon. Tio estas nia devo. Kiel do forĵeti nian devon, timante aliulajn mokojn? Homoj diferencas inter si per rango kaj profesio, sed neniel per budheco. Pli malfacilas savi tiun, kiu, ne sciante ĉi tiun principon, malemas lerni kun tiaj homoj.”

**8.** Post la Sendependa Movado en 1919<sup>154</sup> pli kaj pli severiĝis polica observado al Sotesano. Kiam li restadis en la templo *Gumsansa*<sup>155</sup> kaj en *Jongsan*, li estis plurtage pridemandita en la respektiva policejo. Krome tra la tuta vivo li elportis multajn subpremojn kaj malpermesojn fare de la japanaj aŭtoritatoj. Sed li neniom malamis ilin kaj ĉiam aplombe rilatis al ili. Sotesano diris al homoj: “Ili faras nur sian laboron kaj ni nur nian laboron. Se nia laboro estas ĝusta, neniu povas fine damaĝi kaj malhelpi ĝin.”

**9.** Kiam japana policisto maldece vokis la nomon de Sotesano, *O Ĉanggon* indignis pro lia malĝentilaĵo kaj severe riproĉis lin. Sotesano diris post lia foriro: “Riproĉi lin ne estas ĝusta ago, ĉar li ne bone konas min. Kiu volas instrui homon, tiu ĉiam klopodu kortuŝi lin. Nepre venos venka tago al tiu, kiu malvenkas en malvenkinda loko. Nepre venos malvenka tago al tiu, kiu venkas en malvenkinda loko.”

**10.** Pro iu disĉiplo, kies politika penso suspektindis, Sotesano estis alvokita kaj estis tuttage pridemandita de japana policisto. Li postulis de Sotesano ĵuri, ke neniu plu estos tia disĉiplo. Sotesano diris: “Kvankam gepatroj volas konduki ĉiujn siajn infanojn al ĝusta vojo, tion ne ebligas iliaj malsamaj karakteroj. Kvankam registaro volas bone gvidi ĉiujn siajn anojn, tion ne ebligas iliaj diferencaj mensoj. Tiel same, kvankam mi penas bonigi ĉiujn homojn, kiel do mi povus fari tion en unu tago? Tial mi daŭrigos mian penon, sed al mi malfacilas ĵuri, ke neniu plu estos tia disĉiplo.” Sotesano revenis kaj diris al homoj: “De longe fortulo kaj malfortulo kontraŭstaras unu la alian kaj diskriminacio estas serioza, tiel ke multas false kulpigitaj homoj kun venĝemo. Estonte unufoje eksplodos granda milito, sed poste la homara saĝo plialtiĝos poiome, tiel ke individuoj kaj landoj helpas kaj amike rilatos unu la alian kaj ne invados senprudente aliulan suverenecon.”

**11.** Iu homo demandis: “Ĉu estas naturvidinto en ĉi tiu ĥaosa mondo?” Sotesano respondis: “Ju pli en tia mondo, des pli multiĝi devas naturvidintoj.” Li denove demandis: “Ĉu vi vere vidis la naturon kaj budhiĝis?” Sotesano respondis ride: “Naturvido kaj budhiĝo rekoneblas nek parole, nek aŭskulte. Nur kiu atingas tioman scion, tiu povas rekoni la staton, kaj estontaj homoj de la mondo pruvos la veran valoron de moralo.”

**12.** Sendite de polico, iu detektivo loĝis plurlonge en la centra sidejo de ŭonbulismo por

<sup>154</sup> Sendependa Movado en 1919 기미독립운동 己未獨立運動: kontraŭjapana movado de la korea popolo, kiu komenciĝis en la unua de marto de 1919.

<sup>155</sup> *Gumsansa* 금산사 金山寺: budhana templo fondita en 599.

observi Sotesanon kaj la eklezion. Sotesano traktis lin kiel favoratan disĉiplon. Iu disĉiplo demandis: “Ĉu vi ne tro indulgas lin?” Sotesano respondis: “Mi malsame pensas ol vi. Kiel do ne indus edifi kaj savi lin?” Sotesano prizorgis kaj amis lin ĉiam egale, ĉu kiam li estis, ĉu kiam li forestis. Fine li kortuŝite membriĝis kaj de tiam multe helpis ĉiujn aferojn de la eklezio. Lia ŭonbulana nomo estas *Hŭang Iĉon*<sup>156</sup>.

**13.** Kiam Sotesano restadis en *Jongsan*, iun tagon loka policisto venis al najbara vilaĝo kaj alvokis al si Sotesanon per sendito. Sotesano ŝajnis volonta iri. Liaj apudaj disĉiploj forte indignis pro la maldeca ago de la policisto kaj petis Sotesanon ne iri. Sotesano demandis: “Kial mi ne povas iri por renkonti lin?” Iu disĉiplo respondis: “Kvankam la nuna mondo ne scias moralan valoron, estas ridinde, ke simpla malaltranga policisto ordonas veni kaj iri al vi, kiu havas plurcentojn da sekvantoj. Se vi senreziste cedos al li, tio ne nur difektos vian dignon, sed ankaŭ malhonoros nian eklezion.” Sotesano diris: “Vi pravas iasence, sed neniom zorgu pri tio. Mi jam havas ideon.” Sotesano rapide iris por renkonti la policiston kaj, reveninte, diris al disĉiploj: “Kiam mi renkontis lin, li bonvenigis min male en humila sinteno kaj reiris tre kontenta. Ŝajne multe malpli iĝos lia emo subpremi nin. Se mi ne irus al li, sendube lia emo pligrandiĝus. Kio malbona sekve okazus al nia eklezio? Nun japanoj ĉiakiale subpremas ĉiujn koreajn organizojn. Do estas plej bone trakti lin, kiel mi faris. Se vi volas esti bontraktata, unue montru al la mondo bontraktindan atingon en ajna kampo, kaj ĉiuj homoj respektos vin konforme al la atingo. Tamen budho kaj bodisatvo eĉ ne konscias altan lokon, atinginte ĝin.”

**14.** El la tiutempaj novaj religioj ne malmultis tiuj, kiuj altiris la atenton de aŭtoritatoj kaj socio per financa kaj seksa skandaloj. Sekve la registaro ofte intervenis kaj inspektis ĉiujn religiojn, sed inspektistoj trovis neniun kulpigaĵon ĉe Instituto de Budha Darmo<sup>157</sup> kaj inter si diris: “Se konsideri la organizadon, planadon kaj agadon de Instituto de Budha Darmo, ĝi povas administri eĉ landon.” Sotesano aŭdis pri tio kaj diris: “Vera moralo estas granda rimedo bonigi individuon, familion, ŝtaton kaj la mondon. Kiel do ni ne povus eĉ la mondon administri?”

**15.** Sotesano mem elsarkis herbaĉojn en la templo Seulo kaj diris: “Mia hodiaŭa elsarkado havas du signifojn. Unu estas doni ekzemplon al la respondeculoj de templo, por ke ili ĉiam atentu ordon en templo. La alia estas instrui, ke kiel herbaĉoj abunde kreskas en ĉi tiu templo malzorgata eĉ momenton, vanaj pensoj leviĝas en menso ofte malzorgata, tiel ke mensostudo kaj elsarkado havas egalan signifon. Kontrolu mensostudon dum elsarkado kaj faru elsarkadon kvazaŭ mensostudon, tiel ke vi purigu kaj la templon kaj la menson. Mi petas vin ĉiam memori ĉi tiujn du signifojn kaj ne kontraŭi al mia volo.”

**16.** Sotesano ĉiam metis sian aĵon nepre en ordo, tiel ke li povis palpe trovi ĝin eĉ en malluma nokto. Li ĉiam tenis sian ĉambbron tiel pura, ke eĉ polvo ne restis tie. Sotesano diris: “Se aĵo estas malorde metita, tio montras, ke la menso de ĝia posedanto estas malorda. Se ĉambro estas malpura, tio montras, ke la menskampo de ĝia posedanto estas kruda. Se menso estas maldiligenta kaj kruda, ĉio ne regeblas. Kiel do neglekti ĉi tiun aferon, rigardante ĝin bagatela?”

**17.** Eĉ kiam Sotesano elĉambriĝis por momento, li ŝlosis la pordon. Iu disĉiplo demandis pri la kialo. Sotesano respondis: “Mian ĉambbron frekventas multaj homoj viraj kaj virinaj, maljunaj kaj junaj, kiuj ankoraŭ ne estas maturaj en studo, kaj ankaŭ eksteruloj. Mi timas, ke ili farus malbonon, ĉar vido vekas deziron, kaj mi anticipe protektas ilin kontraŭ malbonfaro.”

<sup>156</sup> *Hŭang Iĉon* 황이천 黃二天 (1910-1990): ŭonbulana alnomo *Bungsan*, laiko, policisto, kiu observadis la ŭonbulanan eklezion dum la japana regado (1910-1945).

<sup>157</sup> Instituto de Budha Darmo 불법연구회 佛法研究會: eksa nomo de ŭonbulismo, kiu estis uzata de 1924 ĝis 1948.



18. Sotesano, ne forĵetante, uzis ŝpareme eĉ paperpecon, krajonstumpon kaj ŝnureton kaj diris: “Kiu malŝparas eĉ ion abundan, tiu puniĝos per malriĉeco. Ekzemple, kiu malŝparas akvon abundan en la mondo, tiu renaskiĝos tie, kie li suferos akvomankon.”

19. Sotesano neniam konfuziĝis en laboro, ĉar li antaŭvidis ĝian okazon. Sotesano multe uzis senvalorajon kiel valorajon, ĉar li antaŭpensis ĝian uzeblon kaj ne forĵetis ĝin senprudente.

20. Sotesano ĉiam avertis homojn kontraŭ la lukso de vesto, manĝo kaj loĝejo super siaj vivrimedoj kaj diris: “Se homo prenas veston, manĝon kaj loĝejon super siaj vivrimedoj, tio povas ruinigi lian familion kaj malhonoru lin. Se eĉ bonhavulo dronas en lukso, fine lia malvirta menso regas kaj tio malhelpas la spiriton de lia sinkultivo. Tial studanto precipe estu ĉiam indiferenta kaj modera en vesto, manĝo kaj loĝejo.”

21. Kiam Sotesano kun kelkaj disĉiploj eliris el la ĉefpordo de la centra sidejo de ŭonbulismo, lin salutis ĉiuj infanoj tie ludantaj krom la plej juna. Sotesano, karesante lin, diris: “Salutu, kaj mi donos al vi dolĉaĵon.” Li salutis kaj Sotesano ridetis. Tamen Sotesano daŭrigis sian vojon dum kelka tempo kaj subite haltis kaj diris: “Atendu min por momento. Mi forgesis ion.” Li rapidis al sia ĉambro kaj alportis dolĉaĵon kaj donis ĝin al la infano. Tiel Sotesano ĉiam plenumis sian promeson eĉ bagatelan.

22. Kiam Sotesano malsanis, iu disĉiplo diris: “Najbara kredanto havas tre komfortan brakseĝon. Mi alportos ĝin por vi.” Sotesano diris: “Ne faru tion, des pli li nun forestas hejme. Kiel do alporti ĝin por mia komforto? Krom neevitebla okazo, estas bone ne uzi aĵon de aliulo sen lia ofero aŭ permeso, eĉ se estas intima rilato.”

23. Kiam Sotesano ricevis leteron, li ĉiam tralegis ĝin kaj tuj respondis. Poste li orde konservis leterojn indajn kaj kolekte forbruligis la ceterajn en pura loko. Sotesano diris: “Letero entenas penon de la skribinto kaj do maldecas meti ĝin senprudente.”

24. Sotesano iutage riproĉegis disĉiplon, sed traktis lin afable post iom da tempo, kiam li venis denove. Alia disĉiplo demandis pri la kialo. Sotesano respondis: “Ĵus antaŭe mi tiel faris por detruu lian malican menson, sed nun mi ĉi tiel faras por kuraĝigi lian ĝustan menson, kiun li rehasas.”

25. *Jang Haun*<sup>158</sup> ĉiapene prizorgis la familion de Sotesano antaŭ lia eklezifondo kaj eĉ post tiam ŝi elportis ĉian malfacilan kamplaboron. Tial ĝeneralaj kredantoj bedaŭris tion kaj diskutis pri la tuteklezia monkokolekto por liberigi ŝin de tia peniga laboro. Sotesano aŭskultis ilian opinion kaj diris: “Viaj vortoj havas ian sencon, sed ĉesigu tion. Ŝi ne povas rekte fari grandan kontribuon al ĉi tiu eklezio, des pli ŝi devas ne ricevi publikan helpon. Estas feliĉe kaj prave, ke ŝi vivas de sia laboro, krom se ŝi ne povas vivi tiel.”

26. *I Ĉongĉun* profunde iluminiĝis, vidante virporkon kaj porkinon ludantaj, kaj fortranĉis sian mondan plezuron. Dum ŝi membriĝinte strebis al sinkultivo, ŝi decidiĝis donaci la tuton de sia terposedaĵo al la eklezio. Sotesano diris: “Via volo estas tre bela, sed homa menso povas aliiĝi fine ol komence. Denove pripensu vian decidon prudente.” Sotesano plurfoje rifuzis, sed eĉ pli kortuŝite, ŝi persistis senŝanĝe. Sotesano fine akceptis ŝian donacon kaj diris: “Faru senpensan grandan virton kiel ĉielo kaj tero, kaj via merito eterne ne pereos.”

27. Kiam Sotesano vizitis la templon *Marjong*<sup>159</sup>, *O Songa*<sup>160</sup> venis kaj diris: “*Ĝongsun*<sup>161</sup> kaj *Ĝongte*<sup>162</sup>, miaj du filinoj, membriĝinte rezignas edziniĝi. Tio mian volon kontraŭas, sed mi lasas ilin, ĉar mi ne povas subigi ilin al mia volo. Mi petas vin respondecu pri ilia estonteco.” Sotesano diris: “Malsame ol en tradicia budhismo, ne estas malpermesite

<sup>158</sup> *Jang Haun* 양하운 梁夏雲 (1890-1973): ŭonbulana alnomo *Ŝiptaŭon*, laiko, edzino de Sotesano.

<sup>159</sup> Templo *Marjong* 마령교당 馬靈教堂: ŭonbulejo situanta en la provinco *Ĝonbuk*.

<sup>160</sup> *O Songam* 오송암 吳松庵 (1886-1948): ŭonbulana alnomo *Hŭisan*, laiko.

<sup>161</sup> *O Ĝongsun* 오중순 吳宗順 (1913-1935): ŭonbulano.

<sup>162</sup> *O Ĝongte* 오중태 吳宗泰 (1913-1976): ŭonbulana alnomo *Hjongtaŭon*, pastrino, *debongdo*.

geedziĝi en ĉi tiu eklezio. Kiel do mi preteratentus ilin, kiuj kun speciala voto dediĉas siajn purajn korpon kaj menson al studo kaj laboro? Sed ilia estonteco pli dependas de ili mem ol de iliaj gepatroj kaj instruistoj. Ni konfidu la lastan respondecon al ili kaj nur gvidu ilin ĉiapene.” Li ekstarinte riverencis al Sotesano kaj ĝoje akceptis ilian pastriniĝon.

**28.** Kiam Sotesano vojaĝis al Busano, *Im Ĉilbohŭa*<sup>163</sup> vizitis kaj invitis lin hejmen. Sotesano demandis: “Mi scias, ke vi estas fidela kredanto, sed via edzo estas nekredanto. Ĉu li akceptos min?” Ŝi respondis: “Mi jam preparolis tion kun mia edzo. Li diris, ke via vizito donos grandan honoron al nia familio, kvankam li ankoraŭ ne membriĝis pro la manko de plena praktikado.” Sotesano divenis la proksiman rilaton ligitan en la antaŭa vivo kaj plezure akceptis la inviton.

**29.** Iu homo venis kaj volis disĉipliĝi. Sotesano demandis: “Ĉu ne estus pli bone viziti min unu- aŭ dufoje plu en la sekvaj tagoj, antaŭ ol decidiĝi?” Li respondis: “Mi firme decidiĝas. Bonvolu akcepti min kiel vian disĉiplon.” Sotesano post longa pripensado donis al li la ŭonbulanan nomon *Ilĝi*<sup>164</sup>. Li elĉambriĝis kaj diris al homoj: “Nia pasinta proksima rilato igas nin kunlerni sub la sama instruisto. Mi havas bonajn medikamentojn. Aĉetu ilin sensuspekte.” Sed neniu volis aĉeti. Li koleriĝis kaj foriris antaŭ la vesperiĝo, dirante: “Kiel do povus esti ĉi tia la samideaneco?”

**30.** Iu disĉiplo pajltegmentis eklezian domon, sed ĉe la fino li ne ŝnuris la tegmenton. Sotesano avertis lin, ke lia laboro estos vana, se nokte ventos. Li diris, ke tiuregione ne estas forta vento, kaj lasis la laboron nefinita. Ja en tiu nokto forta vento leviĝis subite kaj forblovis la pajlan tegmenton. Li embarasite diris: “Malgraŭ ke vi antaŭsciigis min per via supernatura povo, mi stulta ne aŭskultis vin kaj kaŭzis ĉi tiun katastrofon.” Sotesano diris: “Tiuokaze mi instruis al vi ĝustan vojon, sed vi preterlasis mian averton. Tamen nun vi rigardas min kiel magiulon, kio do pligrandigas vian kulpon. Se vi pensos min tia, vi ne lernos de mi ĝustan darmon, sed observos nur mirindaĵon. Kiel do ne estus danĝero en via estonteco? Korektu vian penson kaj ĉiam sekvu nur ĝustan vojon.”

**31.** Kiam *I Unŭoj*<sup>165</sup> malsanis serioze, ŝia familiano kuris al Sotesano kaj petis lian kuracadon. Sotesano diris: “Tuj alvoku kuraciston kaj petu lin kuraci ŝin.” Ŝi resaniĝis kelkajn tagojn poste kaj Sotesano diris: “Kiam *Unŭoj* malsanis serioze antaŭ nelonge, peti mian kuracadon ne estis ĝusta ago. Mi kiel moralinstruisto kuracas spiritan malsanon kaj kuracisto korpan malsanon. De nun konsultu min nur pri spirita malsano kaj kuraciston pri korpa malsano. Tio estas ĝusta ago.”

**32.** *Gŭangrjong*<sup>166</sup>, la dua filo de Sotesano, malsaniĝis. Sotesano petis sian familion tutforte flegi lin, sed li fine junmortis. Sotesano diris: “Ni nur faras nian plejblon, sed homa forto ne povas disponi pri la vivo.” Lia sinteno en laboro kaj prediko neniom malsamis ol kutime.

**33.** Kiam *I Dongan* forpasis, Sotesano preĝis longe en silento kaj larmis. Disĉiploj diris: “Bonvolu ne tro dolorigi vian koron.” Sotesano respondis: “Mi ne dolorigas mian koron, sed mi ne povas ne larmi pro lia morto. Komence de nia eklezio li tutkore sekvis mian volon kaj ĝuste tenis la ŝnuron de kredo, kaj poste li neniom pesis postenon ankaŭ en ĉiu laboro.”

**34.** Najbara granda hundo preskaŭ mortmordis junan hundon nutratan en la centra sidejo de ŭonbulismo kaj la juna dolorkriadis malĝoje. Sotesano aŭdis kaj diris: “Ĉu homo, ĉu besto, neniu volas morti.” Li kompatis la junan, sed fine ĝi mortis. Sotesano donis monon kaj petis ritrespondecan pastron okazigi kvardeknaŭtagan animsavan ceremonion por la ĵus mortinta

<sup>163</sup> *Im Ĉilbohŭa* 임칠보화 林七寶華 (1896-1972): ŭonbulana alnomo *Jongtaŭon*, laiko, *dehobop*.

<sup>164</sup> *Ilĝi* 일지 日之: vendisto de medikamento. La nomo signifas foriri en unu tago.

<sup>165</sup> *I Unoj* 이운외 李雲外 (1872-1967): ŭonbulana alnomo *Ĝuntaŭon*, laiko, edzino de *Song Bjokĝo*, patrino de *Song Gju* kaj *Song Dosong*.

<sup>166</sup> *Gŭangrjong* 광령 光靈: ŭonbulano, la dua filo de Sotesano.

hundo.

**35.** Kvankam Sotesano estis afabla al homo, la homo ne povis esti malĝentila. Kvankam Sotesano riproĉis homon severe, la homo ne povis veki venĝemon. Kvankam Sotesano vidis homon neutila, li unue ne forlasis la homon.

**36.** Sotesano admonis tiun disĉiplon, kiu nur parolis kaj ne agis, sed li ne neglektis lian parolon. Sotesano admonis tiun disĉiplon, kiu havis nur talenton kaj ne virton, sed li ne neglektis lian talenton.

**37.** Kiam Sotesano gvidis homojn, estis la kvar severaj riproĉindaĵoj. Unu estis proprigi al si publikan havaĵon. La dua estis senprave resti longe kiel pastro en sia familio aŭ entrepreni personan laboron. La tria estis ne kunhelpi publikan laboron pro la deziro esti komforta. La kvara estis esperi okultan povon nur per unuflanka medito anstataŭ sekvi la grandan vojon per la tristuda kunpraktikado.

**38.** Kiam Sotesano premiis kaj punis homojn, li havis la jenajn kvin regulojn laŭ ilia kapablo. Unu estis nek premii, nek puni tiun, kiu ĉiam agis ĝuste. La dua estis nur puni tiun, kiu plej ofte agis ĝuste kaj foje eraris, por perfektigi lin. La tria estis kaj premii kaj puni tiun, kiu iufoje agis ĝuste kaj aliffoje eraris. La kvara estis nur premii tiun, kiu plej ofte eraris kaj foje agis ĝuste, por kuraĝigi lin plu agi ĝuste. La kvina estis nur observi sen premii kaj puni dum kelka tempo tiun, kiu ĉiam eraris.

**39.** Sotesano kutime pli riproĉis fidelan kaj bonkoran disĉiplon eĉ pro lia malgranda eraro kaj malpli riproĉis senfidan kaj malbonkoran disĉiplon eĉ pro lia granda eraro kaj multe laŭdis lin eĉ pro lia malgranda bonfaro. Iu disĉiplo demandis pri la kialo. Sotesano respondis: “Mi celas, ke kiu faras unu eraron el dek, tiu korektu eĉ la unu eraron kaj fariĝu perfekta kiel plenrafinita jado. Mi celas, ke kiu faras unu bonon el dek, tiu kreskigu eĉ la unu bonan ĝermon.”

**40.** Kiam Sotesano enpostenigis homon, li ĉiam demandis unue pri liaj fido, sindonemo kaj plenumovo kaj poste pri liaj scio kaj talento.

**41.** Sotesano de tempo al tempo aŭskultis korean klasikan muzikon kun homoj. Kiam li aŭskultis precipe koreajn operojn<sup>167</sup>, t.e. *Ĉunĥjangĝon*, *Ŝimĉongĝon* kaj *Hunĝbuĝon*, li ĉiam laŭdis ĉastecon, filinan priservon kaj fratecon kaj ofte emfazis la gravecon de konstanteco kaj harmonio precipe en la komunuma vivo kaj diris: “Lojaleco, ĉasteco, gefila priservo kaj frateco diferencas laŭepoke per formo, sed ilia spirito utiligendas senŝanĝe en ajna epoko.”

**42.** Sotesano en ĉiu eklezia afero dividis penon, ĝojon, zorgon kaj malĝojon kun homoj kaj ne faris ion ajn malhumanan, nek prenis ion ajn super siaj vivrimedoj, nek deziris ion ajn bonŝancan.

**43.** Kiam estis komuna laboro, Sotesano ĉiam partoprenis en ĝi kaj mem ĝin direktis. Li diris: “Mi laborigas vin komune, por ke vi ne malzorgu la tri korpajn esencaĵojn el la ses esencaĵoj.” Li severe riproĉis tiun, kiu ne partoprenis senprave en komuna laboro, aŭ kiu laboris maldiligente malgraŭ sia partopreno en ĝi.

**44.** Iu homo, travojaĝinte la tutan landon, vizitis Sotesanon kaj admire diris: “Mi surgrimpis multajn montojn, sed la monto *Gumgangsán* estas la plej elstara. Mi renkontis sennombrajn homojn, sed mi unufoje vidas homon tian kiel vi.” Sotesano demande respondis: “Kial vi parolas nur pri monto kaj homo? Ĉu vi ne rimarkas, ke ĉi-lande konstruiĝas eklezio senprecedente granda en la tutmonda historio?”

**45.** Kiam *An Dosan*<sup>168</sup> vizitis, Sotesano mem lin bonvenigis kaj aprezis lian patriotan penadon. *Dosan* diris: “Mia laboro estas malvasta kaj nesufiĉe lerta, tial anstataŭ doni

<sup>167</sup> Korea opero 판소리: *pansori* (k.), popola muzika teatraĵo, en kiu unu kantisto kantas dialogojn kun diversaj gestoj kaj voĉoj, akompanate de unu tamburisto.

<sup>168</sup> *An Dosan* 안도산 安島山 (1878-1938): alnomo de *An Ĉangho*, fama korea patrioto kontraŭ la japana regado.

grandan profiton al la nacio mia laboro nur multigas samideanojn, kiujn la polico subpremas. Sed via laboro estas vasta kaj riĉa je rimedoj, tial vi interne multe kontribuas al la samnacioj kaj elekstere apenaŭ ricevas rektajn malliberigon kaj subpremon. Ja via kapablo estas granda.”

**46.** Sotesano diris: “Mi miras, ke vi fidas kaj sekvas min, malgraŭ ke mi ne havas apartan lertecon, nek sufiĉan edukitecon.” Sed li estis ĉiopova eĉ sen aparta povo kaj ĉioscia eĉ sen aparta scio. Kiam li instruis homojn, lia virto superis tiun de ĉielo kaj tero, kaj kiam li trarigardis aferon kaj principon, lia saĝo estis pli luma ol la suno kaj la luno.

**47.** *Gim Gŭangson* lamente admiris Sotesanon kaj diris: “Dum pli ol dudekjara lernado sub Sotesano mi klopodis sekvi ĉiujn liajn vortojn kaj agojn, sed ankoraŭ ne sukcesas sekvi eĉ la dekmilonon de ili. El ili estas tri, kiujn mi plej adoras kaj volas lerni, sed ne povas fari. Unu estas sinforĝesa altruismo, la dua estas konsekvenca penado kaj la tria estas grandanimeco toleranta puron kaj malpuron. Ĝenerale, kiam mi observas lian konduton, ĉiu lia parolo kaj ĉiu lia ago estas nur por la publiko kaj ĉe li egoismo tute ne ekzistas aparte, tiel ke li ne havas alian penson, alian parolon kaj alian agon krom fondi ĉi tiun eklezion. Tial tion mi korfunde admiras kaj volas ellerni. Kiam mi observas lian laboron, neniom malpliigas lia penado ĝis hodiaŭ, kiun li antaŭ longe montris dum la polderigado en *Giljongni*, des pli ĝi estas pli granda ol antaŭe. Tial ankaŭ tion mi korfunde admiras kaj volas ellerni. Kiam mi observas lian homgvidon, li pli multe karesas kaj favoras malbonulon kaj ĉiam diras, ke ĉar ĉiu ŝatas bonulon, ŝati malbonulon estas fari grandajn korfavoron kaj kompaton. Tial ankaŭ tion mi korfunde admiras kaj volas ellerni.”

## 13 Eklezio

**1.** Sotesano diris: “Kunsento inter instruisto kaj disĉiplo estu sendistanca kiel inter patro kaj filo, kaj nenian obstaklon havos instruado kaj lernado. Kunsento inter samideanoj estu intima kiel inter fratoj, kaj ili senhezite konsilos kaj kuraĝigos unu la alian. Nur tiam rekte komunikiĝas morala energio kaj reciproke transdoniĝas menso, tiel ke kreiĝas la kolektiva forto por studo kaj laboro.”

**2.** En la dekdujara jubileo de la eklezio Sotesano diris al homoj: “Vi aŭskultis la raporton pri la dekdujaraj studo kaj laboro de nia eklezio. Diru viajn impresojn.” Disĉiploj esprimis siajn impresojn unu post la alia. Sotesano atente aŭskultis ilin kaj diris: “Viaj vortoj estas ĝenerale taŭgaj, sed ankoraŭ unu grava afero ne estas rimarkita. Mi ĝin diros. Nun en ĉi tiu darmhalo troviĝas homoj, kiuj intervidiĝas kun mi de multaj jaroj, kaj kiuj nur de kelkaj jaroj. Sekve diferencas la antaŭuloj kaj la posteuloj. Okaze de ĉi tiu jubileo mi volas, ke la antaŭuloj kaj la posteuloj denove danku kaj rekonu sin reciproke. Temas pri la posteuloj. Kvankam ili ne tiel penis fondi la eklezion, ili povas facile studi ekde la membriĝo danke al la jam konstruitaj institucioj kaj faritaj doktrinoj. Tio atribuiĝas al la sindonema penado de la antaŭuloj. Se ne estus la antaŭuloj, kion do la posteuloj lernus kaj sur kiujn do ili apogus sin? Tial la posteuloj devas ĉiam danki kaj respekti kaj priservi la antaŭulojn, eĉ surdorsigante ilin ĉiujn. Temas pri la antaŭuloj. De la komenco de la eklezio ili tutforte laboregis por fari ĉiujn doktrinojn kaj konstrui diversajn instituciojn. Tamen se ne la posteuloj sinsekve venantaj uzus la ekipaĵojn kaj adorus la doktrinojn kaj funkciigus la instituciojn, la multjara penado de la antaŭuloj montriĝus senvalora, la institucioj kaj doktrinoj ne transdoniĝus eterne kaj ilia senĉesa merito neniam montriĝus. Tial la antaŭuloj devas ĉiam danki kaj ĝoje bonvenigi la posteulojn, eĉ surdorsigante ilin ĉiujn. Se la

antaŭuloj kaj la posteuloj havas tian penson eterne, mi certas, ke nia eklezio prosperos senlime kaj via merito transdoniĝos senfine.”

**3.** Sotesano vojaĝis al Seulo, kaj disĉiploj vizitis lin kaj diris: “Ni tre ĝojas, ke pro nia profunda rilato ni samepoke naskiĝis en la sama regiono kaj studas sub la sama budho. Tio montras, ke ni havas eterne nerompeblan bonan rilaton.” Sotesano diris: “Aŭskultante vin, mi ĝojas iuflanke kaj zorgas aliflanke. Estas ĝojige, ke vi hodiaŭ harmonias kaj plezuriĝas antaŭ mi. Estas zorgige, ke malbona rilato povas ĝermi el la hodiaŭa bona rilato.” Iu disĉiplo demandis: “Kiel tio povas okazi?” Sotesano respondis: “Des pli facile naskiĝas malbona rilato el ju pli proksima rilato kiel inter patro kaj filo, inter fratoj, inter geedzoj kaj inter amikoj. Pro la proksimeco ili ofte malatentas ĝentilecon kaj prudenton. Tial reciproka favoro naskas reciprokan malamon kaj reciproka instruado male miskomprenon, tiel ke ofte ilia rilato fariĝas pli malbona ol inter tute nekonataj homoj.” Alia disĉiplo demandis: “Kiel ni povas ĉiam teni bonan rilaton?” Sotesano diris: “Ne trudu ion ajn al aliulo. Ne penu nur venki aliulon, ŝajnigante vin pli alta. Ne malkaŝu aliulan eraron, sed korektu vian eraron per ĝi. Ne penu posedi sola la amon de via instruisto. Ju plu intimiĝas vi kun aliulo, des pli respektu lin kaj ne perdu ĝentilecon en ĉiu ago. Nur tiam malbona rilato ne naskiĝas kaj via ĝojo daŭras eterne.”

**4.** Sotesano diris: “Se oni rilatas al ĉiuj homoj en la mondo, ĝenerale ili diferencas per karaktero. Karaktero formiĝas el aparte komprenata instruado inter multaj instruoj en la mondo, el longdaŭra sperto, el aparta ideo pri instruado starigita laŭ propra opinio aŭ el aparta kutimo denaske havata. Se ĉiuj homoj insistas nur pri sia karaktero sen kompreni aliulan karakteron, facile estiĝas konflikto kaj kverelo eĉ inter intimaj samideanoj. Ĉar ĉiuj homoj diferencas per kutimo kaj scio, tiel ke aliulo eble ne scias ies scion, ĉar lokaj moroj diferencas, ĉar scio malsamas inter novulo kaj malnovulo, aŭ ĉar diferencas io ajn ŝatata kaj malŝatata, al kio homoj kutimiĝis en antaŭa kaj ĉi tiu vivoj. Tial homoj neas aŭ neglektas aliulan scion per sia scio kaj en serioza okazo vekas eĉ malamon. Tion kaŭzas reciproka nekompreneo pri tiu karaktero en la larĝa vidpunkto. Homo do malestimigatas ne ĉiam pro sia kulpo. Eksteruloj trovis okdek mil kulpojn de Ŝakjamunio. Tio okazis ne tial, ke li havis ilin, sed tial, ke la eksteruloj ne komprenis lian veran volon, ĉar iliaj scioj kaj kutimoj diferencis de liaj. Nu, nur se vi inter eldiversloke kolektiĝintaj homoj kun diferencaj scioj kaj kutimoj antaŭ ĉio bone komprenas, ke ĉiu homo havas propran karakteron, naskiĝas nenia konflikto inter samideanoj kaj estiĝas la virto akcepti larĝe ĉiujn homojn.”

**5.** Sotesano diris al disĉiploj: “Kiam homoj aŭ objektoj estas dividitaj inter si malproksime, ili ne sonas. Sed kiam ili pli kaj pli proksimiĝas kaj interfrapiĝas, ili nepre naskas sonon. Se metaloj interfrapiĝas, metala sono naskiĝas, kaj se ŝtonoj interfrapiĝas, ŝtona sono naskiĝas. Tiel same, se pravuloj renkontiĝas, prava sono naskiĝas, kaj se maliculoj renkontiĝas, malica sono naskiĝas. Vidu! Kvankam pasis kelkaj jarmiloj, ekde kiam ĉiuj pasintaj sanktuloj malfermis sian eklezion, ilia kompatplena kaj bona sono estas ĝis nun pura kaj flua kaj frapas la orelojn de ĉiuj vivuloj. Male konfuza sono de malvirtuloj ankoraŭ avertas la mensojn de multaj homoj. Krom se vi havas nenian rilaton dekomence, vi jam renkontiĝas kaj kune laboras, tial vi nepre naskas sonon. Ĉiuokaze atentu, ke vi ne eligu malbonan sonon, kaj ĉiam produktu nur bonan sonon. Tiam tio estos ne nur feliĉo por vi, sed ankaŭ ĝojo por la mondo.”

**6.** Sotesano diris: “Kvankam homoj laboras kun egalaj personeco kaj peno, la valoro estas alta aŭ malalta laŭ la skalo de ilia laboro kaj la historio estas longa aŭ mallonga laŭ la daŭro de ilia laboro. En la skalo estas laboroj por familio, por nacio, por ŝtato kaj por la mondo. En la daŭro estas laboroj por jardekoj, por jarcentoj, por jarmiloj kaj por eterne. La grandeco kaj longeco montriĝas depende de respektiva laboro. La plej granda kaj longa laboro estas religia laboro, kiu havas nek landlimon, nek aĝon. Estis vere malforte, kiam

Ŝakjamunio de pordo al pordo almozpetis kun siaj mil ducent disĉiploj, kiam Konfuceo ĉare vagis la tutan ĉinan kontinenton sen posteno, kaj kiam Kristo persekutiĝis tie kaj tie kun siaj dek du disĉiploj. Sed nun iliaj instruoj disvastiĝas tutmonde kaj pli kaj pli brilas kun la tempo. Vi jam aniĝis al religio. Unue plene komprenu la valoron de religia laboro, daŭrigu diligentan strebadon al ĝi kaj fariĝu ĉefroluloj de la plej granda kaj longa laboro.”

7. Sotesano diris: “Pastroj estas tiuj, kiuj tute dediĉas siajn korpon kaj menson al la publiko kaj ignoras siajn personajn famon, potencon kaj profiton. Tio ja estas ilia devo. Tamen laŭ mia nuna observo iuj el ili forgesas poiome sian komencan volon, plendas senprave kaj faras malĝustan peson en la menso, tiel ke ili agas por si anstataŭ por la publiko. Kiel do ili nomiĝus pastroj? Via komenca voto estis krei neelĉerpeblan feliĉon eterne kaj fari bodisatvan agon inter vivuloj. Se vi male pekos en feliĉokreejo kaj nutros malbudhecon dum bodisatva studo, via peko estos multe pli granda ol en la sekulara mondo. Kiel do ne timi tion? Memorante miajn vortojn, ĉiam ekzameni vin, ĉu vi estas pastro bonfaranta al aliulo aŭ atendanta de aliulo bonfaron. Se vi estas pastro bonfaranta al aliulo, konstante daŭrigu tion. Se vi estas pastro atendanta de aliulo bonfaron, tuj korektu tion. Se vi trovas tion malfacila, estas pli bone ekspatriĝi kaj preventi gravan pekon.”

8. *Ĝong Jangson*<sup>169</sup> kaj aliaj maldikiĝis pro peniga kuireja laboro. Sotesano diris: “Vi maldikiĝas pro peniga laboro. Por fari la studon kaj laboron de nia eklezio vi ja pene laboras, elportante ĉiajn suferojn en fabriko, kuirejo aŭ kampo. Tio estas kiel produkti aparaton utilan al homoj, enforiginte kaj malhardadinte kaj forĝadinte feron. En tiaj malfacilaj situacioj nur serĉu la veron kaj kunpraktiku la tri studojn, kaj vi forigos la nepuran feron de ordinarulo kaj akiros la rafinitan oron de budho kaj bodisatvo. Oni ne povas ricevi puran feron sen fandforno kaj oni ne povas atingi elstaran personecon sen trejniĝo en ĉiaj malfacilaj situacioj. Sciu ĉi tiun signifon kaj ĉiam vivu en paco kaj plezuro.”

9. Iu disĉiplo demandis: “Kial pli inter pastroj en la degenera epoko ol inter laikoj multas tiaj pekuloj, kiuj indas reenkarigi repage kiel serpento?” Sotesano respondis: “Peko de laiko influas pli-malpli nur lin aŭ lian familion. Sed se pastro, ne sciante ĝustan darmon, misgvidas homojn, li fuŝas iliajn multajn sekvajn vivojn. Se pastro parazite vivas sen merita laboro, li kvazaŭ suĉas la sangon de multaj homoj, ĉar eĉ kompleto da vesto kaj bovlo da rizo estas faritaj respektive per teksistina ŝvito kaj kamparana sango. Se pastro, sciante grandan ŝuldon al la kvar bonfaroj, ne rekompencas ilin, tio ja estas nedanko al la familio, socio, ŝtato kaj mondo. Tial tio facile okazas. Iuj el vi povas pensi mian vorton troa, sed fakte ĝi ne estas tia. Ofte ekzameni vin kaj ne devojiĝu de via celo.”

10. Sotesano diris: “Ni neniel vampiriĝu. Se homo, uzante sian postenon aŭ potencon, prenas per ruza maniero kaj sen prava pago tiun havaĵon, kiun malplibonuloj akiris per siaj sango kaj ŝvito, aŭ se homo sen prava kialo vivas de la laboro de parenco aŭ amiko, tia homo estas vampiro. Nu, ni ĉiam ekzameni nian vivon kaj kontroli, kiom da profito ĉiutage donante al homoj ni vivas ĉi tian vivon de vesto kaj manĝo. Se ni havas tioman penadon, ni povas trankviliĝi. Se ni sen tioma penado serĉas nur porvivaĵon kaj komforton sub la masko de publika laboro, tio estas granda ŝuldiĝo en la senlima mondo kaj ne eviteblas vampiriĝo. Klare konsciu tion.”

11. Sotesano en la templo Seulo petis de *I Ŭanĉol*<sup>170</sup> alporti pakaĵon surdorse al la stacidomo Seulo. Li diris: “Nun mi direktas dekojn da laboristoj por konstrui la templon, des pli tio povas difekti mian dignon kiel pastro.” Sotesano petis de *O Ĉanggon* tion. Reveninte, Sotesano demandis *Ŭanĉol*: “Kiel vi pensas pri via ĵusa konduto?” Li respondis: “Mi ne pensas, ke mi faris grandan eraron.” Sotesano diris: “Via kialo povas esti prava, sed

<sup>169</sup> *Ĝong Jangson* 정양선 丁良善 (1914-1986): ŭonbulana alnomo *Doktaŭon*, pastrino, *debongdo*.

<sup>170</sup> *I Ŭanĉol* 이완철 李完喆 (1897-1965): ŭonbulana alnomo *Ungsan*, pastro, *ĝongsa*.

se vi hontas eĉ surdorsigi al vi pakajon kaj ne pensas serioza vian malobeon al mi, tio kontraŭas la devon de pastro. Kiel do vi kun tia sinteno esperus fariĝi grandulo, kiu savas ĉiujn vivulojn? Se vi ne povas forĵeti tian sintenon, estas pli bone ekspastriĝi.” *Ŭanĉol* estis severe riproĉita kaj li pardonpetis Sotesanon. De tiam li daŭrigis la penadon forĵeti vantan dignon.

**12.** Iu disĉiplo, prizorgante la eklezian legomĝardenon, kaptis kaj sekigis multajn vermojn. Li vendis ilin al apoteko kaj enspezis nemalgrandan monon. Lia superulo raportis al Sotesano kaj demandis: “Tiu mono estas kroma enspezo kaj li bezonas novan veston. Kiel vi pensas pri tio, ke mi aĉetu per tiu mono novan veston por li?” Sotesano respondis: “Kvankam la mono estas kroma enspezo, ĝi rezultas el publika laboro kaj devas enmetiĝi en publikan kason. Se ni aĉetus veston por li per la mono, kiu kostis la vivon de multaj vermoj malgraŭ prava kialo. Kiel do li povus eviti la punon?” Sotesano donacis kompletan daŭro al li kaj diris: “Uzu la monon por publika laboro, por ke al li ne estu peko.”

**13.** Iu disĉiplo, prizorgante la eklezian fruktejon, devis ofte mortigi multajn insektojn kaj esprimis sian ĉagrenon. Sotesano diris: “Ne timu pri la puno, sed nur malegoisme priservu la publikon, kaj la puno ne turniĝos al vi. Sed se vi prenas eĉ ioman personan profiton el la laboro, vi ne povos eviti la punon. Aparte atentu tion.”

**14.** Iu disĉiplo, loĝante najbare de la centra sidejo de ŭonbulismo, alportis al sia hejmo eklezian objekton banalan kiel brulligno. Sotesano diris: “Eĉ se la eklezio mizere vivas, kelkaj lignetoj kaj najloj ne multe influas ĝin. Sed se vi maljuste proprigas al vi objektojn kolektitajn per publika penado, neatendita katastrofo trafos vin en la estonteco kaj vi suferos kelkoble pli grandan perdon. Tial mi anticipu avertas vin.”

**15.** Sotesano demandis: “Kiel vi pensas pri la starigo de eklezia fondaĵo por helpi malriĉajn familiojn de pastroj, por ke ili tute okupiĝu pri publika laboro, ne zorgante sian privatan mastrumadon?” *Ĝon Umgŭang* respondis: “Nepre endas starigi tian fondaĵon.” Sotesano denove demandis: “Kion kaj kiel fari, ĝis ni starigos ĝin, se la familio de iu pastro estos en tiel mizera situacio, ke li devos hejmeniĝi?” *So Deŭon* respondis: “Se li estos ordinara pastro, estos bone sendi lin hejmen por adekvata tempo. Se li estos grava persono, estos bone subvencii lian familion eĉ provizore post la decido de nia konsilio.” Sotesano denove demandis: “Kion kaj kiel fari, se tromultiĝos subvencipetantoj, kiam funkcios la fondaĵo?” *Ju Hoil* respondis: “Por preventi tian problemon, ni devos en la centra sidejo starigi la instancon, kiu gvidos kaj prizorgos la familiojn de la pastroj.” Sotesano diris: “Vi tri havas bonajn opiniojn. Ni do poiome starigu kaj utiligu tian fondaĵon. Kiam la eklezio ne havos sufiĉajn financojn por funkciigi ĝin, ni eĉ reduktu niajn agadojn kaj prizorgu helpobezonajn familiojn de oficantaj pastroj, por ke ili ne ĉagreniĝu de sia privata mastrumado.”

**16.** Sotesano diris: “Sub la pastra sistemo de nia eklezio pastroj povas studi kaj labori geedziĝinte aŭ negeedziĝinte<sup>171</sup> kun speciala voto fortranĉi mondajn dezirojn. La eklezio akceptas kaj traktas ilin laŭ ilia volo. Sed se iu sen speciala voto nur korpe restas negeedziĝinta pro ia cirkonstanco aŭ por persona komforto kaj envias mondan vivon, ne nur tio estas granda perdo al li kaj la eklezio kaj la mondo, sed ankaŭ li, kvankam belaspekta, estos mokata de multaj homoj en la sekva vivo. Tial se vi ne estas memfida, estas bone refari vian decidon anticipu. Se vi komencis memfide, laŭ via voto purigu la sekularan mondon kaj kun firma koro kaj nobla fideleco malfermu por ĉiuj vivuloj la vojon al saĝo kaj feliĉo.”

**17.** Sotesano ofte afable prizorgis negeedziĝintajn disĉiplojn kaj diris: “Eĉ se vi nur en ĉi tiu unu vivo pure kaj sindone laboras por la eklezio kaj la mondo, forigante dezirojn al riĉo, sekso, famo kaj profito, tio ne kompareblas kun via priservado al unu familio tra via

---

<sup>171</sup> Needziĝinta pastro 정남 貞男: *ĝongnam* (k.); needziniĝinta pastrino 정녀 貞女: *ĝongnyo* (k.).

plurvivo. Per unuviva penado vi akiros neelĉerpeblajn feliĉon kaj honoron tra via multvivo kaj fine rikoltos la grandan frukton de budhiĝo. Sed se vi estas nur formale negeedziĝintaj kaj vivas sen aparta indo, tio ankaŭ estas vantaĵo. Rekonsciĝu kaj studu.”

**18.** Sotesano diris: “Kiam oni plenigas la aliĝilon de pastrigo, oni devas profunde pensi. Se survoje falos en personan laboron aŭ en sian plezuron tiu, kiu al la malplena darmmondo kaj al la publiko votas dediĉi sin por la studo kaj laboro de ĉi tiu eklezio kaj budhiĝi kaj savi vivulojn, tio estos nenio alia ol trompi ĉielon kaj teron. Tial la vero neniel pardonos lin kaj lia estonteco ŝtopiĝos. Ankaŭ kiam oni gvidas la publikon, oni devas profunde pensi. Se iu ŝajnigos sin iluminiĝinto kaj misgvidos homojn, tio estos nenio alia ol trompi la veron. Tial li apenaŭ povos eviti malbonan vojon.”

**19.** Sotesano diris: “Ni estas kiel sovaĝanseroj. Ili konstruas nestojn laŭ sezonoj jen sude, jen norde. Tiel same ni instruas homojn laŭ rilatoj jen oriente, jen okcidente. Sed se iu sovaĝansero deflankiĝas de la vico gvidata de la ĉefo aŭ estas malatenta eĉ en la vico, ĝi povas facile rekapitiĝi aŭ mortpafiĝi. Reto kaj kuglo estas havaĵo kaj sekso por ni.”

**20.** Sotesano diris: “Eĉ tigro aŭ leono konata kiel la plej brava besto povas morti, se eta skabio disvastiĝas al ĝia tuta korpo. Tiel same eĉ grandvola studanto povas rompi sian volon kaj fuŝi sian tutan vivon, se li havas kelkajn skabiojn en menso. Tial studanto devas ĉiam atenti, ke skabioj ne enŝteliĝu en lian menson. Jen estas kelkaj mensaj skabioj. La unua estas malkontentiĝi per tio, ke ŝajne nur al li direktiĝas admono, kiam instruisto ĝin diras publike. La dua estas serĉi senprave bontraktiĝon en templo kiel en hejmo, forgesante sian studcelon. La tria estas ĉiuokaze ne preni konsilon donitan por la estonteco kiel modelon, kontraŭstari tiun kaj tiun homon aŭ eĉ rigardi konsilinton kiel malamikon. La kvara estas pli kaj pli fieriĝi laŭ la altiĝo de siaj posteno kaj fidindeco. La kvina estas serĉi nur sian komforton, atendante ĉiam de aliuloj favoron. La sesa estas plendi pro tio, ke instruisto aŭ samideanoj ne simpatias lin, malzorgante siajn menson kaj vortojn. La sepa estas ju pli favorate, des pli malkontentiĝi kaj alporti al si novan fikutimon. Kvankam ĉi ĉio ne estas granda malbono, tio povas esti skabio, kiu malhelpas la penemon de studanto. Vi do devas esti tre atentaj pri tio.”

**21.** Kiam iu disĉiplo unuafoje enoficiĝis kiel pastro en loka templo, Sotesano diris: “Ŝajnas, ke intertempe mi malpli ofte prizorgis vin ol aliajn disĉiplojn. Ĉu vi ne malkontentiĝis per tio? Por havi riĉan rikolton komparano penas pli multe en malbona kaj herbaĉoplana grundo kaj malpli en fekunda grundo. Tiel same troviĝas homoj, kiuj ofte bezonas konsilojn, kaj kiuj boniĝas nur post kelkfojaj konsiloj. Tiel komprenu en via okazo kaj neniel malkontentiĝu.”

**22.** Sotesano revenis de *Jongsan* al la domo *Bongneĝongsa* kaj diris al disĉiploj: “Survoje mi vizitis bazaron. Matene bazaren venis terpotisto kun ĝigeo<sup>172</sup> da varoj kaj iu homo kun malplena ĝigeo. Sed kiam ili hejmeniĝis, la terpotisto surhavis malplenan ĝigeon kaj la homo ĝigeon kun terpotoj. Ili ambaŭ aspektis tre kontentaj. Vidante tion, al mi venis la jena penso. Komence la terpotisto ne venis por la homo kun malplena ĝigeo kaj la homo kun malplena ĝigeo por la terpotisto. Tamen ili akiris nur sian deziron kaj fine ambaŭ ĝojis. Tio ja estas la principo, ke homoj apogas kaj bazas unu sur la alia. Iu homo koleriĝis kaj ne aĉetante foriris, ĉar li trovis butikiston malafabla. Homoj mokis lin pro tio, ke li venis bazaren por bontraktiĝi anstataŭ aĉeti varojn. Alia homo venis sambutiken kaj senerare aĉetis nur siajn necesajojn senkonsidere tion, kia ajn estas la butikisto. Ĉiuj apuduloj rigardis lin prava kaj laŭdis lin kiel solida homo. Vidante kaj aŭdante tion, mi subite komparis tion kun via vivo en la eklezio kaj sola jen ridis, jen vespiris. Per mia rakonto

---

<sup>172</sup> Ĝigeo (k.) 지게: neologismo derivita el la korea vorto *ĝige*, ŝarĝportilo surdorsa kun simila formo al la litero A.



atingu profundan scion.”

**23.** Sotesano diris: “Feliĉe vi envenis en ĉi tiun religion, sed vi diferencas ja per kutimo kaj scio. Nur tia homo rekonas tian homon. Tial inter vi foje estas tiu, kiu foriras ne eltenante eĉ bagatelan aferon. Tia homo estas kiel tiu blindulo, kiu ĝuste kaptis manilon, sed koleriĝas stumblante ĉe la sojlo kaj denove ekvagas. Korpa blindulo scias sian difekton, tial li anticipas atentis sian paŝadon. Sed mensa blindulo ofte ne scias sian difekton, tial li ne rimarkas sin falinta en profundan kavon. Kiel do tio ne estus danĝera?”

**24.** Sotesano diris: “Mi malfermis unu butikon kaj komercis plurjare, sed mi neniom profitis. Ĉar mi donis kredite ĉiujn varojn al homoj. Iu bone vendis la varojn kaj pagis al mi sian ŝuldon, alportante ankaŭ al si konsiderindan profiton. Tamen tiaj homoj plej malmultis. Plejparte homoj ne vendis la varojn kaj konservis ilin hejme kaj post nelonge reportis ilin al mi, aŭ ili perdis la varojn kaj eĉ ne pagis al mi sian ŝuldon. Tial mi havis perdon. Sed de nun mi laŭdos kaj pli glate provizos per varoj tiun, kiu bone profitos el sia vendado kaj pagos al mi sian ŝuldon. Tamen mi severe riproĉos tiun, kiu reportos al mi la varojn, kaj mi nepre akuzos al jurejo kaj traktos tiun, kiu perdos la varojn kaj ne pagos al mi sian ŝuldon.” Sotesano demandis: “Ĉu vi komprenas miajn vortojn?” Iu disĉiplo respondis: “Malfermi butikon estas fondi religian eklezion. Kiu pagas sian ŝuldon kaj alportas al si konsiderindan profiton, tiu estas homo, kiu, aŭskultinte vian instruon, bone diskonigas ĝin al aliuloj kaj multe profitas el la sekvado de ĝi. Kiu reportas la varojn, tiu estas homo, kiu, aŭskultinte vian instruon, memoras ĝin, sed ne sekvas ĝin. Kiu perdas la varojn kaj ne pagos sian ŝuldon, tiu estas homo, kiu, aŭskultinte vian instruon, tute forgesas ĝin kaj ne diskonigas ĝin al aliuloj, nek mem sekvas ĝin. Akuzi al jurejo kaj trakti tiun homon signifas, ke kiu forgesas aŭskultitan bonan instruon kaj ne sekvas ĝin, tiu nepre faras multajn malbonojn kaj nature ricevas multajn punojn.” Sotesano diris: “Vi pravas.”

**25.** Okaze de novjara tago Sotesano diris al homoj: “Lastnokte mi renkontis eksterordinarulon en sonĝo. Li diris, ke sendube ĉi tiu eklezio havos grandan prosperon, sed li zorgis pri tio, ke laŭ la kresko de potenco ĝi povos malestimi aliajn homojn aŭ organizojn. Tial li petis min anticipi averti miajn sekvantojn. Onidire sonĝo estas vanta, sed mia sonĝo estis vere klara, des pli mi havis en la jarŝanĝa tago. Tial mi ne povas ĝin preteratenti. Neniam forgesu respekton al homo, kian ajn vi renkontas. Sciu ke eĉ la plej malnobela homo posedas la povojn kaj helpi kaj malhelpi la progreson de nia eklezio. Tio havas gravan rilaton kun la estonteco de nia eklezio.”

**26.** Ĉiuj membroj ĝojis, ke ĵurnalaj artikoloj serie aperantaj laŭdis nian eklezion. Sotesano diris: “Laŭdo kuntrenas kalumnion. Se nia eklezio plifortiĝos kaj plifamiĝos en la estonteco, estiĝos ankaŭ ĵaluzuloj kontraŭ ni. Tial antaŭscianta tion, ne tro skuiĝu de mondaj laŭdoj kaj kalumnioj, sed ĉiam ekzamenante vin, plenumu nur ĝustan laboron.”

**27.** Sotesano diris: “Kiam homo volas plenumi iun laboron en la mondo, li alfrontas tiom da suferoj kaj malfaciloj, kiom da skalo havas la laboro. Preskaŭ ne ekzistas tiuj, kiuj sensufere sukcesis, inter budhoj, bodisatvoj, saĝuloj, granduloj kaj lertuloj tra la tutmonda historio. Forĵetante ĉiujn glorojn de sia kronprinceco, Ŝakjamunio elpalaciĝis por bonziĝi kaj dum ses jaroj li travivis multajn suferojn kaj malfacilojn. Ankaŭ post la fondo de sia eklezio li traelpartis diversajn suferojn kaj eĉ eksteruloj murdaĉis lian disĉiplon. Sed liaj disĉiploj transdonis lian grandan darmon de generacio al generacio kaj hodiaŭ ĉiuj vivuloj senlime respektas lin. Kiam Konfuceo travagis la ĉinan kontinenton por starigi justecon en la periodo *Ĉunĉu*<sup>173</sup>, oni insultis lin, eĉ ke li estas kiel hundo de funebra hejmo<sup>174</sup>. Li travivis la ribelon de *Ĝinĉe*<sup>175</sup> kaj multajn persekutojn. Sed liaj disĉiploj konstante penadis starigi

<sup>173</sup> Periodo *Ĉunĉu* 춘추시대 春秋時代: tempo de 770 aK ĝis 403 aK en la ĉina historio.

<sup>174</sup> Hundo de funebra hejmo 상가의 개: metaforo por malzorgata, neglektata, neinvitita gasto.

<sup>175</sup> Ribelo de *Ĝinĉe* 진채의 난 陳蔡之亂: kontraŭregistara ago okazinta en la tempo de Konfuceo.

lian principon de homa moralo kaj hodiaŭ la mondo respektas lin kiel sanktulon. Kiam Kristo disvastigis sian evangelion, li traelporis ĉiajn persekutojn kaj insidojn kaj fine estis krucumita. Sed liaj disĉiploj ĉiapene transdonis lian instruon kaj hodiaŭ lia merito etendiĝas sur la tutan mondon. Kiel do kritikoj kaj suferoj ne okazus al ni, kiuj agadas kun granda celo en ĉi tiu mondo ondoplena? Ni ankoraŭ ne alfrontis grandajn kritikojn kaj subpremojn. Sed laŭ la plimultiĝo de niaj membroj kaj la pligrandiĝo de nia laboro povos naskiĝi iuj el ni, kiuj eraros kaj difektos la reputacion de nia eklezio. Tamen se nia celo vere estas priservi la mondon kaj nia instruo vere necesas por savi la mondon, misfaroj de unu aŭ du homoj aŭ eraroj en unu aŭ du aferoj ne detruos nian tutan eklezion kaj la eklezio fine elmontriĝos tia, kia ĝi reale estas, malgraŭ ajnaj insido kaj persekuto. Kompardire monto pli klare vidiĝas post la malapero de nebulo, kiu kovras ĝian aspekton. Tial ne ĉagreniĝu de ajna sufero, sed ĝisfine strebu al la celo, bontenante vian konsciencon, kaj nia granda laboro sukcesos perfekte. Pri tio mi certas.”

**28.** Sotesano diris: “Estas tri kialoj de malsukceso en ajna laboro. Unu estas esperi rapidan kaj grandan sukceson sen peno. La dua estas agi senprudente, ne sciante, kiu laboro estas ĉefa aŭ flanka kaj farendas unue aŭ poste. La tria estas limigi sin per malgranda malsukceso aŭ profito antaŭ la finlaboro kaj fine alporti al si grandan malsukceson. Ĉiu laboranto devas ĉiam atenti ĉi tiujn tri.”

**29.** La industria fako de la eklezio bredis kokojn sub la aŭspicioj de provinca registaro. Iun tagon varmakvujo en la kokejo disrompiĝis pro malatento kaj multaj kokidoj vundmortis. Respondeculo tre embarasiĝis kaj tuj alkuris la ŝtatoficejon por raporti la akcidenton. La koncerna ŝtatoficisto diris: “Se vi volas atingi grandan sukceson en kokobredado, vi devas spiti eĉ pli grandan malsukceson. Kiam homo bredas amason da kokoj, li povas multe malprofiti pro neatenditaj katastrofoj kaj akcidentoj, sed estas ankaŭ diversaj rimedoj preventi ilin. Se li ne spertas tian malgrandan malsukceson en malgranda bredado, li ja ne povos eviti grandan malsukceson en granda bredado. Tial via nuna malgranda perdo estas utila sperto, per kiu vi preventos grandan malsukceson en la estonteco. Neniel senesperigiu, sed plu klopodu.” Reveninte, la respondeculo rakontis. Sotesano diris: “Lia parolo vere estas prediko. Estas la proverbo, ke venas saĝo post laboro. Ĉi tiu malgranda malsukceso estas bona ekzemplo por estonta sukceso. Kiel do tio limiĝus nur al kokobredado? Kiam ni studas kaj laboras en la eklezio, ni devas atenti ĉiujn okazojn kaj sukcesajn kaj malsukcesajn kaj nepre serĉi la kialojn de sukceso kaj malsukceso. Ni devas observi ankaŭ aliajn religiojn, kial ilin la mondo bonvenigas aŭ malakceptas, kaj kial ili bonfamiĝas aŭ ĉifamiĝas dum longa tempo. Se ni ĉiam tiamaniere ekzamenas nin, korektas nin kaj sekvas nur ĝustan vojon, nia eklezio estos modela religio, kiu utilos al ajnaj individuoj, familioj, socioj kaj landoj, kaj kiun la publiko bonvenigos. Alie ĉiaj kulpoj okazos al ni kaj la mondo malakceptos nin. Kiel do tion preteratenti?”

**30.** Sotesano diris: “Nenio en la mondo povas iĝi grandaĵo krom el malgrandaĵo. Do estas natura principo, ke grandaĵo iĝas el malgrandaĵo. Kiam ni trarigardas la historion de ĉiuj mondkonataj religioj, ili estis tre malfortaj en sia fondperiodo, sed ili plifortiĝis kun la longa tempo kaj nun estas grandaj religioj. Ankaŭ ĉiuj aliaj grandaj laboroj estas nenio alia ol la akumulita rezulto de malgrandaj fortoj. Se ni kun la spirito de elmalgrandaĵa grandaĵiĝo daŭrigas malegoisman penadon por progresigi nian eklezion, granda rezulto spontane venos al ni. Se ni obeas la gvidon de instruisto kaj orde studas sen rapidemo, ni fine sukcesos. Sed se ni intrige strebas al la momenta disvastiĝo de la eklezio, aŭ se ni per partia studo volas atingi grandan darmforton en mallonga tempo, tio estas nur stulta deziro kaj kontraŭprincipa ago. Ni forpasigas tempon malgraŭ tutforta penado. Nu, mi deziras, ke kiam vi studas, laboras aŭ faras ion ajn, vi ne havu elmontriĝemon kaj rapidemon, sed nepre plenumu vian celon laŭ la supre menciita principo de elmalgrandaĵa grandaĵiĝo.”

**31.** Sotesano diris: “Kiam eĉ ordinarulo volas dungigi laboriston por unu tago aŭ serviston por unu jaro, li ekzamenas la kvalifikon kaj fideindecon de la dungoto. Des pli kiam la ĉielo volas komisi al homo grandan laboron, ĝi nepre ekzamenas lin. Tial kiu volas plenumi grandan laboron, tiu estu tre atenta por trapasi sukcese la ekzamenon.”

**32.** Sotesano diris: “Por fari grandan eklezion kompreneble necesas renkonti tian homon, kiu estas riĉa je talento, scio kaj havaĵo. Tamen li povas fariĝi nur kiel heĝo. Pligravas renkonti tian homon, kiu estas sindona, kvankam malsprita kaj malklera. Li ja povas fariĝi fidela mastro kaj atingi grandan sukceson en ĉiuj laboroj.”

**33.** Sotesano diris al la homoj en darmkunveno: “Hodiaŭ mi parolos pri kreanto kaj detruanto de ĉi tiu eklezio. Aŭskultu min atente. Kreanto de ĉi tiu eklezio rekte penas por la eklezio mense, korpe kaj materie. Li regule ĉeestas darmkunvenon kaj fidele faras fikspordan trejnon. Li diligente studas la sanktajn librojn hejme kaj tute komprenas ĉiujn niajn doktrinojn kaj sistemojn. Li utiligas la instruojn en ĉiutaga vivo kaj ĉiuflanke estas modelo de aliuloj. Tiel li nerimarkate kontribuas al la eklezia progreso. Detruanto de ĉi tiu eklezio rekte malutilas al la eklezio mense, korpe kaj materie. Li apenaŭ ĉeestas darmkunvenon kaj ne plezuras per fiksporda trejno. Li ne deturniĝas de malnova fikutimo. Li laŭplaĉe malobeas la preceptojn kaj nur damaĝas sin kaj aliulojn. Tiel li malhonoras la eklezion kaj malhelpas ĝian progreson. Klare memorante ĉi tion, vi ne fariĝu detruanto de ĉi tiu eklezio, sed ĉiam klopodu akumuli la meriton de eminenta kaj eterna kreanto.”

**34.** Sotesano diris: “Multas manieroj progresigi ĉi tiun eklezion, sed mi ekzemplos dek unu ĉefajn punktojn. Ili estu kriterioj por elekti ĉiun kontribuanton al la eklezia progreso. La unua estas dediĉi sin mense kaj korpe al la eklezio. La dua estas oferi multajn materiojn al la eklezio. La tria estas esti konsekvenca de post la membriĝo. La kvara estas multe interpreti la sanktajn librojn kaj registri predikojn. La kvina estas bone plenumi la regulojn kaj preceptojn. La sesa estas ĉiamaniere ĝojigi samideanon, por ke li progresu en studo kaj laboro. La sepa estas iel ajn strebi nur al la eklezia progreso. La oka estas persisti en altruismo. La naŭa estas senpensi en ago. La deka estas membriĝi fifamulon, kiu pentofaros kaj fariĝos modelo de ĉiuj homoj kaj nature kuraĝigos multajn homojn. La dekunua estas iel ajn membriĝi bonfamulon, kiu nature kuraĝigos ĉiujn homojn kaj altigos la eklezian statuson.”

**35.** *Hŭang Ĝongŝinheng*<sup>176</sup> demandis: “Ŝakjamunio diris, ke oni bonfaru sen penso. Kristo diris, ke la maldekstra mano ne sciu, kion oferas la dekstra. Sed vi enkondukis labornotojn<sup>177</sup> kaj registras ajnan kontribuon de ĉiuj kredantoj. Ĉu tio ne kaŭzas al oferanto pesemon?” Sotesano respondis: “Nur kiam oferanto bonfaras sen penso, akumuliĝas neelĉerpebla feliĉo. Tamen ricevanto devas honoru kaj rekompenci oferinton, tial necesas taksu lian meriton klare.”

**36.** Sotesano diris: “Vi ĉiuj mastriĝu en la komunumo. Privata mastrumaĵo aŭ laboro ĉu granda, ĉu malgranda transdoniĝas tradicie al idoj, sed publikaj mastrumaĵo kaj laboro transdoniĝas nur al senpartia homo, kiu faras senpartian agadon por la publiko. Se vi komprenas ĉi tiun principon kaj fariĝas senpartiaj homoj, ĉiuj niaj ekipaĵoj, instruoj kaj honoroj apartenas al vi kaj estas sub via direktado. Ĉi tiu eklezio estas la publika havaĵo de la mondo, kiun direktas nur altmoralaj kaj sindonaj homoj, tial vi kune penu mastriĝi en ĉi tiu komunumo.”

**37.** Sotesano instrukiis al pastroj: “En ĉi tiu tumultita epoko ĉiam danku tutkore la kvar bonfarojn kaj profunde konsciigu iliajn grandecon kaj gravecon al kredantoj kaj konduku

---

<sup>176</sup> *Hŭang Ĝongŝinheng* 黃淨信行 (1903-): ŭonbulana alnomo *Paltaŭon*, laiko, *dehobop*, unu el la naŭ disĉiplinoj de Sotesano.

<sup>177</sup> Labornotoj 사업성적 事業成積: en dek du gradoj oni taksas mensan, korpan kaj materian kontribuon de ĉiuj ŭonbulanoj al la eklezio.

ilin al dankema, modera kaj fidela vivo. Lastatempe religiaj organizoj en ĉi tiu lando ofte prenis de siaj kredantoj multajn havaĵojn kaj malzorgigis al ili mastrumadon, tiel ke la organizoj malbone influis ĝeneralan socion. Tial foje okazis, ke multaj kritikoj malfondigis eĉ iujn el ili. Ni do gvidu kaj kuraĝigu niajn kredantojn diligenti en sia profesio kaj pli bonigi sian vivon per nia studo ol antaŭe. Monda situacio pli kaj pli aliĝas kaj antaŭ longe falis serioza baro inter viro kaj virino, sed ĉiuokaze ni priatentu asociiĝon kun aliseksuloj kaj neniom difektu la eklezian prestiĝon. Nia prospero dependas ĝuste de tio, ĉu ni atentis ĉi tiujn tri punktojn aŭ ne. Ne preteraŭskultu miajn vortojn.”

**38.** Sotesano instrukiis al pastroj: “Mi petas vin, kiuj rekte instruas niajn kredantojn, esti honestaj en dono kaj ricevo de materio. Klare kaj rapide librotenu la spezon de publika mono. Ne forlogiĝu al senradika famo. Ne komentu senprudente pri siatempa politika afero. Ne malhelpu alian religion kaj ĝian sanktejon. Kovru bone kulpon de kredanto kaj harmoniu senfiere kun ĉiuj kredantoj, sed ne permesu al ili maldecan trorespekton al vi. Atentu aparte inter viro kaj virino. Diskonigu bone aliulan meriton, sed ne troigu vian. Ne koncentru sur vin la kredon de kredanto. Ne limigu je via templo laboremon de kredanto. Memoru, ke vi estas anstataŭantoj de la ĉefmajstro en via templo, kaj plenumu vian devon sen difekti la kvalifikon.”

**39.** Sotesano jarfine alvokis *Ĝo Gapĝong*<sup>178</sup> kaj aliajn disĉiplojn kaj ordonis al ili fari ekzakte la spezokonton de la kuranta jaro kaj la buĝeton de la nova jaro. Sotesano diris, detale memkontrolante: “Sen la speza ekvilibro de familio, organizo aŭ ŝtato ĝi ne povas prosperi. La pasinteco en religio ne rigardiĝis kiel vera religiulo tiu, kiu diskutis pri havaĵo, sed ĉe novmonda religio kunperfektigas korpo kaj spirito. Tial nia eklezio ekipas kaj la centran sidejon kaj la lokajn templojn per librotena dokumento kaj kontrolas ĉiun spezon, tiel ke nia eklezio forigas difekton en korpa kaj spirita kampoj kaj kune gradigas studon kaj laboron.”

**40.** Sotesano diris al pastroj: “Kiam vi parolas kaj skribas por homoj, ne diru nur por akiri plaĉon vortojn nepraktikeblajn, troigajn, ruzajn, misterajn, malfacilajn kaj partiajn. Tiaj vortoj ne utilas al la mondo, nek faras homojn iluminiĝintoj.”

**41.** Sotesano diris: “Kiam vi gvidas homojn, ĉiam atente observu, kien direktiĝas ilia spirito. Se vekigis eĉ iom da nebona moro ĉe ili, studu manieron ĝustigi ilin kaj ĝisfine klopodu deturni ilin per vorto aŭ ago konforme al situacio. Ekzemple, se ili ne emas labori, laboru fizike por inspiri al ili laboremon. Se ili avidas memfierecon, famon kaj profiton, humiliĝu antaŭ ili por estigi ilian memhontiĝon. Tiel same en ĉia okazo preventu kaj kuracu ilian malbonon per via anticipa memago. Tio estas tiel nomata bodisatva maniero gvidi kaj instrui vivulojn.”

**42.** Sotesano diris: “Por sukcese fondi novan eklezion en ajna epoko esence gravas ne nur havi doktrinon kaj sistemon, kiuj superas tiujn de la pasinteco, sed ankaŭ renkonti samideanojn, kiuj vaste utiligas ilin. En la eklezio de Ŝakjamunio estis dek elstaraj disĉiploj el mil ducent sekvantoj. La disĉiploj laŭ sia aparta povo unue praktikis lian instruon kaj stimulis multajn homojn kaj modele agis ĉiuflanke. Tiel la homoj poiome instruiĝis danke al la spirito de la dek disĉiploj kaj fine konstruis grandan eklezion en la Vulturpinta Monto. Nun mi ekzemplos la instrumanierojn de la dek disĉiploj. Iu homo faris eraron. Se rekta riproĉo negative efikis al li, du aŭ tri disĉiploj kaŝdiskutis pri la maniero ĝustigi lin. Unu el ili intence faris la saman eraron kaj la ceteraj alvokis kaj severe riproĉis lin. Li konfesis sian eraron, ĵuris pentofaron kun danko kaj fine korektis ĝin. Per tio la vera erarinto nerimarkate ekpentis kaj senvorte korektis sian eraron. Tiaĵo estis laboro kaj instrumaniero de la dek

---

<sup>178</sup> *Ĝo Gapĝong* 조갑중 趙甲鍾 (1905-1971): ŭonbulana alnomo *Ujsan*, pastro, *debongdo*, filo de *Ĉoj Dohŭa*.

disĉiploj. Krome iukaze por gvidi homojn ili ŝajnis sin nesciaj, misfarintaj, avidaj aŭ pasiaj kaj poste deturniĝis al la origina stato. Ili malkaŝe aŭ sekrete faris ĉiajn favorajn kaj kompatajn agojn, kiel gepatroj prizorgas siajn infanojn, kaj kiel kokino kovas siajn ovojn. Tiamaniere ili multe malpezigis la savpenon de Ŝakjamunio kaj la homoj facile lernis lian ĝustan darmon. Kiom granda estas ilia kompatemo kaj kiom vasta estas ilia merito! Nu, mi petas vin en la komunuma vivo ĉiam sekvi la ekzemplojn de la dek disĉiploj kaj iĝi gvidantoj kaj ĉefaj figuroj por progresigi ĉi tiun eklezion.”

## 14 Perspektivo

1. Sotesano diris: “Mondsava sanktulo kun potenca darmo nepre aperas en degenera kaj malfacila epoko. Li deturnas la universan spiriton, ĝustigas la mondon kaj harmoniigas homojn.”

2. Sotesano verkis multajn kanzonojn kaj ĉinideogramajn poemojn kaj kolektis ilin en la libro *Bopujdeĝon*. Ilia signifo estis vere okulta kaj malfacile komprenebla per ordinara scio. Ili temis precipe pri tio, ke la tranĉita vejno de moralo reviviĝos, kaj ke al la mondo venos favora situacio post malfavora, kaj pri la fondplano de nova eklezio. Poste li mem forbruligis la libron, por ke ĝi ne postrestu en la mondo. Sed buŝe transdoniĝis la unua verso de ĝia antaŭparolo: “Malfermiĝas la grandekstremo kaj malsupreniĝas la ĉefa ĉielo en tiun menson, kiu ĉesigas antaŭan epokon kaj postan heredas.” kaj la jena dekunuversa ĉinideograma poemo:

*“Trapasinte dek mil valojn kaj mil pintojn montajn,  
mi renkontas mastron senmondecan kaj senspuran.*

*Sovaĝherboj kreskas danke al la pluvo-roso,  
universa ŝanco venas al la ĝustmensulo.*

*Kiam mi sagpafas brilan sunon en ĉielo,  
min envolas kvinkolora nubo el la truo.*

*Pitoreskan lokon serĉas la nubrajda feo,  
pleje bonas loko, kie harmonias ĉio.*

*Longa la rivero en si tenas mondan volon,  
vojo fontas el akordo de la jino-jango,*

*Kia loko estas do la regiono Honam<sup>179</sup>?  
Ĝi ja estas la plej bela loko en la mondo.*

*Mi mezuras universajn longon kaj direktojn,  
kaj mi faras veston laŭ la homoj kaj transdonas.*

*Ĉio en la mondo venas de la samutero,  
suno-luno harmonie faras tagon-nokton.*

---

<sup>179</sup> *Honam* 호남 湖南: alia nomo de la provinco Ĝolado, la sudokcidenta regiono de Koreio.

*Universo muĝas pro ventblovo en aero,  
orienta luno igas ĉiujn landojn lumaj.*

*Kiam malaperas vento, pluvo, roso, neĝo,  
samatempe floras kaj eternas la printempo.*

*Vojtrejnita menso belas kiel luno brila,  
virtigita korpo estas kiel ŝipo granda.”*

3. Iu disĉiplo rigardis grava nur scion pri ĉinideograma skribo. Sotesano diris: “Moralo origine ne dependas de litera scio, tial vi nun lasu tian penson. Estonte oni devos skribi ĉiun sanktan libron en simplaj vortoj, kiujn facile komprenas ordinaruloj. Baldaŭ venos la tago, kiam sankta libro kompilita en la korea tradukiĝos en diversajn lingvojn kaj ilin lernos multaj homoj en la mondo. Ne adoru nur ĉinajn ideogramojn malfacilajn.”

4. Kiam Sotesano konstruis la centran sidejon de ŭonbulismo en *Iksan*, li demandis nemultajn disĉiplojn en pajltegmenta domo kelkĉambra: “Kun kio kompareblas nia nuna eklezio?” *Gŭon Deho*<sup>180</sup> respondis: “Kun rizbedo.” Sotesano denove demandis: “Kial vi komparas tiel?” Li respondis: “Nun nia eklezio estas tia, ke en ĉi tia dometo nur kelkdekoj da homoj sekvas kaj ĝuas ĉi tiun darmon, sed el tio la darmo disvastiĝos estonte al la tuta mondo.” Sotesano diris: “Vi pravas. Rizo de tiu vasta kampo devenas de ĝia malvasta bedo. Tiel same ni estonte montriĝos la prapatroj de mondkonata granda eklezio. Iuj povas mokridi ĉe miaj vortoj. Sed multaj homoj sopiros kaj petos nian darmon eĉ post la unua periodo<sup>181</sup> de nia eklezio. Nia lando petos ĝin post kelkaj jardekoj kaj la tuta mondo post kelkaj jarcentoj. Tiam estos sennombraj homoj, kiuj tre bedaŭros ne vidi min, kaj ili envie respektos vin, kiuj nun nombras malpli ol cent, kaj eĉ membriĝintojn ene de la unua periodo.”

5. Reveninte de la vojaĝo en la monto *Gumgangsán*, Sotesano versis la jenan frazon:  
*“Kiam bela monto Gumgang diskoniĝos monde,  
Koreio iĝos Koreio ja denove.”*

Li diris al homoj: “La monto *Gumgangsán* estas mondfama monto kaj en la baldaŭa estonteco estos nomata monda parko, kiun prizorgos ĉiuj landoj. Tiam homoj en la mondo kvazaŭ konkurence vizitos la mastron de la monto. Se la mastro anticipe ne preparos sin, per kio li povos regali venantan gaston?”

6. Okaze de la datreveno de la eklezifondo Sotesano diris al homoj: “Nia lando havas unu grandan trezoron. Ĝi estas la monto *Gumgangsán*. La lando nepre diskoniĝos al la mondo pro la monto kaj la monto nepre plilumiĝos pro sia mastro. La lando, la monto kaj la mastro do havas nedisigeblan interrilaton kaj kunfariĝos la lumo de la mondo. Nu, ne malesperu pri la nuna situacio de nia lando, sed klopodu ekipi vin per tia kvalifiko por respondi, ke kiam la mondo serĉas la veran montmastron, jen estas li. La mastro devas kultivi tian personecon kiel la monto. Kultivu kaj lumigu ĝin, kaj vi akiros la lumon. Por esti kiel la monto, ne perdu la originan naturon, estante sinceraj kiel la monto. Tutkore okupiĝu pri via respektiva devo, estante prudentaj kiel la monto. Ne ŝanĝu viajn fidon kaj volon, estante firmaj kiel la monto. Tiam monto estos substanco kaj homo estos funkcio. Substanco estas senmova kaj funkcio estas mova. Monto restas senmova, sed ĝi povas fariĝi substanco. Tamen homo povas fariĝi funkcio nur per sia bonagado. Tial vi studu rapide la superegan darmon de budho, estu bonvenigataj de ĉiuj homoj, kiel la monto *Gumgangsán* elstaras inter ĉiuj

<sup>180</sup> *Gŭon Deho* 권대호 權大鎬 (1910-1931): ŭonbulana pastro.

<sup>181</sup> Unua periodo 제일대 第一代: tridek ses jaroj, kiujn Sotesano tripartigis po dek du jaroj.

montoj en la mondo, kaj faru ĉi tiun eklezion modelo de ĉiuj aliaj eklezioj. Tiam la monto kaj la homo kune elmontros brilan lumon.”

7. Sotesano vojaĝis al *Gongŭ* kaj diris al *Mun Gonggju* kaj *Bak Hoĝang*<sup>182</sup>, kiuj lin vizitis: “Survoje al *Gongŭ* mi vidis multajn ridindaĵojn. Kiam mi matene trapasis iun vilaĝon, mi vidis, ke iu homo profunde dormis, malgraŭ ke jam tagiĝis, ĉio vekiĝis kaj la ĉirkaŭo bruis; iu homo prisemis glacian kampon en malvarma vento; alia homo frostotremis, ankoraŭ portante someran veston.” *Gonggju*, komprenante la signifon, demandis: “Kiam la dormanto en plena taglumo vekiĝos kaj elĉambriĝos? Kiam la prisemanto de glacia kampo kaj la portanto de somera vesto en vintro rekonos la ĝustan tempon fari tion?” Sotesano respondis: “Kvankam la homo profunde dormas ne rimarkante la tagiĝon, li nepre vekiĝos de longa ekstera bruo de ĉiuj vekiĝintoj, vidos la sunleviĝon malfermante la pordon kaj eklaboros. La prisemanto de glacia kampo kaj la portanto de somera vesto en vintro sendube malsukcesos en sia laboro, ĉar ili ne scias la ĝustan tempon. Travivinte multajn suferojn kaj malfacilojn, ili rigardos al homoj, kiuj scias la ĝustan tempon, kaj poiome mem sciiĝos pri ĝi.”

8. *Gim Giĉon* demandis: “Nuntempe homoj organizas siajn sektojn, asertante sin ĝustaj kaj nomante sin instruistoj. Tamen kiam mi vidas iliajn instruojn, malindas nomi ilin instruistoj. Ĉu ili estas veraj instruistoj?” Sotesano respondis: “Jes.” Li denove demandis: “Kial vi opinias tiel?” Sotesano demande respondis: “Vi diris, ke vi scias distingi veron de malvero pere de ili. Ĉu tio ne sufiĉas por nomi ilin veraj instruistoj?” Li denove demandis: “Tio estas tia. Kiam ili povos havi kvalifikon kiel veraj instruistoj?” Sotesano respondis: “Venas realo post iluzio, aperas vero post malvero. Per multfoja sperto kun vero-malvero kaj realo-iluzio malvera instruisto povas nature ŝanĝiĝi en veran instruiston.”

9. Sotesano diris: “Nuntempe la mondo plenas je tiaj homoj, kiuj deziras ilumiĝi sen studo, kiuj deziras sukcesi sen peno, kiuj atendas nur ŝancon sen preparo, kiuj mokas grandan vojon per sorĉarto, kaj kiuj kalumnias juston per intrigo, tiel ke ili iras brue, kvazaŭ ili havus ian grandan povon. Ili estas tiel nomataj tagdemonoj. Sed kiam la epoko plilumiĝos, tiaj homoj nenie povos trovi sian starlokon kaj en la mondo staros nur darmo necesa por homa justeco. Tia mondo nomiĝas grandluma mondo.”

10. Sotesano vizitis Seulon kaj iun tagon promenis en la parko *Namsan*<sup>183</sup>. Rimarkante lian figuron eksterordinara, kelkaj junuloj venis saluti lin kaj donis siajn vizitkartojn. Kiam ankaŭ Sotesano donis sian vizitkarton, ili diris, montrante kritikan ĵurnalartikolon pri iu nova religio, kiu faris grandan skandalon al siatempa socio: “La religio faris multajn malbonojn, tial nia junularo debatas ĝiajn malbonfarojn kaj iros surloken por ekstermi ĝian ekziston.” Sotesano demandis: “Kio estas ĝiaj malbonfaroj?” Iu junulo el ili respondis: “Ĝi allogas malriĉajn kamparanojn per superstiĉaj vortoj kaj akaparas iliajn havaĵojn. Se oni daŭre preterlasos tion, ĝi serioze influos la mondon malbone, tial ni celas ekstermi ĝin.” Sotesano diris: “Mi ja komprenas vin, tamen neniu povas ĉesigi ion ajn, kiam aliulo volas fari tion spite al sia vivoperdo. Kiel do vi povus malhelpi tion, kion tiu religio volas fari?” Li demandis: “Ĉu tio signifas, ke la religio eterne ekzistas sen detruigo?” Sotesano respondis: “Mi ne parolis pri la daŭrado de ĝia ekzisto, sed nur pri tio, ke ne eblas perforte ĉesigi tion, kion aliulo obstine volas fari. Ĉiu homo ŝatas profiton kaj malŝatas malprofiton. Tial se ĉiam venas profito dum la interrilatoj de homoj, ili eterne estas proksimaj, kaj se venas malprofito, ili eterne ne povas esti proksimaj. Ĝusta vojo komence ŝajnas malutila, sed fine estas utila, dum malĝusta darmo komence ŝajnas utila, sed fine estas venena. Se la religio instruas ĝustan vojon, vi ĝin neniel sukcesos ekstermi. Se ĝi instruas malĝustan

<sup>182</sup> *Bak Hoĝang* 박호장 朴戶張 (?-1929): ŭonbulana laiko.

<sup>183</sup> Parko *Namsan* 남산공원 南山公園: parko situanta en la monto *Namsan* en la seula centro.

vojon, ĝi spontane detruigōs eĉ sen via ekstermado.”

**11.** La junulo denove demandis: “Kio estas via opinie taŭga maniero instrui la mondon sukcese?” Sotesano respondis: “Ne estas speciala maniero, sed mi diros unu ekzemplon. Se iu estas lerta je terkultivo kaj diligente laboras kaj havas multe pli bonan rikolton ol ĉiuj aliuloj en la sama regiono, ili nature sekvas lian manieron. Se iu sen bona rikolto nur rekomendas sian manieron al aliuloj, ili neniel sekvas ĝin. Tial mi ofte diras, ke anticipe memagi estas instrui aliulon.” Li demandis: “Vi instruas ja lertmaniere. Ĉu tamen indas ekzisti religio, kiu enmizerigas homojn per malbonfaroj?” Sotesano respondis: “Por la mondo laboras kaj la religio kaj vi.” Li denove demandis: “Kial vi opinias, ke la religio laboras por la mondo?” Sotesano respondis: “La religio estas kiel batuisto. Kiel do pafistoj povus kapti ĉasaĵon sen batuista alpelado? Nun estas la tempo por konstrui novan mondon, sed homoj ne konscias la situacion kaj dormegas sen aspiro. Ĉiujn homojn vekas kaj instigas diversaj religioj tie kaj tie leviĝantaj. Nur tiam ĉiuj talentuloj enmondiĝinte spertas jen veraĵon, jen falsaĵon, kaj jen trompas aliulojn, jen trompiĝas de ili, tiel ke ili en ĉiuj aferoj distingus veron de malvero, juston de maljusto kaj fine renkontas ĝustan religion kaj ĝustan homon kaj plenumas ĝustan laboron. Tion ili ŝuldas ja al la alpelado de tiaj diversaj religioj. Tial tiu religio ankaŭ laboras por la mondo.” Li denove demandis: “Tio estas tia. Kial vi opinias, ke ni laboras por la mondo?” Sotesano respondis: “Observante la farojn de ĉiuj religioj, vi laŭdas iliajn bonfarojn kaj kritikis iliajn malbonfarojn. Kiu ajn estas kritikata, tiu indignas kaj penas ne plu esti kritikata, denove streĉante sin. Tial vi estas laborantoj, kiuj kuraĝigas kaj sinekzamenigas ĉiujn religiojn laborantajn por la mondo. Sen via tia agado ili apenaŭ povas akiri la forton antaŭeniri. Ankaŭ via merito estas granda.” La junuloj profunde impresiĝis kaj respektplene diris: “Viaj vortoj estas spertaj pri ĉiuj direktoj kaj havas nenan baron.”

**12.** Iu homo diris: “Mi kredas vian darmon ne nur epokokonvena, sed ankaŭ ĝusta, tamen ĝi ankoraŭ havas mallongan historion kaj ne enradikiĝas profunde. Tial mi scivolos, kio okazos en la tempo de viaj postaj generacioj.” Sotesano diris: “Se vi jam scias ĉi tiun darmon ĝusta, ne zorgu pri ĝia disvastiĝo en la tempo de miaj postaj generacioj. Vidu! Ŝtelo estas malbonfaro. Malgraŭ ke registaro klopodas forigi ĝin, kaj ke socio tute ne akceptas ĝin, ĝia semo ne malaperas kaj ĉagrenas nin, ĉar estas homoj, kiuj bezonas tian malbonfaron. Des pli ne necesas paroli pri la ekzisto de ĝusta darmo, kiun ĉiuj homoj bezonas. Jen estas alia ekzemplo. Homoj en la mondo uzas ĉiujn materiojn kaj teknikojn ne por iliaj inventintoj, sed por sia oportuneco. Eĉ se aliulo konsilas al ili ne uzi ilin, ili nature uzas ilin, kiujn ili mem trovas utilaj. Tiel same malgraŭ aliula malkonsilo homoj nature kredas ĉiujn instruojn, kiujn ili memsperte trovas utilaj. Kiam multiĝos tiaj homoj, ankaŭ ĉi tiu instruo disvastiĝos, ĉu ne?”

**13.** Iu homo demandis: “En la oriento kaj en la okcidento jam ekzistas konsiderinda nombro da malnovaj religioj interdisputantaj de jarmiloj. Krome lastatempe tie kaj tie fondiĝis novaj religioj, kiuj asertas nur sian opinion kaj malakceptas aliulan, tiel ke tio plimultigas kritikojn kaj pliakrigas disputojn. Kiel aspektos la estonteco de la religia mondo?” Sotesano respondis: “Iu viro, havante sian familion en Seulo, travojaĝis diversajn landojn en la mondo. Restante plurlandare en kelkaj landoj el ili, li kunvivis kun surlokaj virinoj kaj naskigis infanojn kaj revenis al Seulo. Intertempe liaj infanoj kreskis en siaj landoj kaj ili ĉiuj kunvenis por vidi sian patron en unu loko. Ĉu tiam povas tuj intimiĝi kaj akordiĝi ili, kiuj diferencas vizaĝe, lingve, more kaj kondute? Sed kunvivante jarojn, ili maturiĝos, interkompreniĝos, kutimiĝos al la samaj lingvo kaj moro kaj detale rekonos sian fratecon, tiel ke ili plene scios la samsangecon kaj kunvivos en harmonio. Tiel same ĉiuj religioj diferencas inter si, sed originas el unu fonto. Kiam homoj multe pli saĝiĝos kaj moralo egale lumos, ĉiuj religioj formos unu familion kaj intime interrilatos en harmonio.”



**14.** Kiam Ĝo Songgūang unuafoje vizitis, Sotesano demandis: “Vi aspektas malsama ol ordinara homo. Kian kredon vi havas?” Li respondis: “Mi kredas Dion de pluraj jardekoj kaj estas presbitero de kristana preĝejo.” Sotesano demandis: “Vi kredas Dion de tiel multaj jaroj. Ĉu vi povas diri al mi, kie estas Dio?” Li respondis: “Estas dirite, ke Dio estas ĉioscia, ĉiopova kaj ĉieesta.” Sotesano demandis: “Se tiel, ĉu vi vidis kaj aŭskultis Lin kaj ricevis de Li instruon?” Li respondis: “Mi ankoraŭ ne vidis Lin, nek parolis kun Li.” Sotesano diris: “Se tiel, vi ankoraŭ ne fariĝis kordisĉiplo de Kristo” Li demandis: “Kiamaniere mi povas vidi Dion kaj ricevi de Li instruon?” Sotesano respondis: “Tio realigeblas, nur se vi diligente studas kaj fariĝas kordisĉiplo de Kristo.” Li demandis: “En *la Biblio* estas dirite, ke Kristo ŝtele revenos mondfine, kaj ke tiam aperos multaj pruvoj de Lia alveno. Ĉu Li vere alvenos iam?” Sotesano respondis: “Sanktulo neniam mensogas. Se vi bone studas kaj ilumiĝas, vi rimarkos ankaŭ la alvenon de Kristo.” Li diris: “Mi de longe atendas grandan instruiston, kiu rekte min instruos. Mi tiel kontentiĝas per nia renkontiĝo, ke mi volas tuj fariĝi via disĉiplo. Sed aliflanke mi sentas min kvazaŭ apostato kaj tio ĉagrenas mian konsciencon.” Sotesano diris: “Eĉ kristano komprenas mian laboron, nur se li estas kordisĉiplo de Kristo. Ankaŭ mia disĉiplo komprenas tiun de Kristo, nur se li estas mia kordisĉiplo. Nescianto distancigas ĉi tiun religion de tiu religio, rigardas sian konvertiĝon kiel apostatadon kaj malamikas kun alireligianoj. Sed versciante komprenas, ke ĉiuj religioj diferencas nur per nomo laŭ epoko kaj loko kaj estas samfamilianoj. Via disĉipliĝo dependas nur de via decido.” Li stariĝis kaj riverencinte denove esprimis sian volon disĉipliĝi. Sotesano fine akceptis lian volon kaj diris: “Eĉ de nun pli fidele kredu Dion, kaj vi fariĝos mia vera disĉiplo.”

**15.** Sotesano diris: “Tutage mi legis sutron, en kiu mi trovis la jenan rakonton. Iu disĉiplo demandis Ŝakjamunion: ‘Kiam ajn ni vidas kaj aŭskultas vin, en nia menso senlime estiĝas respekto kaj ĝojo. Sed estas iuj, kiuj priklaĉas kaj kalumnias vin kaj eĉ malhelpas nin viziti vin. Kial ili agas kontraŭ vi, kiu ĉiam korfavo kaj komplete instruas nin?’ Ŝakjamunion respondis: ‘Kiam la suno leviĝas el la oriento, ĝi lumas unue sur la plej altan pinton de la monto *Sumeru*<sup>184</sup>, sekve sur la ceterajn altebenaĵojn kaj poste sur ĉiujn kampojn. La suno tiel lumas ne pro sia diskriminaciemo, sed nur indifere. Tamen laŭ la teralteco okazas tia sinsekvo. Budha prediko estas kiel la suno. Kvankam lia senlima saĝo lumas tute egale, laŭ sia kapablo iuj pli frue komprenas lian predikon, dum aliuloj pli malfrue. Inter la samtempaj aŭskultantoj de budha prediko unue bodisatvo komprenas ĝin, due memilumiĝinto<sup>185</sup>, trie disĉiplo<sup>186</sup> kaj kvare bonfarinto. Laste eĉ vivulo, kiu havas nenian rilaton al budho, poiome ricevas lian saĝlumon. Do neilumiĝintoj, kiuj kalumnias la instruon de budho malgraŭ ke ili vivas de lia saĝlumo, estas kiel blindulo, kiu neas la bonfaron de la suno pro la nepovado vidi ĝin malgraŭ ke li vivas danke al ĝi. Nu, fidele plenumu nur vian laboron, sed neniel malamu tiajn malsaĝulojn, nek malesperu, nek deprimiĝu. Kiel do homoj ne diferencus inter si per scio?’ Ne preteraŭskultu ĉi tiun instruon, sed prenu ĝin kiel modelon kaj daŭrigu vian studon. Neniel tro interesiĝu pri tio, ke aliuloj mallaŭdas kaj neglektas vin. Monda ŝanĝo estas nenio alia ol taga-nokta ŝanĝo. Kiam malluma mondo lumiĝos, ĉiuj vivuloj rekonos budhan bonfaron kaj kune penos danki budhon.”

**16.** Ĉoj Dohŭa<sup>187</sup> demandis: “Multaj homoj soifas la alvenon de Majtrejo<sup>188</sup> al ĉi tiu mondo

<sup>184</sup> *Sumeru* 수미산 須彌山: laŭ budhana mondrigardo alta monto, kiu elstaras meze de la universo.

<sup>185</sup> Memilumiĝinto 연각 緣覺: *pratyeka-buddha* (s.), sanktulo, kiu ilumiĝis meminstruite kaj plezuras sola neinstruante aliulojn.

<sup>186</sup> Disĉiplo 성문 聲聞: *shravaka* (s.), origine rekteaŭskultinto de Ŝakjamunion, tiu budhano, kiu serĉas ilumiĝon kaj povas atingi ĝin aŭskultante la instruon de budho.

<sup>187</sup> Ĉoj Dohŭa 최도화 崔道華 (1883-1954): ŭonbulana alnomo *Samtaŭon*, laiko, *dehobop*, unu el la naŭ disĉiplinoj de Sotesano.

kaj la konstruiĝon de la eklezio Drakfloro<sup>189</sup>. Kia budho estas Majtrejo kaj kia eklezio estas la eklezio Drakfloro?” Sotesano respondis: “Majtrejo signifas la vastan diskoniĝon de la vero de la darmkorpa budho kaj la eklezio Drakfloro signifas grandluman mondon, nome, tio signifas la vastan praktikiĝon de la maksimumo, ke ja budhofiguro estas ĉie, ni adoru budhon ĉiuage.” *Ĝang Ĝokĝo* demandis: “Se tiel, kiam tia mondo revenos?” Sotesano respondis: “Nun ĝi realiĝas poiome.” *Ĝong Seŭol*<sup>190</sup> demandis: “Kiu estas la unua mastro de tia mondo?” Sotesano respondis: “Kiu ajn unue iluminiĝas, tiu estas la mastro.”

**17.** *Bak Saŝihŭa*<sup>191</sup> demandis: “Nun iuj sektoj asertas, ke Majtrejo jam alvenis kaj konstruas la eklezion Drakfloro. Kiu el ili estas la vera eklezio Drakfloro?” Sotesano respondis: “Ne konstrueblas la eklezio nur vorte. Kvankam iu eklezio diras nenion, se ĝi komprenas la signifon de Majtrejo kaj plenumas nur lian laboron, ĝi nature fariĝas la eklezio Drakfloro kaj povas propraokule vidi Majtrejon.”

**18.** *So Deŭon* demandis: “Kiel aspektos la epoko, kiam Majtrejo alvenos kaj komplete konstruos la eklezion Drakfloro?” Sotesano respondis: “En tiu epoko multe pli lumiĝos homa saĝo kaj estos nenia konflikto. Klare distingiĝos vero de malvero kaj poiome foriĝos preĝo al budhofiguro por feliĉo kaj vivdaŭro. Homoj ĉiapene preĝos laŭokaze kaj laŭsituacie al ĉiuj estaĵoj en la universo kaj al la malplena darmmondo por riĉeco, rango kaj vivdaŭro. Ĉiu iĝos viva budho kaj sin savos. Ĉiu rekonos sin enhavanta budhan povon kaj ĉiuhejme loĝos budho. Ne estos loko aparte asignita al templo, sed ĉiupaŝe troviĝos nenio alia ol templo. Kiel do eblus esprimi parole kaj skribe la grandiozecon de la epoko? En la mondo, kie la eklezio Drakfloro konstruiĝos, la budha darmo estos ĉieesta, tiel ke diferenco inter pastro kaj laiko malaperos, leĝo kaj moralo ne malhelpos sin reciproke, studo kaj vivo ne malhelpos unu la alian, kaj ĉiu vivulo egale ĝuos la virton.”

**19.** Sotesano diris: “Nun iuj homoj asertas, ke la mondo atingos sian finon kaj ne havos alian vojon krom eterna detruigo. Sed mi ne opinias tiel. Ja forviŝiĝis antaŭ longe la spuroj de sanktuloj kaj mallumiĝis justeco kaj moralo, tiel ke fakte la mondo troviĝas en sia fino, sed ĝi ne detruigatas nunstate. La venonta mondo estos vere civilizita mondo. Nun estas la fino de malnova mondo kaj la komenco de nova. Tre malfacilas antaŭvidi la estontecon, sed nur kiu antaŭvidas la venontan civilizitan mondon, tiu ĝuas trankvilon kaj plezuron.”

**20.** Sotesano plu diris: “Ĉiu homo en la venonta mondo estas ĉi tia. Ĝenerale nunulo bedaŭras la nepovadon forpreni aliulan aĵon, maltrankviliĝas de la nepovado venki aliulon kaj ĉagreniĝas de la nepovado damaĝi aliulon. Sed estonta homo bedaŭras la nepovadon doni ion ajn al aliulo, maltrankviliĝas de la nepovado malvenki kaj ĉagreniĝas de la nepovado helpi aliulon. Ĝenerale nunulo bedaŭras la nepovadon gajni personan profiton kaj maltrankviliĝas de la nepovado gajni altan potencon kaj famon. Sed estonta homo bedaŭras la nepovadon labori por la publiko kaj maltrankviliĝas de la nepovado havi liberan tempon por sin kultivi pro la alveno de la ŝanco gajni famon kaj de potenco. Ĝenerale nunulo ŝatas peki, estas malliberejo pekopuna kaj individuoj, familioj, socioj kaj ŝtatoj limigas sin kaj penegas defendi unu kontraŭ la alia konstruante barilon kaj muron. Sed estonta homo malŝatas peki kaj individuoj, familioj, socioj kaj ŝtatoj disrompas sian limon kaj harmonias unu kun la alia. En la nuna mondo regas materia civilizo, sed en la venonta mondo la superega moralo ege disvolviĝos, kulturos homaran spiriton kaj regos materian civilizon,

---

<sup>188</sup> Majtrejo 미륵불 彌勒佛: *Maitreya* (s.), la estonta budho.

<sup>189</sup> Eklezio Drakfloro 용화회상 龍華會BĜ: komunumo de tiuj, kiuj aŭskultos la predikojn de Majtrejo sub la drakflora arbo, *naga-puspa* (s.).

<sup>190</sup> *Ĝong Seŭol* 정세월 鄭世月 (1896-1977): ŭonbulana alnomo *Ĉiltaŭon*, pastrino, unu el la naŭ disĉiplinoj de Sotesano, edzino de *So Ĝungan*.

<sup>191</sup> *Bak Saŝihŭa* 박사시화 朴四時華 (1867-1946): ŭonbulana alnomo *Itaŭon*, pastrino, *debongdo*, unu el la naŭ disĉiplinoj de Sotesano.

kiu helpas la disvolviĝon de moralo. Vi vidus en la baldaŭa estonteco vere civilizitan mondon, kie rabisto ne estos en monto, kaj kie neniu prenos al si aliulan perdataĵon sur vojo.”

**21.** Sotesano plu diris: “Nun ni estas en la tempo, kiam la nokto foriras kaj la suno baldaŭ leviĝos en la oriento. Kiel la oriento leviĝanta suno lumas unue sur la okcidentan ĉielon, la okcidento estas unue civilizita. Kiam la suno en la zenito lumas sur ĉiujn partojn de la universo, ĝuste tiam estas grandmorala mondo kaj vere civilizita mondo.”

**22.** Sotesano diris: “La pasinta mondo estis malsaĝa kaj malluma, tial forta kaj scihava homo povis vivteni sin, ekspluatante malfortajn kaj malsaĝajn homojn. Sed la venonta mondo estos saĝa kaj luma, tial eĉ ajna rangulo ne povos vivteni sin sen justa leĝo, forprenante aliulan aĵon senprave. Do mizeriĝos malbona kaj malvera homo, dum nature riĉiĝos ĝusta kaj vera homo.”

**23.** Sotesano diris: “De la korea ekciviliziĝo multe pliboniĝas vivmaniero kaj grande malfermiĝas obstina scio, sed ankoraŭ neperfekta punkto ŝtopiĝos estonte. En la spirita kampo Koreio estos la plej bona gvidlando el la multaj landoj de la mondo. Nun ĉi tiu lando estas kiel fiŝo, kiu poiome drakiĝas.”

**24.** Sotesano plu diris: “Homoj en la venonta mondo sur belaj pintoj de altaj montoj plantos diversajn arbojn kaj florojn aŭ fosos lageton kaj bredos fiŝojn. Ili dise metos fantaziajn rokojn kaj maljunajn arbojn, tiel ke ili faros belegan parkon, sub kiu ili fosos groton, konstruos domon kaj uzos sunlumon tage kaj elektrolumon nokte. Ili vivos senmanke kaj lukse kaj eldomiĝinte vidus super la domo densan arbaron, en kiu raraj floroj kaj belaj plantoj abundos kaj diversaj birdoj kaj insektoj kantos kaj dancos. Ankaŭ en ĉi tiu lando grandpotenculo konstruos sian rezidejon en fama monto kiel la montoj *Gumgangsán*, *Ĝirisan*<sup>192</sup> kaj *Gususan*<sup>193</sup>, aŭ eĉ faros monton, sur kiu li konstruos sian domon, kaj en domkonstruado li preferos naturan ŝtonon al artefarita materialo. Tiamaniere ĉiuj amos kaj prenos naturan belecon.”

**25.** Sotesano plu diris: “Riĉa eklezio surpinte de granda monto faros flughavenon kaj parkon kaj konstruos pompan kaj grandiozan sanktejon kaj konservos la portretojn kaj biografiojn de porpublikaj sindonuloj, al kiuj klinos sian respekton multaj vizitantoj el ĉiuj direktoj. Fama pastro kultivos sin en diversloka monaĥejo kun belaj pejzaĝoj. Kiam li laŭokaze vizitos templon, la sono de bonvenigaj vivuoj tremigos montojn. Ĉiuj homoj eskortos kaj regalos lin kaj petos lian predikon. Tiam li predikos pri la esencaj vojoj de homo necesaj por la sekulara vivo, pri la principo de karmo kaj pri la okulta principo de naturo. Post la prediko ili rekompencos lin per multaj donacoj. Li fordonos tiujn oferojn al tiu templo kaj iros al alia templo, kie lin atendos la sama bontraktado.”

**26.** Sotesano plu diris: “En ĉiu urbeto establiĝos lernejo. En ĉiu vilaĝo konstruiĝos templo kaj publika renkontiĝejo, kie ĉiuj homoj regule darmkunvenos. Ili tie okazigos oportune ĉiujn ceremoniojn de plenaĝiĝo, geedziĝo, funebro kaj prapatra memoro kaj specialajn predikojn kaj diversajn kunsidojn. Ĉiuj nunaj religioj ne sufiĉe trejnas siajn kredantojn, tial ĝenerale ne estas aparta fido al religiuloj. Sed estonte instrua laboro de ĉiuj religioj sufiĉe progresos kaj iliaj kredantoj trejniĝos konsiderinde, tiel ke ili havos tute malsaman personecon ol netrejnitaĵoj ordinaruloj. Sekve publikaj kaj privataj institucioj nepre multe serĉos religiajn kredantojn por siaj dungotoj.”

**27.** Sotesano plu diris: “Eĉ nun troviĝas laborperejoj en grandurboj, sed en la venonta mondo konsiderindaj laborperejoj diversloke fondiĝos kaj multe servos laborserĉantojn. Svatagentejoj troviĝos kaj ilin multe utiligos geedziĝdezirantoj. Vartejoj establiĝos ĉiuloke

---

<sup>192</sup> *Ĝirisan* 지리산 智異山: naciparka monto alta je 1916 metroj.

<sup>193</sup> *Gususan* 구뵈嵒 九岫山: naŭpinta monto, kiu ĉirkaŭas la sanktan lokon de ŭonbulismo en Jongsan.

kaj patrinoj povos trankvile okupiĝi pri sia profesio. Maljunuloj nehavantaj siajn protektantojn povos vivi senzorge kaj komforte en maljunulejoj, kiujn konstruos kaj prizorgos registaro, organizo aŭ filantropoj. Nun vivo en fora vilaĝo estas tre malkomforta, sed en la venonta mondo eĉ en la plej fora loko ekiĝos diversaj oportunaĵoj, kiuj senlime komfortigos la vivon. Estiĝos manĝejoj, tiel ke homoj ne bezonos ĉiam kuiru hejme kaj tie povos komforte manĝi laŭ sia vivnivelo. Multiĝos ankaŭ kudrejoj kaj lavejoj, tiel ke okupataj homoj ne ĝeniĝos de vestfarado kaj lavado.”

**28.** Sotesano diris: “En la pasinteco estis kutimo, ke homo nur al sia ido heredigis sian havaĵon ĉu multan, ĉu malmultan. Se iu ne havis propran idon, li eĉ adoptis filon kaj transdonis al li sian havaĵon. Sekve idoj pensis, ke ili nepre heredos la gepatran havaĵon. Sed en la venonta mondo homo uzos nur parton de sia havaĵo por adekvate eduki kaj vivteni siajn idojn kaj fordonos la restaĵon por edifa, eduka kaj karitata laboroj. Nunuloj profitigas sin, damaĝante aliulon, sed estontaj homoj rigardos profitodonon al aliulo kiel sian profiton. Ĉar homoj kun la kresko de saĝo mem spertas, ke oni tiom damaĝiĝas, kiom oni damaĝas aliulon, kaj tiom profitas, kiom oni profitigas aliulon.”

**29.** Kiam Sotesano predikis, lia virta digno aspektis subpremanta la tri mil grandmondojn kaj impresis la aŭskultantojn, kvazaŭ ĉiuj kvar naskuloj kune ĝuus lian predikon. Tiam *Bak Saŝihŭa*, *Mun Ĝonggju* kaj *Gim Namĉon* emocie dancis, svingante siajn blankajn harojn. *Ĝon Samsam*<sup>194</sup>, *Ĉoj Dohŭa* kaj *No Doksongok* riverencis sennombre al Sotesano. Tiel ili stimulis la etoson de la darmhalo kaj inspiris superegan ĝojon al la publiko. Tio ŝajnis, ke la tuta universo triumfis. Sotesano ridete diris: “Por fondi grandan eklezion budhoj kaj bodisatvoj kunsidas en la nevidebla vermondo kaj enmondiĝas kun sia respektiva respondeco. Tiuj homoj estas bodisatvoj, kiuj respondecas pri dancado kaj riverencado. Nun nur ni, malmultaj homoj, ĉi tiel ĝuas la scenon, sed estonte ĝin egale kunĝuos la tri mondoj en la dek direktoj kaj la kvar naskuloj en la ses vojoj.”

**30.** Iu disĉiplo diris: “Mi supozas, ke nia eklezio fondiĝis kun granda fortuna, sed mi volas scii, por kiom da dek mil jaroj ĝi prosperos.” Sotesano diris: “Ĉi tiu eklezio diferencas de pasintaj eklezioj kaj estas rara eklezio, kiu naskiĝas laŭ la epoko de ‘reveno al la komenco’, tial ĝia fortuna estas senlima.”

## 15

### Lastaj petoj

**1.** Sotesano diris al disĉiploj: “Kiam mi vidas vin, mi sentas profundan korinklinon al vi, ĉar vi pli frue ol multaj aliaj homoj serĉis specialan rilaton kaj kun speciala aspiro venis por studi ĉi tiun darmon. Tamen mi foje bedaŭras, ke iu el vi maldiligentas en sinkultivo, vekas en si egoisman koron kaj ne bone obeas mian gvidon. Kion do farus tiu, kiu forgesas la celon kaj ne komprenas mian volon, se mi forrifuzos ĉiajn rilatojn kaj iros malproksimen por sinkultivo? Tiam vi ne povos facile realigi la deziron iel ajn revidi min. Nu, rekonsciiĝu por ne havigi al mi tian penson. La mensostato de ilumiĝinto ne mezureblas per ordinara penso. Kiam li faras ajnan laboron, ŝajnas ke li ne forlasus tiun laborejon eĉ por dekmiloj da jaroj, sed kiam li decidiĝas lasi menson, li en unu momento malaperas senspure kiel la malplena ĉielo.”

**2.** En januaro de la dudeksesa jaro de ŭonbulismo (1941) Sotesano deklamis sian darmtransdonan versaĵon kaj diris: “Kutime pasintaj majstroj haste deklamis sian

---

<sup>194</sup> *Ĝon Samsam* 전삼삼 田參參 (1870-1948): ŭonbulana alnomo *Songtaŭon*, laiko, patrino de *Ĝon Umgŭang*.

darmtransdonan versaĵon ĉe la morto, sed mi anticipi al vi. Ili deklamis ĝin sekrete nur al kelkaj disĉiploj, sed mi publike al vi ĉiuj. Tamen tute ricevi la darmon dependas nur de via studo. Pleje strebu al la studo kaj poste ne bedaŭru.”

**3.** Sotesano unu jaron antaŭ la morto ofte urĝis la kompiladon de *La Fundamenta Instruo* kaj kontrolis ĝin ĝis malfrua nokto. Kiam la manuskripto fine estis preta presi, Sotesano diris al disĉiploj: “Pro la tempurĝeco mi ne povis plene senmakuligi la libron, sed en ĉi tiu unu libro preskaŭ esprimiĝis la esenco de miaj tutvivaj aspiroj kaj instruoj. Prenu la libron kaj ĝin lernu vorte, sekvu korpe kaj klarkomprenu mense por transdoni ĉi tiun darmon eterne de generacio al generacio. Estonte sennombraj estos homoj en la mondo, kiuj rekonos ĉi tiun darmon kaj ĝin respektos grande kortuŝite.”

**4.** Sotesano kelkajn monatojn antaŭ la morto ofte diris al homoj kaj individuoj: “Mi baldaŭ iros al profunda loko por ripozi. Ekzameni vin, ĉu vi ne malkuraĝiĝos dum mia foresto, kaj streĉu vian menson. Nun estas la tempo por juĝi. Velkos homo kun malprofunda kredo, dum rikoltos bonan frukton homo kun firma kredo. Mi transdonas mian darmon al iu ajn, kiu estas fidela kaj sindona. Ne lamentu poste pri la nepovado ricevi la darmon, sed rapide prenu ĉi tiun ĝustan darmon libere kaj faru ĝin viaj sango kaj karno.”

**5.** Sotesano iun tagon diris al *Song Gju*: “De la unua renkontiĝo kun mi ĝis nun vi faras nur tion, kion mi diras al vi, sen aserti vian opinion. Mi scias, ke vi tiamaniere montras vian plejan fidon al mi. Kiel vi faros, kiam mi neatendite forestos ĉe vi longan tempon? Tial de nun provu starigi vian opinion pri ĉiu afero kaj gvidi homojn propraforte.” Sotesano aldiris: “Nuntempe la polica observado pli kaj pli serioziĝas kaj al mi malfacilas pli longe resti ĉi tie. Estonte iuj foje kaŭzos al la eklezio suferon malfacile elteneblan, sed ne okazos krizega situacio. Do estu trankvila.”

**6.** Sotesano diris: “Neniu el vi malsukcesos, se vi sekvante min klopodos diligente laŭ via ekaspiro. Sed kiam iu eniras de malsupera kapablo en mezan kapablon, aŭ kiam iu ne sukcesas transiri la montpasejon de meza kapablo, ĉiuj simptomoj leviĝas kaj ĝenerale li ne povas atingi superan kapablon. Vi devas aparte penadi transiri ĉi tiun teruran montkreston de meza kapablo. Jen estas simptomoj de meza kapablo. La unua estas tediĝi de studo. Homo kun ĉi tiu simptomo sentas ĉion ĝena kaj malinteresa, tiel ke foje li pli malbone pensas kaj parolas ol sekularulo. La dua estas, ke homo ne plene ilumiĝis, sed ne estas tute nescia. Kiam li de tempo al tempo parolas kaj skribas, multaj homoj laŭdas kaj bonvenigas lin, tial li pensas, ke neniu estas super li. Li fidas kaj senkulpigas sin. Li kritikas instruistojn senprudente kaj vulpodubas pri darmo kaj vero, tiel ke li ja persistas en sia volo. Ĉi tiu simptomo vanigas lian ĝistiaman penadon kaj fine facile fuŝegas lian eternan grandan laboron, tial pasintaj budhoj kaj patriarkoj plej severe avertis ĉi tiujn vulpodubemulojn kaj nefidemulojn. Sed estas bedaŭrinde, ke nun multaj homoj el vi havas ĉi tiun malsanon. Estas bone ekzameni vin mem kaj liberiĝi de la stato. Alie tio ne nur fuŝos vin, sed ankaŭ kaŭzos grandan malfeliĉon al la eklezio. Forte kuraĝigu vin kaj ĉiapene transiru la staton. La maniero facile liberiĝi de ĉi tiu meza kapablo estas dediĉi vian menson sincere al darmfortohava instruisto kaj samtempe ofte pripensi vian komencan voton kaj konscii la danĝeran finon de meza kapablo. Se vi liberiĝas nur de ĉi tiu stato, vi kuras al budheco kvazaŭ aviadile.”

**7.** En januaro de la dudekoka jaro de ŝonbulismo (1943) Sotesano publikigis la doktrinan skemon novdesegnitajn kaj diris: “Ĉi tiu skemo entenas la esencon de ĉiuj miaj instruoj. Kiom da homoj komprenas mian veran volon? Ŝajnas, ke nur malmultaj homoj el vi tute komprenas ĉi tiun volon. Tion kaŭzas la nepovado koncentriĝi pro tio ke homoj korkliniĝas unue al havaĵo kaj sekso kaj due al famo kaj elmontriĝemo. Ĉiokaze firmdecidu preni aŭ tion aŭ ĉi tiun kaj laŭiru nur unu vojon, kaj vi sukcesos.”

**8.** Sotesano demandis la partoprenantojn de trejnsepio: “Kiu per kia studo en la tutmonda

historio atingis la plej grandan povon kaj fariĝis la savŝipo por ĉiuj vivuloj vagantaj en sufermaro? Kian povon vi volas atingi per via studo ĉi tie?” Kelkaj disĉiploj respondis unu post la alia. Sekve *Song Dosong* respondis: “Tiu estas ĉiu budho de la tri mondoj. Ni ekstreme deziras studi por atingi budhan povon. Tra ĉi tiu vivo kaj eĉ miriadoj da estontaj eonoj ni neniel korŝanceliĝas de malvirta vojo kaj bagatela studo kaj ni klopodas atingi budhajn saĝon kaj agon, solvi la problemon de maljuniĝo, malsano kaj morto kaj savi ensufermarajn vivulojn.” Sotesano diris: “Tamen inter vi estas homo, kiu pli adoras eksteran studon, kaj foje estas ankaŭ homo, kiu eksmembriĝas por serĉi eksteran scion. Kiel do ne lamenti? Nu, por plifirmigi vian voton ĵuru strebi ĝisfine al la studo de ĉi tiu darmo.” Ĉiu disĉiplo submetis sian ĵurskribon kaj daŭrigis sian penadon.

9. Sotesano diris: “De post kiam mi fondis ĉi tiun eklezion antaŭ dudek ok jaroj, mi tro interprete predikis pri darmo, tial mi ne zorgas pri homo kun supera kapablo. Sed atingi la veran vojon ŝajnas malfacile al homo kun meza kaj malsupera kapabloj, ĉar ili rigardas darmon facila kaj iĝas naŭvostaj vulpoj<sup>195</sup>. Ja pri tio mi zorgas. De nun ĝenerale ne kliniĝu nur al la interpretado de darmo, sed klopodu kunpraktiki la tri studojn.”

10. Sotesano diris: “Mi fondis multajn ekleziojn en miaj sennombraj antaŭaj vivoj, tamen ĉi tiu eklezio estas la plej grandskala, tial estonte nekalkuleble multiĝos tiaj sindonaj homoj, kiuj volonte dividos la vivon kun ĉi tiu eklezio kiel la unuaj naŭ fondodisĉiploj.”

11. Sotesano diris: “Mi de longe instruas vin, sed mi havas tri bedaŭrindaĵojn. Unu estas, ke estas homoj, kiuj esprimas la okultan veron buŝe, sed malmultas homoj, kiuj atingas la veran staton kondute kaj sperte. La dua estas, ke estas homoj, kiuj vidas per korpa okulo, sed malmultas homoj, kiuj vidas per mensa okulo. La tria estas, ke estas homoj, kiuj vidas la ŝanĝkorpan budhon, sed malmultas homoj, kiuj klare vidas la darmkorpan budhon.”

12. Sotesano diris: “Estas tri malfacilaĵoj en religio. Unu estas scii la absolutan staton de *Ilŭon*. La dua estas konformigi ĉiutagan vivon al la vero de *Ilŭon* kaj praktiki ĝin egale ĉe movo kaj senmovo. La tria estas klarigi koncize la veron de *Ilŭon* al ordinaruloj. Sed ajna malfacilaĵo iĝas facila al tiu, kiu starigas firman menson kaj fidele strebas al ĝi. Ajna facilaĵo iĝas malfacila al tiu, kiu malemas aŭ ĉesas fari ĝin.”

13. Sotesano diris: “Malsaĝuloj ne scias la bonfaron de pluvo kaj roso kaj ordinaruloj tiun de sanktulo. Do ĉiuj homoj ekscias la bonfaron de pluvo, nur post kiam ili suferas sekan veteron, kaj la tuta mondo ekscias tiun de sanktulo, nur post kiam li forpasas.”

14. La deksekan de majo de la dudekoka jaro de ŭonbulismo (1943) Sotesano predikis al la darmkunvenantoj: “Survoje al la domo *Degakĝon*<sup>196</sup> mi renkontis kelkajn infanojn, kiuj ludis en apudvoja bosko. Kiam ili min ekvidis, unu el ili faris signalon kaj ili ĉiuj stariĝinte salutis min. Ili aspektis tre ordaj. Tio montras, ke ili pli kaj pli maturiĝas. Kiam homo estas tre juna, li ne scias bone eĉ la historion kaj parencecon de la plej proksimaj gepatroj kaj gefratoj, des pli sian devon. Sed kun la kresko li ekscias la historion kaj parencecon kaj devon. Tiel same, kiam studanto estas neiluminiĝinta, li ne scias la manieron de budhiĝo, bodisatviĝo, ordinaruliĝo kaj vivuliĝo, sian rilaton al ĉiuj estaĵoj en la universo kaj la principon de naskiĝo kaj morto. Sed kun la studmaturiĝo li ekscias la manieron, la rilaton kaj la principon. Nia progreso en religia studo estas kiel la plenkreskiĝo de infano. Infano kreskas kaj fariĝas plenaĝulo, ordinarulo iluminiĝas kaj fariĝas budho, disĉiplo lernas kaj fariĝas instruisto. Do rapide atingi veran povon kaj fariĝi instruistoj de viaj posteuloj kaj fariĝi grandaj gvidantoj en la granda laboro de vivulsavo kaj mondkuracado. En la libro *Jinfuĉing*<sup>197</sup> estas dirite, ke naskiĝo radikas en morto kaj morto en naskiĝo. Naskiĝo kaj

<sup>195</sup> Naŭvosta vulpo 구미호 九尾狐: metaforo por homo, kiu estas multtalenta, dubema kaj nekredema je instruisto kaj darmo.

<sup>196</sup> *Degakĝon* 대각전 大覺殿: domo kun granda halo en la centra sidejo de ŭonbulismo.

<sup>197</sup> *Jinfuĉing* 음부경 陰符經: *Yinfuching* (ĉ.), unu el la fundamentaj sanktaj libroj de taoismo, verkita ĉirkaŭ

morto estas kiel kvarsezona rotacio kaj taga-nokta ripetiĝo. Tio estas la regulo funkciigi ĉiujn estaĵojn en la universo kaj la vero rotaciigi ĉielon kaj teron. Estas nura diferenco, ke budho kaj bodisatvo scias pri iro kaj veno kaj liberiĝas de ili, dum ordinarulo kaj vivulo ne scias pri ili kaj do ne liberiĝas de ili. La naskiĝo kaj morto de korpo okazas tute egale al budho, bodisatvo, ordinarulo kaj vivulo. Ne kredu nur homon, sed lian darmon. Ĉiapene sciu pri naskiĝo kaj morto kaj liberiĝo de ili. Darmkunveni estas kiel iri bazaren. Indas viziti bazaron, nur kiam vi tie akiras utilon al via vivo, aĉetante aliulan varon laŭbezzone kaj vendante vian varon. Nu, kiam vi darmkunvenas, donu utilan vorton al homoj laŭ via scio, demandu kaj solvu nekonatan aferon, prenu aliulan vorton kiel vian modelon, kaj aparte atentu, ke vi ne venu al templo vane. Ja naskiĝo kaj morto estas granda afero kaj ĉio rapide ŝanĝiĝas. Tial la afero ne malatentindas.”

**15.** Sotesano diris: “Niaj laborceloj estas edifo, eduko kaj karitato. Kunplenumu ilin tri, kaj nia laboro estos senmakula.”

**16.** Sotesano diris: “En ajnaj epoko kaj lando neniel ŝanĝendas la tri studoj, la ok punktoj kaj la kvar bonfaroj, kiuj estas miaj esencaj doktrinoj kune kun la ĉefinstruo *Ilŭon*. La ceteraj detaloj kaj sistemoj ŝanĝeblas konforme al koncernaj epoko kaj lando.”

**17.** Sotesano diris: “En la pasinteco religio, registaro kaj civila organizo regis homojn precipe per diskriminacia leĝo, sed en la venonta mondo ĉiuokaze ne povos harmoniigi ordinarajn homojn per diskriminacia leĝo. Tial nia eklezio kiel budhon respektas grandiluminiĝinton, ĉu pastron ĉu laikon, ĉu viron ĉu virinon, ĉu maljunulon ĉu junulon. Ni ne okazigas naskiĝfeston, mortmemoran ceremonion kaj ĉiujn aliajn ceremoniojn individue, sed ni ĉiuj eklezianoj devas samtage dividi ĝojon kaj malĝojon.”

**18.** Sotesano diris: “Gravas transdoni penike kaj buŝe mian darmon al la sekvaj generacioj, sed pli gravas ne ĉesigi la aŭtoritaton de ĉi tiu darmo eterne en la estonteco, ĝin praktikante korpe kaj spertante mense. Tiam via merito ne mezureblos.”

**19.** Sotesano diris: “La triunuon formas la instruisto, kiu elfaras novan darmon, la disĉiploj, kiuj ĝin ricevas kaj transdonas al postvenantaj homoj, kaj la postvenantaj homoj, kiuj ĝoje ĝin respektas kaj praktikas. Ili ĉiuj havas tute egalan meriton.”

#### Voto al Ilŭonsang

*Ĉi tiun tekston verkis Sotesano en 1938. Por unuiĝi kun la vero de Ilŭonsang, iluminiĝante pri ĝi kaj utiligante ĝin en ĉiutaga vivo, ŭonbulanoj plenkore votas al Ilŭonsang per ofta recitado de ĉi tiu teksto 306-silaba en la korea. La dekstra teksto estas transliterigita en Esperanto.*

#### Ilŭonsang soŭonmun

Ilŭonun onododane ipĝongĉojo, jumuĉoŭole sengsamuninba, ĉonĝi bumo dongpo boprjule bonŭonijio, ĝebul ĝosa bombu ĝungsenge songpumuro, nungisong jusanghago nungisong musanghajo, jusanguro bomjon sangĝu bulmjolo jojo ĝajonhajo murjang segjeul ĝongehajoko, musanguro bomjon uĝue song ĝu ge gonggŭa manmule seng no bjong saŭa sasenge ŝimŝin ĝagjongul tara jukdoro bjonhŭaul ŝikjo hogun ĝingupuro hogun ganggupuro hogun unsengohero hogun hesengounuro iŭa gaĉi murjang segjeul ĝongehajotnani, uri orisogun ĝungsenkun i bopŝinbul ilŭonsangul ĉebadaso ŝimŝinul ŭonmanhage suhohanun gongburul hamjo, tonun sarirul ŭonmanhage anun gongburol hamjo, tonun ŝimŝinul ŭonmanhage sajonghanun gongburul ĝisonguro hajo ĝingupi dego unĥjenun ipulĝionĝong, ganggupi dego hedogun ipĝi anihagirosio ilŭone ŭirjogul otdorokkaĝi soŭonhago ilŭone ĉesonge haphadorokkaĝi soŭonham.